# Heleco

Presorgano de Astura Esperanto Asocio

Organo de Asociación Asturiana de Esperanto

**Numero 97** **Junio - 2021**


# LECIONO DE HISTORIO



## La faŝismoj



## Kio kaj kiaj ili estas

## Kial kaj kiel ili aperas



**Heleco**

Presorgano de Astura Esperanto Asocio
Organo de Asociación Asturiana de Esperanto

Numero 97 Junio - 2021

**Astura Esperanta-Asocio**

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info

**Astura Esperanta Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unuavice en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

| Enhavo | Paĝo |
|---|---|
| Atentindaj aspektoj de la nuntempo | 3-12 |
| LECIONO DE HISTORIO – La faŝismoj | 13-14 |
| Antaŭaĵoj de la afero | 15-17 |
| La Marŝo al Romo | 18-36 |
| Inventado de la faŝismo | 37-47 |
| Tut-germanismo kaj ties mitoj | 48-68 |
| La akso Berlino-Romo | 69-91 |
| La faŝismoj en milito | 92-109 |
| La heredaĵo de la faŝismo | 110-131 |
| Evoluo dela faŝismo | 132-151 |
| Legante pri la faŝismo | 152-170 |
| La faŝismo en la kino | 171-187 |
| Humuro pri la diktaturo | 188 |

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanta Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85



# Atentindaj aspektoj de la nuntempo

Pasis 11 monatoj ekde la apero de la antaŭa numero de ĉi tiu revuo. En ties prezentado ni pritraktis aspektojn de la socia situacio, mondskale, kiuj tiam altiris nian atenton: la disvolviĝon de la pandemio de la kron-viruso, la inter-rasajn kontraŭdirojn… Meritas atenton la evoluo de tiuj problemoj kaj ties rilato kaj interagado kun aliaj elementoj de la problemaro de nia socio.

La pandemio sekvis sian kurson. Nuntempe, kvankam oni disvolvis kelkajn vakcinojn, daŭre mortas multaj personoj en la mondo pro tiu pesto, ĉefe en la ne-disvolvigitaj landoj, ĉar tie ne eblas la amasa vakcinado kiun oni realigas en la riĉaj landoj, t. e. la popoloj de la malevoluintaj landoj, krom la pesto de la kron-viruso suferas ankaŭ, kaj ĉefe, la plej naŭzajn sekvojn de tiu pesto nomata «kapitalismo», la sociekonomia sistemo mondskale dominanta, kies nepra frukto estas la generado kaj senĉesa pligrandigado de malegaleco inter la homoj kaj socia ekonomia malekvilibro.

Cetere, eĉ en la alte evoluinta mondo efikis la pandemio malaranĝante, metante ĥaoson en multajn aferojn. La sanec-servoj ne estis preparitaj por tiaspeca kriza cirkonstanco kaj tio estis kaŭzo de morto de multaj personoj kiuj ne povis ricevi la konvenan kuracan flegadon. Krome estis tre damaĝita la socia (kun)vivado en multaj aspektoj: la spektakloj, la sportaj, kulturaj, religiaj, festaj… renkont-iĝoj. Ne okazis pasintjare, kaj eble ankaŭ ĉi-jare ne okazos la kongresoj de Esperanto; ŝajnas ke ankaŭ la Olimpiaj Ludoj de la nuna jaro ne povos okazi…

De antaŭ junu jaro estas devige kovri la vizaĝon per duon-masko kiam oni eliras for el la hejmo, kaj ŝajnas ke tio ankoraŭ daŭros dum iom da tempo. Oni konstatis ke kelkaj unu-jaraj infan(in)oj kiuj alkutimiĝis vidi la personoj kun vizago kovrita per duon-masko eksentas timegon kiam vidas iun sen tiu aĵo.

Kaj estas ankaŭ la malfavora efiko kiun la pandemio estas farante sur la eko-nomio, la produktiga aparato, tiel en la riĉaj kiel en la malriĉaj landoj. Oni devas atenti pri la sekvoj kiuj rezultos el tiu ekonomia skuo kaj kiamaniere tio respeguliĝos en la politika realaĵo kaj la vivmaniero. Oni pensas ke pro eblaj ŝanĝoj rezultontaj el ĉio-ĉi, la pandemio estos kvazaŭ lim-ŝtono inter la epokoj antaŭ kaj post sia apero.







**La pandemio altrudis egajn restriktojn kaj ŝanĝojn en la homaj kutimoj kaj vivmaniero, en la interhomaj rilatoj.**





**La malriĉaj landoj pli suferis la sekvojn de la pandemio pro ilia malebleco aŭ malfacilo aliri al la merkato de la vakcinoj.**

Sed ĉar oni antaŭvidas novtipan estontecon, estas klare ke interesas koni aŭ esplori la naturon de tiu estonteco. Nu, kiamaniere ni povas fari tian esploradon? Ni devas atenti pri la t. n. «signoj de la tempoj» Kompreneble, la duonmaskoj pasos, sed ni devos adaptiĝi al mondo kiun estas preparante la super-regantoj aŭ mastroj de la sistemo. Estas klare ke la interesoj de tiuj altranguloj ne estas la samaj kiel tiuj de la ordinaraj, vulgaraj homoj. Do, ĉi tiuj devas pristudi, se ili (ni) kapablas, koni tion plej konvenan kaj la manideron efiki por ties realigado. Ni ekzamenu, do, la signojn de la tempojn.

La prezidenteca periodo de ***Donald Tramp*** havis groteskan finon indan je tio, kio estis la tuta daŭro de tiu periodo. Lia politiko kaj la maniero efektivigi ĝin havis proprajn trajtojn, kiuj diferencigis ilin de tio, kion oni povis konsideri, ĝis nun, normalan en tiu tereno. Plej grave estas konstati ke lia stilo havis, kaj havas, imitantojn en aliaj lokoj, ĉefe en Eŭropo, kaj specife en nia lando. Ĉi tiu stilo, kiun iuj nomis "Trumpismo", efektive eniĝas en la formoj de ekstrem-dekstrismo kaj novfaŝismo aperintaj en la lastaj jardekoj, kaj kiuj estas karakterizitaj per alta grado de konservativismo, ksenofobio, rasismo, masklismo, aporofobio, homofobio, socia manko de solidareco, religia fundamentismo...

Ĉi tiuj specoj de novfaŝismaj partioj kaj organizoj ekzistis en Eŭropo antaŭ la prezidenteca periodo de ***Tramp***, sed ili ricevis fortan akcelon pro la influo, kiu ĉio usona havis ĉiam sur nia kontinento. En nia lando, la rezulto de la lasta regiona balotado en Andaluzio (la 2-an de decembro de 2018) estis simptomo aŭ spegulbildo de la ŝanĝo okazanta en la maniero percepti la politikon far konsiderinda parto el la loĝantaro. De tiam la faŝisma partio **VOX** kreskis en politika influo ankaŭ en la cetero de Hispanio. Ege malpliiĝis popolaj mobilizoj kiel


tiu de la 15-M, la feminismaj postuloj kaj tiuj, kiuj, dum la regado de ***Rajoy***, okazis kontraŭ la korupto, la pliiĝo de senlaboreco, la reduktado de la publika sanec- kaj eduk-servo… kaj dume kreskiĝas la ekstrem-dekstrara mobilizado laŭ la formo de ultranaciismo, perforto kontraŭ enmigrintoj, kontraŭ feminismo... kaj ankaŭ kun neraciaj pozicioj kiel la rifuzo de la pandemio de la kron-viruso kaj opozicio al la rimedoj postulitaj por eviti la kontaĝon. Nekredeble ekzistas eĉ movado kiu insistas nei ke la tero estas ronda, kaj en tiu socia sfero el kiu sin nutras sin la novfaŝismo, ekzistas eĉ homoj, kiuj fanfaronas asertante ke ili neniam legis unu libron. La homamaso kiu alsaltis la Kapitolon en Vaŝingtono kontestante la balotan rezulton de la prezidenteca elektado estis konstituita el tiutipaj personoj.

Sendube ĉiam estis homoj kun tiaj reakciaj ideoj, sed ili detenis sin esprimi ilin publike: estis politike malĝuste fari tion. Sed post la alveno de ***Donald Trump*** al la Blanka Domo, tiuj homoj konstatis ke unu el ili eĉ povas fariĝi prezidento de Usono. Ankaŭ estis la precedenco de la sukceso de Berlusconi en Italio. Tiel, la neracio en politikaj kaj sociaj aferoj iĝis laŭmoda, la ekstrem-dekstruloj sentis sin denove protagonistoj de la Historio, kaj plenkonvinkitaj ke nun tio politike ĝusta estas depostuli sian reakcian konceptadon de la socio, ili pretas pasi al la ofensivo.

Ni konstatas ke tio estas okazante, sed ni devas kuraĝi analizi ĝin, interpreti ĝin, ekscii kial ĝi okazas. En ĉi tiu tasko, unua konsidero estas memori la naturon de la faŝismaj movadoj, la klasikajn faŝismojn de la Italio de Mussolini, la Hitlera Germanio kaj la diversaj imitantoj kiujn ili havis diversloke, kiel la frankismon, kiun ni "ĝuis" en nia lando dum kvar jardekoj. La faŝismoj de la pasinta jarcento naskiĝis kiel burĝa reago kontraŭ la influo,



**La prezidenteca periodo de *Donald Tramp* havis groteskan finon indan je tio, kio estis la tuta daŭro de tiu periodo..**



**La ofta mistrakto de blankrasaj policistoj kontraŭ nigruloj en Usono respegulas la ege enradikigita rasisma sento en tiu socio.**







**La klasikaj faŝismoj de la pasinta jarcento estis burĝa reago kontraŭ la komunista projekto, sed… kontraŭ kio mobiliziĝas la nuntempaj faŝismoj?**

kiun la Rusia Revolucio de 1917 kaj ĝia komunisma projekto havis en la industriigita mondo. Tiusence povus ŝajni, ke post la rezulto de la Malvarma Milito, fine de la pasinta jarcento, kun la venko de novliberala kapitalismo super komunismaj reĝimoj, la komunista danĝero pasis, la kapitalismo aperis kiel la sola ebla ekonomia modelo kaj tiel do ne plu estus necese mobilizi la faŝistajn fanatikulojn kontraŭ la komunismo. Sed ni vidas ke denove oni mobilizas tiajn neracian fortojn, sed kontraŭ kio?, kio estas okazante?

Se la faŝisma besto estas denove pretigata, ne estas hazardo, devas esti serioza kialo por tio. Ni memoru, ke sendepende de la neracieco aŭ malklereco de la mobilizata personaro, tiuj, kiuj efektive gvidas la operacion, scias tre bone, kion ili faras. Temas pri la superreganta klaso; Ĝia superregado kaj kontrolo de la ideologia aparato de la sistemo (eduk-aparato kaj inform-medioj) atingas la miraklon mobilizi kontraŭ la interesoj de la ekspluatatoj ne malmultajn ekspluatatojn, ĉar la diferenco inter nura ekstrema dekstrismo kaj la faŝismo estas, ke ĉi tiu sukcesas rekruti laboristojn kontraŭ la interesoj de la laborista klaso, virinojn kontraŭ la postuloj de feminismo, junuloj kontraŭ siaj propraj klasaj interesoj profite al siaj klasaj malamikoj. Temas pri tre ellaborita tekniko de propagando: la mastroj de la sistemo disponas je psikologoj kaj sociologoj (ankaŭ filozofoj kaj teologoj) kun granda scio por manipuli la mensojn de la popolamasoj, kaj grandajn teknikajn rimedojn (gazetaro, kino, televido...) por sukcesi ke multaj homoj forlasu sian legitiman lokon en la fronto de la Klasbatalo pro influo de rasismaj, naciismaj, seksismaj, ultra-religiaj pasiaj sentoj...

Nu, ni devas konkludi, ke se la superregantoj de la sistemo denove uzas la strategiojn uzitajn en la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la pasinta

jarcento, tio estas ĉar ili sentas sin tiom minacataj kiom tiam. Ĝia malamiko hodiaŭ ne estas iu komunista internacio aŭ ia ajn tipo je organizita movado kun alternativa projekto por organizi la socion. La granda defio kiun devas alfronti la gvidantoj de la sistemo estas la kompleksec de la propra sistemo kaj ĉi ties nekapalo doni konvenan solvon al la problemoj kiujn ĝi mem generas. Tio estas, la vera problemo de la kapitalista sistemo estas la realaĵo kiun ĝi mem kreis.


La unua, kaj eble la ĉefa, kontraŭdiro de la sistemo estas la sociekonomia malegaleco. La realo montras ke kapitalismo neeviteble kaj senĉese kreas fortojn kaj kondiĉojn kiuj kontribuas ruinigi la propran sistemon kiu kreis ilin. Konkrete tiu de la socia malegaleco generas senĉesan malekvilibron kaj interfrontiĝon.

Oni kalkulas ke malsatas en la mondo pli ol 800 milionoj da homoj (unu el ĉiu 9 personoj), kaj minacas la vivon de 50 milionoj da infanoj. Tiu nombro iome malkreskis dum la lastaj jaroj, sed oni antaŭvidas ke en la jaro 2050 la afero estos multe pli drameca pro la antaŭvidata pligrandiĝo de la homa loĝantaro. La klimataj ŝanĝoj estas alia el la ĉefaj kaŭzoj de la problemo de subnutrado de milionoj da personoj. Notindas ke la situacio estas precipe pli malbona en Sudameriko kaj plejparto el la afrikaj regionoj. Miliardoj da homoj vivas per malpli ol unu eŭro tage. Ĉi tiu situacio en grandaj areoj de la planedo kaj la armitaj konfliktoj en multaj el ili generas amasan elmigradon de la loĝantaro, kies efikojn ni ankaŭ vidas en nia lando. La 1% de la mondaj riĉuloj amasigas 82% de la tutmonda riĉeco; fakte la 43 plej riĉaj homoj en la mondo havas tiom da riĉeco kiom la 3,8 miliardoj da plej malriĉaj homoj sur la planedo; 115 homoj posedas pli da riĉeco kaj ekonomia potenco ol tutaj landoj. Ni ankaŭ nuntempe vidas la neegalan manieron,









**La ekonomia malegaleco en la mondo generas danĝeran malstabilan kaj eksplodo-povan situacion.**













**La kapitalismo senĉese generas la fortojn kaj cirkonstancojn kiuj kondukas al ĝia ruino.**

kiel la pandemio de la krono-viruso estas alfrontata en riĉaj landoj kaj en la subevoluinta mondo, kaj la skandalo de la privilegioj de la favorataj klasoj rilate al distribuado de vakcinoj. Kaj kiel fono al ĉio ĉi, la neracia formo de ekspluatado de la resursoj de la planedo influas la ekologian ekvilibron kaj riskas la postvivadon de la homaro.

Ĉio-ĉi estas fruktoj, nepra rezulto, de ĉi tiu kapitalisma sistemo, kaj ĉiu provo plibonigi unu el la multaj interagantaj problemoj okzigas intensigo de unu aŭ pli el la ceteraj problemoj. Ekzemple, ĉiu provo nutri la kreskiĝantan loĝantaron pli endanĝerigas la problemon de la klimatŝanĝo, kaj inverse, la planoj por la konservado de la naturmedio kaj la klimato postulas drastan reduktigon de la kosum-nivelo kaj pliakrigus la problemon de la malsato. Alie, ne eblas entrepreni planojn de reduktado de la tera loĝantaro en la nunaj cirkonstancoj de politika malunuiĝo de la homaro kaj la ekzistanta distribuo de la teraj resursoj kaj ties kontrolo. Kompreneble, la ekzistantaj militaj konfliktoj plikompligas tiun situación, kaj de nun oni aldoniĝos la falo de multaj ekonomiaj kaj produktigaj sektoroj kiel sekvo de la pandemio. La propra situacio, pro sia naturo kaj esenco generas siavice tiutipajn perfortajn konfliktojn; nuntempe ekzistas en la mondo kelkaj militoj pli malpli kaŝataj, kaj lasttempe, kiam oni skribas ĉi-liniojn estas okazante grava socia konvulsio en Kolombio. Ankaŭ la ega fluŝo da migrantoj en la mondo kaj la malakcepto kiun plejparto el ili trovas, estas signo de la perversa naturo de la sistemo kiu generis tiun problemon.

La problemo de la kapitalismo estas ke la problemoj kiujn ĝi generas ne havas solvon ene de la kadro de la kapitalismo mem. Ĉiu efika solvo kiun oni devus entrepreni pasas tra la detruo de tiu malbeninda sistemo. Resume, temas pri problemoj, kiuj postulas du aferojn: ŝtata interveno

por solvi ilin kaj tutmonda kunordigo por tut-monda interakordita decido. La superregantaj fortoj de la sistemo, interesitaj pri ĝia konservado, en ia reago de «fuĝo antaŭen», penas kaŝi aŭ minimumigi tiun realon per sia informa aparato.
La ega disvolviĝo de Ĉinio dum la pasintaj jardekoj montras ke la aferoj plej bone funkcias, kiam la ŝtato administras ilin. Ĉi tiu realaĵo ruinigas la oficialan kapitalisman propagandon, kiu insistas ke fiaskis la modelo de planita ekonomio; la intereso de la regantaj klasoj de la kapitalisma sistemo estas la **privata** ekonomio, gvidata de **privata** iniciato, surbaze de **privata** proprieto kaj celanta **privatan** profiton. Ni jam vidis la fruktojn de ĉi tiu **privata** formo de ekonomia administrado kaj la terurajn rezultojn kaj danĝerojn de ĝia aplikado.
Ĝuste kontraŭ ĉi tiu necesa kaj nepra solvo al la mondaj problemoj oni organizas la novan faŝisman krucmiliton. Temas pri milito kontraŭ la ideo ke la ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj devas garantii la egalecon de ĉiuj homoj en la ĝuo de la mondaj resursoj, kaj ke ili devas direkti akademian trejnadon kaj sciencan progreson favore al la tuta homaro, kaj devas administri la sanon de ĉiuj civitanoj egale. La postulo ke ĉiuj ŝtatoj en la mondo kunagadu favore al ĉiuj mondaj civitanoj kolizias kun la **privataj** interesoj de la regantoj de la sistemo. Jen la kontraŭdiro kiu eksplikas la reagon de la profitantoj de la monda situacio, tia kia ĝi estis ĝis nun.
Establinte la naturon de la konflikto, nun necesas analizi, kiamaniere la regantaj klasoj alfrontas ĝin. La novfaŝismo, kiu koncernas nin, estas, en la manoj de la tutmonda financa potenco, armilo aŭ instrumento de ĉantaĝo kontraŭ la ŝtatoj kaj la civitanoj. Ĝi estas senespera provo haltigi la neeviteblon. Neeviteblas ke la Ŝtato alprenu la kontrolon kaj administradon de la ekonomio, produktado, sano, edukado kaj aliaj aferoj kiuj ĝenerale interesas al la tuta socio kaj perversiĝas kiam ili falas en **privatajn** manojn.
En ĉi tiu (klas)batalo, la reganta klaso dediĉas sin potenciigi ultra-dekstremajn opoziciajn movadojn cele premi la regantojn kaj malhelpi la disvolviĝon de progresemaj politikoj. Ĝenerale, multaj regantoj volonte akceptas servi, kiel lakeoj,



**La kapitalista sistemo, pro sia propra naturo, kreas problemojn kiuj ne havas solvon ene de la sistemo mem.**









**Interkontraŭantaj politikaj fortoj kiuj sin nutras el la kontraŭfrontiĝo ekscitas la diskordon celante mal-saman politikan profiton.**

la potenculojn de la mondo. Sed tiuj kiuj volas apliki iome progres-favoran politikon, eĉ se modere, sin trovas antaŭ la ĉantaĝo de la super-regantaj klasoj. Inter la iloj por premi tiajn regantojn troviĝas la faŝismaj movadoj. Estas nepenseble ke la regantoj de la kapitalistaj landoj kuraĝu entrepreni, ekzemple, la naciigon de elektraj firmaoj aŭ simile.

Ankaŭ la apero kaj aktivado de naciismaj, separatismaj, movadoj estas parto de la strategio por embarasi la regantoj pri kiuj la dominantoj de la sistemo ne tute fidas. Ni vidu, ekzemple, la kazon de la separatismaj naciismoj en nia lando kaj reago far la faŝisma movado, ankaŭ ĝi naciisma sed centrisma. Kiam oni verkas ĉi artikolon, estis en Hispanio akra debato pri la temo ĉu meti finon aŭ ne al la enprizoniĝo de la lideroj de la kataluna separatismo kiuj estis kondamnitaj, antaŭ kelkajn jarojn, pro ilia partopreno en la provo sendependigi la regionon. La nuna hispana registaro, konsistanta en kolacio de fortoj de Maldekstraro proponas tiun elpaŝon celante mildigi la konflikton favore al procezo de repaciĝo kaj harmonio en la lando.

Nu, la propono estas samtempe rifuzata, pro mal-samaj kialoj, de la plej radikalaj sektoroj de la interkontraŭantaj pozicioj pri la afero de la separatismo. En la katalunismaj vicoj oni konsideras, prave, ke la mildigo de la puno al la responsuloj de la separtatisma procezo kontribuus malfortigi iliajn naciismajn depostulojn. Ja, kiam oni sin nutras de siaj propraj vundoj, nedezirindas esti kuracata. Dume ankaŭ en la faŝ-imaj vicoj, kiuj forte kaj parade svingas la flagon de la tut-hispana unueco, estas opono al tiu puno-mildigo. La profito kiun la faŝismo kaj la tuta Dekstraro ĝenerale esperas atingi estas la senkreditigo de la registaro de Maldekstro. Kaj krome ambaŭ radikalaj ekstremoj de la poziiĝo pri tiu ĉi temo koincidas en la celo radikaligi kaj venenigi la konflikton ĉar ambaŭ eltiras pro-

fiton el ĝi, ambaŭ estas ĉefroluloj de la milito generitaj de tiu kontraŭdiro. Kaj sepende de kiu atingus la finan venkon en tiu konflikto, la sistemo al kiu servas ambaŭ movadoj eltiras la profiton ke la popolaj aktivuloj de tiu interfrontiĝo estas retiritaj el la fronto de la Klasbatalo, la vera kontraŭdiro de ĉi tiu kapitalista socio.
Estas klare ke por ke la afero disvolviĝu laŭ la interesoj de la superregantoj de la sistemo estas necese ke la popolaj amasoj kiuj ludas kiel peonoj en tiu naciisma konflikto estu nesciaj, t. e. ke ili konu nek siajn klasajn interesojn nek la naturon de la socio kie oni trompas ilin. Same oni povas diri rilate al alia truko kiun la mastroj de la sistemo uzas/is por kapti popolan apogon al politikaj fortoj pli fidelaj al la ekspluatantoj de la popolo.
Ni temas pri iu lasttempa kazo kiu elmontris ke la popola ne-racio favoras la klasan malamikon de la popolaj interesoj. Antaŭ kelkaj semajnoj okazis balotado por elekti la regionan regantaron de Madrido. La ĉefa partio de la hispana Dekstraro atingis egan venkon, kaj ne nur en la burĝaj kvartaloj de la centro de la ĉefurbo sed ankaŭ en la periferiaj urbozonoj loĝataj de malriĉa loĝantaro. Inter la festantoj de la burĝa venko abundis junularo. Ĉi tio estas rimarkinde ĉar en nia lando la junularo havas antaŭ si tre nigran estontecon… kaj nuntempon. La senlaboreco estas enorma en tiu sektoro de la hispana loĝantaro, kaj tiuj kiuj laboras estas submetitaj al tre malfavoraj kondiĉoj: ne-fiksa laborkontrakto, malalta salajro… kaj verŝajne ili ne ĝuos decan emeritiĝon post kelkaj jardekoj; oni scias ke tiu ĝeneracio estas la unua en la historio kiu havos malpli komfortan vivmanieron ol siaj gepatroj.
Kio okazis, do, por ke tiutipa personalo balote apogu sian klasan malamikon? Nu, okazis ke dum pli ol unu jaro, pro la pandemio, estis grandaj restriktoj en pri la ĝuado de liber-tempo: plaĝoj,



**La ne-raciaj reagoj de la amasoj utilas por plifortigi la malamikojn de la interesoj de la popolaj amasoj.**

kafejoj, balo-salonoj… Kompreneble la maldesktra regantaro de la lando devis alpreni la respondecon establi la restriktojn. Dume la dekstrara regantaro de Madrido senrespondece bojkotadis ĉiujn dispoziciojn de la landa regantaro kaj permesis serion da publikaj aktoj kaj kunvivadformoj kvankam ĉi tio estis kaŭzo de pli granda damaĝo (kontagitoj, mortintoj…) far la kron-viruso.

Estis, do, senracia reago de granda parto el la loĝantaro de Madrido-regiono, sed ni scias ke tiaj senraciaj reagoj okazas en specialaj kazoj, ekzemple kiam en granda salono plenplena je personoj estiĝas fajro, la amaso reagas senracie, kaj intencante eliri ĉiuj samtempe okazas pli da mortintoj ol se oni elirus orde, racie.

Se tiutipaj senraciaj reagoj estas pli malpli kompreneblaj en tiaj specialaj kazoj, kiel tiu de la pandemio, malpli pravigebla estas la fakto ke multaj personoj, eĉ el la malataj klasoj, cedas al la instigoj de la faŝismo kontraŭ la enmigrado de homoj venantaj el ter-zonoj kie la vivkondiĉoj estas pli rigoraj favore al la imperiismo kiu ekspluatas ĉiujn.

La ĉantaĝo de la subpremantoj de la mondo direktiĝas kontraŭ civitanoj por ke ili kontentiĝu kun politika kaj ekonomia situacio, kiu damaĝas ilin kaj ne postulu ŝanĝojn laŭ progresema kaj sociala senco. Ĝuste la civitanoj devas reagi kontraŭ tiuj potencoj, kiuj subpremas ilin kaj postuli pli egalecajn politikojn far siaj regantoj. Sen kompleksoj, ni devas postuli, ke la ŝtato, kiu reprezentas ĉiujn, regu favore al ĉiuj kaj ne al la servo de la plurnacioj kaj de la internacia financa sektoro. Ni devas reagi kontraŭ la nova faŝisma krucmilito. Tre multe gravas por ni tio.



**La kazo de la enmigrintoj de Sebto, evidentigis ke la faŝismo instigas la plejn malnoblajn homajn instinktojn por manipuli la homojn kiuj cedas al siaj egoismaj sentoj.**




**La popoloj, kiuj ne konas sian historion, estas kondamnitaj ripeti ĝin**. Ĉi tiu diraĵo, atribuita al Napoleono Bonaparto, estas ofte citata por atentigi pri la utilo kaj la graveco lerni aŭ studi la historion. Tamen, la fakto mem ke oni tiom multe devas memorigi tion atestas ke tia studo ne estas kutima realaĵo en nia socio. Ekzemple, en Hispanio, en la porinfanaj lernejoj nur iomete oni informas la gelernantojn pri gravaj okazintaĵoj de la landa historio (preskaŭ neniom pri universala historio): mezepoka Rekonkero, Katolikaj Gereĝoj, Malkovro de Ameriko, la imperiestro Karolo la 5-a, Filipo la 2-a kaj ĉi ties ampleksa imperio en la mondo, iome pri la milito de hispana sukcedo… Ĝenerale, kaj "hazarde", la kurso finiĝas post la supraĵa lernado pri la napoleona invado de Hispanio en 1808. Do, tre malmultaj personoj en Hispanio konas ion pri la landa historio de la du lastaj jarcentoj: karlismaj militoj, liberalaj revolucioj, militistaj puĉoj. Estas nekredeble granda la nombro da hispanoj kiuj ne scias ion pri ***Rafael de Riego***, ***Juan Álvarez Mendizábal***, ***Baldomero Espartero***, ***Antonio Cánovas del Castillo***… Antaŭ ne multe da tempo iu hispana televidkanalo faris enketon demandante al gejunuloj pri la personulo F. Franko kaj oni konstatis ke plejparto el ili havis ian nebulan ideon pri tiu reginto kaj pri la landa civilmilito de 1936-1939. Tiuj gejunuloj sendube estas tre kompetentaj pri la karieroj kiujn ili studis: informadiko kaj la diversaj branĉoj de la tekniko, sed en kio rilatas al la historio, sociologio, politiko… ili estas viktimoj de la stud-planoj ellaboritaj de registaroj kiuj volis sufoki la t. n. «historia memoro». Por la superregantaj klasoj de ĉi tiu politika sistemo estas tre grave ke la amasoj ne konu la marksistan aserton ke la klasbatalo estas la motoro de historio.

Ja, ekzistas multaj libroj el tiutipa literaturo nomata «historia novelo». Temas pri romanoj aŭ noveloj kies intrigo okazas sur la historia fono de iuj pasintaj epokoj. Inter tiu abunda materialo ne mankas iuj kvalitaj verkoj; menciindas, ekzemple, la verkoj de la finna ***Mika Waltari***. Sed plejparto el tiu novelaro estas nura rakontado de fikciaj travivaĵoj de fikciaj personuloj; la historia fono estas nur tio, fono de la travivaĵoj kaj foje eĉ ne tre historie ĝusta.

Resume, la historia materialo kiun provizas al ni la prihistoria literaturo kaj eĉ la libroj de la historiistoj celas misinformi pri la pasinteco. Tio tute ne estas stranga afero: ni vivas en klasista socio, kaj la dominanta klaso havas intereson kontroli per sia ideologia aparato: literaturo, presaro, libraro… tiun konon kiun oni dissendas aŭ provizas al la publiko. Ankaŭ ĉi tiu zorgo estas parto de la klasbatalo kaj, komprenble, al la superregantoj de la sistemo ne interesas diskonigi la marksistajn teoriojn.

Pri la faŝismo kaj ties lideroj, iliaj biografioj, la Dua Mondmilito en kiu ili intervenis, la karakteraĵoj de iliaj reĝimoj… estas multege da informo. Ĉi tio ŝajne kontraŭdiras nian tezon pri la intereso ne diskonigi tiun informon, kaj tamen tiele estas; la plej efika maniero kaŝi unu libron estas meti ĝin enen de biblioteko. La multenombro da libroj, broŝuroj, revuoj, videoj, filmoj… temantaj pri ***Hitler***, ***Mussolini***, Franko k. a. konstituas la bibliotekon kie oni celas kaŝi la veran konon pri tiuj personoj kaj ties politika celo. Kiel dirite, la instrua sistemo ne vekis en la gelernantoj intereson pri la historio, do multaj personoj disvolvus intereson pri alitipa legado, ekzemple tiu de prisportaj revuoj kaj ĵurnaloj. Sed tiuj kiuj eskapas el tia alienigo kaj serĉas prihistorian informon, fine dronas en tiu biblioteko zorge ellaborita de la ideologia aparato de la sistemo por kaŝi la esencon de la aferoj kaj eviti la komprenon de la realaĵo.

En la kazo de la faŝismo, pri kiu ni temas nun, iu rimedo de la misinformantoj estas detale priskribi la faŝismajn diktaturojn reliefigante ties similecon kun aliaj diktaturoj, konkrete tiuj estiĝintaj en socialistaj landoj, komunistaj reĝimoj. Specialan atenton oni dediĉas montri la identecon inter la reĝimo de Hitlero kaj tiu de Stalino. La simileco ekzistis, kaj objektiva informado ne povas silenti pri tio. Sed la fokusigo de la informantoj en tiu aspekto de la afero ne havas alian celon ol apartigi la atenton de la legantoj el aliaj interesaj rilatoj de la naziismo kaj ĉiuj faŝismoj ĝenerale, konkrete la ekonomiaj rilatoj de tiuj reĝimoj kun la ĝenerala kadro de la kapitalismo en kiu ili naskiĝas kaj disvolviĝas.

Ĉi tiu nia modesta raporto pri la faŝismoj kaj ties historio celas atenti kaj atentigi ĝuste pri tio kion la oficiala propagando de la sistemo volas kaŝi, memori kaj memorigi tion kion la superregantoj de la sistemo volas ke oni forgesu. Se la faŝismoj estus en la historio nura rara realaĵo de la unua duono de la 20-a jarcento, ne indus atenti pri ĝi. En nia lando la sekvoj de tiu doktrino, se nomi ĝin iamaniere, daŭris ĝis preskaŭ la lastaj jardekoj de tiu jarcento en formo de kvardekjara diktaturo kaj postaj puĉo-provoj kaj rezisto rehavi la historian memoron. Nur fine de la pasinta jaro 2019, finfine, la postrestaĵoj de la diktatoro estis forigitaj el la ŝtata monumento kie ili ripozis dum pluaj pli ol kvardek jaroj. Kaj plej grave, nun oni ekvidas en la politika horizonto de la lando (kaj ĝenerale de la mondo) la signojn de reapero de tiaj politikaj monstraĵoj. Evidentas ke la cirkonstancoj kiuj generas ilin daŭre pesistas. Studante la naturon de tiuj cirkonstancoj, ni volas kontribui al la ne-ripetado de pasinta historio.

# Antaŭaĵoj de la afero



Temante pri la afero de la faŝismo, decus oni difini ĝin dekomence. Sed jen la malfacilaĵo: sufiĉas rigardi la enciklopediojn, la verkaron de la specialistoj pri la temo, Interreton kun ties vikipediaj kap-vortoj k. a. por konstati ke ekzistas multenombraj difinoj pri la koncepto «faŝismo», ne ĉiuj koincidaj kvankam ankaŭ ne tre malsimilaj, fakte, ĉiuj veraj sed eble neniu el ili kompleta… Por ni pli gravas ne iu difino pli malpli trafa sed kapti la esencon kaj la veran celon de la faŝismaj movadoj. Kaj tio ĉar tiuj realaĵoj estas io ne evidenta. Ŝajnas ke iuj el la diversaj difinoj, estante ĝustaj, tamen pli kaŝas ol montras la esencon kaj la veran celon de la faŝismo.

Unue, estas interese konstati ke iuj el la karakteraĵoj de la faŝismo aperis jam antikve, konkrete en la Romia Imperio. Estas sciate ke la vorto mem "Faŝismo" kaj ties emblemo derivas el tiu simbolo de la romia povo, la faskoj, konsistantaj el ligaĵo de vergetoj, unu metro kaj duono longaj, ĉirkaŭ hakilo. La unua historia faŝismo, tiu naskiĝinta en Italio en la jaro 1921, prenis la nomon kaj la emblemon el tiu romia simbolo de la politika povo.

Sed la similaĵoj inter ambaŭ politikaj realaĵoj estas pli multenombraj. Ekzemple, estas la afero de la imperi(al)ismo, krome bazita sur elitisma sento. Ĉiuj aristokrataraj kaj militaristaj elitismoj karakteriziĝas pro la disdegno de la febluloj kaj la fremduloj. La romianoj disdegnis kaj malestimis la fremdulojn, al kiuj ili asignis la titolon je «barbaroj» kun la signifo de sovaĝuloj, ne-civilizitaj. Laŭ la imperiisma (mis)etiko, la barbaroj povas esti sklavigataj, kaj ties teroj depredataj kaj ekspropriigataj. Tiutipa ksenofobio kaj simila imperiisma praktiko, kiel sciate, estis distingaj ecoj de la klasikaj faŝismoj de la 20-a jarcento, eĉ se ne ĉiuj imperiismoj kaj elitismoj havas klaran faŝistan karakteron.

La ekzisto mem de la imperiisma afero estis/as la deziro kaj la neceso de la superreganta(j) klaso(j) serĉi eksterajn aventurojn kaj entreprenojn por eviti aŭ malintensigi la internajn soci(al)ajn konfliktojn de ilia socio, t. e. sufoki, anstataŭigi la klasbatalon per militoj kontraŭ fremduloj. Ĉi tio validas kaj por la romia socio kaj por la modernaj faŝismoj.




**La klasikaj faŝismoj prenis el la antikva romia socio emblemojn kaj simbolojn sed ĉefe la elitismon kaj aliajn ecojn de la imperiismo.**

Alia karakteraĵo komuna al la romia socio kaj la faŝismoj estis la troa emfazo de la koncepto de amo al la patrujo. Kompreneble, ĉiuj apartaj nacioj kultivas la amon al sia patrujo, kaj tio eĉ povas esti rigardata kun simpatio kiam oni uzas tiun senton por veki la popolan reziston kontraŭ ekstera agresado. Sed oni uzas ĝin ankaŭ kaj ĉefe kiel ideologian elementon por instigi malamon kaj agresemon kontraŭ fremduloj. La antikvaj romianoj faris kvazaŭ religion el tiu koncepto kun ties specifa kulto kaj ceremonioj. Io simila okazis en la modernaj faŝismoj, speciale en la germana.

Alia similaĵo inter la antikva imperiismo kaj la modernaj de la faŝistaj potencoj estis la kompleta orientiĝo de la tuta socio al la militisma afero, la ekzaltado de la militarismaj valoroj, la emo al militaj venkoj kaj konkeroj, la superĉeesto de la militarista pompo, la trotakso de la militista instruado al la infanoj jam ekde frua aĝo, la emfazado pri la militista disciplino, la abundo de soldataj defiloj kaj aliaj militaristaj parado…

Konekse kun tio antaŭa estis ankaŭ komuna inter ambaŭ socioj, la romia kaj tiu de la modernaj faŝismoj, la kulto al la lidereco. La titolo je «imperiestro» en la romia socio signifis «armea ĉefkomandanto». Tiu titolo estis fiksita kiel simbolo de la absoluta politika povo post la eksterleĝa kapto de tiu povo far Cezaro. ***Mussolini***, krom la titolo je «***Duce***» (Duko) kiu implicas militistan rangon, estis salutata ankaŭ per la titolo je Cezaro. Aliaj titoloj kiel ***Führer***, ***Caudillo***, ***Conducător***… uzataj de aliaj supremaj lideroj havas similan karakteron je karismeca elzaltado.

Alia aspekto, malpli perceptebla, de la tipo je reĝimoj kiujn ni estas prikonsiderante estas ilia kulto al la tradicio, t. e. la kulto al antikvaj kulturoj al kiuj oni atribuas ian perditan

scion: la egiptaj hieroglifoj, la keltaj runoj, k. s. La romianoj konsultadis la sibilajn librojn serĉante en ĉi ties misteraj vortoj respondon al politikaj problemoj kiujn ili devis alfronti. La naziista gnostiko sin nutris per tradiciismaj, esoterismaj elementoj. La plej grava teoria fonto de la itala dekstraro, ***Julius Evola***, miksis la Graalon kun la Protokoloj de la Saĝuloj de Cion, alkemion kun la Sankta Romia Imperio... La fakto mem ke la itala faŝismo serĉis referaĵon en la antikva romia imperio estas signo de tiu inklino al la tradicio. En Hispanio, la faŝista movado kiu naskiĝis en la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento elvokis la epokon de la t. n. Katolikaj Gereĝoj, Isabela kaj Ferdinando kaj alprenis emblemon de tiu reĝa geparo.

Fine, eble la plej notinda karakterizo de tiutipaj aŭtoritatecaj reĝimoj kiuj sekvas la romian modelon estas la radikala malaperigo de la kondiĉo de civitanoj de la homoj vivantaj en ili. La Senato de Romo neniam estis multe pli ol klubo de la riĉuloj de la Respubliko, sed post la starigo de la imperiestra institucio malaperis eĉ tiu modesta signo de popola demarŝado de la politika povo. La cezaroj formale konservis la senatan institucion sed sen politika enhavo; ili mem elektadis la senatanojn, kaj eloficigadis ilin laŭ sia konveno. Same okazis en Hispanio dum la diktaturo de F. Franko. ***Mussolini*** kaj ***Hitler*** eksigis la parlamentojn de siaj landoj. En ĉiuj tiuj kazoj la socianoj restis kiel nuraj regatoj, sen civitanaj rajtoj. La cezaro, lidero, estis la sola esprimanto de la popola volo.

Vidinte kiel la faŝismaj reĝimoj imitis antikvan modelon, ĉu oni povas konkludi ke temis pri stranga neripetebla kaprico? La afero estas pli komplika. Tiuj sociaj retroiroj danĝeras ripetiĝi dum persistas la kaŭzoj kiuj generis ilin. Per sekvaj paĝoj ni pristudos kiuj estas tiuj kaŭzoj.



**Komunaj trajtoj de la antikva kaj la modenaj imperiismoj estis la kulto kaj inklino al ĉio rilate kun la armeo, la permilita konkerado...**




# La Marŝo al Romo

Italio, la pionira lando de la faŝismo, estis atinginte sian reunuiĝon en la jaro 1870 post travenki kaj eksterajn kaj internajn malfacilaĵojn. Eksteraj ĉar plejparto el la nordo de la lando apartenis al la Aŭstria Imperio, kaj internaj ĉar la ĝistiamaj italaj ŝtatoj, ĉefe kvankam ne sole la Papa Ŝtato, kontraŭrezistis la unuiĝ-procezon. La papoj daŭre ankoraŭ dum preskaŭ 60 jaroj post la reunuigo ne agnoskis la italan ŝtaton kaj sin konsideris prizonuloj en la Vatikano. Cetere, la popolaj amasoj de la lando ne estis partoprenintaj en la eventoj kiuj kondukis al la sendependiĝo kaj reunuiĝo de Italio. Tiuj taskoj estis atingaĵo de iu malgranda elito, kaj la itala kamparanaro ne estis konsultita.

Antaŭ la Unua MondMilito, Italio traspertis sociajn, ekonomiajn, regionajn kaj politikajn kontraŭdirojn. La monarkio estis tiu de la Piemonto kaj ne ĝuis specialan aprecon for de tiu regiono. La liberala konstitucio kaj la centrala administracio, se ne vekis rifuzon de la itala loĝantaro, ĝi ankaŭ ne ĝuis ties altiron. La itala nacieco estis dum tiuj jardekoj ia artefaritaĵo; la italoj interesiĝis nur pri la aferoj de ties aparta regiono. Krome estis inter la regionoj gravaj kulturaj kaj ekonomiaj diferencoj kiuj plifortigis la regionalismon kaj la lokalismon. La parlamenta sistemo funkciadis surbaze de provincaj kaj lokaj povoj kiuj estis kontrolinte la politikan vivon ekde Mezepoko. En ĉi tiu sistemo, la centra registaro kun ties ĉefministro sin apogis sur parlamenta plimulto konstituita de kelkaj partioj kaj grupoj kiuj, antaŭ la Unua MondMilito, ofte pli havis provincan ol ideologian bazon. La politika kontrolo de la terposedanta elito realiĝis per voĉdonaj aranĝoj, kiuj malebligis plej multajn italojn voĉdoni. Itala parlamenta liberalismo iĝis maniero intertrakti kun la regionaj interesoj. Nur iompostiom estis ŝanĝiĝanta ĉi tiu situacio: la voĉdonantaro pliiĝis de preskaŭ duon-miliono da italaj viroj en 1870, el 32 milionoj da loĝantoj, al du milionoj en 1881 kaj al tri milionoj post la voĉdona reformo de 1912.

Kiam la Itala Socialisma Partio estis fondita en 1892, la politika elito reagis por meti finon al la parlamenta opozicio pere de la polico kaj la armeo kiel iloj de subpremado. Plej multaj italoj, eĉ tiuj, kiuj povis voĉdoni, montris malmulte da


intereso pri politiko kaj malfidis pro la endemia koruptado kaj la interesoj de gvidantaj politikistoj. Multaj el la trajtoj de la itala parlamenta sistemo estis kompareblaj al tiuj de aliaj sud-eŭropaj ŝtatoj, kiel Portugalujo, Grekio kaj Hispanio. Tamen la manko de reprezentado en Italio pligraviĝis pro la nepartopreno de katolikoj. Kompare kun plejparto el Okcidenteŭropo, la itala ekonomio estis malforta. En Italio mankis esencaj krudmaterialoj, ekzemple karbo, kaj fervojo kaj vojaj konektoj. Tamen la laŭgrada enkonduko de kapitalismaj metodoj kaj moderna maŝinaro kreis en la fruktodona Po-valo novan klason da agraraj riĉuloj, grandan klason de senteraj kamparaj laboristoj kaj mezklasa tavolo de ŝtataj administrantoj kaj teknikistoj. En la nordokcidentaj regionoj, ĉefe ĉirkaŭ la urboj Milano, Torino kaj Ĝenovo, la transformo estis eĉ pli profunda. Tie akcelita industriigo fine venis al Italio kun la disvolviĝo de peza industrio: ŝtalo kaj fero, metalurgio, ŝipkonstruado, armiloj kaj aŭtomobiloj, elektro kaj kemiaĵoj. La rapida industria disvolviĝo generis novan urban laboristan klason kaj samtempe seriozajn problemojn pri loĝado, longajn horojn da laboro en industrioj kaj malbonajn laborkondiĉojn. Sindikatoj iom post iom pliigis sian membraron al kvarono de miliono da membroj en 1900. En la jaroj antaŭ la Unua Mondmilito, pro sindikataj premoj kaj malkomforto pri laborkondiĉoj, socia konfliktado pliiĝis, kulminante per la dutaga ĝenerala striko dum la tiel nomata «Ruĝa Semajno» de junio 1914.
Evidentas ke spite al sia malfrua eniro en la klubon de la eŭropaj landoj, Italio sufiĉe digne staris inter ili. Ĝiaj problemoj ne estis malsamaj kaj multe pli gravaj ol tiuj de la ceteraj nacioj, kaj ĝia industria kaj ekonomia progreso ne estis multe pli malgranda ol tiuj de aliaj landoj. Ĝia liberala, parlamenta sistemo ne estis pli korupta ol tiuj de la cetero de Eŭropo, de Usono, de la SudAmerikaj landoj… Kaj same oni povas diri pri la laborista mobilizado: la itala Ruĝa Semajno de 1914, estis malpli perforta ol, ekzemple, la Tragika Semajno de Barcelono de 1909. Tamen la itala civitanaro, ankaŭ kaj ĉefe la superregantaj klasoj, sentis ian komplekson de malplivaloreco. Kaj tio pro du kialoj: unue ĉar la itala industria disvolviĝo estis konsiderinde pli malalta ol tiu de Germanio, kies reunuiĝo okazis preskaŭ samtempe ol tiu de Italio, konkrete en 1871. Kaj due, kaj ĉefe, tial ke Italio restis preskaŭ tute for de la koloniisma dispartigo fine de la 19-a jarcento.
Ja, preskaŭ la tuta afrika kontinento estis dividita inter la eŭropaj potencoj, kun malmultaj esceptoj, kiel tiu de la Abisenia aŭ Etiopia Imperio. La juna itala nacio, malfrue enirinta en la koloniisman karieron, posedis koloniojn nur en Eritreo kaj Somalio kaj deziris pliigi sian ĉeeston en la Korno de Afriko konkerante Abisenion, kunigante tiel siajn du marbordajn teritoriojn per tero. La ĉefministro, ***Francesco Crispi***, konsideris, ke aktiva ekstera politiko estas la plej bona maniero por malpezigi la fortajn ekonomiajn kaj sociajn streĉiĝojn, kiuj plagis en lia lando. Do li volis plivastigi sian pov-sferon en Etiopio, postulante



*Francesco Crispi*, itala ĉefministro (de 1887 al 1891)



Meneliko la 2a, imperiestro de Etiopio (de 1889 al 1909)



**Batalo de Aduo, fine de februaro – 1896**


protektoratecon sur tiu lando. En oktobro de la jaro 1895, itala armeo de 20.000 homoj invadis la nordon de Etiopio. La etiopia imperiestro Meneliko la 2-a alfrontis la invadon per armeo de 120.000 homoj. En februaro kaj marto de 1896 okazis la definitivaj interfrontiĝoj de ambaŭ armeoj, la t. n. Batalo de Aduo kaj tiu de Monto Belaho. La abisenoj perdis 10.000 kaj la italoj 5.900 homojn, sed la bilanco de la kampanjo estis katastrofa por Italio, la rezulto estis ke la italoj ne kapablis realigi siajn planon je konkerado.
La abisenanoj kaptis grandan kvanton da moderna itala materialo. La ŝoko en Italio estis enorma; Multaj manifestacioj kaj incidentoj okazis en grandaj urboj. En Romo, por preventi tumultojn, estis fermitaj la universitatoj kaj teatroj. La klamado kontraŭ la registaro devigis la ĉefministron ***Crispi*** demisii. En Pavio, homamaso blokis la foriron de trajno kun trupoj. Virinaj asocioj tra la lando postulis la tujan revenon de la italaj trupoj. Kiel sekvo de la batalo, Italio subskribis traktaton per kiu ĝi agnoskis Etiopion kiel sendependan Ŝtaton.
Notindas ke la imperiismo, kiu estis iu el la gravaj distingaj ecoj de la faŝismo jam estis sufiĉe disvastigita en la t. n. civilizita mondo. Ĉiuj eŭropaj landoj aspiris akiri koloniojn kaj/aŭ konservi tiujn akiritaj en antaŭaj jarcentoj. Ĉirkaŭ 1870, du grandaj koloniaj blokoj estis formitaj en Afriko; unuflanke, la restaĵoj de la unua eŭropa ekspansio (esence en la nordo kaj sudo, inkluzive de la hispanaj kaj portugalaj kolonioj), kaj, aliflanke, la francaj kaj britaj kolonioj, frukto de la imperiismo de la industria revolucio. Ĉi tiu imperiisma ideo komenciĝis per filozofia teniĝo, kiu pledis pri la rajto de la plej potencaj nacioj regi ĉiujn tiujn teritoriojn, kies metropoloj estis enirinte en dekadencon. Oni ekzalt-

adis la forton kaj la malegalecon inter la nacioj. Same oni povas diri pri la rasismo. En Usono kaj aliaj amerikaj landoj oni estis masakrante indianajn tribojn por okupi ĉi ties teritoriojn. La nigruloj kaj la anoj de aliaj rasaj etnoj ne estis respektataj kiel civitanoj. Kaj en la "civilizitaj landoj" mem estis egaj interklasaj malegaleco kaj ekspluatado, kaj perforto por sufoki la plendadon de la ekspluatatoj… La tereno estis preta por la apero de la faŝismo. Ĉi tiu estas la pliintensigo ĝis paroksismo de ĉiuj tiuj sociaj putraĵoj. La faŝismaj semoj ĉie disvastigitaj en la socio ĝermas kiam okazas iuj konkretaj kondiĉoj kiujn ni intencas pristudi.

En la kazo de Italio, kie unuafoje ĝermis tia satana socisistemo, ni jam vidis kiom multe efikis sur la animo de tiu popolo la fiasko en la koloniisma aventuro. Tiu fiasko-sento estas unu el la faktoroj, kvankam ne la sola, por la generado de faŝima reĝimo. Alia faktoro estis la disvolviĝo de la klasbatalo. En tiu epoko la respondo de la proletaro al la kapitalista ekspluatado konkretiĝis, en ĉiuj landoj, en du malsamaj movadoj: la socialista, marksism-devena, kiu ne hezitis partopreni en la politika ludo kaj aspiri al la parlamento, kaj la anarkiista, kiu pledis por la «rekta agado», kiu ne ekskludis la sangajn atencojn. Fakte, en 1900 estis murdita, far iu anarkista atenco, la itala reĝo Humberto. En la sama epoko ankaŭ la reĝo de Hispanio suferis perfortan anarkistan atencon, fiaskitan, kaj ne malpli ol du hispanaj ĉefministroj mortis tiamaniere.

En 1900 komenciĝis la reĝado de Viktoro Enmanuelo la 3-a, kiu daŭris ĝis la fino de la faŝismo de Mussolino. De 1901 al 1914 Italio estis regata de ***Giovanni Giolitti***. Ĉi tiu intencis plifortigi la italajn instituciojn starigante novajn kaj efikajn ligojn inter la politika klaso kaj industriaj kaj laboraj interesoj. Tiu periodo estis signita de prospero kaj senprecedenca ekonomia kresko. Sed tamen Italio denove refalis en koloniismajn aventurojn, konflikto kun Turkio kaŭze de la kolonio de Libio. Sed la krizo kiu pli damaĝis la landon kaj pretigis ĝin por la faŝismo estis ĝia interveno en la Unua MondMilito.

Ĉiuj landoj intervenintaj en tiu konflikto agadis egoisme, konkurante pro imperiismaj interesoj, celante konkeri alies koloniojn, kaj krome, per la milito oni celis senaktivigi la laboristan movadon ege disvolviĝinta en tiuj alte industriigitaj landoj; ĝi, la milito, anstataŭis revoluciajn aspirojn. La plej malfeliĉa kaj malplej konscia parto el la loĝantaro estis tiamaniere demetita el la revolucia tereno por esti kondukita al la buĉejo favore al la interesoj de la dominanta klaso. En la klubo de la riĉaj koloniistaj landoj alte industriigitaj, Italio, same kiel Hispanio, estis kvazaŭ malriĉa parenculo. Sed dum Hispanio, konscia pri sia malforto restis for el la konflikto, Italio sin ĵetis al la aventuro ambiciante teritoriajn konkeraĵojn. Pri tiu lando ***Bismarck*** estis dirinte: ***Italio havas egan apetiton sed malfortan dentaron***. La potencoj de la t. n. Triopa Entento promesis al Italio, por ĉi ties aliĝo iliaflanken, interalie, la reakiron de tiuj ital-lingvaj teritorioj ankoraŭ kontrolataj de Aŭstrio.



*Luigi Cadorna* **en 1915**



**Batalo de Isonzo**



**Batalo de** ***Caporetto***

La interveno de Italio en la milito estis ĉefe kontraŭ la Aŭstro-hungara imperio, kaj la koncerna fronto estis en la Alpoj, en la valo de la rivero Isonzo kaj la krutaj pintoj de la Juliaj Alpoj, ideala tereno por la defendanto, la aŭstro-hungara armeo, kiu okupadis la altajn terojn, dum la ofensivo nepre devis esti farita suprenirante. Italio koncentris forton je 900.000 homoj, sed malbone preparitaj. Komence de la kampanjo, la ĉefkomandanto ***Cadorna*** kun siaj 35 diviziojn tre superis la aŭstrianojn, tamen ĉi tiuj ĝuis la avantaĝon okupi la plej altajn zonojn de la tereno kaj disponis je pli supera artilerio. La oficiroj, plejparte el la nordo de la lando, kaj kiuj ricevadis bonan pagon, brutale traktadis la soldatojn kiuj estis plejparte el la sudo. Antaŭ septembro 1915, sepcent soldatoj en la alpa zono estis mortinte je frostiĝo. ***Cadorna*** organizis ofensivon apud la rivero Isonzo. Ekde 1915 al 1917 la milito inter italoj kaj aŭstrohungaroj konsistis el serio da sangaj bataloj en tiu Isonzo-valo. En la unua el tiuj bataloj, en junio de 1915, la itala ofensivo konkeris iom da teritorio sed perdis 15.000 homojn kaj ne sukcesis rompi la aŭstriajn liniojn. Tiujare estis kromaj tri italaj ofensivoj kiuj kostis al tiu lando 230.000 perdojn.

La tria Isonzo-batalo daŭris ĝis novembro kaj el ĝi rezultis nenia utilo por Italio. La kvara batalo daŭris de la 10-a de novembro ĝis 2-a de decembro. Fine la neĝo kovris tiun zonon kaj la operacioj estis suspenditaj ĝis la printempo de 1915. En ĉi tiu jaro estis pluaj kvar bataloj en ĉi tiu fronto sen iu klara venkinto. En 1916 kaj 1917 okazis pluaj kvin bataloj; en la lasta, la dekunua, la italoj atingis sufiĉe da sukceso por ke la aŭstroj petu helpon al la germanoj. En oktobro de 1915 la italaj trupoj suferis egan humiligon en la t. n. Batalo de ***Caporetto***. La centraj imperioj kreis komunan

armeon formitan de ok germanaj divizioj kaj aliaj ok aŭstro-hungaraj sub germana komando. La koncentriĝo de tiuj fortoj surprizis la tute neprotektitajn italojn. La 24-an de oktobro du aŭstra-germanaj korpoj avancis rapide al la urbo ***Caporetto***. Etendiĝis paniko en la italaj vicoj kaj baldaŭ estiĝis granda malordo: fuĝo, insurekcio, rabado... La kolapso de la itala armeo restis en la popola menso kiel signo de la manko de batalema spirito de la italaj fortoj. Ĉirkaŭ 275.000 viroj estis kaptitaj kaj aliaj 350.000 dizertis. La ĝenerala bilanco de la konflikto estis katastrofa por Italio; mortis en la milito 650.000 homoj, preskaŭ 30 elcento el ili je malsano. Krome estis 947.000 vunditoj kaj 600.000 malaperintoj. Poste, la disvastiĝo de la gripo-epidemio de 1919 aldonis preskaŭ 400.000 pliajn viktimojn.

Rezulte de la penoj de la milito, kaj ankaŭ de la revolucio tiam venkinta en Rusujo, estiĝis en Italio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ondo da sociaj tumultoj. En la kazo de Italio, la fiasko-sento estis ĝenerala en la lando. Kontribuis ankaŭ la sekvoj de la ekonomia kosto de la milito: granda inflacio, plialtiĝo de la prezoj… Tiutipaj kondiĉoj kutime generas sociajn konvulsiojn, kiaj la revolucioj. La kazo de la tiama rusa revolucio estis klara ekzemplo de tio. Krom en Rusujo, la monarkioj falis ankaŭ en Germanio kaj Aŭstrio. En multaj landoj estis kreitaj komunistaj partioj laŭ la rusa modelo, ofte kiel skismo aŭ disiĝo de la tiam ekzistantaj socialistaj partioj. En Italio tio okazis en 1921, meze de tiu krizo rezulte de la MondMilito. Sed estis en tiu lando aliaj sekvoj rezulte de la maniero demarŝi la venkon de la potencoj de la Entento.

En Italio, la milito estis kreinta klimaton de intensa naciisma ekzaltado. La tiama liberala regantaro fiaskis en sia intenco akiri la teritoriajn gajnojn kiujn la italoj deziris. La malforteco de la itala pozicio evidentiĝis en la Paco-Konferenco de Versajlo en 1919. La veraj decidantoj en tiu forumo estis la usona prezidento ***Wilson***, la franca ***Clemenceau*** kaj la brita ***Lloyd George***. La francoj kontraŭis la cedon de teritorio fare de la nove kreita jugoslava ŝtato. Ĉi tio signifis, ke la italaj postuloj de Triesto kaj Dalmatio ne povus esti kontentigitaj. Italujo ankaŭ ne estis invitita partopreni la dividon de la Turka Imperio en Proksima Oriento, kiu falis en la manojn de la francoj kaj britoj. Plejmulte el la italoj konsideris, ke ili estis trompitaj de siaj aliancanoj; tiu fiasko-sento ludis gravan rolon en la pliiĝo de la faŝismo, dum la kontraŭsocia ekonomia politiko de la liberaloj nutris la malkontenton de la laboristklaso kaj ties sindikatoj kaj organizoj de Maldekstraro, kaj dume la katolikoj ankoraŭ ne sin sentis integritaj en la ŝtato kreita en 1870. Italio troviĝis, do, en krizo kiu povus estigi revolucion, sed ankaŭ kontraŭrevolucion. Ni penos ekspliki kial okazis la dua opcio kaj ne la unua. Por la venko de socialista revolucio (aŭ simple evolucio) estas necesaj du faktoroj: la objektivaj kaj la subjektivaj kondiĉoj. La objektivaj kondiĉoj, ja, ekzistis tiam en Italio, same kiel ekzistis en Rusio kaj aliaj lokoj. La mondo estis matura por la fina krizo de la burĝa, kapitalista sistemo. Sed la subjektivaj

faktoroj estas alia, pli komplika, afero, konstituita de la ege malfacile taksebla kaj neantaŭvidebla teniĝo de la personoj. En la homamasoj, hazarde kaj nemezureble enestas kaj disvolviĝas kontraŭdiraj sentoj. Estas sentoj kontraŭ la ekspluatado kaj la ekspluatantoj, solidareca sento, sed ankaŭ, rasismaj, imperiismaj, naciismaj, resume egoismaj sentoj. Siavice tiuj subjektivaj faktoroj estas influataj de aliaj subjektivaj, personaj, neatenditaĵoj, kiel la lidereco. La lideroj estas homoj posedantaj tiun psikologian econ kiun en la politika fako ricevas la nomon je «karismo». Lenino kaj Mussolino estis karismaj homoj, sed tre malsamaj de politika vidpunkto, kaj en difinitaj kondiĉoj povas esti decida la fakto ke influu sur la homamasoj unu aŭ la alia. En la kazo de la rusa revolucio estis decida subjektiva faktoro la fakto ke pli influis Lenino kaj ĉi ties bolŝevisma partio; en la kazo de Italio influis alimaniere Mussolino kaj la faŝista partio kiun li kreis. Decas, do, ke iomete atentu pri ĉi lasta personulo.

Benito Mussolino (***Mussolini*** en la itala lingvo) naskiĝis la 28-an de julio de 1883 en iu vilaĝo de la municipo Predappio, ĉe la montpasejoj de la Apeninoj de la itala regiono Romanjo. Lia patro, ***Alessandro*** estis forĝisto kompromitita kun la socialismo. Kvankam li ne estis konata je landa skalo, ***Alessandro*** estis eminenta politikisto en sia regiono, kaj estis konsiderita de la loka polico kiel eble danĝera revoluciulo. Oni publikigis dudek artikolojn liajn en la loka gazetaro, kaj li okupis diversajn postenojn en la Urba Konsilantaro. En 1902, post tumulto en kiu li ne estis rekte implikita, li estis arestita kaj pasigis ses monatojn en malliberejo. Lia filo Benito admiris lin kaj alprenis multajn el liaj valoroj. ***Alessandro*** havis grandan influon sur sia filo kaj kondukis lin al iuj politikaj mitingoj kiam li estis ankoraŭ infano. Benito kaj liaj du fratoj ĉeestis lernejon ĝis ilia 18-jariĝo, io ne ofta en la kamparaj zonoj de Italio en tiu epoko. Benito scipovis legadi en relativa fruaĝo. En iu salezana internulejo kie li lernis li spertis humiligon pro sia humila deveno; en tiu lernejo la infanoj el malriĉaj familioj devis sidadi aparte el la plejmulto el la lernantoj. En tiu epoko li disvolvis agreseman karakteron; el tiu salezana lernejo li estis elpelita tial ke li vundis per iu tranĉilo iun kunlernanton.

Je la fino de siaj lerneja etapo, Mussolino estis perceptita kiel inteligenta, kolerema, ambicia, foje perforta junulo… En 1902, estante dekok-jara, li estis nomumita portempa instruisto en iu lernejo. Tiam li famiĝis kiel ruza kaj donjuano; en sia aŭtobiografio li fiere priskribis unu el la seksperfortoj kiujn li faris en tiu epoko. En aliaj biografioj pri li oni raportas pri alia agreso per tranĉilo, ĉi-foje al iu amikino. Politike li sin direktis al internacia socialismo. Lia kontrakto kiel portempa instruisto ne estis renovigita, sed ŝajnas ke tio estis pro iu skandalo kaŭzita de adulta aventuro lia kun la edzino de iu loka soldato, ne rilate al lia pedagogia praktiko. Tiam li elmigris al Svislando. Ne eblas scii certe la kialojn, kiuj instigis lin foriri. Eblas ke li bezonis monon, ke li klopodis fuĝi de siaj gepatroj aŭ militservo, de iu amafero aŭ de siaj kreditoroj. En


Svisio li pasigis du jarojn, enŝuldiĝis, malsaniĝis (eble je sifiliso, interalie), li forlasis provizoran laboron ĉe ĉokolad-fabriko kaj laŭdire petis almozon; laŭ iuj fontoj, li eĉ kaptis manĝaĵon per minaco. Li loĝis en etaj gastejoj kaj venis pasigi nokton sub ponto en la urbo Laŭzano. Semajnojn post forlasi Italion, li jam estis arestita kiel vagabondo; la polico raportis ke li estis malsana.

Li komencis verki por socialisma ĵurnalo, ***L'Avvenire del Lavoratore*** (La Estonteco de la Laboristoj). Inter la italoj enmigrintaj en Svision, Mussolino baldaŭ elstaris pro sia fajra oratorio. Antaŭ 1903 li difinis sin «aŭtoritateca komunisto», kaj difinis Karlo-Markson kiel «la plej granda el ĉiuj teoriistoj de socialismo», Li estis forpelita el Svisio kiel agitanto, kaj transdonita al la itala polico, kiu malfermis dosieron priskribante lin kiel «impulsivan kaj perfortan junulon». Por fuĝi el militservo, Mussolino revenis al Svisio en januaro de 1904. Li ne estis malkuraĝa, sed ne volis batali por patriotisma kaŭzo je kiu li ne kredis. Komence de 1904, li pasigis plurajn monatojn en Francio, kie li estis denove arestita. Li estis ankaŭ dum iomete da tempo en Germanio kaj Aŭstrio por reveni al diversaj laboroj en Svislando, kaj ricevis la helpon de diversaj socialistaj kolegoj. Tiutempe li elstaris pro sia militanta ateismo: li konsideris la religion kiel malsano de la animo, kiun kuracistoj devas trakti. Aliflanke, li opiniis, ke la nova socialisma moralo devas malaperigi perforton. Forpelita el pluraj svisaj kantonoj, li pasigis multe da tempo studante lingvojn, precipe la germanan kaj la francan, kaj dediĉis longajn horojn por studi en la bonegaj bibliotekoj de Laŭzano. Li estis decidita pruvi, ke li ne estas proleto, sed intelektulo. Tiam li asertadis: «La socialisma movado fariĝis baza neceso por mi; se mi haltus, mi simple

**Benito Mussolino**



**Infanaĝe**



**Polica slipo en 1903**



**Dum la 2-a MondMilito, en 1917**

mortus». Ŝajnas ke en tiu tempo, eĉ kun kelkaj kontraŭdiroj, pri iuj aferoj, lia estmaniero ne estis tre malsimila ol tiuj de aliaj revoluciuloj. Verŝajne, tiam li ankoraŭ ne konis sin mem sufiĉe bone.
Pasis pluaj kelkaj jaroj dum kiuj li, fine, faris militservon, travivivs la forpason de sia patrino kaj akceptis laboron kiel instruisto en iu urbeto de la veneciaj Alpoj, proksime de la aŭstra landlimo. Tie li donis sin al la trinkado, fariĝis konata pro sia prunteprenado de mono kaj pro liaj provokoj al la Eklezio. Eĉ li mem agnoskis poste ke siaj naŭ monatoj en ***Tolmezzo*** estis periodo de "morala malkresko". Li ne povis konservi sian postenon en la loka lernejo. En tiu periodo lia sifiliso devis esti kuracata en loka hospitalo. Aliflanke, ekzistis famo, ke li havis neleĝan filon kiu mortis baldaŭ post la naskiĝo.
Oni ne renovigis lian laboron kiel lerneja instruisto pro protestoj de la gepatroj de la lernantoj. Mussolino denove loĝis en la familia hejmo de Predappio, kie li povis dediĉi sin al studado de la latina kaj la franca por sukcese kandidatiĝi en 1907 por la posteno de mezlerneja franca instruisto. De tiu momento, li fiere nomis sin *profesore*. En marto de la sekva jaro, li akceptis alian laboron kiel profesoro en Oneglio (Ligurio), kie li ankaŭ revivigis sian intereson pri politiko kaj direktis socialisman eldonon nomatan ***La Lima***. Li mem prenis la decidojn kaj establis la politikan linion. Li pensis esti malkovrinta sian plej grandan alvokiĝon, kiel socialista aktivulo, tamen ĝi estis ĉesigita kvar monatojn poste. Reveninte al Predappio, li havis sian unuan sperton kiel politika agitanto: en kamparana striko, el kiu rezultis pluraj vunditoj, Mussolino estis arestita kaj poste liberigita rezulte de lia apelacio.
En 1909 li estis en Aŭstrio, aktivante en la vicoj de la tiea socialista partio, kaj studante en la bibliotekoj. Tiam li verkis eseon titolitan «Trentino vidata de socialisto». Pro lia socialista aktivado kaj verkado en la ĵurnaloj de tiu partio li estis plurfoje arestita. Estante 27-jaraĝa, li revenis kurtatempe por labori kun sia patro, kiu tiam havis unu restoracion, kaj kiu estis reedziĝinta. Mussolino komencis tiam geparan kunvivadon kun Rachele, la filino de sia bopatrino. Sed en tiu tempo li prikonsideris la eblecon elmigri al Usono. Li havis nenian fiksan laboron, kaj devis resti en malliberejo dum iom da tempo pro la nepagado de ŝuldo.
La socialistaj kluboj de ***Forli*** (Romanjo) elektis lin por estri ĉiusemajnan gazeton nomatan ***Lotta di Classe*** (Klasbatalo), unu el la multnombraj socialismaj semajn-ĵurnaloj de Italio. Dum la du jaroj en kiuj li rolis en tiu posteno de direktoro, li disvolvis sian grandan kapablon por politika agitado. Li ofte prononcis diskursojn per kiuj li montris sian malestimon al la demokratia sistemo, kiun li akuzis servi tiujn, kiuj volis sin promocii.
Mussolino havis portreton de Markso surmure en sia oficejo. Li ankaŭ estis konata pro liaj vitriolaj atakoj kontraŭ la Eklezio, kiujn li riproĉis pro sia aŭtoritateco kaj lia rifuzo akcepti liberecan penson. Li verkis romantikan romanon, *Claudia Particella, la amantino de la kardinalo*, situanta en la Trento de la 17a

jarcento. Li malestimis Jesuon Kriston, kiun li akuzis esti instruinta nenion pli ol malkuraĝeco kaj submetiĝo. Li atakadis ankaŭ la armeon, kiun li konsideris "kriminala organizo destinita por protekti kapitalismon kaj burĝan socion". Laŭ Mussolino, la malriĉeco de Italio estis rezulto de la landa elspezo por milita materialo, dum la plimulto de italoj estis analfabetoj. Li konsideris, ke la proletoj ne havas patrujon kaj ke la nacia flago estas «ĉifono, kiu devas esti najlita al amaso da sterko». La itala parlamento estis, laŭ Mussolini, la plej korupta en Eŭropo, ĉar Romo estis urbo de «prostituitinoj kaj burokratoj».
Dum lia restado en Laŭzano, Mussolino interkonatiĝis kun ***Angelica Balabanoff***, juna kaj entuziasma marksistino el Ukrainio, el la revolucia maldekstro, kiu konis Leninon. Ŝi konsideris Mussolinon intelekte tre sendisciplinan. Sub la influo de ***Balabanoff***, Mussolino komencis ĉeesti la lecionojn de la influa itala sociologo kaj ekonomikisto ***Wilfredo Pareto***, kaj samtempe li konatiĝis kun la ideoj de ***Nietzsche***. La ideoj de ***Nietzsche*** tute ne kongruas kun la socialismo, sed Mussolino konstatis ke li sentis altiron al ties idearo, kiu havis egan influon ankaŭ sur Hitlero. La malestimo de la germana filozofo pri la kristanaj virtoj de amo kaj toleremo instigis la kontraŭklerikan Mussolinon, kaj la ribelemo, same kiel lia koncepto de la superhomo, la heroa estro kiu allogas la amasojn. En ***Nietzsche*** li trovis iujn el siaj plej ŝatataj ideoj kaj frazoj: «vivu danĝermaniere» kaj «la volo je povo». Poste, li mem agnoskis ke lia sperto pri socialismo ne estis doktrina. Lia doktrino, tiam kaj poste, estis la doktrino de agado». Centra komponaĵo de lia karaktero estis lia malestimo pri la teorio; tio kio vere gravis por li estis la agado, kiel eble plej perforta.
La kialoj de tio ke internacieca socialisto, kia Mussolino estis antaŭ la milito, tiel rapide fariĝis defendanto de la patriota milito daŭre estas diskutata. Sed, ĉu vere tio estis stranga fenomeno tiam? Ni konsideru ke en tiu kunteksto de la unuaj monatoj de la MondMilito estis okazante simila ŝanĝiĝo en ĉiuj socialistaj organizaĵoj en Eŭropo. Popolamasoj, ĉiuj sociaj tavoloj, eĉ la proletaro, en tiuj eŭropaj landoj: Germanio, Francio, Anglio, Aŭstrio… entuziasme enviciĝis kun la industriaj kaj imperiismaj interesoj de siaj respektivaj landoj, kaj postulis militon kontraŭ alilandaj interesoj, kaj ĉiuj volonte alkuris al la rekrutejoj por iĝi soldatoj. La popola entuziasmo konstituis socian premon favore al la milito; la socialistaj kaj socialdemokratiaj partioj, eĉ se teorie estis sin poziciinte kontraŭ la milito, sin vidis tuj superitaj de la patriota fervoro de la laboristoj kaj de la tuta loĝantaro ĝenerale, kaj fine apogis la militeman teniĝon de la regantaro de siaj respektivaj landoj. Pli ĝuste, oni devas diri ke en tiuj organizaĵoj de Maldekstraro estiĝis malakordo inter inter tiuj favoraj kaj tiuj kontraŭaj al la milito. En Rusujo tiu malakordo konkretiĝis en la rompiĝo de la tiulanda socialdemokratia partio en du tendencojn: menŝevikoj kaj bolŝevistoj; ĉi lastaj sukcesis faligi la caran reĝimon kaj eligi la landon el la milito. En Germanio, post la finiĝo de la milito, la spartakistoj, la pli radikala sektoro de la tiulanda socpartio intencis

imiti la rusan revolucion, sed ili fiaskis kaj estis ekstermitaj de la alia socialista sektoro, kiu uzis por tiu perforta agado la unuajn faŝismajn grupojn kiuj oni estis formante tiam en tiu lando. Fakte, en multaj landoj en la mondo ekzistas hodiaŭ du marksist-devenaj politikaj fortoj: socialista kaj komunista, kies baza malakordo estas ilia teniĝo rilate al la fina celo de la klasbatalo. La unua, kutime havas progresistan programon kies sola celo estas kaŝi la realaĵon ke tiu politika forto definitive instaliĝis en la kapitalistan sistemon kaj ne celas aboli ĝin. Ĉi tiu putra sistemo putrigas eĉ la fortojn kiuj devas malaperigi ĝin.
La putrigo de Mussolino estis relative rapida post la komenciĝo de la Mond-Milito. Ĝis 1914 li jam estis sufiĉe konata en la socialista partio. Li estis en ega kontraŭdiro kun la partia gvidantaro ekde la kongreso de partio en 1910, pro tio ke lia teniĝo estis pli radikala kaj perforta kontraŭ la burĝa sistemo ol tiu de la partio. Rilate al liaj revoluciaj vizioj, eble estis la revolucio mem, kiu instigis lin, prefere ol la tipo je postrevolucia socio dezirata de multaj el liaj socialistaj kamaradoj. Kiam la ĉefministro ***Giolitti*** entreprenis kampanjon por la konkerado de Libio, Mussolino konsideris, ke temis pri kruda provo deturni atenton de la tre gravaj italaj problemoj. Li priskribis patriotan lojalecon kiel «mensogan kaj eksmodan fikcion» kaj esperis, ke la proletaro lanĉos oportunan klasmiliton. La itala proletaro devis prepari sin al ĝenerala striko. Li provis organizi ribelon kontraŭ la milito kaj, kvankam kelkaj fervojoj kaj fabrikoj estis paralizitaj, la ribelo estis sufokita kun relativa facileco. Tamen, Mussolino estis arestita kaj pasigis kvin monatojn en malliberejo. Li famiĝis kiel pasia kontraŭimperiisto, kaj konsideris, ke la milito estas krimo kontraŭ la homaro. Je lia ekskarceriĝo, li famiĝis en ***Forli***, sed tiam li jam havis pli ambiciajn revojn. Li prepariĝis por la sekva nacia kongreso de la Itala Socialisma Partio, tiu de 1912. Tiam li kaptis la atenton de vere entuziasma aŭdienco. Li denuncis la invadon de Libio kaj la moderajn socialistajn gvidantojn, kiuj vizitis la reĝon por gratuli lin pro tio ke saviĝis el iu ĵusa atenco. Mussolini rimarkis, ke tia konduto estas neakceptebla de socialisto kaj ke la murdo de reĝo Humberto far anarkiisto estis valida formo de protesto. La stilo de oratorio de Mussolino kaptis ĉies atenton dank'al la sento de sincereco kaj firmeco kiun ĝi prezentis, tiamaniere ke Mussolino kaj ***Balabanoff*** fariĝis la dominanta frakcio de la gvidado de la partio. Kvar monatojn poste, Mussolino estis nomumita redaktoro de la socialisma gazeto ***Avanti!***. Dum la sekvaj du jaroj, li plifirmigis sian pozicion kiel unu el la gvidantoj de la partio. Kiel redaktoro de la ĵurnalo, li sukcesis duobligi ties eldon-kvanton direktante sin al pli ampleksa publiko de la malaltklasaj legantoj. Lia kunredaktorino estis ***Balabanoff***. Ŝajnas ke ĉi tiu ino iĝis amantino lia, krom iu alia nomata ***Ida Dalser*** kiu naskis al li filon. Krome li havis poste alian amantinon, la judino ***Margherita Sarfatti***. Dum la jaroj, kiam li rolis kiel redaktoro de la ĵurnalo, li dediĉis sin al preparado de la homoj por la tago de la socia revolucio, kiu venos, laŭ li, kiel sekvo de eŭropa milito. En

1913, la socialistoj akiris milionon da voĉdonoj, fakto, kiun oni atribuis al la bona laboro de la gazeto ***Avanti!*** Ĝia propaganda kampanjo eble influis ankaŭ en la mobilizo de la t. n. Ruĝa Semajno, kiu eksplodis en Italio, en kiu pli ol miliono da homoj sin ĵetis manifestacii surstrate.
Baldaŭ poste komenciĝis la MondMilito. Kiel fama peranto de antimilitarisma kaj internaciisma partio, li senprokraste pledis por neŭtraleco. Mussolino subtenis sian neŭtralan pozicion dum pluraj monatoj ĝis ĝi estis neeltenebla. Evidentiĝis, ke la internaciaj laboristaj klasoj mobiliziĝis ĉirkaŭ la naciaj flagoj. En Germanujo, ekzemple, la germana socialdemokratia partio subtenis la militon (kun la escepto de la spartakistoj de ***Rosa Luxemburg***). Mussolino rimarkis, ke la demando pri interveno povas dividi la partion kaj komencis ŝanĝi sian pozicion favore al eniro en la Unuan Mondmiliton. La okazaĵoj en Italio kaj eksterlande inter 1913 kaj 1914 persvadis Mussolinon, kaj la sindikatajn revoluciulojn kun kiuj li kontaktis, ke la marksisma analizo ne taŭgas por Italio. En Italio, la praktikaj limoj de socialisma militemo, kulminantaj per la revolucia fiasko de la Ruĝa Semajno konvinkis Mussolinon, ke nek lia partio nek la itala laborista klaso kapablus efektivigi revolucion. En Eŭropo, la konduto de la laboristoj dum la jaro de 1914 malvarmigis la ĝistiaman fidon de Mussolino pri la klasika laborista solidareco. Krome li konstatis la potencon de naciismo kiel forto por mobilizi popolajn pasiojn. La 18an de oktobro 1914, Mussolini klare favoris eniri en la militon kontraŭ Aŭstrio-Hungario kaj Germanio, deklarante, ke Italio ne povas resti kiel spektanto. Li eĉ ne konsultis siajn kolegojn pri la redakcia estraro de ***Avanti!*** Kaj kiam la afero estis pridiskutata, li trovis sin en la malplimulto, do li devis demisii. Lia flirtado kun la socialismo finiĝis kaj la ekstremisma naciisto aperis. Samtempe li malkovris sian lertecon kiel oratoro.
Mussolino ne havis klarajn politikajn ideojn, sed li ĉiam estis taktikisto; por li ĉiam estis klare la ideoj konvenaj por li ĉiumomente. Pri tio klare atestas la frontpaĝoj de ***Avanti!***. La komenca maldekstrara slogano: «Ne al la milito!», estis poste ŝanĝiĝinta al «De la absoluta neŭtraleco al la aktiva». Baldaŭ li fondis alian ĵurnalon: ***Il Popolo d'Italia***, celante krei sian propran voĉdonantaron, la plej radikalajn socialistojn. Li komencis novan aventuron estante 31-jara. La nova ĵurnalo, eĉ se pretendite socialista, estis financiata, interalie, far entreprenistoj, la ***Fiat***… kiuj atingus profiton se Italio enirus en la milito. Aliaj subvencioj rekte venis el la landa registaro. Tiu rilato kun la mondo de la negocoj radikale ŝanĝis lian vivon: la proprieto de la ĵurnalo provizis al li vivrimedon kaj platformon por sin lanĉi al landa politiko. Publikigita ekde novembro de 1914, la ĵurnaklo de Mussolino pledis favore al la eniro en la militon kaj akre atakadis la Italan Socialistan Partion pro kio li estis elpelita el ĝi.
Fine Italio eniris en la militon kaj Mussolini deklaris ke tio estas glora kaj decida evento. Li ne estis rekrutita tiam, eble al la armeo ne interesis iu revoluciulo en siaj vicoj. Kiam fine li estis rekrutita, Mussolini konstatis ke la milito

estos longa kaj sanga. Eĉ dum la konflikto, Mussolini daŭre administris sian gazeton, per kiu li pledis por ke ĉiuj pli ol tridek-jaraj viroj estu senditaj al la fronto. En decembro de 1915, li profitis permeson por edziĝi al Rachele per civila ceremonio. Naŭ monatojn poste naskiĝis ŝia unua vira infano, ***Vittorio***. Li pasigis jaron kaj duonon en la fronto, kie li estis bone taksata de la superuloj. En februaro 1917, Mussolini rezultis vundita pro eksplodo de kuglo. En junio li estis sendita hejmen pro handikapo kaj revenis al la gazeto. En la tranĉeoj, en kontakto kun la homoj, li konstatis, ke la socialismo ne altiris ilin. Li sentis pasion pri la revolucio, sed ne pri la malriĉuloj aŭ la proletoj, kiuj estis nur la amaso, sur kiu li esperis sin apogi. Li sentis ĉagrenon pro tio ke post la Rusa Revolucio ĉi tiu lando eliris el la milito kaj permesis al Aŭstrio plifortigi sian fronton kontraŭ Italio. Li diris ke Lenino estis malkuraĝa perfidulo al la vera revolucio. Li asertis, ke la rusa estas primitiva popolo kiu devas esti forpelita preter la Uraloj.
Finiĝinte la milito, Mussolino konsideris la finan venkon de Italio en la milito kiel «la plej grandan venkon en la historio de la mondo». En 1918, li ŝanĝis la redakt-orientiĝon de ***Il Popolo d'Italia***. Li difinis la Marksismon kiel «amaso da ruinoj» de neaktualaj ideoj. La gazeta subtitolo ŝanĝiĝis de «Socialista Gazeto» al «Ĵurnalo de la batalantoj kaj produktantoj». Ĉirkaŭ Mussolini, kun la deziro serĉi lokon en la politiko kaj en lia gazeto, komencis kolektiĝi militaj veteranoj, nostalgiaj pri perforto, ĉiutipaj nekontentaj uloj kun la politika klaso... Tiele naskiĝis la ***fasci***, la faskoj, iu simbolo prenita el la romia imperio: ĝi estis pakaĵo de vergoj, portitaj de la eskortoj de aŭtoritatuloj kaj juĝistoj, kiu restis kiel emblemo de la potenco. Mussolini skribis ke la milito estis grandega sukceso, ĉar estis atingitaj preskaŭ ĉiuj naciismaj gajnoj. La «naturaj limoj» de Italio estis certigitaj kaj komencis nova epoko de libereco kaj justeco. Tamen li baldaŭ rimarkis, ke multe pli utilas nutri malkontenton kaj helpi krei la ideon de «kripla paco». Li opiniis, ke Italio devas insisti atingi «grandan imperian destinon» kaj egan teritorian ekspansion.
La 2an de marto 1919, ***Il popolo d'Italia*** anoncis surstratan kunvenon en Milano la 23an por krei «la kontraŭpartion», kontraŭ la ĉiamaj maldekstraro kaj dekstraro, kontraŭ socialistoj kaj popularanoj (katolika partio). La «kontraŭpartio», ekster la tradicia politiko, estis la ***Fasci di Combattimento*** (Batal-faskoj). Ili volis transformi la italan vivon, «per revoluciaj metodoj, se necese». Partoprenis ne pli ol tricent uloj, plejparte sindikatistoj kaj anarkiistoj, krom iuj perfortemaj milit-veteranoj. Mussolini faris mitingon kun altiraj sloganoj sed sen klara linio. Kontraŭ la disipado, aboli la Senaton kaj modernaj proponoj kiel la virina voĉdon-rajto. La baza ideo estis detrui la kapitalisman sistemon, ŝtatigo de bankoj, eksproprietigoj de riĉuloj ktp. Estis ĝenerala deziro fari ion, rompi ĉion, ŝanĝi la realaĵon, kvankam ne estis klare kiamaniere. Tiele difinita, la faŝismo ne estis klara afero. Temis pri ambigua ideo formita de oportunismo, eventualaj

cirkonstancoj kaj politika taktiko, ne sciante Mussolino mem kio tuj elirus el ĉio-ĉi. Li sciis, kion li volis, la povon, kaj la ceteron li elpensis survoje, ĉar ĉefe li havis grandan politikan talenton por kapti la anim-staton de la amasoj kaj reagi rapide. Estas instrua ĉi tiu frazo lia: «Ni permesas al ni esti aristokratoj kaj demokratoj, konservativaj kaj progresemaj, reakciaj kaj revoluciaj, laŭ-leĝaj kaj kontraŭ-leĝaj, laŭ la cirkonstancoj de tempo, loko kaj situacio». Ankaŭ ene estis diverseco, kun la sola komuna afero de la malkontento pro la senlaboreco, la inflacio, kaj la malamo al ĉiu dominanta sistemo. Resume, temis pri ĝenerala mobilizado de ĉiuj kiuj sin sentis forlasitaj de la politiko, sen klara loko en la socio, kaj kiuj volis dediĉi ili mem al ĝi. Sed ĉefe, mezklasanoj: homoj travivintaj la militon, en kiu ili lernis malestimi la dekadencan povon kaj aprezi iajn valorojn pli energiajn. Ili sciis uzi armilojn kaj plaĉis al ili fari tion, ili estis perfortemaj. Ilia argumentado estis la batado.

Monaton post la prezento de la ***fasci***, iu grupo atakis kaj detruis la redakciejon ***Avanti!*** en Milano, kiun Mussolino estis direktinta ĝis antaŭ nelonge. De tiam oftis la perforto: en aprilo de 1920 iuj el ĉi tiaj knaboj atakis socialistan akton kaj per bastonoj mortigis tri ĉeestantojn kaj lasis kvardek vunditojn; la polico ne intervenis. Ja, la aktivularo de Mussolino estis altirante la simpation de la dominanta klaso. Baldaŭ aldoniĝis al ili la ter-posedantoj kiuj abomenis la ruĝulojn kaj volis ordon per perforto, kaj ĉi tiuj estis klare dekstruloj. Tiele naskiĝis la pun-***squadre*** (skipoj da bravulaĉoj). Ĉi tio okazis sur la fono de pliiĝo de la laborista kaj kamparana perturbo, kun okupado de fabrikoj kaj terenoj; temis, ja, pri intensiĝo de la klasbatalo.

En tiu kunteksto okazis la dalmatia afero. En la pacaj interakordoj de Versajlo post la mondmilito en 1919, la italaj postuloj estis ignorataj kaj oni ne donis al tiu lando la teritorion de Fiumo, la nuna Rijeko, en Kroatio. La naciistoj t. n. ***iredentisti***, ne rezignis pri la perdo de la teritorioj de Trentino, ***Venezia Giulia*** kaj Dalmatio. Mussolino komencis ĉi tiun aventuron kun la granda nacia poeto, ***Gabriele D'Annunzio***, kvankam ili tute ne simpatiis unu la alian. La 12-an de septembro de 1919, ***D'Annunzio*** gvidis forton de pli ol mil volontaj «legianoj» kaj armeo-dizertintoj, al la pridisputata urbeto Fiumo. Ĝi kreis egan streĉiĝon inter Italio kaj ĝiaj aliancanoj post la milito. Dum la somero okazis tie tumultoj el kiuj mortis iuj francaj soldatoj, do, por restarigi la ordon, oni decidis malpliigi la grandon de la itala kontingento de la aliancita garnizono. Tio plue kolerigis la lokajn patriotojn kaj militajn aŭtoritatojn en la areo. Antaŭ la krizo de Fiumo, ***D´Annunzio*** kun siaj sekvantoj okupis tiun pridisputatan teritorion. Li okupis la urbon sen kontraŭrezisto kaj restis tie ĝis decembro de 1920. Dum pli ol unu jaro, ***D´Annunzio*** defiis sian propran registaron, la aliancitajn potencojn kaj Jugoslavion. Estis defio ankaŭ por Mussolino mem kaj la faŝisma movado, ĉar se ***D'Annunzio*** sukcesus konkeri ne nur Fiumon, sed ankaŭ Italion, Mussolino iĝus ne pli ol subulo lia. Mussolino devis zorge taksi sian pozicion.



Gabriele d'Annunzio



Tumultoj de la Ruĝa Semajno en 1919



Benito Mussolino en 1919

Li devis deziri sukceson al la operacio, sed li ne povis esti implikita en ebla fiasko. ***D'Annunzio*** deklaris Fiumon sendependan ŝtaton. La incidento estis multe pli ol teatra kaj anekdota faro de la ekscentra verkisto. Temis pri danĝera precedenco kaj klara defio al la Traktato de Versajlo, kaj metis la italan registaron en tiklan nacian kaj internacian situacion. ***D'Annunzio*** ignoris la Traktaton de Rapallo inter Italio kaj Jugoslavio kaj deklaris militon al Italio. Li troigis; la itala armeo fine agadis kaj Fiumo kapitulacis en decembro de 1920, post kiam la itala Mararmeo bombardis la urbon. Mussolino lernis la lecionon de la sukcesoj kaj fiaskoj de la «unua Duko». Feliĉigis lin tio ke unu el liaj ĉefaj rivaloj nuliĝis sen ke li intervenu persone. La nigraj ĉemizoj kaj aliaj simboloj de la movado de ***D'Annunzio*** integriĝis en la faŝisman pompon. Sed Mussolino venis al la konkludo ke estis en la stratoj de Italio kaj ne en la teritorio de Fiumo kie oni devus konkeri la povon.

La unua kongreso de la ***Fasci*** estis en oktobro de 1919 en Firenco, sed denove temis pri ambigua retoriko, kiel la ĉiama sindifino de Mussolino. Iuj historiistoj opinias ke li ne havis enkape ian konkretan ideon pri la ŝtato kaj la partio, li improvizadis survoje, kvankam fine trenis lin la okazintaĵoj. Sed li esence rolis kiel lidero, ĉar li komprenis la malkontenton de la homamaso kaj faris el ĝi politikan sintezon. La faŝisma programo de 1919, prenis elementojn de maldekstre kaj dekstre. De maldekstre, la faŝistoj prenis la postulon de la okhora labortago, la minimuma salajro, kaj iun formon de socia sekureco kune kun kapitalimpostoj. De la dekstraro la faŝismo prenis sian patriotan kaj naciisman retorikon, ĝiajn atakojn kontraŭ la «kripla venko» kaj la frontan malakcepton de la itala socialisma partio. Ĝi postulis «teron por la kamparanoj» kaj re-

prezentadon de la laboristoj en administrado de la industrioj, same kiel progresivan imposton sur kapitalo, eksproprietigon de teroj kaj fabrikoj, kaj konfiskon de la troaj profitoj akiritaj dum la milito. Sendube tio estis kontraŭdira programo, sed la faŝismo celis apelacii al ambaŭ: la maldekstruloj kaj la eksbatalantoj. Ĉiukaze en la balotado de 1919, sen klaraj aliancanoj dekstre kaj maldekstre, la faŝistoj fiaskis: ili atingis nur unu parlamentanon. Gajnis la socialistoj per 32 elcento el la voĉdonoj, kvardek-oble pli ol la faŝitoj. Krome, la kontraŭleĝa posedo de armiloj igis ke Mussolino, inter aliaj, estis arestita, kvankam por mallonga tempodaŭro.
La balotado estis malfavora ankaŭ por la liberala registaro. En la parlamento estis tiam 156 socialistaj deputitoj kaj 100 ***popolari*** (katolika partio). Mussolino konsideris, ke la sola alternativo kiu restis al li estis fari klaran turniĝon dekstren, tial en 1920 li forlasis multajn el la plej maldekstraj elementoj de la faŝisma programo. Por li, la socialista plimulto estis bona novaĵo, ĉar ĝi alarmis la konservativulojn de la lando. Paniko disvastiĝis en la supera burĝaro, kiu du jarojn post la Rusa Revolucio vidis, ke alia povus okazi en Italio. La periodo ekde la fino de la milito ĝis la fino de 1920 estas nomata la ***bienio rosso*** (ruĝa dujaro) en la itala historiografio. La kapto de la povo en Rusio far la bolŝevistoj en 1917 vekis en la burĝaro de Eŭropo timegon pri ebla komunista revolucio. Grandparto el la faŝistaj aktivuloj estis tiuj, kiuj suferis la seriozan ekonomian krizon post la milito. Fine de 1919, kiam la trupoj malmobiliziĝis, la senlaboreco atingis du milionojn da homoj. Inflacio forpafiĝis; la prezoj plialtiĝis preskaŭ 50 elcente. Laŭ la ekonomio malboniĝis, la politika kontraŭfrontiĝo pliiĝis. Post la milito, italaj industriaj laboristoj amase alkuris al la Socialista Partio, kies membraro pliiĝis de preskaŭ 50.000 en 1914 al 200.000 en 1919. Tiu partio celis la revolucion; inspiritaj de la revoluciaj eventoj en Rusio en 1917, la socialistoj postulis la falon de la liberala reĝimo. La celo, laŭ la partio, estis «socialisma respubliko» kaj la «diktaturo de la proletaro». En la kongreso de 1919 oni konkludis ke por atingi tion estus necesa la «uzon de perforto por la konkero de povo». Multaj mezklasanoj teruriĝis. En septembro 1920, industriaj laboristoj okupis fabrikojn en la nordo de la lando. Post kelkaj tagoj, ĉirkaŭ 400.000 laboristoj partoprenis en atakoj al fabrikoj kaj industrioj. La entreprenistoj, en situacio de paniko, petis al la registaro energie agi por meti finon al ĉi tiuj okupoj. Tamen, la registaro de ***Giolitti*** subtenis politikon de neŭtraleco, ĉar li estis konvinkita, ke la uzo de la forto okazigus sangoverŝadon kaj pensis, ke la okupoj ĉesos per si mem. Kiam evidentiĝis, ke la okupataj fabrikoj estis uzataj por fabriki armilojn por la strikistoj, la burĝuloj komprenis ke estus baldaŭ okazonta socialista revolucio. La laboristoj de grandaj kompanioj, kiel ***Fiat***, kreis fabrikajn konsilantarojn, similaj al la sovietoj de la Rusa revolucio. Ĉi tiuj konsilioj konsideris ke la sindikatoj kaj la itala Socialista Partio estis falsaj revoluciuloj. La itala socialista partio estis profunde dividita inter la re-

formistoj, kiuj volis akiri koncesiojn al la laboristoj per la parlamenta sistemo, kaj la ekstrema maldekstraro, poziciigita ĉirkaŭ ***Antonio Gramsci***, kiu volis efektivigi revolucian batalon ekster la parlamento per la konsilioj de laboristoj kaj kontrolo de la produktado fare de ili. Tiele okazis fatala disiĝo inter la partia bazo kaj la gvidantaro. En 1921, ***Gramsci*** kaj ties samideanoj disiĝis el la Itala Socialista Partio kaj fondis la Komunistan Partion de Italio (PCI). ***Gramsci*** kaj liaj komunistoj faris eksperimenton kun la «fabrikaj konsilioj», por fondi novan ŝtaton regatan de laboristoj. Tamen la partio estis tro malgranda por prezenti minacon, kvankam ĝi faciligis la propagandan laboron de la faŝismo.
Mussolino mem tute ne klare sciis kio estis la faŝismo, sed li estis tre lerta kaj li decidis forlasi sian ribeleman maldekstran animon; en la maldekstraro tute ne atentis pri li, kaj en la dekstraro li havis liberan kampon. En la dekstraro estis la timo kaj la malamo al la perturbantoj, la deziron al ordo... En unu el la multaj registaraj krizoj de tiuj jaroj, la faŝistoj spontane sin metis sub la ordonojn de la aŭtoritatoj, kiel paramilitistoj, por defendi la stabilecon. Tiuj knaboj kiuj solvadis problemojn estiĝis modo en la konservativa mondo kaj multaj hastis aldoniĝi al ili. La faŝismo, neekzistinta en la balotado, komencis rapide kreski. Pensante pri la sekva balotado, Mussolino aliancis kun la ĉefministro, la konservativa ***Giolitti***. En la elektoj de 1921, ***Giolitti***, sen aliancanoj, elektis aliĝi al Mussolino kun la espero de enloĝi lin en la parlamenta ludo. Sed la afero rezultis inverse. La tradiciaj partioj subtaksis la faŝismon. Mussolino uzis tiun aliancon por ludi lertan rolon en la balotado. Ĉio-ĉi dum liaj bravulaĉoj daŭre batadis en la vilaĝoj, urboj kaj fabrikoj. Li atingis kvardek kvin parlamentanojn kaj tuj anoncis, ke li ne subtenos registaron de ***Giolitti***, kiu tiam malkovris kiom ĝi estis trompita. Mussolino ŝajnis agi impulseme, per intuicia kaj freŝa inspiro, sed ofte ĉiu lia movo estis kalkulita.
La ***fasci*** kreskis kiel fungoj. Sed ili daŭre ne estis unu partio, ili estis lokaj organizoj kun sia estro, kiuj ŝprucis ĉi tie kaj tie spontane, ĉiu kun siaj lokaj trajtoj kaj ofte kun tre disaj ideologioj ĉar la faŝismon ĉiu komprenis siamaniere, de maldekstre al dekstre, kvankam fine sin altrudis tiuj de la dekstraro. En multaj urboj estis senĉesaj interfrontiĝoj inter ruĝuloj kaj nigruloj, kun mortoj, punaj ekspedicioj, atakoj en iuj regionoj kaj portempa kapto de malgrandaj urboj. Laŭ pliiĝis la sociaj konfliktoj, pliiĝis ankaŭ la faŝista perforto, ofte mendata de komercistoj aŭ terposedantoj. La nombro da faŝismaj taĉmentoj multobliĝis tra la tuta itala geografio. La metodoj estis brutalaj, sed efikaj. En 1920, miliono da terkulturistoj estis en striko. En 1921, la nombro estis nur 80.000. Laŭ Mussolini, estis konfirmita la «fera bezono de perforto». Ĉi tio daŭris tra la vintro kaj printempo de 1921, periodo en kiu pli ol okdek sindikataj oficejoj estis detruitaj, kun ducent mortintoj kaj okcent vunditoj. En la printempo, kelkaj italaj regionoj estis fariĝintaj redutoj de la faŝismo. La polico ne kapablis defendi la ordon, aŭ rigardis aliflanken, ĉefe se la batantoj estis faŝistoj. Ĉar la nigrĉemiz-

uloj batadis pli kaj pli bone, multaj laboristoj iris al la faŝismaj sindikatoj. Estis tri jaroj da latenta civilmilito, kun provoj de militarecaj mobilizoj, antaŭ efemeraj kaj senutilaj registaroj, sed la tradiciaj partioj kaj institucioj ne konsciis pri tio. La demokratio degeneradis. La bildo kompletiĝis per la bankroto de bankoj kaj politika fragmentiĝo en ĉiuj partioj, ĉefe en la maldekstraro. Mussolino komprenis, ke la povo estis surstrate kaj kaptus ĝin tiu kiu dominus la straton. Tiam li komencis gajni la favoron de la urba kapitalismo, kiu komencis financi lian partion. Do li komencis defendi privatajn posedaĵojn. Mussolino ludis duoblan rolon sen plena kontrolo, ĉar liaj bravulaĉoj agadis siamaniere, gvidataj de siaj lokaj estroj, sed samtempe li devis doni ŝajnan garantion de stabileco por ne timigi la burĝaron. Kreita la kaoso far liaj bestoj, li prezentis sin kiel la solan kapablan teni ilin... Liaj klopodoj por efike organizi la faŝismon atingis konvenan por li rezulton kun la fondo de la Nacia Faŝisma Partio en oktobro de 1921: la faŝismo ne plu estis nur movado, sed vera politika partio. La partia kongreso formale agnoskis Mussolinon kiel la gvidanton de la faŝismo.
Socialistoj estis atakataj de faŝistoj, kaj tiu perforto etendiĝis eĉ al la parlamento, kie deputito estis batita de grupo de faŝistoj. Ili tenis siajn armilojn en la parlamentejo kaj minacis kontraŭulojn. La faŝisma brutaleco ankaŭ altiris novajn membrojn al la partio. Fine de 1921, ekzistis jam 834 lokaj sekcioj kaj preskaŭ 250.000 membroj en la Nacia Faŝista Partio. Okaze de ĝenerala striko en aŭgusto 1922, la faŝistoj profitis por montri sin kiel garantiuloj de la ordo, por ke la publikaj servoj funkciu. Estiĝis ĝenerala penso ke tiuj nigrĉemizaj junuloj estis pli efikaj ol la ŝtato, ĉar la ŝtato estis nekapabla; alivorte, faŝismo kaj komercistoj renkontiĝis. Mussolino alvenis al evidenta konkludo: «Se hodiaŭ ekzistus en Italio ia registaro inda je tiu nomo, ĝi devus sendi la ***karabinieriojn*** por dissolvi nin kaj okupi niajn sidejojn. Ne koncepteblas armita organizo kun komando kaj reglamento en ŝtato kun sia armeo kaj polico. Sed okazas ke en Italio la ŝtato ne ekzistas. Ĝi estas senutila, ni nepre devas atingi la povon». Mussolino estis devigita persvadi la grandan kapitalon, ke li estas la plej efika armilo kontraŭ la socialismo, tial li devis rezigni pri siaj plej radikalaj teniĝoj. Li devis rezigni pri sia respublikanismo, ne nur por altiri la altklasan socion, sed, evidente, por trankviligi la reĝon kaj atingi ĉi ties apogon. Estis ankaŭ necese, atingi la simpation de la armeo. Liaj flirtadoj kun la framasonoj estis utilaj al li por kontakti kun iuj altrangaj oficiroj. La lideroj de la framasonismo estis provizinte fondusojn al la faŝismo, kiun ili konsideris valoran aliancanon kontraŭ la socialismo. Tamen li baldaŭ rompis tiun rilaton: en februaro de 1923, li malpermesis al la anoj de la Nacia Faŝisma Partio iĝi framasonoj. Tio estis la plej tipa taktiko de Mussolino: uzi ajnan utilan kontakton, kaj poste rifuzi ĝin senindulge, kiam ĝi jam servis al liaj celoj.
La 24an de oktobro 1922 kolektiĝis en Napolo grandnombro da nigr-ĉemizuloj, sesdek mil homoj. La lando estis matura por la aventuro kaj estis alveninte la

tempo por la granda marŝo al Romo kvar tagojn poste. La celo aŭ preteksto de de tiu faŝista mobilizado esti kontraŭfronti komunistan striko-tagon kiun oni estis organizante por la sekva semajno. La marŝo al Romo komenciĝis per la kapto de institucioj en la ĉefurboj kaj pli-malpli senorda pilgrimado de diversaj grupoj al la ĉefurbo. Sed ĝi vekis timon neproporcian al la vera graveco de la mobilizo. En Romo estiĝis paniko kaj oni petis al la reĝo deklari sieĝo-staton, sed Viktoro-Enmanuelo la 3-a ne kuraĝis fari tion. Iu generalo respondis, «La armeo plenumos sian devon, sed estus prefere ne tion provi». Fine la reĝo telefonis al Mussolino petante ke li prenu la povon. Mussolino ne estis en la marŝo, li restis en Milano atendante la rezulton de la afero kaj pritaksante la eblecon ke reagu la armeo. Survestita per nigra ĉemizo, li alvenis al la palaco ***Quirinale*** la 30-an por intervidiĝi kun la reĝo. Tiam li estis 39-jara.

Estis proksimume tridek mil marŝantoj, kaj tiu nombro duobliĝis survoje dum la marŝado. La 31-an ili paradis en Romo dum ses horoj antaŭ la reĝo. Mussolino diris ke estis tricent mil. La parlamento akceptis la novan ĉefministron per 306 voĉdonojoj kontraŭ 116 kaj en la senato per 196 kontraŭ 19. Socialistoj kaj popularaj, la tradicia politika klaso, ne nur senkreditigis la instituciojn, ili ankaŭ ne sciis defendi ilin. La politikistoj de tiu tempo havas grandan respondecon pri plifirmiĝo de la faŝismo, ĉar mankis al ili iniciato kaj kuraĝo por veki la intereson de la amasoj. Por ili pli gravis kontraŭfronti la komunismon ol malebligi la venkon de la plej fanatikaj fortoj defendantaj la kapitalismon.






Konsiderante la gravecon de la laboristaj mobilizoj de la antaŭaj jaroj ene de granda ekonomia kaj politika krizo en Italio, povas ŝajni strangaĵo, neelpensebla kaj neantaŭvidebla okazaĵo, ke fine la povo estis konkerita en tiu lando, kun granda popola apogo kaj akcepto, far iu politika forto de ekstrema dekstraro. Tamen tia disvolviĝo de la soci-politikaj krizoj estas sufiĉe normalaj, kaj ni vidos ke en la 20-a jarcento estis aliaj similaj kazoj. Unue, la popolaj amasoj ne perceptis Mussolinon kaj la faŝismon kiel dekstraron; cetere grandparto el la popolaj amasoj eĉ ne komprenas la klasan signifon de la terminoj "dekstraro" kaj "maldekstraro". Por tiuj homoj kiuj perdis sian laborpostenon, aŭ estas ekspluatataj iu aŭ alimaniere, ne gravas ĉu la solvanto de ilia problemaro nomiĝas Lenino aŭ Hitlero; ili blinde sekvos tiun kiu promesas kaj ŝajnas alporti la solvon. Cetere la programo de Mussolino en 1922 estis sufiĉe ambigua; troviĝis en ĝi sociaj depostuloj elprenitaj el la socialisma idearo kiun Benito Mussolino estis defendinta dum multaj jaroj. En la faŝismo kiun li enkarnigis poste, tiuj socialistaj depostuloj kunekzistis kaj miksiĝis kun naciismaj kaj aliaj sentoj kiuj troviĝis, ankaŭ ili, en la animo de la tuta loĝantaro, ankaŭ la popolanoj de la malaltaj klasoj de la socio. Kompreneble, la komunistoj de ***Antonio Gramsci***, kaj la socialistoj kiuj iam forpelis Mussolinon en la Socialista Partio, plenkonsciis pri la reakcia naturo de la faŝisma projekto. Tiu klas-konscio estas frukto de ioma intelekta ellaborado, sed la popolamasoj legis/as nek la Komunistan Manifeston nek ion ajn alian.

Do, meze de la konfuzo de la sociaj krizoj atingas sukceson tiu plej aŭdaca. Al ***Gramsci*** mankis tia aŭdaco kiun Lenino havis en Rusio kvin jarojn antaŭe. En tiaj sociaj krizoj tre gravas gvidi movadon, kiel tiu de la bolŝevistoj de Lenino kaj la faŝistoj de Mussolino, kiuj konkeras la straton kaj la animon de la popolamasoj. La popolaj amasoj estas grava faktoro, ĉefa protagonisto, en tiaj cirkonstancoj de krizo en la pinto de la ŝtata povo. En normalaj cirkonstancoj, la armitaj fortoj de la ŝtato: polico, armeo… povas facile sufoki ĉiun ajn popolan mobiliziĝon, sed kiam la socia krizo efikas sur ĉiuj klastavoloj, krizas ankaŭ la

## KULMINO DE LA MARŜO AL ROMO



Je la alveno de la nigr-ĉemizuloj al Romo okazis atakoj kaj dispredado al ĵurnalaj oficejoj de Maldekstraro



Benito Mussolino estas nomumata ĉefministro de Italio far la reĝo Viktoro Enmanuelo la 3-a

disciplino de la membroj de la armitaj fortoj kaj ĉiu el ili agadas kiel unuopaj popolanoj. Tiele okazis en Rusio en 1917 kaj en Italio en 1922. Fakte, la reĝo Viktoro Enmanuelo kaj ĉi ties regantaro ne kuraĝis provi la fidelecon de la armeo por sufoki la marŝon al Romo de la faŝistoj de Mussolino.

Krome, la dominantaj klasoj de la socio estis komencinte simpatii kaj apogi tiun strangan ulon, Beniton Mussolinon, kiu devenanta el la socialistaj vicoj, ŝajne kaj neatendite trovis la politikan formulon ekzorci la fantomon de la komunismo kiu hantis en Eŭropo. La formulo konsistis adresigi la pasiojn de la ekspluatatoj de la kapitalista sistemo for de la klasbatalo. Tiam vivadis ankoraŭ la franca sociologo ***Gustave Le Bon*** kiu, en 1895, publikigis libron titolitan: ***La psychologie des foules*** (La psikologio de la amasoj) kiu ĝisfunde priskribis la funkciadon de la animo de la homamasoj kaj la maniero influi sur ĝi: oni ne scias ĉu Mussolino konis tiun verkon aŭ li mem, dum sia politika aktivado, estis alveninte al la sama kono kiel ***Le Bon***, sed ja, li majstre sciis manipuli la animon de la italaj popolamasoj antaŭ, dum kaj post la marŝo al Romo.

Tiu mobilizo estis grava politika faro de historia vidpunkto ĉar ĝi signis la unuan kapton de la povo far la faŝismo, sed tamen, kiel mobilizo ĝi ne estis eksterordinara socia konvulsio. La marŝantoj estis ne pli ol 30.000 faŝistaj aktivuloj, ne 300.000 kiel deklaris la faŝista propagando. Tiu propagando kreis poste la miton ke 3.000 nigr-ĉemizuloj mortis en la kapto de Romo. La alveno de la mobilizitoj al la ĉefurbo estis antaŭita de atakoj kontraŭ la politikistoj de la opoziciio el kiuj rezultis 12 mortintoj. Post la alveno de la marŝantoj al Romo okazis la kutimaj perfort-faroj: la direktoro de iu ĵurnalo estis devigita, laŭ la faŝista kutimo, trinki ricin-oleon, kaj oni atakis kaj

dispredis socialistajn ĵurnal-oficejojn kaj libro-vendejojn. Grand-nombro da libroj estis bruligitaj, anoncante tion, kio okazos poste en Germanio.
Verdire la perforto estis tute nenecesa ĉar matene de la 30-a de oktobro Mussolino prezentiĝis en la palaco de la Kvirinalo por esti nomumata ĉefministro far la reĝo. De tiam, kaj dum dujara etapo, la faŝista lidero prezentis pri si mem bildon de modereco kaj stabileco en la regado. De tiam en Italio estis jam faŝista ĉef-ministro, sed ne ankoraŭ faŝista registaro kaj eĉ malpli faŝista reĝimo. En la Parlamentejo Mussolino havis nur 35 sidlokojn el 535. En la unua registaro de Mussolino, el 14 ministroj nur kvar, krom li, estis faŝistoj; estis ankaŭ ministroj de aliaj partioj ne tre kontraŭaj al la faŝismo, kiel la *popolari* (katolika partio). Ĉi tio trankviligis konservativulojn kaj liberalulojn, kiuj perceptis la faŝismon kiel ilon por venki la maldekstraron; ili apogis la aliron de la faŝismo al la politika povo kaj pensis ke post la neniigo de la socialistoj ili povos asimili la faŝistojn en la reĝimon aŭ ellasi ilin. Multaj pensis ke al la faŝismo mankis koheran ideologion.
Ĉi lasta opinio estis prava; la faŝismo havis tiam nenian politikan (mem)difinon. Nur en 1932, dek jarojn post la Marŝo al Romo kaj kapto de la povo, aperis iu broŝuro, sufiĉe konciza, titolita: *La Dottrina del Fascismo*. Tiu dokumento estis oficiale atribuita al Benito Mussolino sed oni pensas ke ĝi estis verkita de ***Giovanni Gentile***. En la ĉapitro pri la faŝisma dokumentaro ni recenzas ĉi tiun verketon; ĝi utilas por vidi kia estis la tiama mondkoncepto de Mussolino, kaj ni substrekas la vorton tiama ĉar ok jarojn poste, en 1940, li ordonis kolekti kaj detrui ĉiujn ekzistantajn ekzemplerojn de tiu verko tial ke estis ŝanĝiĝinte lia opinio pri iuj elementoj de ĝia enhavo. Cetere, la «doktrino» estis nura prezentado de bazaj teoriaj ideoj, sed neniu ajn programa elemento. La programoj ĝis tiam prezentitaj de Mussolino en partiaj mitingoj kaj en balotkampanjoj estis sufiĉe ambiguaj kaj kontraŭdiraj. Do li devis konkretigi la veran enhavon de sia politiko. La paperoj povas elteni ĉion kion oni skribas sur ili: la mitingaj tekstoj kaj la balotkampanjaj programoj estis paperoj, ankaŭ la faŝisma doktrino estis papero, sed la regado konkretiĝas en faktoj kiuj povas pruvi aŭ ne sian efikon.
Mussolino, por la konservado kaj pliigo de la akirita de li povo, devis zorgi jam dekomence pri la enhavo de la politiko de li realigata. Tial li agadis modere kaj trudis moderecon al siaj sekvantoj dum tiu unua etapo de sia regado. Dufoje ĉiusemajne li vizitadis la reĝon respektante la protokolon. Por atingi la diktatorecan povon kiun li ambiciis estis necesa al li parlamenta plimulto je kiu li ne disponis, kaj limigi aŭ neŭtraligi la ne-faŝistajn partiojn. El liaj unuaj registaroj estis ekskluditaj la maldekstruloj -socialistoj kaj komunistoj- kaj poste ankaŭ la katolikaj *popolari*.
Post la aliro al la politika povo de la lando, la Nacia Faŝista Partio ricevis amason da novaj membroj: ilia nombro plialtiĝis de 300.000 en oktobro de 1922 al 783.000 fine de 1923. Krome la unuiĝo de tiu partio kun la Itala Naciista Aso-

cio signifis la plialtiĝo de la nombro de parlamentaj sidlokoj kaj 80.000 novaj partiaj membroj. Ĉi tio plifortigis la povon de Mussolino ene de la partio domaĝe al la povo de la lokaj faŝistaj lideroj. Cele plifirmigi sian povon en la partio li kreis la t. n. «Granda Konsilio de la Faŝismo», kaj transformis la faŝistajn eskadrojn en nacian milicon pagatan de la ŝtato. Tiamaniere li posedis privatan armeon de pli ol 30.000 homoj kiujn li povis uzi por timigi la opozicion kaj limigi la povon de la lokaj lideroj de sia partio. La armeo de la lando ne vidis kun simpatio tiun paralelan armeon kies membroj, krome, ricevis pli altan pagon. Tiu milico ĵuradis lojalecon al Mussolino, ne al la reĝo. Ŝajnas evidenta la simileco de tiu milico kun la pretora gvardio de la imperiestroj de la antiva Romo. Ja, la romia imperio estis granda inspiro de la ideoj de Mussolino.
Same kiel la romiaj imperiestroj li volis plikreskigi sian povon nuligante tiun de la Senato kaj Parlamento, kaj aplikiĝis al tiu celo ekde 1934. Tiucele li pripensis pribalotan reformon kiu ebligus al li atingi parlamentan plimulton, kaj por atingi politikan apogon por tiu reformo li konfidis pri la apogo de la konservativuloj, de multaj katolikoj kaj de plejmulte el la liberaluloj. Mussolino proponis ke la partio kiu atingus pli grandan kvanton da voĉdonoj en ĝenerala balotado ricevu du trionojn el la parlamentaj sidlokoj. La faŝistoj estis pretaj teruri la loĝantaron; ĉar Mussolino estis ankaŭ ministro pri internaj aferoj, li povis ordoni al la polico ne interveni dum la faŝistoj disturbis kaj pribatis la opoziciantojn. Krome la ebleco "kontroli" la balotadojn pligrandiĝis metinte faŝistojn en influopovaj postenoj en la lokaj regantaroj. Por ke la proponita pribalota reformo estu aprobata, Mussolino devis ricevi la apogon de la *popolari*, la katolika PPI (Itala Popola Partio) kiu ne ŝajnis tre favora al tiu projekto. Grandparto el la alta klerikaro, kun la papo mem, simpatiis al Mussolino, sed multaj el la parokestroj kaj lokaj simpatiantoj de la PPI profunde abomenis la faŝismon ĉar ili mem estis ofte viktimoj de la perforto de la nigr-ĉemizuloj. Tiam Mussolino pruvis sian politikan lertecon; la perforto kontraŭ la katolikaj organizaĵoj konsiderinde pligrandiĝis, kaj la nova papo, Pio la 11-a, timis ke la apogo al la *popolari* altiru kontraŭ la Eklezio novan kontraŭklerikan kampanjon. En aprilo de 1923 Mussolino eksoficigis la *popolari*-ojn ministrojn; sekve la papo ordonis al Sturzo, ĝenerala sekretario de la PPI, ke li rezignu sian postenon kaj ekziliĝu. Estiĝis malakordo en la partio, iuj katolikaj deputitoj voĉdonis favore al la pribalota reformo, kvankam plejparto sindetenis en la voĉdonado. La fakto ke dum la balotado iuj nigr-ĉemizuloj promenadis en la parlamenta ĉambro sendube influis sur kelkaj parlamentanoj. La leĝo estis aprobita la 21-an de julio de 1923 per 223 voĉdonoj kontraŭ 123. Mussolino, kiu ĉiam sin deklaris kontraŭ-religia, oportunisme intencis bonrilati kun la Eklezio enkondukante la lernadon de la katekismo en la italajn lernejojn kaj la krucifiksojn en la ŝtatajn konstruaĵojn. Tiele li entreprenis la procezon de renormaligo de la rilatoj inter la Eklezio kaj la ŝtato, ĉar, krome, li sciis ke la ambicio de la papo estis solvi la t. n. "roman aferon".

La 6-an de aprilo de 1924 okzis ĝenerala balotado en situacio de teruro kaj evidentaj kontraŭleĝaj faroj. La kandidatoj proponitaj de Mussolino atingis 66 elcenton el la voĉdonoj kaj 374 deputitojn. La *popolari* atingis 39 sidlokojn, la socialistoj 46, kaj la komunistoj 19. Notindas ke voĉdonis nur 7 milionoj kaj duono el la 12-miliona civitanaro kiu rajtis tion fari. Pro la maniero laŭ kiu formiĝis la faŝista partio kaj la diversaj tendencoj kiuj poste aldoniĝis al ĝi, estis en tiu organizaĵo diversaj malsamaj grupoj, foje kun kontraŭdiraj interesoj kaj celoj, kaj Mussolino devis peni por kunigi ilin sub sia lidereco. Oni povas diri ke la faŝismo estis inventante sin mem kaj intencante konkretigi kiu estis ĝia aplikenda socia programo. Mussolino petis al la Parlamento, kaj atingis, ke oni permesu al li regadi per dekretoj dum dek-du monatoj. Verdire, tiu postulo ne estis novaĵo en Italio; oni estis uzinte ĝin kelkfoje ekde 1870 por eviti parlamentajn krizojn. Laŭŝajne ĉio restis normale en la lando: la konstitucio daŭre validis, la reĝo daŭre estis la ŝtatestro, kaj restis netuŝitaj la armeo kaj la ŝtata administra aparato. Ŝajnis ke la registaro de Mussolino estis iu kroma koalicio simila al antaŭaj, sed fakte la politika situacio estis evoluante al diktaturo.



La papo Pio la 11-a

En junio de 1924 okazis evento kiu tre komplikis la procezon de plifirmiĝo de la faŝisma diktaturo. Iu konata socialista deputito, ***Giacomo Matteotti***, estis murdita far faŝistoj en Romo. Li devenis el riĉa familio kaj dum sia studado pri Juro li kontaktis kun la socialista movado, kie li baldaŭ elstaris. Dum la Mond-Milito li pledis por neŭtraleco kaj pro tio li suferis enkarceriĝon en Sicilio. Vigla aktivisto, li distingiĝis ankaŭ pro sia bonfaremo: grandparton el sia salajro kiel deputito li donadis al iu orfejo. ***Matteotti*** profunde abomenis la faŝistan moralon, pro kio li iĝis la plej pasia kri-





La socialista parlamentano
Giacomo Matteotti


tikisto de tiu partio en la Parlamento. Krome al Mussolino tre ĝenis la fakto ke tiu kontraŭfaŝista deputito ĝisfunde esploradis la eksterleĝajn farojn de la faŝistoj en la balotadoj. Surbaze de sia esplorado, li faris en la Parlamento akuzan diskurson. Li jam konis la faŝistan perforton ĉar kelkfoje estis batita far nigr-ĉemizuloj, kaj ankaŭ estis ricevinta minacojn. Tamen li estis konscia ke kvankam subriske perdi la vivon, li devus denonci antaŭ la mondo ke la faŝismo baziĝas sur perforto kaj koruptado. Li estis atinginte pruvojn pri iuj skandaloj, inter ili tio ke iu nafto-firmao ligita al iuj bankieroj akiris per subaĉetado la rajton distribui petrolon en Italio.
La 10-an de majo de 1924 ***Matteotti*** havis en la Parlamento gravan intervenon por protesti kontraŭ la balotado okazinta la 6an de aprilo. Dum la faŝistaj deputitoj kriadis kaj primokis lin, li kuraĝe priskribis la troigojn kaj la eksterleĝan agadon de la faŝistojn por venki en la balotado. Fine de la diskurso, post ricevi la gratuladon de siaj kamaradoj, li diris al ili. *«Mi jam eldiris mian diskurson. Nun vi devos prepari la diskurson por mia funebraĵo».* Kelkajn tagojn antaŭ la malapero de ***Matteotti***, kelkaj deputitoj estis atakitaj far nigr-ĉemizuloj for de la Parlamentejo, kiel averto ke jam oni ne toleros pluajn kritikojn. ***Matteotti*** estis sekvestrita en Romo la 10-an de junio, sed lia korpo ne estis trovita ĝis la monato aŭgusto en iu arbaro. La afero iĝis ega politika skandalo en Italio ĉar ***Matteotti*** estis tre konata kaj respektata en la lando. Baldaŭ ĉiuj indicoj montris ke la krimo estis realigita de tre proksimaj kunlaborantoj de Mussolino. Fine oni malkovris ke la estro de taĉmento kiu sekvestris la socialistan deputiton estis ***Amerigo Dumini***, kiu jam estis partopreninte en multenombraj batadoj al opoziciantoj kaj disidentaj faŝistoj. Alia el la implikitoj estis ***Cesare Rossi***, kiu laboradis en la presar-kabineto de Mussolini, kaj alia, ***Giovanni Marinelli***, elstara membro de la faŝista partio.
Tio, kio komence ŝajnis krimo perfekte organizita, evidentiĝis kiel fuŝaĵo rekte kondukanta al Mussolino. Kvankam estis certa la interveno de faŝistoj en la murdo, ne estis klara la implikiĝo de Mussolino. Sed oni scias ke je la fino de la diskurso de ***Matteotti***, Mussolino publike komentis antaŭ la estro de la sekreta faŝista polico ke la ulo kiu eldiris tia diskurso devus ne «daŭre plu cirkuladi» («*non dovrebbe più circolare*»). Oni asertis ke Mussolino ne pretendis ke oni lin interpretu laŭlitere. Tamen, li devus scii ke estis granda risko ke iu el siaj subuloj konsideru ke temus pri ordono. Li estis sin adresiĝanta al uloj alkutimigitaj batadi kaj uzi armiloj por timigi ties kontraŭulojn kaj ke iu el tiuj bravulaĉoj taksus liajn vortojn kiel ordonoj kies plenumo, cetere, tre komplezus lin. La kazo estis tre simila al tiu okazo kiam la angla reĝo Henriko la 2-a supozeble demandis: «Kiu liberigus min el ĉi tiu problema kleriko?», demando post kiuj la baronoj haste alkuris mortigi Tomaso-Becket-on. Oni diktis nenian rektan ordonon, sed la korteganoj konsideris ke tiu ago plenkontentigos sian reĝon. En sia membiografio, Mussolino skribis: *«Iam, **Matteotti** malaperis el Romo. Tuj estiĝis la*

*famo ke temis pri politika krimo. La socialistoj estis serĉante iun martiron kiu oni povus uzi kaj, provizore, antaŭ ĉia ajn scio, ili akuzis la faŝismon. Laŭ miaj ordonoj oni entreprenis kompleksan esploradon. La registaro decidis agadi energie, ne nur pro kialoj de justeco, sed por malhelpi, dekomence, la disvastiĝadon de kalumnioj […]. Baldaŭ eblis trovi la kulpulojn […]. Ili apartenis al faŝista grupo, sed tute for de nia respondeco […]. Oni procedis kontraŭ ili senlime kaj senbride […]. Ĉio-ĉi devus esti kvietiginta la ŝtormon».*

La registaro provis ĉiutipajn sensencajn eksplikojn, kiel atribui la krimon al la judoj aŭ al la framasonoj, eĉ oni asertis ke temis pri krimo por senkreditigi la faŝismon. Tamen la konataj faroj atestas, almenaŭ, la moralan kaj politikan kulpecon de la ***Duce***. Aliflanke ekzistas indicoj de tio ke la murdistoj ĉantaĝis Mussolinon. ***Dumini*** asertis ke li transdonis al sia advokato dokumentojn kiuj pruvis la kunkulpecon de Mussolino en la murdo al ***Matteotti***. La itala registaro aĉetis por ***Dumini*** unu farmon en Libio kaj donis al li ĉiumonatan pension de 1.000 liroj. La afero ***Matteotti*** malfermis egan krizon en Italio kaj en la sino de la faŝista partio mem. Definitive ruiniĝis la ebleco de ia interkonsento inter la faŝismo kaj ties opoziciantoj en la kadro de la Konstitucio. Aliflanke malfermiĝis kontraŭdiro inter la faŝistaj sektoroj kiuj aprobis la tipon je perforto kiu metis finon al la vivo de la socialista deputito kaj tiuj kiuj sin oponis al tia agad-maniero. Krome, sekve de la murdo al ***Matteotti***, la publika opinio komencis stari kontraŭ Mussolino. Iuj elstaraj faŝistaj funkciuloj sin vidis devigitaj demisii. Tamen tio ne sufiĉis por silentigi la opozicion. Fine de junio cent parlamentanoj forlasis la Parlamenton kiel protesto kontraŭ la faŝista brutaleco. Ili asertis ke ili ne plu partoprenos en la parlamenta vivo ĝis kiam oni



tute klarigos la kazon ***Matteotti***. Tiu elpaŝo estis nomata «aventina» memore al iu okanzitaĵo en la antikva Romo; en la jaro 494 a. K. la plebanoj retiriĝis al la Aventino-monto kaj minacis fondi novan urbon. Antaŭ tiu minaco la patricaro cedis al la postuloj de la plebo. Kurioze, la opozicio sentis saman fascinon kiel la faŝistoj pri la romia pasinteco. La Vatikano opiniis ke tiu retiriĝo estis «grava eraro», kaj surprizige aldonis: *«Kiu estas senpeka, tiu unua ĵetu ŝtonon».* Tiam, kiel Mussolino mem agnoskis, al la opozicio estus facile venki. Li estis terurita kaj eble estus demisiinta se la reĝo estus mendinte tion al li. Sed tiu ne faris tion kaj eĉ deklaris li *«neniam havis ĉefministron kun kiu pli plaĉe intertraktis ol kun **signor** Mussolino»*. Evidentas ke tiel li kiel la konservativuloj, vatikanaj aŭ liberalaj ne volis perdi Mussolinon kaj ĉi ties faŝistojn pro timo antaŭ la ebleco je revigliĝo de la bolŝevistoj.
Mussolino, do, sciis kaj povis profiti siafavore la kontraŭdirojn de la itala politika situacio. Alia fronto pri kiu li devis atenti estis tiu de la presaro. En Italio la presaro daŭre havis grandan povon, kaj Mussolino, tre interesita pri la ĵurnalismo, kontroladis per si mem la faŝistan ĵurnalon ***Il Popolo d'Italia***, kiu, en 1922 vendadis malpli da specimenoj ol la tradiciaj tag-ĵurnaloj, kiel ***Corriere della Sera, La Stampa*** aŭ ***Il Mondo***. Tiam daŭre oni publikigadis la socialistan ***Avanti!*** kaj la komunistan ***L'Unità***. En julio de 1924, Mussolino dispoziciis la cenzuradon de la presaro kaj donis povon al la prefektoj por averti aŭ ĉesigi eldonistojn kiuj publikigus «falsajn noticojn», insultus la «nacian honoron» aŭ instigus «malobei la leĝojn». En la aplikado de tiu leĝaro, iuj eldonistoj estis ĉesigitaj. La dua grava ĵurnalo de Italio, ***La Stampa*** de Torino, pasis al la entrepreno ***Fiat***, kiu nomumis faŝistan eldoniston. Oni dispoziciis ke nur la akredititaj ĵurnalistoj povus skribi por la presaro, kaj oni efektivigis la cenzuradon ankaŭ per la aĉetado de akcioj de iuj proprietuloj aŭ premante ilin por la ĉesigo de la eldonistoj ne favoraj al la reĝimo. Samtempe Mussolino malpermesis la kunsidojn de la politikaj partioj de la opozicio.
Tamen, spit' al la penado de la registaro, la polemiko pro la afero ***Matteotti*** ne malaperis. Kiam la Parlamento denove kunvenis en novembro de 1924, Mussolino perdis la ĝistiaman apogon de iuj liberalaj lideroj. La presar-cenzuro permesis ke la ĵurnaloj publikigu iun memorandon de ***Cesare Rossi***, unu el la arestitoj pro ties implikiĝo en la murdo al ***Matteotti***. Per tiu dokumento ***Rossi*** asertis ke oni elektis lin kiel propeka kapro pro la murdo, kaj per sia deklaracio li akuzis Mussolinon ordoni atakojn kontraŭ la opoziciantoj, tamen li ne rilatigis ĉi tion kun la kazo de ***Giacomo Matteotti***. Ĉio-ĉi signifis pluan kaj plian premon sur Mussolino, kies destino ŝajnis pendi el fadeno. En iuj italaj regionoj multaj personoj festis surstrate la baldaŭan finon de la faŝismo. Sendube, per la murdo al ***Matteotti***, la reĝimo sin vidis pli proksime al sia disfalo ol en ĉiu ajn momento ĝis 1943. La 27-an de decembro, la ĵurnalo ***Il Mondo*** deklaris: *«Ni havas ĉef-ministron akuzitan je komunaj deliktoj. Neniu lando povas konsenti*

*humiliĝi al ĉi tia situacio».* La publika opinio de Italio reagis tiom horore antaŭ la murdo al ***Matteotti***, ke Mussolino agnoskis, de tiam, ke ekzistis linio kiun li ne povus preterpasi. Fine oni atingis ke la nomo de Mussolino apenaŭ aperu en la cent volumenoj kiujn oni kolektis pri la kazo ***Matteotti***, kaj neniam oni mendis al li ĵuĝ-atesti. Poste li konfesis ke la tagoj kiuj sekvis al la murdo estis la plej teruraj el lia vivo. Fakte li neniam plu prononcis la nomon de ***Matteotti***.
Sed lia situacio estis tikla ankaŭ ene de lia partio. Ĉi tiu fama kazo komplikis al li la procezon de inventado aŭ difino de la faŝismo. Dum monatoj li dubis inter la apogo al la plej ekstremistaj faŝistoj kaj la «normaligo». Unu el liaj plej aktivaj kritikistoj, ***Curzio Sucker***, publikigis artikolon dirante: *«La sana faŝismo troviĝas en la provincoj. Tie, ĝia revolucia spirito deziras konkeri la ŝtaton por Italio».* Fine de decembro de 1924, Mussolino elektis la duran linion. Lia decido estis krome motivita per la vizito kiun faris al li 33 lideroj de la faŝista milico la 31-an de decembro. Kun la preteksto gratuli lin okaze de la nova jaro, fakte oni avertis lin ke aŭ li uzus sian aŭtoritaton, aŭ ili retirus sian apogon. Iuj lokaj lideroj akuzis Mussolinon esti mensogulo kaj perfidulo kiu sin vendis al la grandaj entreprenistoj. Aliaj akuzis lin esti stariginta iun reĝimon tre similan al tiu de la bolŝevistoj. Mussolino decidis plifirmigi sian pozicion kaj konvinkis sian registaron por agadi kontraŭ la kritikistoj kaj frakasi la opozicion. Dum la mateno de tiu 31-a de decembro, 10.000 armitaj nigr-ĉemizuloj estis defie promenante tra la stratoj de Florenco. Estis la minaco de iu dua marŝo al Romo, ĉi-foje adresita kontraŭ Mussolino.
La 3-an de januaro li prononcis en la Parlamento unu el siaj plej famaj diskursoj de sia politika kariero. Li ĉiam lerte oratoris, sed ĉi-foje li troviĝis antaŭ tre malfacila situacio ĉar devis alfronti kontestadon de malsamaj kaj eĉ kontraŭdiraj sociaj anguloj, ec interne de sia propra partio. Tamen la plej granda kontestado estis tiu de la publika opinio; en la partio, ĉiuj malsamaj tendencoj sufiĉe respektis lin, kaj en la Parlamento li havis faŝistan plimulton, do estis la granda publiko tio kion devus (re)konkeri. La 3-an de januaro, multaj el liaj kontraŭuloj ŝajnis konvinkitaj ke li sin vidus devigita rezigni. Mussolino tre atentis pri la parol-stilo kiun li devus uzi por altiri la apogon de la parlamentanoj kaj de la ĝenerala publiko. Li insistis pri sia amo al Italio kaj pri sia interveno en la milito cele reliefigi siajn patriotajn kaj naciistajn akreditilojn. Li sciis ke siaj alvokoj al la paco kaj trankvileco rezultus tre efikaj kun parto el la italoj kiuj sin montris lacaj je tiom da disturboj kaj maltrankvileco. Li ne dubis kvalifiki la opozicion kiel renverseman kaj la presar-kampanjon kiel «malpura» kaj «malhonesta». Li evitis mencii ***Matteotti***-on, dum li mem prezentiĝis kiel forta figuro kapabla alpreni la respondecon pri sia agado kontraste kun la decido-manko de antaŭaj registaroj. Mussolino akceptis la respondecon pri la eventoj okazintaj dum la antaŭaj monatoj, kvankam ne pri la morto de ***Matteotti***: *«Nun, nur mi akceptas la politikan, moralan kaj historian respondecon pri ĉio okazinta*

En 1944, en la lasta etapo de sia vivo, pritaksante la krizon ***Matteotti***, Mussolino skribis: «Mil naŭcent dudekkvar [...] estis decida jaro. La reĝimo devis alfronti la sekvojn de iu krimo, kiu, krom aliaj prikonsideroj, estis politika eraro tiel en la metodo kiel en la elektita momento. En la somero de mil naŭcent dudek-kvar la premo de la grupo de la Aventino kaj tiu de la reĝo kun ĉi ties kunlaborantoj estis tre forta [...]. La reĝo estis doninta iajn garantiojn pri tio ke oni aplikos la leĝan punon al la krimuloj, sed pridubis sekvi la homojn de la Aventino pri la politika respondeco. Eĉ la fama memorando de ***Cesare Rossi***, fine de decembro (publikigita dank' al peto de la registaro por devanci siajn oponantojn) ne multe impresis la reĝon. La oponantoj al la faŝismo estis tiam antaŭ senelira morala dilemo, kaj krome, ekziliĝinte, ili estis lasinte senbare la vojon, kio estis uzita de la reĝimo por efektivigi kontraŭatakon en la oportuna momento».

*[…] se la faŝismo estis krima asocio, tial do mi estas ĝia ĉefa estro»*. Li neis la ekzistadon de faŝista torturejo kaj asertis ke la agado de la kunlaborintoj de ***Dumini*** estis tro mallerta kiel por esti atribuita al persono tiom inteligenta kiom li. Li asertis ke li admiris ***Matteotti***-on, kies kuraĝo estis «egala al tiu mia». En sia diskurso, Mussolino enfazis la militistan fortecon de la faŝismo kaj samtempe trankviligis la parlamentanojn: *«Kun tricent-mil bone armitaj junuloj, preparitaj por ĉio kaj preskaŭ mistike pretaj sekvi miaj ordonojn, mi estus povinta puni ĉiujn tiujn kiuj misfamigis la faŝismon kaj intencis dronigi ĝin en koton. Mi estus povinta fari el ĉi tiu griza kaj sengusta parlamenta ĉambro bivakon por miaj trupoj. Mi estus povinta nuligi la Parlamenton por starigi registaron tute faŝistan; sed almenaŭ provizore, mi ne volis tion fari»*. Krome, li promesis fortan registaron. Estis la opozicio tiu kiu agadis senrespondece kaj kontraŭkonstitucie forlasante la Parlamenton kaj sin ĵetante kontraŭ registaro libere elektita. La diskurso estis akompanita de mobilizado de la milico kaj atakoj kontraŭ grupoj de la opozicio. Mussolino sciis ke sia plej bona atuto estis la minaco pri civil-milito.

Kurioze, laŭlonge de la jardeko de 1930, la itala ŝtato subvenciis kaj la familion de ***Matteotti*** kaj ĉi ties murdinton; temis pri kroma kontraŭdiro de la faŝista reĝimo.

Poste Mussolino pritaksis sian diskurson de 3-a de januaro de 1925 kiel unu el la du aŭ tri okazintaĵoj pli decidaj de la faŝisma revolucio. La malamikoj de Mussolino estis perdinte sian eblecon kaj de tiam la vojo estis senbara por la diktaturo.

El Britio venis ia helpo al Mussolino. En decembro de 1929, la nova brita ministro pri eksterlandaj aferoj, ***Austen Chamberlain***, vizitis Romon nome de la Konsilio de la Ligo de Nacioj kaj faris tre pozitivajn deklarojn pri Mussolini. Ekde tiu vizito, estiĝis amikeco inter Mussolini kaj ***Chamberlain***, kiu daŭris eĉ kiam ĉi tiu perdis sian postenon en 1929. En tiu tikla momento, la vizito de la brita ministro helpis subteni la fragilan pozicion de Mussolino.

Fine de 1925, plifortigis sian rolon ene de la registaro kiel *Capo del Governo* (regantarestro) kio, laŭŝajne, sig-

nifis la alprenon de pliaj prerogativoj. Interalie, de tiam estus delikto «ofendi la honoron aŭ la prestiĝon de estro de la registaro» subriske de puno de kvinjara enkarceriĝo; la plirangigo estis aprobita en la Parlamento sendiskute. En decembro oni promulgis la *Leggi Fascistissime* kaj la Leĝo por la Defendo de la Ŝtato. Oni malpermesis la politikajn partiojn kaj la sendependajn sindikatojn. Estis la morto de la demokratio.
La faŝismo jam estis plene inventita. Jam ĉiuj scias kio ĝi estas, kvankam eble ĉiu difinus ĝin malsam-maniere. Por Mussolino estis la perfekta sistemo kapabla plenumi ĉiujn liajn aspirojn kaj ambiciojn. Por la popolo estis neevitebla fakto kiun ĝi akceptis kun miksaĵo de konfido kaj timo. Por la marksistoj estis evidente ke temis pri alia formo de kapitalismo, malsama ol la liberala kiun oni konis ĝis tiam. La beneficitoj de tiu kapitalista sistemo: la posedantaj soci-klasoj, ĝoje konstatis ke temis pri mirinda por ili invento. Ja, se Mussolino kaj la faŝismo ne ekzistus, estus necese inventi ilin. Kaj ĝuste ĉi tio estis komencinte okazi tiam for de Italio.
En Hispanio, la 13an de septembro de 1923, unu monaton post la apero de la kadavro de ***Matteotti*** en iu arbaro proksime al Romo, iu generalo nomata ***Miguel Primo de Rivera***, faris militistan puĉon kontraŭ la liberala reĝimo. La hispana reĝo Alfonso la 13-a akceptis lin tiom komplezeme kiom la itala reĝo akceptis Mussolinon. Evidentas ke temas pri imitaĵo de la tiama procezo de Italio. Sed kun granda diferenco: ***Primo de Rivera*** ne disponis je partio simila al la faŝista de la ***Duce***; la bazo de lia povo estis la armea apogo, kaj tiorilate lia kazo estas pli simila al tiu de la romiaj cezaroj ol tiu de Mussolino, ĉar la bazo de la povo de la romiaj imperiestroj estis ilia kondiĉo de supremaj komandantoj de la legioj; la civilaj kamariloj kiuj ariĝadis ĉirkaŭ ili ne estis veraj partioj, ili pli similis al la reĝaj kortegoj de ĉiuj epokoj. Rilate al Hispanio, la puĉo de ***Primo de Rivera*** havis ankaŭ ian tradicion en la lando. Estis sufiĉe da militistaj puĉoj dum la antaŭa jarcento, ekde tiu de ***Rafael de Riego*** en 1820. Informon en Esperanto pri tiu epoko oni povas vidi en la numeroj 87a kaj 88a de ĉi tiu revuo **Heleco**. Konkrete, la diktaturo de ***Primo de Rivera*** estas raportata en la ĉapitro videbla en la retpaĝo: https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/17-20.html
Ankaŭ en Germanio oni intencis imiti Mussolinon. La 20an de decembro de 1924, dum la ***Duce*** estis baraktante pri la maniero superi la krizon de la kazo ***Matteotti***, eliris el la prizono de la fortreso de ***Landsberg***, post kelkmonata enkarceriĝo, ***Adolf Hitler***, kiu estis kondamnita post la fiasko de la t. n. «Puĉo de Munkeno», kiu estis iu provo imiti la faŝistan iniciaton de la marŝo al Romo. Sciinte pri tiu mispaŝo, la faŝistoj de Mussolino konsideris ke ***Hitler*** kaj ĉi ties sekvantoj ne estis pli ol bufonoj. Hodiaŭ ni scias ke poste tiuj germanaj "bufonoj" rezultis esti disĉiploj pli avantaĝaj ol siaj italaj majstroj. La historio de la germana faŝismo, la soboj kaj la soroj de la movado de Hitlero, kaj ties ideologia inspiro meritas apartan atenton.




# tut-germanismo kaj ties mitoj


La 19-a jarcento estis, interalie, la jarcento de la romantikismo, kaj laŭ ies opinio, la plej abomeninda frukto de la romantikismo estas la naciismoj. En tiu jarcento formiĝis, fakte, ĉiuj naciismoj nuntempe ekzistantaj. Laŭdifine, la naciismo estas ideologio kaj movado kiu baziĝas sur la sento aŭ konscio de aparteno al iu nacio; do la ekzistado de klare difinita nacio estas antaŭa kaj nepra kondiĉo por la generiĝo de naciismo. Ĉi tio signifas ke iamaniere, ĉiu naciismo bezonas ian specon de tradicio sur kiu baziĝi, kaj se tia tradicio ne ekzistas, oni devas ĝin inventi; ĝenerale tia inventado estas miksaĵo de planita, programita decido, kaj spontana, nekonscia ellaborado de la kolektiva menso de la nacianoj: tia estas la procezo de generado de mitoj.
Kiel sciate, unu el naciismoj naskiĝintaj en la 19-a jarcento estis la Cionismo, la ideologio kaj politika movado kiu celis la kreadon de juda ŝtato en אֶרֶץ יִשְׂרָאֵל (la tero de Israelo). Ĉi-kaze la baza tradicio estis tre forta: estis/as ne malpli ol la Biblio mem, la Libro de la libroj. Sendube ankaŭ en ĝi estas mitoj, sed estas ankaŭ multege da historio, kaj ĉiukaze, ĝiaj mitoj konstituas tre antikvan tradicion, ne estas io ĵuse improvizita por pravigi la naciismon. En la kazo de la itala naciismo, kies ŝtato naskiĝis en 1870, eble iu faktoro de la sukceso de la faŝismo de Mussolino estis ke ĉi tiu sciis ligi la modernan ŝtaton kun la romia tradicio kiu, ankaŭ ĝi, havis historian bazon.
La problemo de la tut-germanismo estis ke mankis al ĝi konata historio de tiutipa tradicia bazo, t. e., estis nenia konkreta kono pri iama pasinta epoko en kiu estintus germana nacia unueco, do estis necese inventi tian tradicion, kaj tio estis la tasko de la mitofaraj germanistoj. Inter ili staris la opero-komponisto ***Richard Wagner***. Liaj operoj elvokas ian germanan aŭ arjan pasintecon kiu neniam ekzistis. Tristano kaj Izoldo, ***Tannhäuser***, ***Lohengrin***… estas personuloj de romantikaj noveloj de la 19-a jarcento kun mezepoka fono. Parsifalo estas ligata al la mezepoka legendo de la Grialo. La heroo Sigfrido de aliaj vagneraj operoj simbolas la germanan popolon. Tiuj operoj de Rikardo Vagnero tre entuziasmigis Hitleron… kaj milionojn da germanoj.


Sed estis ankaŭ literaturaj kunlaborantoj en tiu procezo de mito-kreado. Hiperboreoj, nibelungoj, estas nomoj de popoloj supozeble arjaj kiuj ekzistis oni-ne-scias-kie, kaj oni-ne-scias-kiam. Kiel praa lokdeveno de tiu heroa etnio oni ne-precize mencias la Atlantidon, aŭ ian Tuleo-insulon neeble situigi ie ajn. Sed aliaj serĉas la originon de la arja raso en la Tibeto… kaj krome ne mankas alia legendo kiu asertas ke «la bravaj sigfridoj elvenis el la arktaj glacioj». Fakte oni prenis ne malmultajn elementojn el la normana mitologio por ilin miksi kun aliaj germanaj, kaj la germanistoj asignis arjan aŭ teŭtonan devenon al la skandinavaj popoloj kaj al la angloj kvankam ĉiuj-ĉi ne estis kaj ne sin sentis germanoj. Ĉiuj-ĉi legendoj kaj mitoj ŝajne havis la celon konfirmi en la menson de la germanoj ke ili ekzistas kiel nacio, kaj se la historio, la geografio kaj la etnologio ne ratifikas tion, des pli malbone por la historio, la geografio kaj la etnologio.
Tamen, nedudeble, kun aŭ sen vera historio kaj tradicioj kiuj konfirmus tion, kun aŭ sen mitoj oportune ellaboritaj, la germana nacieco, ja, reale ekzistis. Estis multe pli artefaritaj la hispan-amerikaj respublikoj kiuj sendependiĝis el Hispanio laŭlonge de la 19-a jarcento. Kaj same oni povas diri pli la novaj landoj kiuj formiĝis en Eŭropo en la 20-a jarcento disiĝinte el la aŭstria kaj la cara imperioj: la slavaj, la baltaj, la centr-eŭropaj, se escepti Polujon kiu jam estis grava regno en Mezepoko, kaj multe pli la afrikaj landoj rezultintaj el la senkoloniigo, kompreneble kun la esceptoj de Egiptujo kaj Etiopio. Resume, La germanoj de la lastaj jardekoj de la 19-a kaj la unuaj de la 20-a jarcento estis vera nacio ĉar tiele ili sin konceptis kaj sentis.
Kaj oni konceptis ilin tiele ankaŭ deekstere. Tiorilate estas menciindaj la kazoj de la franca aŭtoro ***Joseph Arthur de Gobineau*** (1816-1882)



**Scenoj de mito-faraj operoj de *Richard Wagner***


Joseph Arthur de Gobineau


Richard Wagner


Houston Stewart Camberlain

kaj la angla ***Houston Stewart Chamberlain*** (1855-1927). Ĉi lasta iĝis entuziasmulo de la tut-germanismo, kaj eĉ ellaboris teoriojn pri tiu koncepto. Liaj verkoj: **Politische Ideale** (Politikaj idealoj), **Arische Weltanschauung** (Arja mondrigardo) kaj **Die Grundlagen des 19 Jahrhunderts** (La fundamentoj de la 19-a jarcento) enhavas ideojn kiuj poste povis esti profitataj de la naziismo. Li studis en Aŭstrio kaj Francio. Enmigrinte en Germanion en 1885, en 1908 li edziĝis al iu filino de ***Wagner***. Li estis fascinita de la rapida progreso de Germanio en ĉiuj terenoj: scienco, industrio, politiko…

En la procezo de politika unuiĝo de la germana loĝantaro, la Prusia ŝtato havis rolon similan al tiu de la regno de Piemonto en la itala unuiĝo. Sed post preskaŭ duonjarcento ankoraŭ restis for de la germana ŝtato multaj german-parolantoj, ĉefe en Aŭstrio sed ankaŭ en aliaj lokoj de centra Eŭropo. La tut-germanista movado estis, ĝuste, la esprimo de la emo kulmini la unuiĝ-procezon, emo sentata tiom en Germanio kiel en la zonoj kun germana loĝantaro ankoraŭ ne entiritaj en la germanan ŝtaton. Tiu porgermana sento, kiel dirite, estis nutrata de la muziko de ***Wagner*** kaj de la mitoj kiuj, ekzistintaj en la fundo de la popola kolektiva animo, ricevadis literaturan formon per la romantikaj verkoj tiam eldonataj. Al tiu verkistoj aldoniĝis la bofilo de ***Wagner***, la anglo ***Stewart Chamberlain***, kiu akiris la germanan civitanecon en 1916, dum la Unua Mond-Milito kiam Germanio estis batalante kontraŭ Anglio. Per sia verkaro, en kiu li tre insistis pri "etna pureco", li proklamis la superecon de la germana popolo, ĉar, laŭ li, la germanoj devenas de la supera arja aŭ teŭtona raso. Kiel dirite, lia idearo tre influis sur la hitlerismo, sed estis iu diferenco, en la religia tereno, inter la konceptado de ***Houston S. Chamberlain*** kaj la naziismo. Ĉi-lasta ne malkaŝis sian intencon for-


balai la kristanismon kaj rehavi la antikvan arjan paganismon. ***Chamberlain***, tamen, sin limigis nei la judan naturon de Jesuo-Kristo. Li pretendis pruvi ke Jesuo-Kristo estis arj-devena. Ĝenerale, la tuta verkaro de ***H. S. Chamberlain*** transpiras kontraŭ-judan senton.

Tiorilate ne estis malpli grava la verkaro de la franco ***Joseph Arthur de Gobineau*** antaŭe menciita. Lia radikala rasisma idearo ege tendencis al kontraŭ-judismo. ***Gobineau*** estas konsiderata la fondinto de la moderna rasismo. Li estis profunda konanto de la orientaj kulturoj kaj, ekzemple, atribuis la ekstreman malriĉecon de Hindujo al la fakto ke ĝiaj loĝantoj perdis sian rasan purecon pro konstanta miksiĝo. Li firme kredis, ke la afrikaj nigruloj estas malsuperaj kaj ke la eŭropanoj (kiujn li nomis kaŭkazanoj) estas ankaŭ superaj al la azianoj. Inter la eŭropanoj li determinis ke la teŭtona raso estas supera al ĉiuj aliaj. Lia ĉefa verko tiorilate estis la «Eseo pri la malegaleco de homaj rasoj», per kiu li asertis ke la raso de la germanoj loĝantaj en Britujo, Francio kaj Belgio estis la sola pura raso el ĉiuj, kiuj devenas de la supera raso de la arjoj. Kaj tio ĉar ĉiuj aliaj rasoj miksiĝis, por ties devaloriĝo, kun la nigraj kaj flavaj rasoj. Liaj teorioj pri rasa supereco havis egan influon sur germanaj verkistoj.

Tiutipaj intelektuloj kaj tiutipaj opinioj oftis en Gemanio dum tiuj jardekoj. Kiel lasta ekzemplo ni prezentas tiun de la germano ***Heinrich von Treitschke***. Li estis intelekta kaj grava historiisto, kaj ankaŭ dediĉiĝis al la politiko. En la parlamento li prezentis siajn opiniojn kiuj celis kolonian germanan ekspansiismon. Li impulsis la ideon de germana koloniismo ĉar Britio estis sin plifortigante per siaj kolonioj kaj estis akaparante ĉiujn. Li publikigis serion da artikoloj kun la frazo: «La judoj estas nia misfortuno».

Tio estas, la celo de la tut-germanismo ne estis nur la plifirmigo de la popola memkonscio pri la germana identeco, sed ankaŭ krei konscion je rasa supereco, plejrangeco de la germana popolo. Jen tiu estis la plej katastrofa el la mitoj kiuj estis konstruanta al si tiu naskiĝanta naciismo. Konsideri sin mem la plej altranga nacio, la popolo elektita de la Dio(j), kondamnas la ceterajn popolojn roli kiel subalternaj, servantoj, sklavoj. Sed estas iu escepto, la juda popolo altiras la plej akrajn atakojn de tiuj teoriuloj de la germanismo; ĝi ne estas kondamnita al sklaveco sed al malapero. Kaj rezultas ke ankaŭ tiu juda popolo havas siajn mitojn kaj pretendas esti "elektita popolo". Kurioze…

Tia estis la socia medio kie oni estis generante la naziismon. Eble la popolamasoj ne legadis la verkaron de tiuj intelektuloj kiun ni menciis, sed sama ideologio estis diskonigata per aliaj publikigaĵoj pli alireblaj al la ekonomia kaj intelekta kapablo de la malaltklasaj germanaj civitanoj. En Aŭstrio kaj en Germanio estis akireblaj en la tabak-vendejoj la numerojn de la revuo ***Ostara***, publikigita de la fanatika eks-pastro ***Jörg Lanz von Liebenfels*** (1874-1954). Ĉi tiu pitoreska mito-vendisto naskiĝis en Aŭstrio, kie multaj civitanoj sentis frustriĝon ne esti enkalkulitaj en la tiam formiĝantan germanan ŝtaton. Verdire li nomiĝis ***Adolf***







**La diino *Ostara*, de la antikva nord-eŭropa paganismo, iĝis en la tutgermanisma medio, simbolo de rasa pureco.**

***Jozef Lanz***, sed modifis sian nomon por alpreni tiun de iu nobela aŭstria familio eble pro tio ke li volis kaŝi la fakton ke sia patrino havis judan devenon. Per sia revuo, «**Ostara**», ***Lanz*** publikigis kontraŭjudajn teoriojn. ***Ostara*** estas la nomo de iu diino de la mitologioj germana kaj normana kun ia ajn rilato al la printempo, kaj estas ankaŭ la nomo de la festo dediĉita al tiu diino kaj celebrata ĉiu 20-a de marto en tiuj landoj kaj ankaŭ en Anglio. Origine ĝi havas nenian rilaton kun la rasismo; temas nur pri iu postrestaĵo de la antikva paganismo, io simila al tio okazanta en Hispanio kun la festo de la ĝoj-fajroj de Sankta Johano komence de la somero. Sed en la tut-germanisma medio, la pagana ***Ostara*** iĝis simbolo de reago kontraŭ la kristanismo kiu venis de ekstere, t. e. elemento de rasa kaj naciisma sento. Do, en tiu kunteksto la termino ***Ostara*** akiris politikan sencon kiu estis uzita de ***Jörg Lanz*** por ĉi ties rasisma propagando.

Antaŭ la fondo de la revuo, ***Jörg Lanz*** estis publikiginte libron titolata: «Teozoologio» per kiu li pledis por la steriligado de la malsanuloj kaj la "malsuperaj rasoj", kaj gloriadis la "arjan rason" kiel diajn personojn. Laŭ lia interpretado de la Biblio, Eva estis dia estaĵo, sed seksrilatis kun Satano kaj el tio rezultis la "malsuperaj rasoj". Laŭ li, ĉi tio eksplikas tion ke la blond-haraj virinoj sentas altiron al la "malhel-haŭtaj viroj", io kion oni povas haltigi nur per "rasa malmestizado", por ke la "homaj kristanaj arjoj" povu "kromanfoje superregi la malhel-haŭtajn homajn bestojn" kaj, fine, atingi la "diecon". Ekde la revuo de ***Lanz*** oni kritikadis la habsburgan monarkion kaj oni ĝin avertis kontraŭ la danĝero kiun konstituis por la arjoj la "malsuperaj rasoj", t. e., preskaŭ ĉiuj ceteraj. Iu rimedo uzita de li por altiri junajn legantojn estis la raportoj je stilo preskaŭ pornografia prirakontante kiamaniere la belaj blondulinoj estas allogataj de lascivaj "malhel-haŭtaj" viroj; tiele li difinadis la nigrulojn, la slavojn kaj la judojn, priskribitaj kiel ruzaj kaj simieskaj estaĵoj posedataj de senbrida seks-deziro, kiuj emas infekti la puran arjan sangon. Malantaŭ tiu revuo estis la ***Ordo Novi Templi***, iu inica sekto fondita de ***Lanz*** mem.

Li estis forpelita el la cistercia ordeno en 1899, unu jaron post sia ordeniĝo kiel pastro, pro la publikigo de liaj ideoj kiujn li estis komencinte fari tiam kaj pro tio ke li estis «kaptita de karna amo». La publikigo de la revuo ***Ostara*** komencis en 1905, kaj li estis ĝia sola aŭtoro ekde 1908. Ĝi havis grandan disvastiĝon kaj iam ĝia eldonado atingis nombron de dek-miloj da ekzempleroj.
Revuoj kiel tiu de ***Jörg Lanz*** abundis ne nur en Aŭstrio, sed ankaŭ en Germanio. Tiuj gazetoj rolis kiel pres-organoj de la multenombraj ekstrem-naciistaj societoj en ambaŭ landoj kaj kiuj postuladis la unuiĝon de ĉiuj germanoj en unusola ŝtato, la t. n. Granda Germanio. Plej multaj el ĉi tiuj socioj konsistis el ekstremismaj grupoj, kiuj kombinis, rasismon kaj kontraŭjudismon, teozofion kaj okultismon, konstituante tion, kio estis nomata arjosofio. Ĉi tiu movado celis la revenon al iu supozeble glora kaj pagana arja pasinteco, subgvide de karismaj estroj dotitaj je okultaj povoj. Alia ulo kiu elstaris pro siaj kontraŭjudaj teorioj kaj kiu influis sur ***Lanz*** estis ***Guido von List***. Ĉi tiu estis german-aŭstria ĵurnalisto. Per sia verkaro, li insistadis, ke la germana kulturo estis minacata de ia internacia juda konspiro, kiu povus esti venkata nur per milito. Por sin prepari antaŭ la venonta konflikto, estus necese strukturi fortan kaj rase puran ŝtaton, gvidatan de lidero, kiu estus la "videbla enkorpiĝo de la arja dia leĝo". En tiu ŝtato, "nur membroj de la arja-ĝermana raso havus rajton je civitaneco", tiuj de malsuperaj rasoj estus submetitaj kaj ekskluditaj de iu ajn posteno.
Tio vidate, ŝajnas ke en la germanaj medioj ĉio estis preta por la konkretiĝo de la naziista faŝismo, kaj tiele estis, sendube. Sed la disvolviĝo de tiaj aferoj estas pli komplika kaj en ties procezo intervenas aliaj faktoroj, foje ne-percepteblaj, kaj eventoj ofte neantaŭvideblaj. Ni konsideru ke la situacio ne estis malsimila en aliaj tiamaj socioj de la industrie disvolviĝinta mondo. Ekzemple, en la tiama Rusio, sub la regado de la Caro, okazis en la finaj jardekoj de tiu 19-a jarcento pogromoj kontraŭ la judoj. La t. n. “nigraj centurioj” atakadis la judejojn kaj masakradis multajn el ĉi ties enloĝantoj.













***Jörg Lanz von Liebenfels* kaj ties *Ostara* simbolaro.**



**Kontraŭjudaj Pogromoj en Rusujo en la 19-a jarcento**

La fame konata kontraŭ-juda verko «Protokoloj de la cionaj ŝaĝuloj» estis eldonita ĝuste en tiu lando, en la cara kortego, en tiu epoko. Tamen tie la situacio ne evoluis al rasisma reĝimo kiel la hitlerismo, sed tute male; okazis revolucio kaj venkis marksisma partio kiu establis komunistan reĝimon. Diversaj neatenditaj faktoroj kaj eventoj interagadis por kaŭzi tiun rezulton, kaj siavice la bolŝevisma venko estis faktoro kiu, kombine kun aliaj, ebligis la venkon de Mussolino en Italio kaj Hitlero en Germanio.

Kaj ankaŭ en Francio, kaj ankaŭ fine de la 19-a jarcento, okazis kontraŭ-juda eksplodo en rilato kun la t. n. ***Dreyfus***-skandalo. Ne estas necese priskribi ĉi-raporte la ***Dreyfus***-aferon; ekzistas pri ĝi abunda informo, ankaŭ en Interreto, kaj konkrete en Vikipedio ekzistas interreta paĝo, krome en Esperanto, en la ret-adreso:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Dreyfus-skandalo
Nu, endas klarigi ke la kontraŭ-juda kampanjo estiĝinta tiam en Francio ne estis rezulte de la kazo ***Dreyfus***, sed ĝuste inverse, tiu afero ***Dreyfus*** estis rezulte de la kontraŭ-juda sento kiu daŭre subkuŝis en la fundo de la animo de la franca popolo spite al la revolucioj okazintaj en tiu lando de antaŭ unu jarcento.

Eĉ en Usono, la lando kie trovis azilon multaj judoj fuĝintaj el la rusaj pogromoj kaj la germana perforto, evidentiĝis poste kontraŭ-juda tenîĝo; la verko «Protokoloj de la saĝuloj de Ciono» estis publikigita en tiu lando per iu ĵurnalo apartenanta al la grava entreprenisto ***Henry Ford***. Krome estis tie pli granda rasisma subpremado kontraŭ la nigruloj kaj la indiĝenaj indianoj, kaj en 1871 okazis en Kalifornio ega masakrado de ĉinaj enmigrintoj.

Kaj en kio rilatas al la koloniismo, Italio kaj Germanio, ja, vane emis eniri en la klubon de la potencoj ĝuantaj tiun sistemon. Afriko estis plejparte kontrolata de Britio, Francio kaj Belgujo; ilia liberalisma politiko ne estis obstaklo por

ke tiuj landoj kondutu imperiisme en siaj afrikaj kolonioj. Simile okazis kun Usono en Centra kaj SudAmeriko. Ĝuste fine de la 19-a jarcento, en 1898, tiu potenco kaptis la restaĵojn de la hispana imperio en Ameriko. Kubo kaj Porto-Riko (krom Filipinoj). Kaj la Rusa imperio kontrolis multajn teritoriojn en Azio, kaj en Eŭropo ankaŭ tutaj landoj kiaj Polujo kaj Finnlando estis sub la povo de la Caro. La frustracio de Italio kaj Germanio pro tio ke ili estis duarangaj potencoj en la koloniista-imperiista tereno estis alia el la faktoroj kiuj influis en la apero de la faŝistaj reĝimoj. Ni jam vidis kiamaniere Mussolino sciis profiti tiun cirkonstancon por aliri al la supera povo en Italio. Poste ni vidos kiel Hitlero faris la samon en Germanio.



Gepatroj de Hitlero

Adolfo Hitlero (***Adolf Hitler*** en lia germana lingvo) naskiĝis la 20-an de aprilo de 1889 en ***Braunau am Inn***, en la Aŭstrio regata de la imperiestro Francisko-Jozefo, en socia medio en kiu regis frustracio ne esti inkludita en la germana ŝtato tiam regata de la Kajcero Vilhelmo la 2-a. Tio signifas ke jam de infanaĝe li estis subinflue de tiu germanista sento, same kiel la antaŭe menciita ***Jörg Lanz***. Kaj same kiel ĉi tiu, eble ankaŭ Hitlero havis iun judan antaŭulon. Verdire, la fizika aspekto de ambaŭ tute ne similas al la modelo de la arja mito de la Sigfridoj: blondharaj, bluokulaj… Tamen, paradokse, en Rusio estis milionoj da slavoj kiuj alĝustiĝis al tia modelo, sed ili ne estis enkalkulitaj en la arjan rason. Dume multaj germanoj, same kiel ***Lanz*** kaj ***Hitler***, pli similis al la uloj de la rasoj kiujn ili konsideris "malsuperaj". Estis en Germanio kaj Aŭstrio ankaŭ Sigfrid-tipaj homoj, sed fakte ne malmultaj el ili, ja, havis judajn antaŭulojn. Spite al ĉio-ĉi, kion ĉiuj povis konstati, furoris en la germanisma medio la mito de la ras-pureco, kaj ni vidos ke nome de ĝi oni entreprenos pluajn militojn en Eŭropo. Kaj farante la aferon eĉ pli ridindan, tiuj militoj pli kontribuis al la miksado de la rasoj: la


*Adolf Hitler*, infanaĝe


Francisko-Jozefo, Imperiestro de Aŭstrio


Germana Kajzero Vilhelmo la 2-a


Rusa Caro Nikolao la 3-a


germanaj armeoj invadante Rusion en 1941 kaj la rusaj armeoj enirante en Germanion en 1945, estis kaŭzoj de la morto de multaj personoj, sed ankaŭ de la generado de multaj mestizoj el ambaŭ rasoj. La historio plenas je tragedio sed ankaŭ de motivoj por ridado kaj amuzo.

Dum la unuaj tridek jaroj de sia vivo, Hitlero estis iu perfekta malgravulo. Estante 16-jaraĝa, li forlasis la gimnazion. La lernejaj jaroj ne estis feliĉaj por li, kaj liaj kvalifikoj estis ne tre altaj. En 1907 kaj 1908 li ne sukcesis trapasi la enir-ekzamenon en la Akademio de Belartoj de Vieno, kio tre lezis lian orgojlon. La sekvintajn kvin jarojn li travivis kiel socia ekskludito en la imperiestra ĉef-urbo. En 1913 li fuĝis al Munkeno por eviti militservon en Aŭstrio. Same kiel okazis al Mussolino, la Unua Mond-Milito kreis la kondiĉojn por orientigi la kurson de la vivo de Hitlero, kaj ĉi tiu, same kiel Mussolino, sciis profiti la eblecojn kiujn la nova situacio malfermis al li.

Falas for de la celo de ĉi tiu raporto priskribi la disvolviĝon de tiu milita konflikto. Oni multe verkis pri ĝi, kaj eĉ ci tiu revuo, **Heleco**, dediĉis al ĝi unu numeron, la 90-an. Do, pri ĝi nun ni diru nur ke la milito alportis grandan detruon kaj malfeliĉon al la landoj kiuj tre emis ĝin. La loĝantaro de la eŭropaj industriaj landoj, kiu tre entuziasme apogis la militon je ĉi ties komenciĝo, kelkajn jarojn poste estis suferante ĝiajn katastrofajn kaj ruinigajn sekvojn, kaj reagis kontraŭ siaj propraj regantoj. Rezulte de tiu popola elreviĝo, definitive falis tri gravaj monarkioj de Eŭropo, tiu de la Aŭstria Imperio, tiu de la germana Kajzero, kaj tiu de la rusa Caro. Ĉiuj ili falis rezulte de popolaj, proletaraj revolucioj de marksista inspiro. Sed la posta starigo de nova reĝimo disvolviĝis malsame en tiuj landoj, kiel poste ni vidos.

Antaŭe ni vidu kiel efikis sur Hitlero la milito. Tuj post ties komenciĝo li kuris volonte soldatiĝi en la germanan armeon. La militservo faris el la sensignifa junulo fanatikan militariston kaj naciiston. Post malpli ol tri monatoj da trejnado, Hitler estis sendita al la Okcidenta Fronto. Li servis en Francio kaj Belgio kiel ku-

riero por la 1-a Kompanio de la 6-a Bavara Rezerva Divizio. Li partoprenis en la unua batalo de Ipro, kie lia trupo estis malpliigita en kvar tagoj. Fine de la batalo, el la komencaj 3.500 soldatoj, nur 600 povis daŭrigi batalon. Li militservis kiel mesaĝisto, estis plirangigita al la grado de kaporalo kaj kvarfoje ordenita per la Fera Kruco. Konata pro lia malfacila karaktero, li tamen estas estimata de liaj kamaradoj. Li ĉiam rifuzis la proponojn "dormi kun francaj virinoj", ĉar tio estus, laŭ li, "kontraŭa al germana honoro". Li nek fumis, nek trinkis, nek iris al bordeloj. La soldato Hitlero izoliĝas sin por pensi aŭ legi. Lia vera kunulo estas lia hundo ***Foxl***. Hitlero estas vera fanatika militisto, nenia kunfrateco devus esti tolerata. Persone, Hitlero neniam ricevis leterojn aŭ donacojn de amikoj aŭ familio. Liaj gepatroj estis jam mortintaj; cetere lia familia vivo ne estis feliĉa: lia patro estis traktinta lin tre rigore. En oktobro de 1916 li suferis gravan vundon kaj fine de la milito li estis denove enhospitaligita tial ke trafis lin toksa gaso. La 10an de novembro, li estis preskaŭ kuracita en armea hospitalo, kiam oni informis lin, ke la monarkio estis deponita kaj ke estis proklamita la tiel nomata «Vajmara Respubliko». Sciinte ke la sekvan tagon oni subskribos armisticon kaj ke la milito perdiĝis, Hitlero ege ŝokiĝis. Por li, kiu "estis trovinta sin mem" en la milito, la novaĵoj pri la germana malvenko kaj revolucio estis severa bato. Li suferis portempan traŭmaton kaj frenezon. En tiu momento, la malamo, kiu naskiĝis en li, eksplodis eksteren. Li baldaŭ alprenis la tiaman germanan popolkredon ke la germana armeo restis nevenkita. Same kiel multaj aliaj germanaj naciistoj, Hitlero riproĉis al la socialdemokratoj ("la novembraj krimuloj") la armisticon. Teorio etendita de la dekstraro pri la kaŭzo de la malvenko estis la **Dolchstoßlegende** ("legendo pri la surdorsa ponardopiko"), kiu provis argumenti, ke kaŝe de la armeo la socialismaj kaj marksismaj politikistoj (plejparte judoj) perfidis kaj surdorse "ponardis" la germanojn kaj ĉi ties soldatojn.








**La soldato *Adolf Hitler* en la Unua Mond-Milito**



Lenino kaj Trocko, lideroj de la Rusa Revolucio



Roza Luksemburgo



*Karl Liebknecht*



*Antonio Gramsci*

De tiam, la armeo fariĝis la hejmo de Hitlero: li restis en ĝi eĉ post kapitulaco de Germanio deĵorante ĝis aprilo de 1920, kaj ne plu revenis al la bohemia vivo de pentristo kiun li havis en Vieno kaj Munkeno antaŭ la milito. Antaŭe, en 1917, ankoraŭ dum la milito, estis falinta la cara dinastio en Rusujo. La penoj de la milito ĵetis la rusajn popolamasojn kontraŭ la cara reĝimo. Pri la situacio kiu en tiu lando provokis tiun socian konvulsion, kaj pri la maniero kiel disvolviĝis la revolucio, oni publikigis ĉiutipan materialon. Ĉi tiu revuo Heleco, en sia 93-a numero dediĉis al tiu revolucio ĉapitron videblan en jena paĝo: https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/93/54-60.html Por la kompreno de ĉio okazinta poste en Eŭropo en la politika tereno, ni diru ke la Rusa Revolucio havis du decidajn momentojn en la jaro 1917, la unua en februaro kaj la alia en oktobro. Laŭ la rusa kalendaro, kiu tiam ne koincidis kun tiu de la okcidenta mondo, la revolucia elpaŝo de la 25 de oktobro de la rusa kalendaro, fakte, estis la 7-a de novembro. Sed la plej grava fakto de la revolucia elpaŝo de tiu tago estis tio ke tiam oni grave preterpaŝis la burĝan horizonton de la revolucio. T. e., la revolucio de februaro, kiu detronigis la Caron estis ĝuinta la apogon de ĉiuj rusoj kiuj abomenis la feŭdalismon: laboristoj, kamparanoj, burĝuloj… Sed tiam estiĝis situacio de duobla politika povo, tiaj situacioj kiuj karakteriĝas pro ties malstabileco …kaj eventualeco. La partioj de la burĝklaso, kun parlamenta apogo konstituis la t. n. "Provizoran Registaron". Ĉi tiu daŭre plu apogis la intervenon en la Mond-Milito kiun oni heredis el la Caro. Sed estis alia fakta povo en la lando, tiu de la t. n. "sovetoj", popolaj asembleoj de kamparanoj kaj laboristoj. Dum la monatoj, de marto al novembro, la soveta potenco ne povis efike kontraŭfronti la burĝan povon de la Provizora Registaro tial ke en tiu asemblea movado ne ekzistis unueca kriterio pri la milito kaj aliaj landaj aferoj. Inter la diversaj grupoj konstituantaj la sovetojn elstaris la du marksistaj partioj de la menĉevistoj kaj la bolŝevistoj: fakte ambaŭ grupoj tiam estis ankoraŭ nuraj tendencoj aŭ frakcioj de la sama socialdemokratia partio, sed de tiam, kaj sub la premo de la gravaj cirkonstan-

coj de la milito pliakriĝis la kontraŭdiroj inter ambaŭ socialistaj variantoj kaj fine, komence de novembro la bolŝevistoj, poste nomataj "komunistoj", iĝis plimulto en la gvidaj organoj de la sovetoj kaj entreprenis kontraŭfronti la burĝan povon. Grava tiama figuro de la bolŝevista movado estis Leo Trocko; li sukcesis mobilizigi la soldataron de la garnizonoj de la tiama ĉefurbo, Petrogrado, kontraŭ la burĝa registaro kaj defaligi ĝin. La nova reĝimo, subgvide de Vladimiro Lenino, metis finon al la rusa interveno en la milito kaj entreprenis konstruadon de socialista sistemo en la perspektivo de antaŭenirado al la Komunismo.
Kompreneble, tio estigis ŝokigan situacion por la burĝa povo de ĉiuj industriaj kaj kolonisiistaj potencoj en la mondo. Ne estis la unua fojo ke proletara revolucio kaptis la povon en grava industria lando. En la jaro en 1871 estis okazinta la t. n. "Pariza Komunumo", sed tiu proletara eksperimento (socialista kaj anarkiista), daŭris nur sepdek tagojn kaj pasis al la historio kiel anekdoto nepenseble ripetebla. Sed la afero de Lenino, Trocko kaj ties bolŝevistoj, forte enradikiĝis en Rusujo kaj aperis kiel imitebla ekzemplo por la proletaro de aliaj industriaj landoj. Komence de la dua jardeko de tiu 20-a jarcento estis konstituitaj komunistaj partioj en multaj el tiuj landoj, far laboristoj devenantaj el la anarkiistaj grupoj kaj marksistoj el la plej radikalaj sektoroj de la socialistaj partioj. Kaj plej grave estis ke tiuj novaj partioj havis kiel celon kaj idealon ripeti la rusan revolucian elpaŝon. Ni jam vidis ke en Italio la tradiciaj partioj de la burĝa sistemo ne kapablis alfronti la revolucian movadon kaj ĉi tiu estis sufokita nur per la apero de novtipa partio, nomata "faŝista" kiu ludis per politika ambigueco inter socialistaj kaj naciistaj ideoj sed kun klara alvokiĝo defendi la burĝan sistemon kontraŭ revoluciaj eksperimentoj. La procezo de enkonduko de faŝisma reĝimo en Germanio estis iom simila al tiu de Italio sed ankaŭ estis iuj diferencoj inter ambaŭ landoj. En ambaŭ kazoj temis pri burĝa reago sin apogante sur la plej malnoblaj instintoj kaj la nescio de la amasoj por abortigi revolucian procezon. En la kazoj de Germanio kaj Austrio, la fakto ke tiuj potencoj perdis la militon vekis popolan reagon kontraŭ la autoritatoj kiuj estis entreprenintе la militan aventuron. En ambaŭ landoj falis la monarkioj kaj estis proklamitaj respublikoj.
Tiel vidite, la afero multe similis al la falo de la Caro en Rusio, t. e. temis pri la unua paŝo de la procezo: la anstataŭo de feŭdisma monarkio per demokratia respubliko. Same kiel en Rusio en 1917, la ĵus naskiĝinta germana respubliko restis sub la kontrolo de la burĝklaso kies alvokiĝo kaj intereso estas resti en la kapitalista ekonomia sistemo. Do, la ekonomiaj interesoj de la popolaj klasoj restis subordigitaj al tiuj de la superregantaj klasoj. Antaŭ la germanaj popolamasoj restis kiel farenda tasko la dua paŝo, kiun oni plenumis en Rusujo en Oktobro (novembro) de 1917. La germanaj komunistoj (spartakistoj), liderataj de Roza Luksemburgo kaj ***Karl Liebknecht*** sciis tion, sed ĉu la popolamasoj estis konsciaj pri la neceso de tiu tasko? Iu antikva hinda proverbo aŭ aforismo

asertas: *Se du regnoj intermilitas sed unu el ili ne scias tion, la alia ĝuas avantaĝon*. Nu, jen ĉi tio okazas kun la klasbatalo; la laborist-klaso, ĉiuj klasoj kiuj pergajnas sian vivon per laborado, ne scias ke ili troviĝas en milito (nomata "klasbatalo") kontraŭ la soci-klaso(j) kiu(j) havas aliajn interesojn. Iu maniero apartigi la intereson de la popolaj klasoj el la klasbatalo estas devii ilian atenton al aliaj aferoj kiel la rasismo, la naciismo… la mondmilito mem estis alia el tiuj aferoj por veki en la popolo pasion kiu deviu ĝin el la klasbatalo. En Germanio, en 1919, donis frukton, favore al la superregantaj klasoj, la intensa naciisma kaj rasisma propagando de pluraj generacioj. Roza Luksemburgo komprenis ke en Germanio la afero ne tiom estis matura por Revolucio kiel estis en Rusio du jarojn antaŭe, tamen ŝi partoprenis en la operacion kiam ŝiaj kamaradoj sin lanĉis malprudente al tiu aventuro. La registaro de la socialdemokrata ***Friedrich Ebert*** sufokis la insurekcion kaj la trupoj de **Freikorps** (veteranoj de la unua mondmilito kunbanditante kun ekstremdekstraj grupoj), kaptis Rozan Luksemburgon, ***Karl-Liebknecht*-**n kaj kelkajn aliajn subtenantojn. Ŝi estis arestita kaj murdita (poste ĵetita al kanalo) kune kun ***Liebknecht***, dum la spartakisma provo de revolucio la 15-an de januaro 1919. Ĉi-kaze, la burĝaro, bone servita de tiuj germanaj socialistoj tiom similaj al la itala Mussolino, provizore kontrolis la situacion. Notindas ke la menciitaj **Freikorps** tre similis al la ***Fasci di Combattimento*** kiuj konstituis la bazon de la itala faŝismo. Dum la sekvaj jaroj, dum en Italio venkis kaj plifirmiĝis la faŝistoj de Mussolino, en Germanio oni serioze prikonsideris la italan modelon kiel rimedon kontraŭ iu eventuala reviglîĝo de la revoluciaj fortoj en la lando.


Ankaŭ en Aŭstrio oni establis respublikon rezulte de la milita malvenko, sed la Aŭstria lando kiu rezultis el tiu procezo tute ne estis la antaŭmilita imperio. Altrudo de la militvenkintoj estis la sendependigo de Hungario kaj aliaj teritorioj antaŭe apartenintaj al la imperio. La nova aŭstria lando estis nur tio kion oni puvus nomi "germana Aŭstrio", t. e. la teritorio kies loĝantaro plejparte estis subinflue de la mitaro de la tut-germanismo kaj emis integriĝi en grandan komunumon de ĉiuj arjoj. La politikistoj kiuj devis demarŝi la humiligajn kondiĉojn truditajn de la venkintoj estis socialistoj, kaj inter tiuj altrudoj estis tiu de la malgrandigo de la armeo. Tio altiris al la maldekstraro la malamon de la eks-armeanoj kiuj ariĝis en organizaĵoj similaj al tiuj menciitaj de la italaj ***Fasci di Combattimento*** kaj la germanaj **Freikorps**. Krome la fakto ke ekzemple, en Hungario en 1919, estiĝis soveta reĝimo en la linio de la rusa komunismo, kvankam poste ĝi estis perforte detruita, kreis la kondiĉojn por la drivado de la aŭstria burĝaro al pli dekstremaj pozicioj; multaj socialistoj forlasis sian partion, la kamparanaron reprenis sian tradician konservativismon...


Estis en ĉi tiu socia kunteksto kiam Adolfo Hitlero malkovris sian alvokiĝon, aŭ pasion, al la politika agado. Okazis alia sovet-favora revolucio en Bavario dum li estis armeano en ties ĉefurbo, Munkeno. Tiam li povis konstati tion ke, krom la

tut-germanisma mitaro, ankaŭ la komunistaj ideoj pri socia justeco kaj finigo de la kapitalista ekspluatado altiris la favoron de la popol-amasoj. Kiam la komunista bavaria reĝimo estis perforte detruita de la germana armeo, Hitlero restis en sia armea taĉmento, al kiu oni asignis la taskon spioni la diversajn grupojn kaj partietojn tiam formiĝantajn. En la plenumado de tiu tasko li kontaktis kun la Germana Laborista Partio. Tiu organizaĵo estis tiam nur unu el la multaj sektismaj grupetoj kun naciismaj kaj rasismaj ideoj tiam ekzistantaj en la lando, kaj laŭ li mem asertis poste en sia verko **Mein kampf** (Mia batalado), vekis lian intereson kaj decidigis lin aliĝi al tiu grupo la fakto ke en ĝi ne estis klara lidereco. Same kiel en la kazo de Mussolino, la amo de Hitlero al la patrujo tre estis ligata al lia ambicio lideri la ŝtaton. Kiam Hitlero aliĝis al la Germana Laborista Partio, en aprilo de 1919, membris jam en tiu politika organizaĵo, kiu poste iĝos «Naci-socialista Partio» aŭ resume «nazi-partio», ***Alfred Rosenberg***, homo kiu poste elstaros kiel mito-kreanto de la germanismo, kaj la sekvan jaron aniĝis ĉe tiu partio aliaj gravaj figuroj kiel ***Ernst Röhm*** kaj ***Rudolf Hess. Röhm*** estis lidero en tiu movado de la **Freikorps**, kaj ***Hess*** estis ega mito-maniulo. ***Rosenberg*** publikigis en 1930 sian verkon: «La mito de la 20-a jarcento», per kiu li pretendis science pruvi ke estis arjoj Zaratruŝtro, la antikvaj hindaj bramanoj, la egiptaj faraonoj de la unuaj dinastioj, la persa reĝo Ciro, la helenoj de la homeraj sagaoj kaj Jesuo-Kristo mem. Poste li verkis aliajn similtipajn mito-kolektojn kiuj utilis kiel propagando de la naziismo dum la daŭro de tiu reĝimo.

Kiel membro de tio kio baldaŭ estiĝos la Nazi-Partio, Hitlero komencis politike aktivadi en la biero-drinkejoj de Munkeno. Ĉiuj kiuj ĉirkaŭis lin, kaj li mem, komencis konstati lian eksterordinaran lertecon esprimi, altirmaniere kaj demagogie, la plej vulgarajn popolajn antaŭjuĝojn kaj rankorojn. Tiele li estis formiĝante kiel politika agitisto kaj komencis eliri el anonimeco. Li havis la kapon plenan je tiuj ideoj de la tut-germanismo kiujn ni priskribis. Inter la tut-germanismaj mitoj, iu kiu speciale kaptis lian menson estis tiu koncepto de


*Ernst Röhm*


*Rudolf Hess*


*Alfred Rosenberg*


*Adolf Hitler*
**Komence de la 20-aj jaroj**

la **Lebensraum** (vivo-spaco). Ĝi rilatas al politikoj kaj praktikoj de koloniigado, kiuj furoris en Germanio de la 1890-aj ĝis la 1940-aj jaroj. Komence ĝi estis popularigita ĉirkaŭ 1901, poste ĝi fariĝis politika celo de la Germana Imperiestra Regno en la unua mondmilito, kiel centra elemento de programo pri teritoria ekspansio. La ideo de Hitlero pri la **Lebensraum**, kiun li konsideris necesa por la postvivado de Germanio estis ke la plimulto de la origina loĝantaro de Centra kaj Orienta Eŭropo estu retirigata (per amasaj deportadoj al Siberio, ekstermado aŭ sklaveco) inkluzive de poloj, ukrainoj, rusoj, ĉeĥoj kaj aliaj slavaj nacioj konsideritaj ne-arjaj. La plano implicus instigi repopoladon de tiuj landoj pere de germanaj setlantoj. La tuta indiĝena loĝantaro estus malpliigita per malsato, uzante la agrokulturan pluson por nutri Germanion.
Sed liaj diskursoj ne devis multe insisti pri la mitoj de la germanismo; pri tiu afero jam la menso de la germanoj estis bone kultivita far la propagando dum pluraj generacioj. Ĉeftemo de lia politika politika propagando dum tiuj post-militaj jaroj estis la afero de la **Dolchstosslegende** (la legendo de la surdorsa ponard-piko). La germana loĝantaro estis alvenante al la firma konvinko pri tio ke ilia lando estis surdorse ponard-pikita far tiuj kiujn ili nomis "La krimuloj de novembro", tiuj kiuj metis finon al la regado de la Kajzero (kvankam ankaŭ al la milito). Tiu legendo estis disvastigata de multaj malkontentaj militestroj kaj eks-soldatoj. Multaj germanoj forgesis ke ili ĝoje ricevis la establon de la demokratio kaj komencis kulpigi la maldekstraron, la liberalulojn kaj la judojn, al kiuj oni atribuis esti perfidinte la landon de interne kaj riĉiĝinte per la milito. La fortoj de la ekstrem-dekstraro, kiel tiu partio en kiu membris Hitlero, profitis tiun popolan anim-staton kaj la ekonomian ruinon de la lando por malstabiligi la ĵus nask-iĝintan demokration de Vajmaro.
La figuro de Hitlero iom-post-iom estis akirante pli kaj pli da ĉefroleco. Li intense dediĉiĝis al la partiaj taskoj kaj klare influis sur la nova ideologio. Komence de la 20-aj jaroj li jam estis skizinte ian partian projekton: kapti la ŝtatan pov-aparaton; detrui la internajn malamikojn: judojn, marksistojn…; rearmiĝo de la lando; perforta ekspansio por akiri novajn teritoriojn cele garantii la germanan estontecon. Inter la partiaj taskoj plenumataj de Hitlero estis la presaro, depost kiam li alprenis tiun respondecon kreskis la legantaro de la ĵurnalo, la **Völkischer Beobachter** (Nacia Observanto) kaj la partia membraro. La 24-an de februaro de 1920 la partio havis gravan asembleon en kiu ĉeestis proksimume du-mil personoj. Hitlero legis la 25 punktojn de la partia programo en kies kunredaktado li estis interveninte. La 1-an de aprilo de 1920, laŭ propono de Hitlero, estis aldonita al la nomo de la partio la terminon "naci-socialista". Evidente li eltiris instruon el la revolucio de Bavario kaj komprenis ke estis bona ideo kunmiksi la social-istajn depostulojn kun la naciismajn. Memorindas ke simile ambigua programo utilis al Mussolino por ricevi amasan popolan apogon en Italio. Tiutipaj ambiguaj programoj, kiujn oni povas katalogi kiel "popolismaj", karakteriĝas pro la manko

de rigoro, kaj celas trompi la malplej klerajn sektorojn el la popola loĝantaro kies apogon oni celas altiri. Hitlero forlasis la armeon kaj plendediĉiĝis al la politika aktivado. Baldaŭ poste, li organizis taĉmentojn de eks-soldatoj por konservi ordon en la partiaj kunvenoj, kaj forpeli tiujn kiuj malkonsentis kun la parolantoj. La 5-an de oktobro 1921, ĉi tiuj taĉmentoj organiziĝis sub la nomo **Sturmabteilung** (SA), ankaŭ konata kiel la brun-ĉemizuloj pro la koloro de siaj uniformoj. Tre baldaŭ, la SA ĉesis limigi sin al sia rolo konservi ordon kaj komencis ataki opoziciajn politikajn grupojn kaj judojn, kio fine iĝis ĝia ĉefa agado. Temis pri strategio, jam praktikita de la ***Fasci di Combattimento*** en Italio por konkeri la straton. En la printempo de 1920, Hitler prenis kiel emblemon la **Hakenkreuz** -la svastikon- kaj la saluton de itala faŝismo per levitaj brakoj.
Jam komence de 1921, Hitlero estis taksata kiel eminenta oratoro, parolante antaŭ pli kaj pli ampleksaj hom-amasoj. Li famiĝis ekster la partio per siaj polemikaj diskursoj, atakante la Traktaton de Versajlo, kaj rivalajn grupojn ĉefe marksistojn kaj judojn. Tiujare, Hitlero persone gvidis la brun-ĉemizulojn en atako kontraŭ iu kunsido de bavariaj federaciistoj. Kvankam li restis enkarcerigita dum tri monatoj pro la batado de liaj bravulaĉoj al la federaciistoj, elirinte el la prizono li montris nenian ajn penton; male, li estis pli preta uzi la perforton kontraŭ siaj oponantoj. De tiam, la naci-socialista movado brutale persekutis la kunsidojn kaj diskursojn kiuj povus altiri la publikan atenton. En la somero de 1921 Hitlero estis la ĉefa oratoro kaj propagandisto de la nazia partio kaj ĉi ties ĉefa akiranto de mon-donacoj, sed li ne estis ankoraŭ la oficiala lidero de la movado. ***Anton Drexler***, la fondinto de tiu partio, volis limigi la diktatorecan rolon de Hitlero sed fiaskis ĉar ĉi tiu ĝuis jam je publika famo, ene kaj for de la partio, tiu persona eco kiun oni esprimas per la vorto "karismo". El tiu pov-batalo, ***Drexler*** rezultis venkita kaj estis retirita el lia posteno de prezidanto. Hitlero iĝis nediskutebla lidero de la Nazia Partio kaj establis en ĝin la "principon de lidereco" (**Führerprinzip**), tio estas, la koncepto de senlima aŭtoritato de la estro (**Führer**), al kiu ĉiuj ŝuldas blindan obeon. Ĝis tiam, en tiu partio, samkiel en ĉiuj ajn partioj kaj organizaĵoj, estis asembleoj, debatoj, voĉdonado… La "principo de lidereco" forigis ĉion-ĉi, kaj de tiam estis nur la decida volo de la estro. Post la kapto de la politika povo far la naziistoj, tiu sistemo etendiĝis, kiel ni vidos siamomente, al la tuta germana nacio.
Dum tiuj unuaj jaroj de la 2-a jardeko, Hitlero atingis pli socian apogon; pere de ***Hess***, ***Göring***, ***Rosemberg*** k. a. li sukcesis aliri al pli altaj sociaj sferoj, el kiuj li povis atingi malavarajn mondonacojn por lia novtipa partio. Kuraĝigita pro tiu socia apogo, li komencis prikonsideri la eblecon kapti la politikan povon, kvankam lia partio ankoraŭ ne estis la ĉefa politika forto en Bavario kaj krome ĝi estis fakte nekonata en la cetero el Germanio. Li serĉis la apogon de la armeaj garnizonoj de Bavario kaj en tiu medio li atingis ian sukceson. Inter la gravaj armeestroj kun kiuj kontaktis estis la generalo Eriko Ludendorfo, kiu estis rol-

inta en la lasta etapo de la MondMilito en la gvidado de la germana armeo. Surbaze de tiu ankoraŭ nesufiĉa apogo en la lando, Hitlero aŭdace kaj malprudente entreprenis, fine de 1923, aventuron similan al tiu de la Marŝo al Romo de Mussolino unu jaron antaŭe.
Verdire, la tiama situacio estis malsimila ol tiu de Italio kaj sufiĉe komplika. La regantaro de Bavario kun ties armeo troviĝis tiam en situacio de preskaŭ ribelo kontraŭ la tutlanda, berlina, regantaro. La kontraŭdiroj inter ambaŭ aŭtoritatoj, la ŝtata kaj la regiona, estiĝis pro la ĥaosa ekonomia situacio rezulte de la militaj monkompensoj kiujn Germanio devis pagi al Francio laŭ la dispozicioj de la Traktato de Versajlo. En tiutipaj konfuzaj situacioj ĉio eblas kaj iu aŭdaca elpaŝo povas sukcesi… aŭ fiaski. Hitlero, kun la kompliceco de la fama eks-militestro Ludendorfo decidis riski. Li intencis altiri la bavarian registaron kaj armeon interveni kontraŭ la ŝtata registaro por kapti la povon eksterleĝe. Post ŝanceliĝo, la bavaria kanceliero ***Gustav von Kahr***, decidis ne kunlabori kun Hitlero. Li volis establi naciistan diktaturon sed sen la naziistoj. Ĉi tio indikas ke la situacio en Germanio estis matura por drivado al konservativa diktaturo, eĉ faŝism-tipa, sed Hitlero ne estis ankoraŭ la referaĵo aŭ simbolo de tia solvo; li estis malpli grava ol li pensis en la medioj de la malkontentaj kun la situacio de la lando. Lia eraro estis intenci devigi la bavariajn fortojn sekvi lin; kiam li marŝadis apud Ludendorfo kaj kun siaj sekvantoj por sekvestri la registaron de ***Kahr*** kaj la komandantojn de la bavaria armeo kaj polico cele kunmarŝi ĉiuj al Berlino, la civilaj kaj militistaj aŭtoritatoj de Bavario reagis kontraŭ la ribelintoj kaj estiĝis pafado en kiu mortis 14 ribelintoj kaj 4 policistoj. Kompreninte ke la operacio fiaskis, Hitlero fuĝis kaj kaŝiĝis, sed li estis malkovrita kaj arestita kelkajn tagojn poste.





**Hitlero kun la ceteraj akuzitoj pro la Munkena Puĉo dum ilia juĝo**

Paradokse, tiu fiasko estis grava faktoro de la posta sukceso de Hitlero kaj ties faŝista partio. La t. n. «Munkena Puĉo» kaj la koncerna juĝo de la kulpuloj altiris la atenton ne nur de tuta Germanio sed ankaŭ internacian. Dum la juĝo, kiu komenciĝis la 26-an de februaro de 1924, oni permesis al Hitlero paroli senlime, kio igis ke lia populareco kresku pro lia verva kaj konvinka naciisma diskurso. Kompreneble, Roza Luksemburgo, ***Karl Liebknecht*** kaj la revoluciuloj de Hungario kaj Munkeno ne ĝuis tian toleremon. Estas evidente al kiu flanko kliniĝis la simpatio de la dominanta sistemo, kaj estas evidenta la klasbatalo kiu subkuŝas en la fundo de la tuta afero. Tion montras ankaŭ la juĝa sentenco: Hitlero estis kondamnita al 5-jara enprizoniĝo en la fortreso de ***Landsberg*** kvankam la konstitucio postulis dumviva enprizoniĝo por tiutipaj deliktoj. Li estis bone traktita de la gardistoj kaj povis ricevi leterojn kaj vizitojn de siaj admirantoj. Li estis amnestiita kaj liberita la 20-an de decembro de tiu sama jaro; entute li estis en prizono dum nur naŭ monatoj.
Dum la restado de Hitlero en ***Landsberg*** li dediĉiĝis ordigi siajn politikajn ideojn kaj registri ilin en la verko **Mein kampf** (Mia batalado). Tiu verko havis formon de biografio kaj estis ekspozicio de la nazia ideologio. Li malkaŝe deklaris la celon de tutmonda superregado far la germana ŝtato: la detruadon de Francio, la ekspansion easten por la akiro de **Lebensraum** (vivo-spaco) eĉ elpelante la tieajn enloĝantojn. Rilate al la interna politiko de la lando li deklaris ke la **Deutsches Reich** (Germana Imperio) devos esti regata per diktaturo, kaj ke tiu ŝtato devos esti «rasa ento». Laŭ li, la arja raso, plejsupera inter ĉiuj, devas superregi la ceterajn. Post lia liberiĝo el la prizono, Hitlero devis okupiĝi rehavi la kontrolon de la Nazia Partio. Dum lia enprizoniĝo anstataŭis kaj planis delasi lin aliaj lideroj: Ludendorfo (kiu estis absolvita en la juĝo pro la Puĉo de Munkeno), ***Gregor Strasser***… Tiam estis malpermesite al Hitlero paroli publike kaj la registaro estis prikonsiderante la eblecon forsendi lin al Aŭstrio. Li devis penbatali ĝis 1929 por rehavi sian antaŭan elstarecon kaj por ke la nacia Partio kapablu pribalote konkuri kun la aliaj partioj. Kvankam li, pro sia respekto al la leĝoj atingis la releĝigon de la partio kaj la permesigon de lia politika agado, lia submetiĝo al la konstitucio estis nur ŝajna: li nur estis ŝanĝinte sian strategion, ne sian ideologion. Iuj membroj de lia partio rifuzadis tiun teniĝon, ĉefe la estroj de la brun-ĉemizuloj, kiel ***Ernst Röhm***, kiu ridindige nomis lin «Adolphe Legalité», sed Hitlero persiste daŭris en sia strategio apogi sin sur la demokratio kaj la balotadoj por aliri al la povo kaj poste detrui ilin. Li estis pluverkante sed ankoraŭ ne publikiginte sian biografian libron **Mein Kampf** per kiu li malkaŝe eksplicitis siajn verajn planojn.
Estis dum tiuj jaroj kiam Hitlero organizis sian partion land-skale, kaj komencis krei ĉiutipajn organizojn interne de ĝi: La **Hitlera Junularo**, la **Ligo de Germanaj Knabinoj**… kaj oni establis organizaĵojn en Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Sarlando, Libera Urbo Dancigo… Ĉefe, oni establis la SS-n kiel subdivido de la SA; iliaj membroj devis fari juron de lojaleco al Hitlero kaj baldaŭ ili elstaris pro tio ke



Hitlero je lia eliro el la prizono, la 20-an de decembro de 1924



*Gregor Strasser*



*Joseph Goebbels*



*Himmler, Hess, Hitler kaj Strasser en 1927*

ili estis pli fidindaj ol la brutalaj brun-cemizuloj. Hitlero sin metis fronte de la nazia hierarkio, kun la titolo la "Supera Gvidanto de la Partio kaj la SA, Prezidanto de la Germana Nacia Socialisma Laborista Organizo". Krome li kreis la "Direktorion de la Regno", konstituitan de la ĉefaj naziaj hierarkoj. Unu el la celoj krei ĉi tiun ampleksan kaj kompleksan strukturon estis la formado de "ŝtato ene de la ŝtato"; tiamaniere, kiam la naziistoj finfine ekregus, Hitlero povus rapide detrui la respublikan strukturon, kaj anstataŭigi ĝin per la strukturo de sia partio.

La ambigueco de la naziista programo, miksante socialistajn kaj naciistajn depostulojn, okazigis al Hitlero problemojn similajn al tiuj kiuj devis alfronti Mussolino en la unua etapo de sia regado. Repreninte la kontrolon de sia partio, Hitlero asignis al sia eks-rivalo ***Gregor Strasser*** la taskon organizi la naziistan movadon en la nordo de Germanio. Gregor entreprenis la laboron kun la helpo de sia frato ***Otto*** kaj iu junulo nomata ***Joseph Goebbels***. ***Strasser*** estis firma kredanto je la socialista enhavo de la partia programo. La 22-an de novembro de 1925, en iu konferenco en Hanovro ***Strasser*** deklaris sian apogon al la eksproprigo de la posedaĵoj de la nobelaro pri kiu oni baldaŭ fariĝus plebiscito. Tiamaniere, la naziista organizaĵo de tiu norda zono unuiĝis al la marksistoj en la plebiscita kampanjo pri tiu temo. Hitlero reagis la 14-an de februaro de 1926 organizante konferencon en ***Bamberg***, kie li devigis ***Strasser***-n kaj ***Goebbels***-n malkonfesi ilian programon. La pozicio de ***Strasser*** komplikiĝis kiam, post malmultaj tagoj ***Goebbels*** forlasis lin kaj unuiĝis al Hitlero. Ĉi ties malamikeco kun ***Strasser*** daŭre pligrandiĝis. Laŭ la Principo de Lidereco, **Führerprinzip**, ĉiam pravas la estro, kaj la gvidantoj ne estus elektataj de sia grupo sed nomumataj de superuloj; ĉiu povo estus delegata de supre al malsupre (same kiel en la RomKatolika Eklezio).

Dum la 20-aj jaroj la partio de Hitlero konkuris en la balotadoj kiel ĉiuj ceteraj partioj. Ĝia propagando promesadis rifuzi la Traktaton de Versajlo, ĉesigi la pagadon de la militaj mon-kompensoj, krei laborpostenojn, kontraŭbatali la koruptadon kaj kontroli la riĉulojn.

Subtile, la naziistoj ankaŭ komencis rilatigi la judojn kun la komunistoj kaj la koruptaj komercistoj, revivigante malnovajn kontraŭjudajn sentojn.
En normalaj cirkonstancoj eble la Nazia Partio ne estus atinginte specialan sukceson, kaj ĝi restus, kiel ĉiuj ceteraj partioj, submetita al la kutimaj soboj kaj soroj de la lanta evoluado de la politikaj preferoj de la voĉdonantaro. Fakte tia estis, dum kelkaj jaroj, la sorto de tiu partio. Sed en 1929 la situacio ĉesis esti normala; okazis mond-skala ekonomia krizo kiu speciale trafis Germanion pro ĉi ties specifa postmilita situacio. La malboniĝo de la ekonomia situacio favoris Hitleron. La ekomia malstabileco baldaŭ etendiĝis al la politika tereno. Neniu el la burĝaj politikistoj atingis sufiĉan parlamenta plimulton por regi la landon. La prezidento ***Paul von Hindenburg*** nomumis ***Heinrich Brüning***-n kiel kancelieron; ĉi tiu, manke de parlamenta apogo devis regi per prezidentaj dekretoj, sed estante demokrato, li preferis kunvoki novan balotadon esperante atingi la necesan parlamentan plimulton. En la balotado de 1930 la Nazia Partio restis kiel dua forto en la lando, kaj la Komunista Partio la tria. De tiam pli kreskis la socia apogo al Hitlero; kelkaj industriistoj komencis financi lian partion.
En la politika tereno, ***Brüning*** daŭre restis en nefirma situacio, sen sufiĉa parlamenta plimulto ĉar nek la naziistoj nek la komunistoj apogis lin, do li plu devis regadi per prezidentaj dekretoj. Sed en 1932 devis okazi baloto por elekti prezidenton. ***Hindenburg*** deziris retiriĝi sed antaŭ la danĝero ke Hitlero atingus tiun altan postenon, li sin vidis devigita prezentiĝi denove por reelektiĝo. La 25-an de februaro Hitlero iĝis germana civitano kaj tuj prezentis sian kandidatecon por la priprezidenteca balotado. ***Hindenburg*** estis fama generalo de la Mond-Milito, la plej prestiĝa figuro tiam en la lando. Do, kvankam Hitlero faris impresan pribalotan kampanjon, la olda militisto estis denove elektita por prezidi la ŝtaton. Ene de la Nazia partio daŭre persistis la rivaleco inter Hitlero kaj ***Gregor Strasser***. Ĉi tiu ne kapablis lideri la organizaĵon sed dume ankaŭ Hitlero ne povis ellasi ***Strasser***-n ĉar ĉi tiu estis sufiĉe prestiĝa figuro en la partio, en la Parlamento kaj en la ĉirkaŭmedio de la Prezidento, kaj krome en la partio havis potencajn partianojn kiel ***Röhm***.
Post la malvenko de Hitlero en la prezidanteca balotado, la kanceliero ***Brüning*** malpermesigis la naziajn brun-ĉemizulojn, kies nombro tiam jam estis pli granda ol tiu de la armeaj trupoj. Sed Hitlero bone sciis intrigi en la ĉirkaŭmedio de la Prezidento; ankaŭ tie estis rivalecoj inter figuroj kiel ***Brüning***, la Generalo ***Kurt von Schleicher*** kaj ***Franz von Papen***. Frukto de konspiro de ***Schleicher***, ***Papen*** anstataŭis ***Brüning***-n kiel kanceliero kun la apogo de Hitlero; la prezo postulita de ĉi tiu estis la kunvokado de nova balotado en 1932. Tiam la Nazia Partio rezultis la unua politika forto en la Parlamento, kvankam sen sufiĉa apogo por la regado. Kun tiu balot-rezulto Hitlero rifuzis apogi ***Papen***-on, kaj postulis la kancelierecon por li, kaj rifuzis ankaŭ kunregi kun ***Schleicher***. Antaŭ ĉi tiu nova fiasko, ene de la Nazia Partio plifortiĝis la grupo de la apogantoj de ***Strasser***, kaj ĉi tiu komencis publike kritiki Hitleron.


Kunsido de la Nazia Partio en 1930


La 30-an de januaro de 1933, Hitlero iĝas Kanceliero


La Kanceliero Hitlero (1933)


Hitlero kun la Prezidento ***Hindenburg***

Ĉar daŭris la politika malstabileco pro manko de parlamenta plimulto, oni kunvokis novan balotadon, la trian en 1932. Ĉi-foje la voĉdonantoj punis Hitleron pro ĉi ties necedemo; lia partio perdis voĉdonojn kvankam ĝi daŭre restis la unua en la Parlamento. ***Schleicher*** plu konspiradis, ĉi foje por provoki la falon de ***Papen*** siafavore. La Prezidento, nomumis lin la 2-an de decembro de tiu jaro 1932. Estis klare ke tiam la povo estis nek en la popolo nek en la Parlamento sed en la Prezidento ***Hindenburg*** kiu estis tre maljuna kaj facile manipulebla de lia kamarilo. Hitlero komprenis tion kaj entreprenis siajn proprajn intrigojn en tiu medio. Li interakordis kun ***Papen*** por ke ĉi tiu influu sur la Prezidento cele defaligi ***Schleicher***-on. Siavice ĉi lasta estis klopodante subfosi la pozicion de Hitlero ene de la Nazia Partio apogante ***Strasser***-on por la vic-kanceliereco. Multaj membroj de la partio de Hitlero, elrevigitaj, estis forlasante ĝin por alkuri al la Komunista Partio. Kvankam ***Strasser*** ne akceptis la oferon de ***Schleicher***, estiĝis grava diskutado de Hitlero kun li, kaj li minacis forlasi la Nazian Partion. Tre damaĝis la partion la fakto ke la interna kverelo estis publike diskonigata de la presaro. Hitlero minacis sin mortigi se la tuta afero fuŝiĝus. ***Strasser*** havis kontrolon sur iome grava parto el la naziista strukturo, sed en tiu kriza momento li decidis vojaĝi al Italio por ferii, esperante ke Hitlero alvoku lin reveni. Sed la **Führer** ne nur ne alvokis lin, sed profitis lian foreston por eksigi ĉiujn liajn simpatiantojn el la gravaj postenoj en la partio kaj anstataŭigi ilin per fidelaj partianoj, kaj kunvokis ĉiujn naziistajn liderojn en Berlinon por igi ilin juri personan fidelecon. Kvar tagojn post la foriro de ***Strasser***, Hitlero estis finfine preninte la kontrolon de la tuta politika strukturo de la partio.
La 4-an de januaro de 1933 Hitlero kunvenis kun ***Papen*** kaj interakordis koalicion se ***Hindenburg*** nomumus lin kiel Kancelieron. ***Papen*** konvinkis la Prezidenton ke li kapablus kontroli Hitleron en la regantaro. Demisiinte ***Strasser*** pro manko de parlamenta apogo, ***Hindenburg*** aprobis la regantaron de Hitlero en kiu enestis ankaŭ ***Papen***. Tiele la naziista lidero iĝis Kanceliero de Germanio la 30-a de januaro de 1933.





Dum la jaroj 1925 al 1933, kiam Hitlero estis baraktante por konservi la kontrolon de la Nazia Partio kaj atingi pere de ĝi la politikan povon en Germanio, Mussolino estis plifirmigante sian faŝistan reĝimon en Italio. Li sciis ke la ekzistantaj politikaj institucioj de la lando devis esti ĝisfunde modifitaj aŭ nuligitaj se li volus konservi la povon. La procezo de li entreprenita rezultis sukcesa; la kvar murdo-atencoj kiujn li suferis dum la procezo pli favoris ol damaĝis lian planon; ankaŭ la reĝo ne estis obstaklo por ties realigo.
Mussolino volis ne kunhavi la povon kun siaj ministroj; en la kunsidoj de lia registaro ne eblis la normala pritraktado de la politikaj aferoj; la rolo de la ministroj estis nur sekvi la instrukciojn de la *Duce*, fakte, li konservis la kontrolon de gravaj ministrejoj. Ankaŭ la rolo de la Parlamento estis tre limigita; tiu asembleo ne povis pridiskuti ian ajn aferon sen la invito de Mussolino tion fari. Do, la *Duce* ne povus esti eksigita pere de parlamenta decido. Per la malpermesigo de la politikaj partioj de la opozicio, la Parlamento estis konstituita de nur faŝistaj deputitoj. Krome, el la civitana voĉdonantaro estis ekskludita plejparto el la laboristaj klasoj, kiuj antaŭe estis apoginte la maldekstrajn partiojn; ĉiuj kandidatoj devis esti aprobataj de la faŝistoj. En januaro de la jaro 1939 la Parlamento malaperis por esti anstataŭata de la t. n. "Ĉambro de Faskoj kaj Korporacioj". Ankaŭ la juĝsistemo suferis enmiksiĝon de la faŝisma reĝimo: multaj juĝistoj, kiujn la faŝistoj konsideris "nedezirindaj" estis forpelitaj el ties funkcio. La enkarcerigo senjuĝe iĝis normala afero, kaj Mussolino ne hezitis interveni en la verdiktoj kiam tio konvenis al li. Por la civitanoj jam ne plu eblis kontraŭi la decidojn de la regantaro. Registaro kaj Ŝtato estis jam sama afero.
En 1929, Mussolino ŝanĝis sian laborlokon al la palaco Venecio. Kiel oficejo li uzis la ege granda ĉambro de la *Mappamondo*, 18 metrojn longa, 15 larĝa kaj 12 alta. Tiuj kiuj vizitadis Mussolinon devis trairi diagonale tioman distancon por aliri al lia skribotablo. Eĉ la ministroj ne povis sidi en tiu loko dum ili estis pritraktante aferojn kun la *Duce*. Kiam li troviĝis en tiu loko li postuladis absolutan si-

lenton; li volis ke la publiko pensu ke li estis senlace laborante dum 18 horoj ĉiutage kaj devigis la presaron diskonigi tiun version. Plejparto el liaj vizitantoj ne povis esti kun li dum pli ol dek-kvin minutoj. Aliri al la *Duce* estis afero de prestiĝo, kaj alportis multajn avantaĝojn, eĉ financajn. La grado de amikeco estis zorge mezurita kun ĉiu gasto; kun iuj, Mussolino konsentis renkonti ilin ĉe la pordo de sia giganta oficejo, anstataŭ devigi ilin marŝi la dudek metrojn por aliri al lia skribotablo (aŭ kuri, kiel li devigis fari al siaj ministroj kaj generaloj).
Mussolini asertis ke li legadis ĉiutage 350 ĵurnalojn. Li volis impresi la raportistojn dirante al ili ke li sekvas ĉiujn individue. Zorge analizante la gazetojn, li pensis ke li bone informiĝis pri la publikaj bezonoj, tamen tio estis nur memtrompo: li ofte forgesis, ke la novaĵoj estis fabrikitaj de sia propra gazetara oficejo. La kampanjo por prezenti Mussolinon kiel superhomon signifis profundan malestimon de la *Duce* pri liaj faŝistaj kolegoj, ĉar li devis estri per si mem diversajn ministrajn fakojn. Foje estis kontraŭdiraj decidoj rilate al la diversaj fakoj estritaj de li. Krome, kiel ĉefministro, antaŭ 1926 li demarŝis ses el la dek tri ministrejoj, kaj antaŭ 1929 li jam akiris du pliajn. Li prezidadis la partion, la Grandan Konsilantaron kaj la Landan Konsilon de Korporacioj, krom la registar-kunsidojn. Inter aliaj institucioj, elstaris lia prezidanteco de la Plejalta Komisiono pri Defendo, la Ŝtata Konsilantaro, la Tribunalo de la Ŝtata Fisko, la Armea Konsilantaro, la Komitato de Civila Mobilizado, kaj ĉiuj ceteraj koporacioj kreitaj post la jaro 1934. Notindas ke tiu agad-maniero, rezulte de malkonfido pri liaj subuloj, ne estas propra de ĉiuj diktatoroj, faŝistaj aŭ ne: Stalino, Hitlero kaj Franko kutimis delegi funkciojn en homoj pri kiuj ili konfidis kaj ili okupiĝis nur pri la desupra





**Grava elemento por la subteno de la faŝisma reĝimo estis la kulto al la *Duce*.**

gvidado. Mussolino ofte prenis decidojn senkonsulte al aliaj ministroj; kiam iuj ministroj evidentigis sian kapablon, pligrandiĝis ilia ebleco esti eksigitaj el iliaj funkcioj. Aliaj estis ĉesigitaj pro tio ke ili estis tro popularaj. Mussolino ne estis lojala kun siaj oldaj kamaradoj. Ankaŭ pri tio li ne estis simila al Hitlero, kiu konservis siajn ministrojn dum multaj jaroj.
Mussolino kutime ne komunikis persone la ĉesigon de la ministroj, ofte la eksigitoj eksciis tion per la presaro. Li ne havis proksimajn kunlaborantojn pri kiuj li plene konfidus. Estis raraĵo ke la ministroj kunvenu sen la ĉeesto de la *Duce*, kaj se tio okazus iam, ili tuj iĝus suspektindaj je konspiro. La centralizo de la povo kun Mussolino tiome estis granda ke kiam li troviĝis for de Romo, plejparto el la itala administracio restadis senfara. Ofte li ne bone konis la pritraktatajn temojn kaj liaj interparolantoj ne ricevadis klarajn instrukciojn pri la maniero atingi la konkretajn rezultojn de la prenitaj decidoj. Tio igis ke, en la realo, por iuj gravaj aferoj estis kvazaŭ ne ekzistus regantaro.
Grava elemento por la subteno de la faŝisma reĝimo estis la kulto al la *Duce*. Abundis statuoj liaj, multaj stratoj kaj placoj portis lian nomon, kaj la *Mont Blanc* estis konata kiel «Monto Mussolino». Abundis sloganoj dirantaj: «Mussolino pravas ĉiam», kaj kun diraĵoj liaj: «Kredi, obei, batali»; «Vivu danĝere»; «Preferindas konduti unu tagon kiel leono ol centon kiel ŝafido»… La kino-spektantoj devis ekstari kiam aperis film-bildoj de la *Duce*. En la presaro la vorto DUCE aperadis kun majusklaj literoj post lia nomo. Multsence, tiu kulto funkciis kiel oficiala religio de la faŝismo, kaj ofte, la sola kriterio de politika lojaleco postulita de la reĝimo estis la publikaj laŭdoj al la grandeco de la *Duce*. La eldonistoj ricevadis detalajn instrukciojn antaŭ la publikigo pri tio kion ili devus aŭ ne publikigi. La informiloj ludis gravan rolon en la kreado kaj disvolvado de la kulto al la *Duce*. La celo estis atingi popolan apogon por la diktatoro kaj superi ties eblajn rivalojn, emfazante liajn «superhomajn» talentojn. Oni devis ne prezenti Mussolinon kiel iun ajn alian politikiston, sed kiel aŭtentan savanton de Italio, homo










**La informiloj ludis gravan rolon en la kreado kaj disvolvado de la kulto al la *Duce***

elektita de la destino por savi la landon el la socialista minaco kaj la koruptitaj demokratiaj politikistoj por restaŭri la gloron de Italio. Li estis la nova cezaro, iu genia homo, homo de agado, klera, mondfama ŝtatisto plendediĉita al la renaskiĝo de Italio. La ĵurnalistoj kiuj ne tre volontis alĝustiĝi al tiu linio fiksita de la faŝismo estis ĉesigitaj kaj ekzilitaj al la aridaj insuloj Liparo kaj Lampeduso. Al la fremdaj ĵurnalistoj oni pagadis, timigadis aŭ elpeladis el la lando.
En la faŝisma Italio ne ekzistis iu mastro de la propagando kiel la germana ***Joseph Goebbels***. En marto de 1933 ĉi tiu estis nomumita ministro de propagando de Germanio kaj de tiam li efektivigis totalan kontrolon de la intelekta kaj kultura vivo de la lando. ***Goebbels*** estis humildevena homo kiu iĝis unu el la malmultaj intektuloj de la nazia reĝimo. Lia komplekso de malplivaloreco pro siaj fizikaj limoj igis lin acid-karaktera homo kaj fanatika kontraŭjudo. Li ĉiam estis radikala naziisto kiu senkondiĉe apogis Hitleron. Ekde 1930 kiel ministro de propagando li uzis ĉiujn rimedojn por potencigi la nazian partion en la balotadoj; li lerte sciis profiti la malamon de la germanaj meza kaj popola klasoj. ***Goebbels*** kreis la Ĉambron de Kulturo de la **Reich** por strikte kontroli la popolan kulturon. Kiam li vizitis Romon en 1931, li ne estis impresita de la propaganda aparato de la reĝimo. Tamen en 1926 la faŝista reĝimo jam estis uzante ĉiujn propagand-rimedojn je kiuj ĝi disponis por disvastigi siajn mesaĝojn. En 1933 Mussolino nomumis sian bofilon Ciano kiel estron de la Presar-Oficejo kiu ankoraŭ estis iu organo kontrolita de la registrarestro.
Ciano, kiu estis studinta la germanan modelon, rapide plietendigis la funkciojn de la Presar-Oficejo al la radio kaj la kino. En junio de 1935 Mussolino kaj Ciano kreis novan Ministrejon de Presaro kaj Propagando. La italaj ĵurnaloj sugestis ke la Duce estis ne-erarebla. Iu ideo kiun Mussolino instigadis per frazoj kiel: *Ofte mi volus ne pravi, sed ĝis nun neniam okazis tio kaj la eventoj rezultis al mi tiel kiel mi estis aŭgurinte*. Ne sufiĉis prezenti Mussolinon kiel homon de agado, li devis esti ankaŭ klera homo. Oni informis ke li estis leginta (kaj asimil-inta) la 35 volumojn de la *Itala Enciklopedio* kaj la tutaĵon de la klasikuloj de la eŭropa literaturo inkluzivante la kompletan verkaron de Ŝekspiro. Oni prezentadis lin ankaŭ kiel virtuozan violon-ludanton. La oficialaj fotografaĵoj prezentadis lin kiel lerta ĉeval-rajdanto, tenisisto, piloto aŭ skermomajstro, samkiel fortika atleto kaj kapabla inspekti la trupojn plej rapide. Tre plaĉis al Mussolino ke oni komparu lin kun Napoleono Bonaparto, kiu, laŭ iuj faŝistaj studoj, estis reale italo. Aliaj asertadis ke oni ne devus malrangigi Mussolinon komparante lin kun nur unu imperiestro; li estis, reale, kompendio de ĉiuj ĝis tiam ekzist-intaj imperiestroj.
Liaj diskursoj sonadis kiel ĵurnalaj fraz-titoloj, kaj uzadis senartifikajn asertojn per tre limigita terminaro. Ĝenerale lia tono estis agresa kaj tre altira, liaj publikaj diskursoj karakteriziĝis pro la teatreco de lia elparolado ekde la balkono kiun li nomis «sia scenejo». Li paroladis per kurtaj kaj stridaj frazoj, akompan-

itaj de akraj gestoj per lia dekstra mano. Ofte li faradis dramecajn paŭzojn, kun sia kapo en alte, la torso rigida kaj la brakoj anse metitaj, kun insolenta aspekto. Oni diris ke lia histrioneco ne estis pozo sed lia vera naturo. Lia frato Arnaldo priskribis lin kiel iu duondio kiu superrigardis ĉiujn, kiu sciis ĉion okazantan en Italio kaj estis, krome, la plej grava ŝtatisto de Eŭropo.

***Margherita Sarfatti***, amantino de Mussolino, verkis biografion lian titolitan *Dux*, kiu konstituis veran hagiografion; per ĝi oni priskribis Mussolinon tiamaniere: «Romiano laŭ spirito kaj vizaĝ-aspekto, Benito Mussolino estas la reviviĝo de la itala arketipo, kiu reaperas fojfoje laŭlonge de la jarcentoj». Tamen, kiam ŝi estis forlasita de la *Duce*, ***Sarfatti*** asertis ke la libro estis ia «ridinda rubaĵo». La espero de Mussolini, ke li estus la ideala bildo por ĉiuj kaj la troigaj asertoj pri lia figuro, montris ne nur lian vantecon, sed ankaŭ lian misan taksadon pri la publiko. Fakte, li asertis ke la popolo estas stulta, malpura kaj mallaborema. La faŝista propagando atribuis al Mussolino la kvalitojn de iu sanktulo aŭ iu dio. Proksimume tridek milionoj da bildoj de la *Duce* komencis cirkuli en klara ekzemplo de la sakraligado de la politika vivo. Iu el la personoj kiuj komencis kolekti bildojn de la *Duce* estis iu 14-jara infanino nomata ***Clara Petacci***, kies devoteco al Mussolino igis ŝin kunsuferi lian tragikan finon.

Kelkfoje la bildo de Mussolino estis procesie portata surstrate kvazaŭ temus pri bildo de sankta patrono: la ceteraj faŝistoj devis esti konsideritaj kiel liaj sacerdotoj kaj akolikoj. Iu multenombra sekvantaro sekvis kaj ĉirkaŭis lin dum liaj diskursoj kaj publikaj aktoj por lin aplaŭdi. Poste, kelkaj faŝistoj konsideris ke tiu procezo de idolatrio estis iu el la grandaj eraroj de la reĝimo. Se konsideri ke tiu propagando kontribuis konvinki grandnombron da italoj ke ne ekzistis alternativo al la faŝista reĝimo, ni devas konkludi ke Mussolino pravis kiam li diris ke la popolo estas stulta.

Ankaŭ Hitlero devis politike manovri por plifirmigi sian ĵus akiritan ŝtatan povon komence de la jaro 1933. Dum la antaŭaj jaroj, li evidentigis eksterordinaran politikan saĝon kaj mankon je etiko en la politika agado. Tamen tio ne sufiĉis por atingi la povon; estis necese ke li mem



**Tipaj gestoj, insolent-aspektaj, kutime uzataj de Mussolino en siaj diskursoj.**



**Incendio de la *Reichstag***







**Hitlero kun la Prezidento *Hindenburg***

kaj la superregantaj elitoj komprenu ke ambaŭ bezonis unu la alian. La 30-an de januaro de 1933, ***Hindenburg***, influita de grandaj entreprenistoj kaj armeaj oficiroj, decidis inviti Hitleron gvidi registaron de koalicio kun la burĝulo ***Franz von Papen***. La Prezidento deziris ke Hitlero establu stabilan dekstraran diktaturon por defendi la celojn de la armeo, la grandaj terposedantoj kaj la entreprenistaro. Ili sin konsideris kapablaj kontroli Hitleron por servi la interesojn de la tradiciaj fortoj. Tiunokte Hitlero adresiĝis radiofonie al la nacio tre modere. Li pacience estis gajninte la konfidon de la grandaj industriistoj kaj la armeo. La radikalaj naziistoj estis ĉagrenitaj pro la "forlaso" de la socialistaj principoj far Hitlero. ***Gregor Strasser***, lidero de la revolucia alo de la partio, forlasis ĝin. Ĉi tio konvinkis la tradiciajn fortojn de Germanio ke Hitlero estis forlasinta la plej radikalajn poziciojn. Tamen li deziris detrui la demokration de Vajmaro kaj ne pretis lasi sin kontroli de iu ajn. La timo, amplekse perceptita, de la komunista minaco estas unu el la ĉefaj faktoroj por ekspliki kial la naziistoj kapablis detrui la konstitucion de la Vajmara Respubliko.

La forto de la komunista partio igis ĝin ian realan minacon por la naziistaj aspiroj. En la du balotadoj okazintaj en 1932, la Komunista Partio pligrandigis la nombron de siaj voĉdonoj el 14,3 elcente en julio, al 16,9 en novembro. En la germanaj stratoj la «Ligo de Batalantoj de la Ruĝa Fronto» konkuradis kun la SA laŭnombre kaj perfortaj metodoj. En la balotadoj de 1932 la Socialista Partio ricevis 20,4 elcenton el la voĉdonoj. Sekve de ĉio-ĉi, la 10-an de februaro de 1933, Hitlero deklaris sian intencon detrui la «marksistan minacon». Siaflanke, la komunistoj eraris pensante ke la regantaro de Hitlero ne daŭrus; ili supozis ke lia nomumo kiel kanceliero signifus krizon de la kapitalista sistemo kiu nepre kondukus al la ekonomia kolapso kaj la venko de la Komunismo. Ilia pasiveco estis profitata de la naziistoj. La 24-an de februaro la polico alsaltis kaj detruis la centran oficejon de la Komunista Partio. ***Goering***

deklaris ke oni trovis evidentecon de komunista konspiro por perforte alsalti la povon. La naziistoj estis kreintaj tion kion oni prikribis kiel «kontraŭkomunistan histerion». Ni devas noti ke krei tian senton estas, ĝuste, la baza celo de la faŝismo. Aliflanke, la malakordo inter komunistoj kaj socialistoj malfortigis la germanan maldekstraron.
En tiuj cirkonstancoj, la 27-an de februaro iu juna nederlandano, ***Marinus van der Lubbe***, incendiis la Reichstag-n, la germanan parlamentejon, ŝajne kiel protesto pro la subpremado kiun estis suferante la laboristklaso. Tiu ulo havis nenian rilaton kun la germanaj komunistoj kaj, fakte, ŝajnas ke li kontaktis kun membroj de la SA en la tagoj antaŭ la incendio. Hitlero ignoris la evidentecon ke ***Van der Lubbe*** agadis sola kaj konkludis ke temis pri la unua akto de la kapto de la povo far la komunistoj. Tio konstituis oportunan pretekston por meti finon al la Konstitucio de Vajmaro kaj forbalai la opozicion. ***Hindenburg***, laŭ peto de la naziistoj, subskribis la «Dekreton pri Protekto de la Popolo kaj la Ŝtato». Ĝi signifis la ĉesigon de politikaj liberecoj kaj la plifortigon de centra povo. Per la dekreto ĉesis ĉiuj konstituciaj garantioj, kaj la Centra Registaro rajtis preni la kontrolon de ĉiu ajn provinca registaro kiu ne kapablus restarigi la publikan ordon. Krome oni limigis la personajn rajtojn: libera esprimado, presaro, manifestacioj… la aŭtoritatoj povis interveni la privatan interkomunikadon, traserĉi la loĝejojn kaj aresti la personojn sen juĝa ordono.
En tiuj specialaj cirkonstancoj okazis la balotado de la 5-a de marto de tiu jaro 1933. En ĝi estis ega partopreno, 88 elcente el la voĉdonantaro. Ankaŭ la grado je perforto estis alta: 50 kontraŭ-naciistoj kaj 18 naziistoj mortis en surstrataj bataloj. La balota rezulto iome elrevigis la naziistojn; la voĉdonoj favoraj al ili kreskis el 33 elcento al 43,9. La katolika partio plialtigis siajn 4,2 milionoj da voĉdonoj al 4,4. La socialdemokratoj perdis 70.000 voĉdonojn sed ili ankoraŭ estis la dua politika forto. La komunista partio perdis milionon da voĉdonoj, atingante 4,8 milionojn, deca rezulto se konsideri ke ĉiuj komunistaj lideroj estis enkarcerigitaj. Por Hitlero estis malbona rezulto ĉar por modifi la Konstitucion estis necesaj du trionoj el la parlamentanoj. Do li elpensis artifikon por ke la Parlamento leĝe aprobu la starigon de diktaturo. Li proponis leĝon kiu rajtigu la registaron regadi diktatorece dum kvar jaroj; tiutipa leĝo eblis en la kadro de la Konstitucio sed por ties aprobo estis necesa la aprobo aŭ sindeteno de du trionoj el la parlamentanoj. Kiam la Parlamento kunvenis por prikonsideri tiun leĝo-proponon, la naziistoj forĵetis sian maskon de modereco kaj montris sian veran vizaĝon: oni ne permesis eniri la komunistojn (tiujn kiuj ankoraŭ ne estis en prizono), dum la cetero el la deputitoj estis timigitaj far la membroj de la SA kiuj ĉirkaŭis la konstruaĵon. Spit' al ĉio, Hitlero daŭre bezonis du trionoj el la voĉdonoj, kaj ne kalkulante kun la apogo de la socialdemokratoj, estis necesa al li la apogo de la Centra Partio. Por atingi ĝin Hitlero promesis respekti la rajtojn de la Katolika Eklezio kaj subteni la moralajn kaj religiajn valorojn. Temis pri promesoj kiujn li ne pensis

plenumi, sed efikis. Fine, nur la socialdemokratoj voĉdonis kontraŭ la leĝo, kiu estis aprobita per 444 voĉdonoj kontraŭ 94. La vojo estis malfermita por ke Hitlero starigu sian personan diktaturon. Tiu leĝo estis la bazo de la hitlera reĝimo nomita **Drittes Reich** (Tria Regno); la perforto uzita de la naziuloj por kapti la absolutan povon estis poste uzata por konservi kaj plifirmigi ĝin.

La 14-an de julio de 1933 oni promulgis leĝon kontraŭ la kreado de novaj partioj. La unua artikolo de tiu leĝo tekstis: «En Germanio ekzistas kiel unika politika partio la Germana Naci-socialista Partio de la Laboristoj». Tiu Nazia Partio estis rekrutinta 850.000 novajn membrojn el la 66-miliona loĝantaro. Ses jarojn poste, en 1939, estis jam ok milionoj da naziistoj, unu el ĉiu kvaro da germanoj. En majo de 1933 estis malpermesitaj la sindikatoj, ties lideroj estis arestitaj kaj ties havaĵo konfiskita. Ĉiuj laboristoj estis enkadrigitaj en unusola oficiala sindikato de la reĝimo, la Germana Fronto de la Laboro. Poste venis la vico de la politikaj partioj; la komunistoj jam estis eksterleĝigitaj dum la balotkampanjo kaj la socialdemokratoj volonte dissolviĝis en junio de 1933. Sekvis poste la ceteraj partioj. En julio de 1933, la Nazia estis la sola partio de la lando; Hitlero estis tiam la lidero de unupartia ŝtato kaj ĉiuj membroj de la Parlamento estis naziistoj. Pere de serio da leĝoj estis nuligita ankaŭ la aŭtonomeco de la regionoj. La 30-a de januaro de 1934 estis dissolvitaj la regionaj parlamentoj, malaperante tiele la federacia Ŝtato kiu ekzistis ekde 1867. La kontrolo de la edukado, presaro kaj kultura vivo far la naziistoj estis plenumita sen grandaj malfacilaĵoj. Printempe de 1933 ***Goebbels***, kiel Ministro pri Propagando, kontroladis la radio-elsendojn, la presaron kaj libro-eldonadon. En septembro de tiu jaro ĉiuj «intelektaj laboristoj» estis devigitaj aniĝi al la Kultura Ĉambro de la **Reich**, kiu strikte kontroladis ilian agadon. En la universitatoj, grupoj de naziaj studentoj teruradis maldekstremajn aŭ sendependajn profesorojn kaj devigis ilin eksiĝi. Estis tiu studenta personaro, la asocio de studentoj influita de naziisma penso, la ĉefrolanto de la kampanjo de bruligado de libroj okazinta en majo de tiu jaro 1933. Estis ĵetitaj al fajrejoj la libroj «kontraŭaj al la germana spirito»: tiuj verkitaj de marksistoj, judoj, pacifistoj…

Sed dume la grandaj entreprenistoj, la Prezidento, la armeo kaj la aristokrataro konservadis sian tradician povon. Ene de la nazia partio estis voĉoj postulante ian duan revolucion kontraŭkapitalistan. ***Ernst Röhm***, la lidero de la SA, revis kunmiksi la SA-trupojn kun la armeo por konstitui ian «Popolan Armeon» sub lia komando. Iuj naziaj membroj de la maldekstra alo de la partio deziris la alprenon de radikalaj sociaj dispozicioj kiel la naciigo de la tero. Tiaj pozicioj ege alarmis la grandajn industriistojn kaj la armeon. Hitlero mem malkonfidis pri la plej kontraŭkapitalista alo de sia partio, kaj opiniis ke la SA estis aro da surstrataj batalantoj ne taŭgaj por la profesia armeo. Li persone trankviligis la entreprenistojn kaj la armeon indikante ke nur la armeo portos armilojn en la ŝtato. Liaj deklaracioj elrevigis la plej radikalajn membrojn de la partio. Hitlero venis al la konkludo ke oni devus meti finon al la SA.

Similajn internajn partiajn problemojn devis alfronti antaŭe Mussolino, kaj li solvis la aferon malsammaniere ol Hitlero. Sed notindas ke li krome havis malsaman ideon pri la rolo de la partio. Male ol Hitlero, Mussolino konsideris ke li neniam devus konsenti ke la faŝista partio estu ŝtato ene de la ŝtato. Li opiniis ke ne estus necesa al li la partio por regi Italion; por tiu tasko li jam disponis je la polico kaj la publika administracio. La partio estus utila al li kiel ilo por dissendi la «faŝistajn» valorojn, eduki la junularon kaj organizi sociajn aranĝojn. Sed iuj radikalaj elementoj de la partia anaro deziris ke la faŝismo alprenu la ŝtatan strukturon kaj ĉi ties subpremantan aparaton. Kaj estis aliaj partianoj (sindikatistoj, teknokratoj…) kiuj pensis ke la brutaleco de la *squadrismo* devus malaperi. En partioj kun ambigua programo, kia estis la itala faŝismo kaj ankaŭ la germana naziismo, estas neevitebla la generiĝo de tiaj kontraŭdiroj. Mussolino sciis lerte manovri por nuligi la povon de la lokaj kaj regionaj lideroj de la partio, kun pacienco kaj sen perforto, kvankam, jes ja, li devis eksigi el la partio la plej turbulentajn elementojn el ties membraro. Dume estis rekrutitaj novaj, alitipaj partianoj. Dum la jaroj 1926-1927 estis varbitaj 300.000 novaj membroj de la partio. Ĝenerale, temis pri oportunistoj kaj karieristoj kiuj vidis en la partio iun vojon por altrangiĝo kaj plibonigo de sia persona vivo. En la jardeko de 1930, la kamparanoj kaj laboristoj kiuj antaŭe estis preskaŭ 30 elcente el la partianoj, restis malplimulto. Estis forigitaj el la partio 60.000 *squadristi* kaj disidentaj faŝistoj. Purigante la italan faŝisman partion de ĝiaj plej ekstremistaj elementoj kaj malfermante la pordon al novaj membroj, Mussolini ankaŭ detruis siajn esperojn, ke faŝismo fariĝu revolucia elito. Male, la partio iom post iom transformiĝis al politika grupo de mezklasaj laboristoj kaj oportunistoj, karakterizata de sia nepotismo kaj korupteco. Promociante duarangajn faŝistojn, Mussolini montris sian zorgon eviti la aperon de eblaj rivaloj. La plej dinamikaj kaj karismaj homoj estis forigitaj el la sfero de la povo. La regionaj gvidantoj komprenis ke ili povus konservi tutan povon en la provincoj se ili estus lojalaj kaj obeemaj al la *Duce*. Ili sciis ankaŭ ke sen Mussolino ilia propra povo disfalus.
Alia baza problemo kiun li devis alfronti estis la itala armeo, ĉar li konsciis pri la neceso adapti ĝin al la faŝisma reĝimo. Antaŭ 1925 la faŝismo estis dividita pri la politiko kiun oni devus adopti tiorilate. La plej radikaluloj rekomendis profundan reformon, kiu malpliigus la armeon kaj donus al ĝi pli popularan bazon. Fine Mussolino elektis kompromisan solvon kun ĉefe monarkiaj kaj tradiciismaj oficiraj korpusoj. La plej drastaj reformoj estis prokrastitaj aŭ forlasitaj. La armeo restis tradicia kaj forto ne ideologie engaĝita al la faŝismo.
En Germanio la solvo de la internaj partiaj kontraŭdiroj estis pli rapida sed ankaŭ pli perforta ol en Italio. Dum la jardeko post 1920, la ekstremismaj grupoj batalis man-al-mane sur la stratoj de Germanio, do estis necesa ia instrumento de atako kaj fizika protekto. Tiucele Hitlero kreis en 1921 la SA, kies membroj devenis plejparte el la amaso da senlaboruloj kiuj ekzistis en Germanio. Ilia perfort-

emo estis lerte uzita de la gvidantoj de la SA, ĉefe Ernst ***Röhm***, kiu igis la SA-n efikan ilon de subteno al naziismo; baldaŭ ege kreskis ilia membraro. Per timigaj metodoj, la SA sukcesis silentigi kontraŭulojn; iliaj marŝoj, kantoj kaj torĉlumaj procesioj diskonigis la naziismon. Ili sendube ludis esencan rolon en la aliro de Hitlero al la politika povo. ***Röhm*** revadis pri socio gvidata de la laboristoj kaj la soldatoj; neniam li pensis ke Hitlero, atinginte la povon laŭleĝe, volus plifirmigi la novan nazian ŝtaton altirante la tradician klason de Germanio. La SA pli kal pli iĝis malfacile kontrolebla. Hitlero konsideris ke la revolucio devus halti, kaj pensis ke la membraro de la SA estis tro interesitaj pri la «socialista» enhavo de la nacisocialismo. ***Röhm*** konsideris ke Hitlero forgesis ke la nazia povo estis gajnita en la stratoj. La SA devenis ia naziismo kiu malplaĉis al Hitlero; ĝia kvar-miliona membraro estis troa kaj konstituis seriozan problemon por liaj planoj. ***Röhm*** mem komencis paroli pri la SA kiel iu «armeo de la popolo», ia koncepto kiu timigis la generalojn kaj la industriistojn kies apogo Hitlero urĝe bezonis. La politikaj intencoj de Röhm iris tro malproksimen. Siaflanke, ***Goering*** kaj ***Himmler*** malamis ***Röhm***-n kaj deziris subordigi la SA al la SS.
Eble Hitlero ne decidiĝis agadi ĝis kiam la vickanceliero ***Von Papen*** prononcis diskurson per kiu li petis ke oni finu la ekscesojn de la SA. Hitlero konsideris ke li devus kontentigi la konservativajn fortojn. La 30-an de junio de 1934, dum la t. n. «Nokto de la longaj tranĉiloj», Hitlero eliminis la SA-an kiel politikan kaj militistan forton. ***Röhm*** kaj la ĉefaj lideroj de la SA estis mortpafitaj far membroj de la SS; la armiloj estis volonte provizitaj de la armeo. Estis nenia rezisto. Ankaŭ oni reguligis malnovajn kontojn kun uloj ne favoraj al la novaj teorioj de Hitlero. ***Schleicher***, iama kanceliero, kaj ***Strasser***, lidero de la radikala socialista alo de la nazia partio, estis murditaj. Entute, estis ekzekutitaj proksimume 200 personoj. La signifo de la «Nokto de la longaj tranĉiloj» estis tre grava. Per tiu perforta agado Hitlero metis finon al la radikala alo de sia partio kaj al la tradicia dekstrara opozicio. De tiam la situacio draste ŝanĝiĝis en Germanio; la armeo klare apogis la nazian reĝimon. La germanaj generaloj estis timintaj la SA-an, sed ili ne perceptis tiam la danĝeron de la SS kiel institucio de la nazia teroro. Ĉefe, Hitlero certigis al si personan politikan hegemonion. La armeo dankis la murdon kiel necesan por la «defendo de la ŝtato» kaj ***Hindenburg*** mem gratulis Hitleron pro ĉi ties «kuraĝa kaj decida interveno». Fakte, tio estis legaligi la murdon. De tiam, la nazia reĝimo jam ne estis ia tradicia povo-formo, temis pri persona diktaturo kun timiga povo. Sed sekvis jaroj de politika stabileco kaj paco kontraste al la antaŭa perturbo-plena etapo. Krome, pasinte la krizo de 1929, la germana ekonomio komencis pliboniĝi. Ĉio-ĉi favoris la akcepton de la hitlera diktaturo fare de la germana popolo. Tiu diktaturo iĝis plenplena kiam mortis la maljuna Prezidento ***Hindenburg***, kio okazis la 2-a de aŭgusto de tiu jaro 1934. Hitlero profitis la okazon por iĝi Prezidento kaj devigi la armeon ĵuri personan lojalecon al la **Führer** kiel plej supera komandanto de la armeo kaj lidero de la nazia

ŝtato. La 19-an de aŭgusto 90 elcente el la germanaj voĉdonantoj aprobis la absolutan diktatorecon de Hitlero. Li povis deklari antaŭ la enorma homamaso kuniĝinta en Nurenbergo: «Ne plu estos revolucioj en Germanio dum 1000 jaroj!».

Do, meze de la jardeko post 1930 ambaŭ faŝistaj reĝimoj, la itala de Mussolino kaj la germana de Hitlero, estis majoritate akceptitaj de la respektivaj popoloj. Sed oni devas diri ke la aprobo al tiuj reĝimoj estis ankaŭ ekstera, t. e. el la ceteraj landoj, kiuj, kvankam en ili estis politikaj sistemoj pli malpli demokratiaj, ili fermis la okulojn antaŭ la diktatoreca karaktero de la faŝismaj reĝimoj. Abundis tiam laŭdoj kaj favoraj deklaracioj de burĝaj regantoj de Britio k. a. al la faŝistaj lideroj, ĉefe al Mussolino. Ankaŭ en Rusio, tiam nomata "Sovetunio", la politika situacio rezultinta el la Revolucio de 1917 estis evoluinta al diktaturo; la tiama povo de Stalino, sukcedinto de Lenino, ne estis malpli absoluta ol tiuj de Mussolino kaj Hitlero. Sed tio kio alarmis la kapitalistajn landojn ne estis la diktatoreco, sed la socialismo de Sovetio, t. e. la fakto ke iu lando povas rapide industriiĝi sen kapitalista funkciado. Tiorilate, la burĝa mondo rigardadis kun simpatio la aperon de reĝimoj, kiel tiuj de Italio kaj Germanio, kies ĉefa alvokiĝo kaj rolo estis eviti la imitadon de la rusa eksperimento.


Iu elmontro de tiu simpatio al la eŭropaj faŝismoj estis la aljuĝo al Germanio de la celebrado de la Olimpiaj Ludoj de 1936. Tiu evento estis tre zorge planita de la naziaj gvidantoj por montri al la mondo la grandecon de la nova reĝimo kaj, ĉefe, la superecon de la arja raso. Kvankam Hitlero malsimpatiis al la «internaciismo» de la ludoj, la sporto povus utili kiel ilo de propagando por prezenti la nazian stetikon. Do, kvankam li opiniis ke la olimpi-ludoj estis «invento de la judoj kaj fra-masonoj», atinginte la povon, li vidis en ili iun rimedon pligrandigi la nazian prestiĝon. La preparado estis konsiderita laŭ ia skalo «vagnera», kun la konstruado de impona stadiono por 100.000 personoj. Oni esperis la viziton de kvar milionoj da fremduloj en Berlino, vera montrofenestro de la nazia reĝimo. La ber-














Olimpiaj Ludoj de 1936

linaj stratoj estis ornamitaj per standardoj de la svastiko. Hitlero komprenis ke la kontraŭjudaj aranĝoj estus malbone konsiderataj de la internacia presaro, do li ordonis la ĉeson de ĉiu kontraŭjuda propagando, kvankam la ciganoj estis retiritaj el la stratoj. Inter la ĉeestantoj troviĝis la brila kino-direktorino ***Leni Riefenstahl***, kiu profitis la eventon por realigi sian dokumentan filmon «Olimpio». La germanoj atingis pli da premioj ol la ceteraj landaj sportistaroj, sed tamen la ĉefprotagonisto estis la usona nigrulo ***Jesse Owens***; dum unu semajno li iĝis la reĝo de la ludoj atingante dek-unu venkojn. Ĉagrenita, Hitlero rifuzis saluti la usonanon; li tute ne volis esti fotita kun nigrulo. Kaj li devis suferi pliajn humiligojn. Ricevis medalon sur la podio iu franco, kaj en alia okazo sonis en la stadiono la nacia himno de Turkio.
Kiel dirite, la celebrado de la Olimpiaj Ludoj de 1936 en Berlino estis kvazaŭ ĝentilaĵo kiun oni faris al la nazia Germanio ignorante la brutalecon de tiu reĝimo. Ja, nur du jarojn antaŭe, en 1934, okazis ne nur la «Nokto de la longaj tranĉiloj», kiun ni priskribis, sed ankaŭ la murdo de la aŭstria kanceliero ***Engelbert Dollfuss***. Okazis ke, malgraŭ la deziro de Hitler kunigi Aŭstrion kun Germanio, la aŭstria kanceliero ege kontraŭis la ideon kaj malpermesis al la aŭstria nazia partio agadi kontraŭ la sendependeco de Aŭstrio. La 25-an de julio 1934 grupo de naziistoj impete eniris en la oficejon de la kanceliero kaj murdis lin. La murdo de ***Dollfuss*** igis tutan Eŭropon suspekti ke Hitlero ordonis la atencon por preteksti la okupadon de Aŭstrio. Poste oni eksciis, ke la aŭstraj SS trejniĝis por la puĉo en la koncentrejo de ***Dachau***. La morto de ***Dollfuss*** generis reagon de ĝenerala kondamno fare de la eŭropaj potencoj. Mussolino sendis kvar diviziojn al la aŭstra landlimo por subteni la aŭstrian sendependecon. La brita kaj franca registaroj publikigis deklarojn kontraŭ ĉiu provo aneksi Aŭstrion. Pro la internacia premo, Hitlero sin sentis devigita nei ajnan implikiĝon en la murdo de ***Dollfuss*** kaj nei ke li provis okupi Aŭstrion. Tio montris ke Germanio ankoraŭ ne kapablis sin teni agresema pri la aŭstra afero. En la internaciaj aferoj Hitlero devis sin montri modere; tiujare mem, Germanio estis subskribinte traktaton je ne-agresado kun Polujo. Por Hitlero la pakto valoris nenion kaj estus ignorata kiam ĝi jam ne estus necesa. Li daŭre persistis en sia plano aneksi la teritoriojn kun germanparolanta loĝantaro; en 1935 okazis plebiscito en Sarlando kaj ties rezulto estis plejmulte favora al la reunuiĝo kun Germanio. Iomete poste la germana reĝimo restarigis la milit-servon, kaj en marto de 1936 la germanoj reokupis Rejnlandon, ĉio kontraŭ la dispozicioj de la Traktato de Versajlo.
Ankaŭ Mussolino estis tiam rompante interakorditajn internaciajn traktatojn. La 3-an de oktobro, 1935, cent mil italaj soldatoj atakis Somalion sen antaŭa milit-deklaro. En tiu lando la italaj trupoj estis venkitaj en la Unua Itala-Etiopa Milito en 1896. La etiopia armeo, rudimente armita, ne povis multe rezisti kontraŭ la modernaj armiloj de la italoj. La reĝo ***Haile Selassie*** estis devigita fuĝi en ekzilon la 2-an de majo, kaj la italaj fortoj kaptis la ĉefurbon Adis-Abebo la 5-an de

majo. Entute, la kampanjo daŭris sep monatojn, ĝis majo de 1936. En 1937, post kelkjara enprizoniĝo, mortis la komunista lidero ***Antonio Gramsci***. Aliaj lideroj de Maldekstraro, kiel ***Sturzo***, ***Turati*** kaj ***Palmiro Togliatti***, estis en ekzilo. Estis ankaŭ ioma opozicio al reĝimo de Mussolino far katolikaj organizaĵoj, sed plejparte el la itala katolikismo komforte instaliĝis en la faŝista reĝimo, ĉefe post kiam, en la jaro 1929, la Vatikano kaj Mussolino interakordis la t. n. Pakto de Laterano per kiu normaliĝis la rilatoj inter la papa sidejo kaj la itala ŝtato, rilato kiu tute ne ekzistis ekde la kreado de la itala ŝtato en 1870. Per tiu Laterana Traktato, la Vatikano iĝis sendependa ŝtato ene de Romo. Esence la papo, laŭ tiu traktato, agnoskas, ke la urbo Romo estas la ĉefurbo de la ŝtato Italio, ne papa teritorio, dum la itala ŝtato agnoskas la politikan kaj teritorian suverenecon de la Vatikan-urbo, kiu do estas agnoskata kiel urboŝtato. Oni devas agnoski ke ne mankis al Mussolino saĝeco por alfronti tiun aferon kun la Eklezio, kiu havis malfacilan solvon ĉar la Papoj estis kontrolinte egan parton el Italio dum multaj jarcentoj. Hodiaŭ, kiam jam ne plu ekzistas la faŝista reĝimo, daŭre validas tiu interakordo inter Italio kaj la Vatikano.

Pli malfeliĉa estis la akordo kiun Mussolino entreprenis poste kun la nazia Germanio, tiu alianco konata kiel «Akso Berlino-Romo». La unua persona renkontiĝo inter ambaŭ faŝistaj lideroj okazis en Venecio la 14-an de junio de 1934. Tiu vizito de Hitlero al Italio daŭris du tagojn. En ĝi oni alvenis al neniu konkreta interakordo. Pli fruktodona estis la vizito kiun Hitlero faris la 3-an de majo de 1938 kaj kiu daŭris sep tagojn; tiam, krom Romon, Hitlero vizitis ankaŭ Florencon kaj Napolon. Tiam jam ekzistis la pakto nomita «Akso Romo-Berlino», ĝi estis subskribita en oktobro de 1936, plurajn monatojn post la Olimpiaj Ludoj en Berlino. Ŝajnas ke Hitlero ĉiam malaprezis la aliancon kun Italio; iam li deklaris: *«Eble Mussolino estus unu romiano, sed tamen lia popolo estas konstituita de italoj»*. Fine de 1936 Hitlero sin sentis pli forta kaj kuraĝis entrepreni aŭdacajn diplomatiajn kaj politikajn iniciatojn kiel la subskribon de iu pakto kontraŭ-***Komintern*** kun Japanio. Francio kaj Britio kondamnis la rompon












**Hitlero vizitas Italion en majo de 1938**

de la Traktato de Versajlo, kaj la Ligo de Nacio kondamnis ankaŭ la italan agreson al Etiopio. Sendube ĉio ĉi estis la unuaj sonoj de la trumpetoj anoncantaj la Duan MondMiliton, sed eble neniu komprenis tiam ke, fakte, iamaniere, tiu milito estis jam komenciĝinte en Hispanio en julio de tiu jaro 1936.
Ni jam vidis ke Hispanio estis inter la unuaj landoj kie Mussolino havis imitantojn. Sed la provo de Generalo ***Miguel Primo-de-Rivera*** ne sukcesis kaj li devis demisii post sep-jara regado pro manko de popola kaj institucia apogo. Ĉi tie ni ne priskribos la okazintaĵojn de tiuj kaj la sekvaj jaroj; detalan priraporton de tiu epoko oni povas vidi en la 88-a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**. Nun ni nur skize priskribos la tiamajn eventojn, atentante pli pri la specifaĵoj de la hispana faŝismo, tio kio igas ĝin simila al la klasikaj faŝismoj, kaj tio kio diferencigas ĝin de la itala kaj germana modeloj.
La falo de la diktaturo de ***Primo-de-Rivera*** estis kaŭzo ankaŭ de la falo de la reĝo kiu konsentis tiun diktaturon; unu jaron post la demisio de la Generalo estis starigita la t. n. «Dua Respubliko». Estis granda konsento en la lando pri tiu ŝanĝo de politika reĝimo, sed tiu ĝenerala akcepto de la Respubliko ne signifis socian interakordon, sed socian krizon. Fakte, la kvin jaroj de la daŭro de la Respubliko, antaŭ la komenciĝo de civil-milito, estis plenaj je politika kaj socia malstabileco, malordo kaj eĉ perforto; la civilmilito mem estis rekta rezulto de tiu ĥaoso. La tri unuajn jarojn, la registaroj kun ega socialista influo, intencis meti solvon al la problemoj de multaj jarcentoj de maljusteco kaj subevoluo. La reago de la tradiciaj fortoj de la dekstraro haltigis tiun progresistan procezon, kaj tio provokis intencon de revolucio (fiaskintan) far la plej radikalaj fortoj de maldekstraro. En tiu kunteksto ege kreskis la komunista partio fondita en 1920 kaj kies celo kaj alvokiĝo, kiel okazis kun ĉiuj ceteraj tiamaj kompartioj, estis imiti la rusan revolucion. Kaj jen tiutipa situacio provokis, same kiel en Italio kaj Germanio, la aperon de faŝism-tipaj organizaĵoj. Por pli kompleta ekkono de la disvolviĝo de la situacio dum tiuj jaroj, oni vidu la menciitan numeron de nia revuo, konkrete la ĉapitrojn alireblajn tra la retadresoj:
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/21-23.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/24-26.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/27-29.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/30-32.html
Por konstati kiom multe la germana kaj itala faŝismoj ĝuis prestiĝon en la dekstraraj sektoroj de aliaj landoj, oni devas rimarki ke en Hispanio formiĝis en tiu epoko diversaj rondoj kun faŝisma inspiro, aldone al la jam tradiciaj dekstraraj rondoj de karlistoj, aliaj monarkiistoj kaj la integristaj katolikoj. En oktobro de 1933 ĉiuj apartaj faŝismaj rondoj unuiĝis en unu partion nomatan «Hispana Falango» sub la gvido de la plej karisma inter la faŝistaj lideroj de la lando, ***José Antonio Primo-de-Rivera***, filo de la diktatoro kiu estis reginta la landon de 1923 al 1930. Estis simileco kaj ankaŭ diferenco inter la Falango kaj la itala kaj germana modeloj

kiuj inspiris ĝin. La plej notinda diferenco estis tio ke la falangismo, kiel ne povus esti alimaniere en la hispana dekstraro, estis tre inklina kaj respektema rilate al la katolika religio. En Hispanio ĉiam la RomKatolika Eklezio identiĝis kun ĉiuj reakciaj kaj konservemaj povoj kaj benis ilin. La simileco kun ceteraj faŝismoj estis, kompreneble, la komuna celo de ĉiuj tiutipaj movadoj: altiri la homamasojn for de la klasbatalo pere de ambigua programo kun socialista enhavo kiu poste povus esti ignorata. Kiel tradicia simbolaro, ĉi-kaze ne povis esti referaĵo al la romia imperio, kiel ĉe Mussolino, aŭ rasismaj depostuloj kiaj tiuj de la naziismo. Oni prenis la emblemon de la jugo kun la sagoj, kiu estis tiu alprenata de la t. n. «Katolikaj Gereĝoj», Izabela kaj Ferdinando. La hispana faŝismo alprenis kiel referaĵon tiun epokon ĉar ĝi elvokis la imperian etapon de Hispanio. Estis dum la reĝado de tiu geparo kiam iu hispana ŝip-ekspedicio malkovris la amerikan kontinenton inaŭgurante la hispanan imperion. La menciitan emblemon oni surmetis al nigra-ruĝa flago ĉar tiuj koloroj estis la emblemo de la anarkiismo; temis pri tributo al la ĝis tiam ĉefa maldekstra forto de Hispanio, kiel simbolo de la maldekstraj depostuloj kiuj ne povas manki en ĉiu faŝisma movado se ĝi vere volas konfuzi la laboristaron kaj ceterajn popolamasojn.

Sekvante la modelon de siaj italaj kaj germanaj samideanoj, la hispanaj falangistoj intencis perforte konkeri la straton konkurante kun la manifestacioj de maldekstraro, kies partioj havis, ankaŭ ili, organizitajn taĉmentojn kapablajn alfronti kaj realigi perforton. Tiuj de la Falango aŭdacis ataki sidejojn de sindikatoj kaj de maldekstraj partioj. En februaro de 1936 okazis balotado per kiu la Maldekstro rekuperis la povon kiun ĝi perdis en 1933. La Falango estis malpermesita kaj ties lidero enkarcerigita, sed la perforto pludaŭris kaj estis murditaj iuj gravaj personoj de ambaŭ socipolitikaj blokoj. Dum la 17-a kaj 18-a de julio la armeo ribelis kontraŭ la registaro en multaj lokoj en la lando. Male ol tio okazinta en Italio kaj Germanio, en Hispanio la laŭleĝa regantaro rezistis kaj al-



**Hispana Falango: ties lidero kaj simbolaro**

vokis la popolamasojn kontraŭi la faŝismon. La rezulto estas konata, la civilmilito daŭris tri jarojn, sed la lidero de Falango ludis neniun rolon en ĝi; li troviĝis en prizono kiam la milito komenciĝis, kaj poste estis juĝita kaj paf-ekzekutita. La venkinto estis la ĉefkomandanto de la armeo, Francisko Franko. La falangistoj organizis operacion por liberigi sian lideron, sed la plano fiaskis. Oni diras ke la partianoj de Franko kaŝe denuncis la operacion al la malamiko por eviti ke la falangista lidero estu rivalo de Franko en la dekstrara medio. Ne eblas certigi ĉu tiu supozo estas aŭ ne ĝusta. La militon ni ne priraportos; ĝi estis amplekse priskribata de multaj historiaj verkoj. En la 88-a numero de ĉi tiu revuo oni resumas ĝin per la ĉapitroj alireblaj tra:
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/33-38.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/39-42.html
Ni aldonu nur ke la potencoj de la «Akso Berlino-Romo» kunlaboris helpi la ribelintan armeon de Franko. Germanaj trupoj kune kun italoj efike subtenis la frankistan armeon. Hitlero povis elprovi siajn fortojn, precipe la Luftwaffe, kiu faris atakojn kontraŭ civilaj celoj, kiel la detruon de la eŭska urbeto Gerniko. Por li, la hispana milito estis baza helpo al lia ekstera politiko, ĉar ĝi distris atenton de lia rearma procezo, provizis al li la ekskuzon por lia furioza kontraŭkomunismo, profitante la timon de la eŭropa loĝantaro, ke Hispanio estas la unua paŝo al ĝenerala komunisma revolucio. Ĝi ankaŭ donis al li aliron al krudaj materialoj kiuj estis urĝe necesaj por lia programo de rearmado. Estis organizita sistemo de interŝanĝo de germanaj armiloj kaj provizoj por hispanaj krudaĵoj. La bombardado fare de german-italaj trupoj de la eŭska urbo Gerniko iĝis unu el la simboloj de la teruro de la hispana civilmilito kaj antaŭvido de tio, kio poste okazis en granda parto de Eŭropo. Siaflanke, la francoj kaj la britoj adoptis politikon de "ne-interveno" timante, ke la hispana milito provokus ĝeneralan militon. Sovetunio subtenis la hispanan respublikon. Post la venko de Franko, Germanio havis aliron al granda kvanto da tre gravaj krudaĵoj por la milita penado, inkluzive feron, kupron, zinkon, hidrargon kaj stanon.
Dum tiuj jaroj, kiam en Hispanio estis sin altrudante permilite kroma faŝista reĝimo en Eŭropo, Hitlero troviĝis en la pinto de sia persona povo en Germanio. La centro de la germana povo estis Berlino, sed tamen Hitlero troviĝis plej ofte en sia bela monta rezidejo en la ***Berghof***, proksime al la bavara urbo ***Berchtesgaden***. Ankaŭ kelkaj naziaj altranguloj konstruis domojn proksime al la ***Berghof*** por konservi kaj garantii sian rektan aliron al Hitlero. Li ofte regis komforte sidanta sur fotelo en sia alpa hejmo. Li rifuzadis burokratajn procedurojn, dokumentan laboron, komercajn kunvenojn kaj administradon ĝenerale. Li volis ne partopreni en la burokratara rutino cele konservi sian rolon je karisma gvidanto. Kiel enkarniĝo de nacia misio, li devis resti for de iuj decidoj, kiuj povus rezulti nepopularaj. Krom la gravaj diskursoj, li tre malmulte diktadis al siaj sekretariinoj. Ofte li subskribis gravajn dokumentojn sen dua revizado. Tiuj ministroj, kiuj

konis lian rutinon, venis al lia alpa rezidejo por provi orienti Hitleron al specifa politiko. Kutime la ministroj devis plenumi "la volon de la **Führer**", kiu estis malfermita al ampleksaj kaj dubasencaj interpretoj. La nazia ŝtato estis kvazaŭ milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, kio altigis la pozicion de Hitler kiel la fonto de la tuta aŭtoritato. ***Ribbentrop***, ministro pri eksterlandaj aferoj, malamis ***Goering***-n, la estron de la **Luftwaffe**. Li malfidis je la arkitekto ***Speer***, kiu timis ***Himmler***-on, la estron de la SS, kiu siavice malamis la estron de la partio, ***Bormann***,-n kiu malamis la ministron de propagando, ***Goebbels***-n, kiu malamis ***Ribbentrop***-on, en senfina erara rondo.
Hitlero malmulte laboris pri ŝtataj aferoj, kvankam nenio grava okazis sen lia konsento. Li neniam interesiĝis pri la maŝinaro de registaro, evitis la oficialan rutinon kaj apenaŭ sidis en sia berlina oficejo krom por haste subskribi dokumentojn aŭ nomumojn prezentitajn al li. Ĉi tio estis pro lia naŭzo al burokratio kaj lia malemo kompromitiĝi per skribo. Fakte, lia karismo dependis de lia malproksimiĝo el la ordinaraj aferoj por subteni lian aŭreolon de senerareco. Tiamaniere la enorma populareco de Hitlero persistis meze de kreskanta senkreditiĝo de la nazia partio. Hitlero preferis lasi la laboron al la nomumitaj ministroj. Ĉi tio donis al li konsiderindan povon kaj kaŭzis grandan rivalecon inter ili. La plej grava afero por ministro estis konservi la fidon de la **Führer**. Tiuj, pri kiuj li fidis, povis alproksimiĝi al li kaj peti lian apogon por siaj proponoj. Hitlero preskaŭ neniam enlitiĝis antaŭ la tria horo matene, ĉar li suferadis de kronika sendormeco kaj kutime devis engluti dormigajn pilolojn. Lia vivstilo ne estis sana; li nek fumis nek trinkis alkoholaĵojn, kaj estis strikta vegetarano sed li ne estis sana. Li suferis multajn fizikajn malsanojn, inkluzive stomakajn problemojn, galajn problemojn kaj ulcerojn. Poste, submetita al la streĉo de la milito, Hitler komencis manĝi kreskantajn kvantojn da medikamentoj por stimuli sian energion. Ekde 1936 li estis ekzamenita de la doktoro ***Morell***. Ĉi tiu konfesis esti uzinta kun Hitlero serion da medikamentoj en kiu estis ne malpli ol dudek-ok drogaj miksaĵoj. Hitlero neniam sukcesis forigi tiun dependecon. Li timis morti antaŭ ol



**La *Berghof*, monta rezidejo de Hitlero**

plenumi siajn grandiozajn planojn por Germanio. Do, laŭ li, estis necese solvi la problemojn, kiel tiun de la vitala spaco, kiel eble plej baldaŭ, por ke tio okazu dum lia vivo, ĉar la postaj generacioj ne kapablus fari tion; nur li povus entrepreni tiujn taskojn.
Por Berlino, Hitlero havis ambiciajn konstruo-planojn. La nova kancelierejo de la Reich, kiun oni mendis al ***Speer***, havus 300-metrajn salonojn cele ke la longa distanco ekde la enirejo ĝis la akcepto-salono impresu kiel signo de la germana povo. Berlino estus reorganizita laŭlonge de kvin-kilometra bulvardo. Por la norda ekstremo, ***Speer*** elpensis konstruaĵon kun enorma kupolo, 16-oble pli granda ol tiu de la katedralo de Sankta Petro de Romo. En la suda ekstremo de la bulvardo estus iu arko simila al Pariza Triumfa Arko, sed multe pli granda: 120 metrojn alta. Kiam Hitlero eksciis en Moskvo oni planis fari iun konstruaĵon pli grandan honore al Lenino, li koleris tiamaniere ke oni povis trankviligi lin nur kiam oni diris al li ke la soveta konstruaĵo estos 20 metroj malpli granda.
En la koncentriĝoj de nazia povo, estis uzataj ĉiuspecaj teatraj rimedoj, kiel milita muziko, grandegaj flagoj, uniformitaj masoj kaj, ĉefe, teatra lumigado kun potencaj lumĵetiloj kaj torĉaj procesioj. La preparado de tiu spektakla propagando estis sola tasko al kiu Hitlero dediĉis atenton. En tiuj publikaj aktoj li devis diskursi, kaj li akurate kaj zorgeme antaŭpreparadis la tekston de la diskursoj. Fakte, la influo kiun li havis sur la popolamasoj estis rezulto de tiuj publikaj elparoladoj; lia elokvento ne estis malpli granda ol tiu de Mussolino. Sed la kialo de la sukceso de lia elokvento estis tiu ke li diradis al la germanaj popolamasoj tion kion ili deziris aŭskulti. Tiuj ideoj pri la supereco de la teŭtona aŭ arja raso,



**Apoteoza, homamasa, kvazaŭ religia ekzaltado de la faŝisma reĝimo kaj ties lidero**

la teorio de la perfido al Germanio kaj ties armeo (la surdorsa ponard-piko), la teorio de la neceso de vitala spaco… ne estis altruditaj al la germanoj; ĉi tiuj jam havis tian idearon en la kolektiva menso, kaj la merito de Hitlero estis tio ke li sciis formuli kaj prezenti ĝin.
Cetere, Hitlero estis soleca homo; li mem deklaris ke sia aŭtenta amiko estis la germana popolo. Tamen, ofte li malaprecis la germanojn; same kiel Mussolino, li estis certa ke la popolo estas stulta; ne povas esti alimaniere, konsiderante ke la popoloj fidis je homoj kiaj ili. Same kiel okazis en Italio kun Mussolino, en Germanio la fotografaĵoj de Hitlero abundis ĉiuloke, kaj al ĉiu novedziĝinta geparo oni donacis ekzempleron de Mein kampf, la verko de Hitlero.
Evidentas ke la kulto kreita ĉirkaŭ Hitlero konstituis veran integrigan forton kiu estis esenca por la disvolviĝo de la Tria Reich. La nazia ideologio estis tre simila al religia kulto, ĉefe en la diigo de iu mesia figuro, oni konstruis bildon de Hitlero kvazaŭ je duon-dio. Plejgrave estis ke fine li mem kredis je tiu mito; li, ja, iĝis la plej fervora kredanto je sia propra senerareco, kio ne helpis lin decidi racie pri ege gravaj aferoj. Li evitadis ĉiujn situaciojn en kiuj li povus ŝajni dubema aŭ erarebla, kio postulis de li ne montri emociojn kaj eviti la manifestadon de humanaj sentoj. La kulto al la nazia lidero estis eĉ pli grava kaj pli sistematike organizita ol tiu kiun oni estiĝis en Italio por Mussolino.
Iu afero pri kiu la kazo de Hitlero estis tre malsimila al tiu de Mussolino estis tiu de la rilato kun la virinoj. Mussolino havis legitiman edzinon, kiu naskis gefilojn al li. Krome, antaŭ kaj post la edziĝo li havis ne malmultajn amantinojn, kaj ankaŭ iuj el ili naskis al li ne-legitimajn idojn. Ankoraŭ en 1937, kiam li jam estis 54-jara, li havis am-aferon kun iu princino el la reĝa familio, tiu kiu poste estis la lasta reĝino de Italio, kaj iu juna amantino lia, ***Clara Petacci***, akompanis lin ĝismorte. Male, Hitlero rezultis tro ne-matura por tiutipaj aferoj. La virinoj neniam estis centra parto de la vivo de Hitlero. La bildo kiun la




**La nazia propagando kun ekzaltado de la lidero alprenis formojn de religia kulto**

## La virinoj de Hitlero



Geli Raubal



Eva Braun

nazia propagando prezentis al la publiko estis ke Hitlero estis edziĝinta al Germanio, do li ne bezonis virinojn. Tamen ekzistis du virinoj kiuj, jes ja, efikis sur lia vivo, kvankam li, laŭŝajne, desapontis ambaŭ kiel amanto. Iu el ili estis lia nevino ***Angela Raubal «Geli»***, kaj la alia ***Eva Braun***. ***Geli Raubal*** estis studentino en la universitato de Munkeno kiam ŝi restis dum kelkaj tagoj kun la «onklo ***Alf***», kiel estis konata Hitlero en la familio. Li enamiĝis al tiu junulino, tamen baldaŭ la rilato ĉesis plaĉi al ŝi; Hitlero ne sentis grandan intereson pri la sekso; eble lia vegetaranismo estis la kaŭzo de lia malalta hormona rendimento. Ŝi havis am-aventurojn kun kelkaj viroj de la ĉirkaŭo de Hitlero, ĉefe kun ĉi ties ŝoforo, kiu estis maldungita pro tio. Seks-arda aŭ ne, Hitlero fakte estis tre posedema, kaj oponis kiam ***Geli*** volis edziniĝi al iu junulo de Vieno. Hitlero malpermesis al ŝi eliri el la hejmo sen eksplicita permeso. En 1931 ***Geli***, premata kaj deprimita, sin mortigis.
Pli daŭra estis la rilato de Hitlero kun ***Eva Braun***. Ĉi tiu kunvivadis kun li ekde 1936 ĝis la morto de ambaŭ en 1945. Ŝajnas ke estis ŝi kiu iniciatis la rilaton kun la germana lidero, kaj minacis sin mortigi se li ne atentus pri ŝi. ***Eva Braun*** neniam havis oficialan pozicion, kaj la presaro de la reĝimo apenaŭ menciis ŝin. Ekde 1936 ŝi loĝis en la ***Berghof***, la monta rezidejo de Hitlero. Tie ŝi komforte travivis la militajn jarojn tute izolita el la realaĵo. Sed eĉ dum ŝia kunvivado kun la **Führer**, ĉi tiu ne speciale atentis pri ŝi kaj ŝi senĉese timis esti forlasita de li. Ŝia vivo estis monotona kaj enua. Hitlero sentis pri ŝi eĉ ne la pasion kiun iam li sentis pri sia nevino ***Geli***, kaj estante pli maljuna, lia seksa rendimento kun ***Eva*** estis eĉ pli malofta ol estis iam kun lia nevino, kaj por dece plenumi lian devon enlite kun ŝi, la doktoro ***Morell*** devis recepti al li fortajn dozojn je afrodiziajn substancojn. Fine, kaj eble por rekompenci ŝin pro ŝia fideleco, Hitlero decidis edziĝi al ***Eva***. Ŝi deziris morti kiel honesta virino, laŭleĝe edziniĝinta, kvankam tio okazus en la bunkro de la ruinoj de Berlino. La 30-an de aprilo de 1945 ambaŭ sin mortigis cele ne esti kaptitaj de la sovetaj trupoj.

En 1938 Hitlero kuraĝis entrepreni iujn iniciatojn en la perspektivo de sia plano por la pligrandigo de Germanio. Dume en Hispanio la civilmilito estis disvolviĝante sufiĉe bone por lia aliancano, la generalo Franko. Do li tiam atentis pri la disvolviĝo de la situacio en Aŭstrio. La sendependeco de Aŭstrio estis garantiita de la Traktato de Versajlo kaj dum kelka tempo estis protektita de Mussolino. Poste la amikeco inter ambaŭ faŝistaj reĝimoj, la pakto t. n. «Akso Romo-Berlino», ŝanĝis la situacion favore al la tut-germanismaj postuloj. En tiu kunteksto en Aŭstrio oni organizis referendumon por decidi pri la ebla unuiĝo de la lando kun Germanio, sed la aŭstra regantaro, malfavora al tiu unuiĝo, manovris por influi sur la rezulto de la plebiscito: oni limigis la voĉdon-rajton al la civitanoj kiuj aĝis pli ol 24 jarojn, lasante for plejparton el la nazia membraro, kies partianoj estis tre junaj. Hitlero furiozis ĉar timis ke tia voĉdonado povus meti finon al la mito de la volo je unuiĝo al Germanio. Do la 12-an de marto de 1938 li ordonis la invadon de Aŭstrio. Li estis apoteoze akceptita tie, kaj profitis la okazon por viziti sian naskiĝlokon kaj surmeti floran bukedon sur la tombo de siaj gepatroj. Aŭstrio restis aneksita al la Germana Reich.
Ĉi tiu sukceso kuraĝigis Hitleron entrepreni pli aŭdacajn celojn. De tiam Ĉeĥoslovakio estis kaj sin sentis subdanĝere. Tiu centr-eŭropa lando estis konstituita de miksaĵo da etnoj artefarite unuigitaj per Traktato de Versajlo. Hitlero pensis ke Ĉeĥoslovakio estis ponardo celante la koron de Germanio. En tiu lando estis 3,5 milionoj da germanoj en la regiono de Sudet-lando. Hitlero klare eksplicitis sian intencon uzi la forton por solvi tiun problemon. Aliflanke ĉio indikis ke Britio kaj Francio ne pretis militi pro tiu afero. La krizo estiĝis en septembro de tiu jaro 1938 kiam okazis senĉesa interfrontiĝo inter la germanoj kaj ĉeĥoj de Sudet-lando, dum Germanio metis sian armeon en alarmo-stato. La 15-an de septembro la brita ĉefministro Chamberlain renkontiĝis kun Hitlero en ĉi ties alpa rezidejo. Hitlero klare diris al la brito ke se Sudet-lando ne estus aneksata al Germanio okazus milito. La rezulto de tiu politiko estis pli favora al Germanio ol Hitlero mem estis supozinte: La firma volo de Chamberlain konservi la pacon ĉiurimede igis ke ĉi tiu, dum malpli ol unu semajno, konvinkis la francojn kaj la ĉeĥojn ke oni devus cedi pri la afero de Sudet-lando. Neniu konsciis tiam ke la volo de Hitlero ne estis korekti la erarojn de la Traktato de Versajlo sed konkeri tutan Eŭropon. Liaj postuloj pri Ĉeĥoslovakio iĝis pli kaj pli ambiciaj, kaj post streĉiga intertraktado kun poziciiĝo de cedo-malcedo kiu ŝajne estis kondukante al milita konflikto, Hitlero, konvinkita de Mussolino, cedis prokrasti la invadon kontentigante sin per la alpreno de Sudet-lando. Dum oni subskribis la inter-akordon, la 10-an de oktobro de 1938, la ĉeĥa delegacio eĉ ne povis ĉeesti la akton. Oni donis al Ĉeĥoslovakio ian neprecizan promeson ke oni garantius la ceteron el la teritorio, sed ĝi neniam estis ratifita. La rusa lidero Stalino komprenis ke la okcidentaj potencoj estis kontentaj dum la ekspansio de Hitlero okazus orienten. Chamberlain persvadis Hitleron subskribi brit-germanan deklaracion pri amik-

eco kaj ke Britio kaj Germanio neniam intermilitos. Por Hitlero tiu dokumento estis nura senvalora papero, sed Chamberlain orgojle montris ĝin je sia alveno al sia lando. Tri semajnojn poste, Hitlero ordonis al siaj generaloj prepariĝi por invadi Ĉeĥoslovakion. En marto de 1939, en malespera provo savi sian landon, la ĉeĥa prezidento ***Emil Hacha*** iris al Berlino por streĉa renkontiĝo kun Hitlero. Ĉi tiu submetis lin al severaj minacoj, tiomgrade ke la ĉeĥa prezidento svenis kiam li eksciis ke germanaj bombard-avioj pretis bombardi Pragon. La 15-an de marto la germanaj trupoj okupis la ceteron el Ĉeĥoslovakio pretekstante la neceson «restaŭri la ordon». Hitlero kaj ties armeo defilis tra la stratoj de Prago. Male ol tio okazinte en Vieno, ĉi-foje ne estis ĝojmanifestacioj; eble la ĉeĥoj, de rasa vidpunkto, estis arjoj, sed, ja, ili ne sin sentis germanoj.
Meze de tiu politika krizo pri Ĉeĥoslovakio, kaj sen ia ajn rilato kun ĝi, okazis gravaj eventoj en la procezo de malboniĝo de la situacio de la germanaj judoj. La 9-a de novembro de 1938 okazis en Germanio la t. n. «Nokto de la rompitaj kristaloj». Dum tiu nokto estis murditaj 91 judoj, 191 sinagogoj estis bruligitaj, 7.000 judaj vendejoj estis disrabitaj, kaj 26.000 jud(in)oj estis senditaj al koncentrejoj. En Germanio jam de antaŭ kelkaj jaroj oni estis persekutante la judojn diversmaniere: oni neis al ili la landan civitanecon, la nazia reĝimo estis dekretante bojkoton al la judaj vendejoj, oni elpelis la judajn profesorojn el la universitatoj kaj aliaj profesiaj fakoj… Lasttempe oni estis dekretinte la forigon de ĉiuj fremdaj judoj loĝantaj en Germanio. Konkrete 12.000 el ili estis devigitaj reveni en Polujon, sed en ĉi tiu lando oni rifuzis akcepti ilin. Sekve de tio, tiu kelkmila personaro troviĝis amasigita en iu kampadejo simila al tiuj ekzistantaj nuntempe en kelkaj eŭropaj landoj por enmigrintoj venintaj el Afriko kaj aliaj lokoj. Inter tiu homamaso troviĝis la gepatroj de iu juna cionisto, ***Herschel Feibel Grynszpan***, tiam loĝanta en Parizo. Li estis baldaŭ forigota el Francio ĉar estis kadukinta lia permeso de rezidado en tiu lando, kaj ne povis elmigri al Palestino ĉar la brita aŭtoritato kiu tiam kontroladis tiun teritorion rifuzis akcepti lin tial ke li ankoraŭ estis infanaĝa. Lia nepra destino se oni ekstradicius lin al Germanio estus esti sendata al tiu kampadejo kie misvivadis lia familio. En lia senespero, li agis perforte kaj malprudente. Li adresiĝis al la germana ambasadejo en Parizo kaj tie li mortpafis la unuan funkciulon kiun li trovis en tiu loko. Tiu faro utilis kiel preteksto al la naziaj aŭtoritatoj por entrepreni kroman elpaŝon en la eskalado de la perforto kontraŭ la judoj: «la Nokto de la rompitaj kristaloj».
La rezulto de la krizo de Ĉeĥoslovakio konvinkis la okcidentajn landojn ke ne eblis honeste trakti kun la aŭtoritatoj de Germanio, kaj ke de tiam ne plu oni devus fari cedojn al tiu lando. Britio kaj Francio konsciis ke ilia ĝistiama ne-decidemo ebligis al Hitlero progresi en ties plano superregi en Eŭropo, kaj ke estis necese prepariĝi por militi. En Germanio regis eŭforio pro la ĵusaj sukcesoj, kaj la germana popolo pli idoligis la lideron kiu atingis tiujn triumfojn. Persistante en tiu aŭdaca politiko, la 22-an de marto de tiu jaro 1939 la germanaj trupoj okupis parton el la

teritorio de Litovia Respubliko. Kroma ĝojo-kialo por la nazia reĝimo estis la fina rezulto de la hispana civil-milito. La 1-an de aprilo la Ĉef-Generalo F. Franko anoncis la faŝistan venkon anoncante: *Hodiaŭ, kaptita kaj senarmigita la Ruĝa Armeo, la naciaj trupoj atingis siajn lastajn militajn celojn. La milito finiĝis*. La ne-diskutebla lidero de la faŝisma Hispanio estis tiu Francisko Franko, sed li apartenis al ia stilo tre malsama ol tiuj de Mussolino kaj Hitlero; li estis arme-estro, ne karisma lidero de faŝisma partio. Malaperinte el la scenejo la lidero de Falango, Franko manovris por kontroli tiun partion, kies membraro, krome, estis kreskiĝante dum la milito. Li decidis la unuiĝon de tiu partio kun aliaj organizaĵoj de la hispana dekstraro: la karlistoj kaj aliaj monarkiistoj, krom aliaj burĝaj kaj katolikaj organizaĵoj. Kompreneble, tiu artefaritaĵo ne respegulis la realon de la hispana dekstraro, kaj estis rezisto akcepti ĝin, ĉefe en la Falango. Ĉi tiu partio, manke de ***José Antonio Primo-de-Rivera*** elektis novan lideron, ***Federico Manuel Hedilla***, kiu tamen devis alfronti la oponon de iuj sektoroj de Falango. Franko instigis kaj profitis tiujn internajn kverelojn de Falango por certigi al si la tutan kontrolon de ĉiuj sociaj fortoj de la hispana dekstraro. Sed fine li devis severe puni ***Hedilla***-n kaj ties sekvantojn. Venkinte en tiu interna fronto kaj poste ankaŭ kontraŭ la ruĝuloj, de tiam estis en Eŭropo kroma faŝista lando. Tio eksplikas la optimismon kaj eŭforion de la faŝistaj hierarkoj. Ili sin sentis nehaltigeblaj, kaj sekve de tio ili entreprenis novajn konkeraĵojn.

Ilia sekva celo estis Polujo. Laŭ la tiama landlimoj de Polujo, fiksitaj de la Traktato de Versajlo, ĉi ties norda flanko apudis al la Balta Maro kaj tio tranĉis la germanan teritorion, en du partojn. La pola teritorio inter ambaŭ Germanio-pecoj nomiĝis «Koridoro de Danzingo». Hitlero provis premi Polion same kiel li estis farinte kun Ĉeĥoslovakio kaj Litovio, sed ĉi-foje tiu strategio ne funkciis. La pola registaro rezistis kaj subskribis kun Francio kaj Britio interakordon kiu garantius la sendependecon de Polujo. Hitlero komprenis ke estos ne-evitebla la milito por solvi tiun aferon de Polio, kaj komencis studi la koncernan strategion.

**Finiĝas la hispana civil-milito**












**Franko prezidas la triumfan defiladon de la venkinta armeo**




Jam dekomence ni kuraĝas, aŭ riskas, formuli teorion, tezon, opinion, aserton… kiel ajn oni volus ĝin difini, ke la milito ĉiam estas eraro, homa fiasko, io kio solvas nenion, eĉ kaze de venko. Ĉi tio validas ankaŭ por la faŝismo kaj ties malnobla celo. Se iu celo estas bona, altrudi ĝin per milito igas ĝin malbona, kaj se temas pri malbona celo, la milito, kaze de venko, igas ĝin pli malbona, kaj kaze de fiasko metas ĝin en la plej absolutan malhonoro. Ĝuste ĉi tio okazis al la ĉefaj eŭropaj faŝismoj de la 20-a jarcento. Oni atribuas al ***Goebbels*** iun frazon, kiun li estus eldirinta post la germana fiasko en Stalingrado: *En ĉi tiu milito, estos nek venkintoj nek venkitoj, sed nur supervivantoj kaj ekstermitoj*. Nun ni ne priskribos la disvolviĝon de la Dua MondMilito, ties ofensivojn, batalojn, armilaron… Ekzistas multenombro da historiaj verkoj, (video)raportoj, filmoj, revuoj kaj ĉiutipaj informiloj kiuj pritraktas tiun konflikton. Ni pritemos la militajn eventojn nur laŭmezure ke ties marko aŭ scenejo utilus al ni por ekspliki la disvolviĝon de la evoluo de la faŝismo, ĉar ĉi tiu, kiel ĉiu ajn socia fenomeno, ne estis/as io statika, ĝi havis/as disvolviĝon kaj evoluon.
Reprenante la fadenon de nia raportado, ekde la fino de la antaŭa ĉapitro, ni devas okupiĝi pri la rezisto de Pollando antaŭ la germanaj minacoj. Tiu fakto tiome estis neatendita de Hitlero ke li, reage, prenis ankaŭ neatenditan decidon. Pri ĝi ni okupiĝos poste. Sed antaŭe ni devas ekspliki la kialon de la pola sinteno. Eĉ agnoskante ke ĉiuj ŝtatoj, landoj, nacioj… estas artefaritaĵoj, t. e. rezulto de homa agado, tamen oni devas agnoski ankaŭ tion ke, ekzemple, Ĉeĥoslovakio kaj Litovio, kiuj cedis al la germanaj premoj, estis pli artefaritaj ol Polio. Temis pri landoj kiuj estis kreitaj laŭ dispozicioj de la Traktato de Versajlo, diktitaj de la venkintoj de la Unua MondMilito. Ankaŭ Polujo iĝis sendependa lando laŭ dispozicio de tiu Versajla Traktato, sed ĉi-kaze temis rehavo de sendependeco; Polio estis grava regno dum Mezepoko, kaj poste, fakte ĝis la 17-a jarcento, kaj post perdi sian sendependecon favore al Aŭstrio, Prusio kaj Rusio, estis kelkaj ribeloj celante rehavi ĝin. Resume, en Polujo estis forta naciismo, ne malpli grava ol tiu de Germanio kaj multe pli antikva kaj kun pli aŭtenta historia bazo ol ĉi tiu.

Ni jam montris kiom multe estas pridubinda la historia bazo de la pangermanismo; ne indas plu insisti pri tiu aspekto de la afero, sed interesas prikonsideri kiel estis evoluante tiorilate la naziista propagando en la 30-aj jaroj. Laŭlonge de tiu jardeko, la naziisto ***Alfred Rosenberg*** amplekse priverkis la ideologion de la nacisocialismo. Lia ĉefa libro estis: «La mito de la 20-a jarcento», kiun ni jam menciis, per kiu li teoriadis pri la supereco de la arja raso. Per longega teksto kun pretendo de scienco kaj erudicio, li asignas arjan devenon al ĉiuj gravaj historiaj figuroj kiuj iu aŭ ali-maniere influis en ĉiuj branĉoj de la kulturo. Li emfazis pri la animo de la rasoj kaj la neceso konservi la ras-purecon per endogamio, t. e. sen inter-rasa mestizado. Laŭ li, la antikvaj romianoj kiuj konstruis la imperion estis arj-devenaj, sed tiu imperio dekadencis pro mestizado de la romianoj kun alirasuloj, sed la romia kulturo persistis dank' al la alveno de la germanoj, sed la plua mestizado kun sirioj kaj suduloj ebligis la venkon de la dekadenca katolika eklezio, sed reagis la bravaj arjoj: hugonotoj, husitoj, valdensoj, luteranoj… La katolikaro kaj ĉiuj latinoj ĝenerale estas pejorative nomataj "sud-alpaj", sed oportunisme kaj kiel ĝentilaĵo al la faŝista reĝimo de Mussolino, ***Rosenberg*** pretas agnoski ian reviviĝon de la arjaj radikoj en la italoj. Sed la esenco de la arja raspureco troviĝas en la nordaj popoloj. Li intencas ekspliki la homan historion ne surbaze de homaj interfrontiĝoj pro religiaj, ekonomiaj, ideologiaj, kulturaj, klasaj… kontraŭdiroj, sed surbaze de rasa identeco. Temante pri la valoroj alprenataj de la diversaj rasoj, li kontrastas, ekzemple, tiujn predikataj de la kristanismo: amo, kompato, bonvolo, bonkoreco, mizerikordo, indulgo… kontraŭ tiujn kiujn li asignas al la arjoj: honoro, batalemo, rigoro, emo plenumi la devon, heroismo… evidentas ke tiu ideologio celis hardi la germanan popolon por militi kontraŭ la cetero el la homaro. Inter la malamikoj de la arja idealo, li ĉefe metas la judojn.

Tiu ideologio kiun ***Rosenberg*** ellaboris per sia verkaro por la naziismo estas tre ampleksa kaj peze legebla. Sed ĝia tuta enhavo giras ĉirkaŭ tiuj bazaj ideoj. Ni ekzamenu ĉu ili havas sciencan kaj racian bazon. Ĉu la endogamio kiun li receptas al la germana gento estas konvena? La genetika scienco malkovris ke el la endogamio rezultas pliiĝo de homozigozo, kiu povas pliigi la ŝancojn, ke la idoj heredu recesivajn trajtojn aŭ genetikajn difektojn. Ĝenerale tio kaŭzas malpliigon de taŭgeco de la loĝantaro, la t. n. «endogamia depresio». La realo tute kontraŭas la teorion de tiu "doktoro": la idoj rezulte de mestizado estas pli taŭgaj ol ties gepatroj por alfronti la kondiĉojn de la vivo ĉar ili ricevas genojn generitajn responde al diverseco de medioj. Se la homaj grupoj devus resti senŝanĝaj, kiel postulas la rasismo, la naturo ne estus disvolviginta la per-seksan generadon; ĉiuj vivestaĵoj sin reproduktus per iu ajn metodo de natura klonado aŭ burĝoniĝo.

Sed, cetere, kio estas tiu arja raso al kiu la teoriuloj de la naziismo atribuas ĉiujn kvalitojn kaj volas konservi senŝanĝan por superregi la tutan mondon? Origine, la termino "arjo" ne havis rasan signifon. En la plej antikvaj skribaĵoj de la kulturoj kie oni mencias tiun vorton, ĝi estas adjektivo kiu signifas "nobla". Nur oni




**Alfred Rosenberg**



**Heinrich Himmler**



**Ĉu arjo, aŭ semido?**



**Prototipo de arj-rasulo: maldika kiel Goering, alt-statura kiel Goebbels kaj blond-hara kiel Hitler (Germana ŝerco)**


komencis uzi ĝin en Eŭropo en la 19-a jarcento kun la signifo de apartenanto al iu konkreta raso. Ŝajnas ke tiu kiu uzis unuafoje la terminon "arjo" kun rasa signifo estis Sinjorino ***Helena Blavatsky*** en sia verko «La sekreta doktrino». Sed en tiu kunteksto kaj en la verkaro de aliaj teozofoj la koncepto de "arja raso" estis tre ampleksa kaj ambigua, ne rilatis konkrete al la prauloj de la germanoj aŭ la normanoj, sed oni povus apliki al la tuta blanka raso. Tiukaze ankaŭ la judoj kaj la araboj estus arjoj; ili sin difinas kiel "semidoj", termino kiu devenas el iu genealogio kiun la Biblio prezentas de la idaro de Noao, pli antikva sed ne malpli mita ol la legendoj pri la Atlantido aŭ Tuleo.
Sed jen en la tut-germanisma tradicio en kiu enkadriĝas la naziaj teorioj de ***Rosenberg***, la arja raso estas pli pure konservata nur de la germanoj, kaj al ili apartenas la rajto regi kiel sinjoroj la tutan homaron. Nu, la germanoj kaj la baltoj, ni supozas; tiu ***Rosenberg***, ja, estis estono. Notindas ke la tiamaj kaj la nunaj loĝantoj de Estonio, Latvio kaj Litovio ne sin konsideris/as germanoj kaj ankaŭ ne rusoj, kaj krome ĉiuj tri etnoj sin konsideris/as malsamaj kaj apartaj unu el la du aliaj, kaj neniam ili prikonsideris la eblecon kuniĝi por konstitui ian baltan landon. Ankaŭ ili havas tradiciojn kiuj ideologie nutras sian apartan naciismon, sed rilatas neniom al la mitoj de la pangermanismo. Ja, artefaritaĵoj aŭ ne, ĉiuj naciismoj estas vere ridindaj.
La estono ***Rosenberg*** sin sentis germano kaj rompis kun sia denaska lando, eĉ eksedziĝis el sia estona virino kaj edziĝis al germanino. Lia rasisma doktrino estis disvastigata al la tuta germana popolo per la propagand-rimedoj de la ministro ***Goebbels***. Sed surbaze de ĝi oni entreprenis alian eksperimenton, ĉi-kaze sub la gvido de alia nazia hierarĥo: ***Heinrich Himmler***. Ĉi tiu estris la SS-n, elita militista korpuso ne dependanta de la armeo sed ligata per persona ĵuro de lojaleco de ties membroj al la Führer. La SS-anoj estis trejnitaj kaj edukitaj kiel membroj de iu religisimila ordeno. Krom ilia militista tasko, al ili oni asignis ankaŭ, kaj ĉefe, la mision generi pure arj-rasajn gefilojn por konservi kaj pligrandigi la germanan popolon elektitan por regi la mondon. Kompreneble, por tiu alta tasko oni elektadis kiel membrojn de la SS tipe nordajn rasulojn: blond-haraj, blu-okulaj, alt-staturaj, atlet-korpaj… Pituloj kiel Hitlero kaj

***Goebbels***, aŭ ***Himmler*** mem, neniam estus aprobitaj por aparteno al tiu elita korporacio. Tiam en Germanio estis ŝerco diranta: *la prototipa arja homo devas esti maldika kiel **Goering**, alt-statura kiel **Goebbels** kaj blond-hara kiel **Hitler**.*

Nu, tia estis la evoluo-stato de la germana naziismo, sed oni devas ne forgesi ke la socia evoluo estis ĝenerala. Grandparto el Eŭropo komencis konfidi nur je aŭtoritatecaj solvoj: inter 1922 kaj 1940, estis starigitaj diktaturoj, krom tiuj de Rusio, Italio, Aŭstrio, Germanio kaj Hispanio, pri kiuj ni jam atentis, ankaŭ en Albanio, Portugalio, Litovio, Jugoslavio, Letonio, Bulgario, Grekio kaj Rumanio. Kaj krome estis la kazo de Japanio. Ĉi tiu lando rapidege industriiĝis kaj moderniĝis inter 1868 kaj 1912, kaj komencis aneksii teritoriojn en Azio. La japana militarismo fanatike kredis je la destino de sia lando komandi la kontraŭ-okcidentan ribelon en Azio, en la ideo de iu japana imperio militista kaj naciisma, limigante la rolon de la politikaj partioj favore al la rehavo de la absoluta tradicia povo de la imperiestro. Japanio estis tiam ia militista faŝismo dediĉita fari ĉion eblan por la ekspansio en la kontinento. Post aliaj militaj agresoj en Azio, la japanaj trupoj invadis Ĉinion. En 1938 Japanio subskribis kun la faŝistaj potencoj de la «Akso Romo-Berlino», interakordon, la t. n. «Ŝtala Pakto».

Tiele estis la afero kiam Hitlero entreprenis la konkeradon de viv-spaco en Orienta Eŭropo, komencante per Polujo. La afero prezentiĝis komplika al li tial ke la sendependeco de tiu lando estis garantiita de Britio kaj Francio. Sed li deziris sekvi antaŭen eĉ riske de milito ĉar li pensis ke lia morto povus estis proksima kaj li volis realigi la taskon kiun li asignis al si mem. Sed prikonsiderante kiom multe damaĝis Germanion batali en duobla fronto (easte kaj ŭeste), en la Unua Mond-Milito, Hitlero decidis aranĝi la aferon en la diplomatia tereno por ke Sovetunio ne aliancu, en la nova milito, kun la okcidentaj potencoj. Tiucele li, pere de sia ministro pri eksteraj aferoj, ***Ribbentrop***, proponis al ***Stalin*** kundividi la polan teritorion inter Germanio kaj Sovetio. De vidpunkto de ***Stalin***, la afero estis konvena; lia ekstera politiko ne estis malpli imperiisma ol tiu de la kapitalistaj potencoj. Li emis rehavi la teritoriojn kiuj iam apartenis al la imperio de la Caro, kaj inter ili estis parto el Polio. Krome, ankaŭ estis konvena por Sovetunio aldirekti okcidenten la militan germanan maŝinon kiu ĝis tiam estis aldirektita orienten. Tiu «Germano-Soveta Pakto» surprizis ĉiujn, amikojn kaj malamikojn de ambaŭ potencoj. ***Ribbentrop*** penis ekspliki la aferon al Mussolino, kaj la reĝimo de Franko ne sciis kiel ekspliki al la hispanoj tiun pakton inter du potencoj kiuj, ĝis antaŭ malmultaj monatoj, estis defendintaj kontraŭajn poziciojn en la hispana civil-milito. Same okazis al la komunistaj partioj de multaj landoj. En Francio la kazo estis speciale grava; la malamikeco de la francoj al la germanoj havis profundajn radikojn, do multaj francaj komunistoj elreviĝe forlasis la kompartion.

La 1-an de septembro de 1939, sen antaŭa militdeklaro, Germanio invadis Pollandon. La germana atako estis brutala. La potenco de ĝia armeo kompare al la pola estis enorma. Spite al la forta rezisto de la poloj, Germanio kompletigis la



***Ribbentrop*** **subskribas en Moskvo la german-sovetan pakton kun Stalino kaj Molotovo**




**La germana armeo invadas Polujon**



**Polaj patriotoj masakritaj de la invadintoj**




**Hitlero vizitas la polan fronton**



**La germana armeo defilas tra la stratoj de la konkerita Varsovio**

okupadon de sia parto de Polujo en la daŭro de kvar semajnoj. La pola registaro kaj multaj miloj da soldatoj kaj oficiroj forlasis la landon por daŭrigi la bataladon en aliaj frontoj de la milito. Tiam evidentis ke la milito estos longdaŭra. Britio kaj Francio deklaris militon al Germanio. Dum kelkaj monatoj, tamen, okazis neniu batalo en la okcidenta fronto; Francio kaj Britio restis je la defensivo, dum la germana armeo plenumis sian militan celon en Polio. La 17-an de septembro Sovetio komencis sian invadon de Polujo, kaj la 28-an de tiu monato ĝi subskribis kun Germanio interakordon pri la limoj inter la polaj partoj de ambaŭ potencoj.

Multaj poloj estis masakritaj far la germanaj trupoj, Laŭ iuj el la diversaj historiaj raportoj pri la konflikto, ankaŭ la pola armeo kondutis kruele kun la germanaj milit-kaptitoj: oni blindigis ilin. La milito pliintensigas la plej malbonajn ecojn de la homa naturo. Ankaŭ la soveta armeo preterpasis la neeviteblan perforton de ĉiu milito: 4.000 soldatoj kaj oficiroj milit-kaptitaj (15.000 laŭ aliaj versioj) estis murditaj kaj enterigitaj en la t. n. «foso de Katino». La okcidenta parto de Polujo estis "germanigita": la pola loĝantaro de la regiono estis aŭ deportita aŭ reduktita al sklaveco, oni eksproprietigis, senigis je rajtoj, malpermesis uzi la polan lingvon, fermis katolikajn preĝejojn kaj lernejojn, elpelis aŭ ekzekutis katolikajn pastrojn. Estis deportitaj al Germanio 2,8 milionoj da poloj inter 1939 kaj 1944 kiel sklava laboristaro. Du milionoj da judoj estis senditaj al koncentrejoj. Nur en la geto de Varsovio, estis koncentritaj proksimume 450.000 homoj. Tiu personalo estis destinita al ties ekstermado dum la sekvaj jaroj. El la sovetia zono estis deportita miliono da poloj al Siberio kaj Mez-Azio.

La 28-an de novembro de tiu jaro 1939 Sovetunio, kun germana konsento, atakis Finnlandon en sia celo rehavi la teritoriojn iam apartenintajn al la rusa Caro, sed sukcesis kapti nur parton el la finna teritorio. La milito daŭris ĝis la 12-a de marto de la sekvinta jaro. La finnoj bone rezistis kaj okazigis al soveta armeo proksimume 200.000 viktimojn, fakto, kiu dubigis pri la milita kapablo de rusoj kaj igis Hitleron pensi ke estus facila afero la konkeradon de rusaj teritorioj.

Pli brilaj kaj efikaj estis la sekvintaj germanaj militaj kampanjoj, kiuj okazis en Okcidenta Eŭropo. Antaŭ entrepreni la atakon al Francio, Hitlero klopodis kontroli kaj certigi la ŝip-trafikon en la Balta maro cele ebligi la provizadon de la necesaj krud-materialoj por Germanio. Tiucele li decidis okupi Danlandon kaj Norvegion. Danlando estis venkita kaj okupita dum la daŭro de unu sola tago, la 9-an de aprilo de 1939, kaj en Norvegio la germanoj devis batali kontraŭ la brita floto, sed fine tiu lando kapitulacis la 9-an de junio, ties reĝo kaj registaro ekziliĝis en Britiom. La germanoj submetis Norvegion, kiu restis regata de la faŝista reĝimo estrata de ***Vidkun Quisling***.
La 10-an de majo de tiu jaro 1940, Germanio atakis Nederlandon kaj Francion. La ofensivo estis perfekta elmontro de la nova speco de milito dezajnita de Germanio, nomata *blitkrieg* (fulm-milito), surbaze de surprizo, komenca bombardado, profundaj kaj rapidaj strategiaj penetroj far tankaj divizioj tra la malamikaj linioj kun taktika apogo de la aviado, por tranĉi la ĉefajn arteriojn de la malamiko kaj ĉirkaŭi ĝin. Parto de la germana trupo atakis Nederlandon kaj Belgion frontale; alia parto, evitante la Maginot-Linion, atakis Francion tra Ardenoj; estis aŭdaca kaj surpriza atako tra tereno konsiderata netrairebla pro ties topografio. La sukceso estis fulm-rapida. Nederlando, kiun Germanio atakis per aer-transportitaj fortoj de paraŝutistoj, kapitulacis la 14-an de majo, la reĝino Vilhelmino kaj la Registaro povis ekziliĝi en Londono: la centro de Roterdamo estis detruita per bombardado far la germana aviado. La belgaj kaj francaj linioj, plifortigitaj de la Brita Ekspedicia Trupo, en tute 350.000 homoj, estis surprize penetritaj de la germanoj, kiuj detranĉis kaj ĉirkaŭis la aliancajn trupojn en diversaj punktoj. Belgio kapitulacis senkondiĉe la 28-an de majo; la registaro fuĝis al Parizo kaj poste al Londono, de kie ili provis daŭrigi la militon kaj organizi la enlandan rezistadon; la reĝo Leopoldo restis en Belgio en ambigua situacio: kaptito de la germanoj sed konservante distingan kaj influan pozicion, kiu eĉ permesus al li negoci kun Hitlero favore al sia lando. La Brita Ekspedicia Trupo kaj cent mil francaj soldatoj retiriĝis al Dunkerko, de kie inter la 28-a de majo kaj la 4-a de junio ili estis evakuitaj al Anglujo en ekstreme malfacila operacio.


**Germana invado de Francio en 1940**


**La germana armeo defilas en la konkerita Parizo**


**Hitlero en Parizo**


**Hitlero kun *Petain***



**Politika mapo de Francio post la germana invado**


La 10-an, la germanoj transiris Sejno-riveron, Francio estis venkita: cent mil soldatoj mortigitaj, 1,6 milionoj kaptitaj kaj senditaj al Germanio; milionoj da rifuĝintoj deiris suden; ĥaosa situacio. La 14-an de junio la germanoj eniris en Parizon. La 16-an, la Nacia Asembleo, nomumis registrar-prezidenton marŝalon ***Pétain***, la heroo de Verduno de 1916, maljunulo 84-jara sed ankoraŭ eksterordinare prestiĝa. Li petis armisticon, kiun oni subskribis la 22-an. Francio restis dividita en du zonoj: "okupita", la okcidenta kaj norda duono de la lando, inkluzive Parizo, sub rekta germana okupado, kaj nominale suverena "libera zono", la suda duono, kies gvidon alprenis ***Pétain***, kiu fiksis la ĉefurbon en ***Vichy***, sed fakte nura satelito de la Hitlera Germanio, tamen retenante modestan armeon de cent mil homoj kaj la kolonian imperion. Alzaco kaj Loreno estis rekte aneksitaj al Germanio.
***Pétain*** kreis en ***Vichy*** aŭtoritateman reĝimon, tradician... inspiritan de la ideoj kaj principoj de la franca naciisma dekstraro: kontraŭjudismo, katolika edukado, morala cenzuro, malpermeso de partioj, sindikatoj kaj strikoj. La "ŝtata kunlaboro", kiun la reĝimo de ***Pétain*** starigis kun Germanio, signifis plenan ekonomian, militan kaj polican kunlaboron. ***Vichy*** kunlaboris kun la germana ***Gestapo*** en la subpremado de la Rezisto kaj en la genocido de francaj judoj: 83.000 mortintoj, el juda loĝantaro de 300.000 personoj. Senĉese estis kreskanta en Eŭropo la nombro da reĝimoj pli malpli faŝismaj. La akomodado de la franca socio al la malvenko kaj la germana okupado estis surprizige konsiderinda. ***Vichy***, kaj ***Pétain*** havis pli grandan popularan subtenon ol oni povis atendi. Kvankam la saman 18-an de junio 1940, generalo ***De Gaulle*** fuĝis al Londono kaj ekde la brita ĉefurbo alvokis al rezisto, la alvoko estis longatempe ignorita. Nur ekde la fino de 1942, aŭ pli ĝuste ekde majo 1943, oni komencis rimarki la rezistadon kontraŭ la germana okupado.
Sed en 1940 ĉiuj pensis ke la milito estis finiĝinta. Mussolino, oportunisme, deklaris militon al Francio la 10-an de junio, plurajn semajnojn antaŭ la kapitulaco de tiu lando antaŭ la germanoj, kaj aneksis al Italio kelke da franca teritorio. Pli oportunisma estis la sinteno de la hispana diktatoro, F. Franko. Ĉi tiu adresiĝis al Hitlero gratulante lin pro ĉi ties brilaj kampanjoj kaj manifestis sian intencon kunmiliti kun la potencoj de la «Akso». Sed la kondiĉoj de la hispana diktatoro malplaĉis al Hitlero ĉar Franko pretendis konstrui hispanan imperion per la kapto de la afrikaj kolonioj de Francio. Kiel dirite, laŭ la kondiĉoj de la armistico franc-germana, tiuj kolonioj restis sub la kontrolo de la Francio de ***Vichy***, kiu de tiam estis faŝisma aliancano de Hitlero. Krome ĉi tiu sin sentis sufiĉe forta por entrepreni, sen alies helpo, la konkeradon de Britio.
En ĉi tiu lando, la ĉef-ministro ***Neville Chamberlain*** estis demisiinte la 10-an de majo 1940, la saman tagon kiam komencis la germana ofensivo kontraŭ Nederlando. Anstataŭis lin kiel estro de koalicia registaro de konservativuloj, laboristoj kaj liberaluloj, ***Winston Churchill***. Britio rezistis, kaj krome sola ĝis 1941, kontraŭ la potencoj de la Akso. La memorindaj diskursoj de ***Churchill*** stimulis liajn kun-

civitanojn: *Mi havas nenion oferti krom sangon, penadon, ŝviton kaj larmojn*, li eldiris la 13-an de majo de 1940. ***Churchill*** alprenis la gvidadon de la milito kun ega energio kaj entuziasmo, kunlaborante kun siaj generaloj. Hitlero, kiel prepara operacio por la posta permara invado al Britio, komencis aeran ofensivon la 10-an de julio. La t. n. «Batalo de Anglio», okazis de julio ĝis oktobro de 1940, batalo inter la brita aerarmeo (la ***RAF, Royal Air Force***), proksimume 1.450 aviadiloj komence subkomande de marŝalo ***Dowding***, kaj la germana (***Luftwaffe)***, proksimume 2.800 ĉasaviadiloj sub la komando de ***Göring***. La germanoj unue atakis britajn havenojn kaj ŝipojn en la Manika markolo; poste, en aŭgusto, flughavenojn kaj fabrikojn en suda Anglujo; fine, ekde septembro, la ĉefajn urbojn de la lando: Londono estis bombardita unuafoje la 7-an de septembro de 1940. La ***RAF***, kiu bonege uzis la radarajn staciojn instalitajn tra la tuta lando, perdis 915 aviadilojn kaj 449 pilotojn. Germanio perdis 1.733 aviadilojn. Ĝi ne sukcesis detrui britan aeran potencon. En oktobro, Hitler definitivde forlasis la ideon invadi Britujon. Sed daŭris la atakoj al la urboj: Londono, Glasgovo, ***Plymouth***, ktp. La 14-an de novembro, la ***Luftwaffe*** laŭvorte detruis ***Coventry***. Londono estis bombardita 120 tagojn sinsekve: 80.000 homoj mortis en la bombadoj. ***Birmingham***, la lasta urbo atakita, estis bombardita la 16-an de majo de 1941. Britio reagis per bombadoj kontraŭ Hamburgo, Bremeno kaj iuj aliaj germanaj urboj.


Winston Churchill


Batalo de Anglio

Samtempe kiel la aera «Batalo de Anglio», estis ankaŭ la t. n. «Batalo de la Atlantiko» inter Britujo kaj Germanio. La flotoj de ambaŭ potencoj atakadis unu la alian kaj sinkigis ŝipojn, kaj militajn, kaj komercajn. Tradicia mara potenco, Britujo havis pli grandan floton, sed dum la milito la germana industrio konstruis grandnombron da potencaj submarŝipoj. Tiuj germanaj submarŝipoj tre damaĝis la perŝipan provizadon de Britujo. En 1940 ili sinkigis 300 britajn ŝipojn, kaj militistajn kaj komercajn, 875 ŝipojn en 1941, kaj en 1664 en 1942.


Batalo de la Atlantiko

La eniro de Italio en la militon ampleksigis la militfronton al la Mediteraneo. La celo de Mussolino estis pligrandigi la italan imperion en Afriko koste de la britaj kolonioj. Li



Richard O'Connor



Erwin Rommel



Batalo de Afriko

prenis tiun decidon pensante ke, post la fulma kampanjo de la germanoj en Okcidenta Eŭropo, baldaŭ finiĝus la milito per la kolapso de la brita potenco. Do li pretiĝis alpropriigi al la si la postrestaĵojn de la brita imperio. En Italio ne ĉiuj estis tiel optimismaj; la afero tute ne vekis entuziasmon en la ĉirkaŭo de la reĝo, kaj inter la armeanoj, ekzemple, la marŝalo Badoglio, kaj inter la faŝistaj hierarkoj mem, kiel Ciano, la bofilo de Mussolino, kaj ***Dino Grandi***, la fondinto de la faŝismo en la regiono de Bolonio. Ĉi tio estas tre signifa ĉar ilustras pri la medio en kiu poste konkretiĝis opozicio al Mussolino kiam alproksimiĝis la milita malvenko.

Sed en 1940 li vole nevole metis Italion en militon por ataki Grekujon ekde Albanio, kiun la italoj estis okupintaj la antaŭan jaron, kaj la britajn koloniojn de Sudano, Kenjo, kaj Egipto kun la Sueza kanalo. Tiuj atakoj konkretiĝis inter aŭgusto kaj oktobro de 1940. La militaj fortoj je kiuj Italio disponis tiam por interveni en Afriko estis tre superaj al tiuj kiujn Britio povis kontraŭfronti tie. Tamen la italaj militaj operacioj rezultis katastrofaj, ĉefe en la nordo de Afriko. La itala avanco kontraŭ Egiptujo ekde Libio estis haltigita en la egipta urbo ***Sidi Barrani*** la 16-an de septembro, nur unu semajnon post la komenco de la operacio. Du monatojn poste la angloj estis atinginte 38.000 italajn milit-kaptitojn, inter ili kvar generalojn. Komence de 1941, la brita 7-a Kiras-Divizio, tiam komandita de ***Richard O'Connor***, sieĝis la italojn en ***Al Bardi***, Libio: 40 000 kaptitojn, kaj detruis, la 6-an de februaro, la italan 10-an armeon en ***Beda Fomm***, tiel devigante la kapitulacon de Bengazi, la ĉefurbo de la tiama itala kolonio Cirenaiko. Germanio devis alkuri helpe al sia itala aliancano. En februaro de 1941, Hitlero sendis unu el siaj plej prestiĝaj generaloj, ***Erwin Rommel***, al Libio kun elita tank-formacio, la ***Afrika Korps*** (du sekcioj, 320 tankoj, kun cent italaj tankoj). La rezulto estis fulmrapida. Per eksterordinara taktiko: fulm-operacioj, surprizo, aŭdaco, granda movebleco de liaj ne tre abundaj rimedoj, ***Rommel***, operaciante en norda Libio, reakiris preskaŭ la tutan Cirenaikon inter februaro kaj junio 1941 kaj forpelis la britojn al Egiptujo.

Ankaŭ la atako al Grekujo de la itala armeo estis katastrofa. La greka kontraŭatako repuŝis la italojn al Albanio kaj eĉ deprenis de la italoj parton el tiu lando. Krome, la 11-an de novembro, ŝipaj kaj aeraj unuoj de la brita mediteranea floto de la admiralo ***Cunningham*** atakis surprize la italan mar-armean bazon en Taranto. Preskaŭ ĉiuj havenaj instalaĵoj estis detruitaj kaj kvar el la plej bonaj italaj batal-ŝipoj estis grave damaĝitaj. Kaj la 28-an de marto de 1941 la britoj donis alian severan baton al la itala mararmeo: en la sudo de Grekio estis detruitaj 3 italaj kroz-ŝipoj kaj 2 destrojeroj, kaj severe damaĝis la kiras-ŝipon ***Vittorio Veneto***. Tio permesis al la brita mararmeo kontroli la Mediteraneon kaj bari la provizadon al la trupoj de la Akso en Afriko. Ja, la eniro de Italio en la militon pli ol helpo por la germanoj estis embaraso ĉar igis necesa la intervenon de la germana armeo en scenejoj kiuj ne estis komence kontemplitaj en la militaj planoj de Hitlero.

La komenca plano de Hitlero estis okupi nur la orientan parton de Grekio por sekurigi sian flankon okaze de la antaŭvidita invado al Sovetunio. Sed la disvolviĝo de la aferoj igis lin ŝanĝi sian strategion en Balkanio kaj decidis plene integrigi la tutan balkanan regionon en la novan germanan ordon. Rumanio, Hungario kaj Slovakio aliĝis al la Akso en novembro de 1940. Hungario, regata de admiralo ***Horthy*** aliĝis la 20-an kaj Rumanio aliĝis la 22-an de tiu monato. Slovakio, germana protektorato ekde marto 1939 sub la registaro de la katolika episkopo ***Tiso***, faris tion la 23-an. Post la itala fiasko en Grekio, la situacio en Jugoslavio evoluis malfavore por la Akso, okazis brit-favora milita puĉo la 23-an de marto de 1941 kiu nuligis la decidon aliĝi al la Akso prenita nur du tagojn antaŭe de la Registaro de Princo Reganto Paŭlo, Hitlero decidis milite interveni en tiu zono.

Alia lando kiun Hitlero volis aligi al la Akso en la aŭtuno de 1940 estis Hispanio. Multe estis ŝanĝiĝinte la situacio ekde ses monatojn antaŭe, kiam Franko manifestis sian volon tion fari sed la afero ne entuziasmigis Hitleron pro la kialoj kiujn ni eksplikis. Ĉi tiu ne povis permesi al si damaĝi sian aliancanon ***Pétain*** por favori Frankon, kaj krome pensis ke baldaŭ li povus okupi Britujon samkiel okupis Francion kaj aliajn eŭropajn landojn. Sed pasis la monatoj kaj la germana aerarmeo ne sukcesis ebligi la perŝipan invadon. Kaj plej zorgige por Hitlero estis ke tiu situacio estis senlime prokrastigante la invadon al Rusio kiu estis, laŭ lia opinio, la mision por kiu li estis naskiĝinta. Do li decidis ekentrepreni tion, eĉ metante sin en la danĝeran situacion, kiun ĝis tiam li klopodis eviti, batali en pluraj frontoj. Do, Hitlero bezonis kiom eble pli da aliancanojn kaj, krom tiuj aligitaj en la balkana regiono, li celis ankaŭ la militan partoprenon de la faŝista Hispanio. Laŭ la plano konceptita de Hitlero, la hispana tasko en la milito estus kunbatali kun la germana armeo en la konkerado de la brita strategia pozicio de Gibraltaro. Ĉi ties konkerado permesus al la germana mar-armeo eniri en la Mediteraneon por batali tie kontraŭ la britaj fortoj kaj provizadi la armeojn de la Akso en Norda Afriko. Oni interakordis renkontiĝon de Hitlero kaj Franko en ***Hendaya***, franca urbo proksima al la hispana landlimo.







**Renkontiĝo de Franko kun Hitlero en *Hendaya* la 23-an de oktobro de 1940**



**Renkontiĝo de Franko kun Mussolino en *Bordighera* la 12-an de februaro de 1941**

La intervidiĝo de ambaŭ ŝtatestroj okazis la 23-an de oktobro de 1940. Per la filmo kaj fotoj ekzistantaj pri tiu evento oni povas konstati ke la hispana reganto aperas komplezema antaŭ la germana lidero, elmontrante admiron kaj amikecon al ĉi tiu. Nuntempe oni scias ke tiuj sentoj estis veraj, sed samtempe la sceno estis sufiĉe teatreca. Tiam Franko jam estis preninte la decidon ne eniri en la militon. Li prave konsideris ke Britio povus dumlonge rezisti en la metropolo kaj en ties kolonioj. Krome, militanta Hispanio estus en tre febla situacio pro la blokado de ties provizado kiun Britio povus efektivigi. Estis evidente ke Germanio ne povus anstataŭigi tiun provizadon. Fakte, Hispanio devis kunlabori en la provizado al Germanio dum la milito. Sed Franko ne povis klare rifuzi la germanan postulon; li devis ruze manovri simulante akcepti la peton de Hitlero sed prokrastigante la fiksadon de dato por la hispana ekmilitado en la pakto kiun ili subskribis. Ĉiukaze Franko insistis en la peto de la francaj kolonioj en Afriko kaj en la provizado, far la germanoj, de tritiko, armiloj kaj kemiaĵoj.
Sekvis poste kelkaj germanaj premoj al Hispanio pere de la ambasadoroj por ke tiu lando eniru en la militon. Fine Hitlero mendis al Mussolino pluan premon tiurilate. Franko intervidiĝis kun la itala diktatoro en ***Bordighera*** la 12-an de februaro de 1941. Franko insistis pri siaj nerealigeblaj petoj kaj pri la manko je preparo de la hispana armeo por militaj taskoj. Mussolino, en mesaĝo al Hitlero, agnoskis ke: *oni ne povas peli al milito iun armeon kiu havas pano-provizaĵon por unu sola tago*.
Du monatojn poste, la 6-an de aprilo de tiu jaro 1941, du germanaj armeoj, kun apogo de trupoj de Italio kaj Hungario, atakis Jugoslavion kaj Grekujon. Kvankam malgrandaj armitaj grupoj povis fuĝi al la interna montaro, kiujn la germanoj ne plene okupis, Jugoslavio kapitulacis la 17-an de aprilo. La germanoj kaptis Atenon la 27-an de aprilo. La germana avanco kulminis per la kapto de Kreto-insulo, sur kiu Germanio lanĉis inter la 20-a kaj

la 26-a de majo la unuan gravan operacion de la milito, efektivigitan nur per aeraj fortoj. Ĉiuj partoprenantaj armeoj: germana, greka, itala k. a. suferis grandan perdon je homoj kaj materialo. Germanio aneksis la nordan parton de Slovenio kaj armee okupis Serbion, kie ĝi trudis faŝistan reĝimon estratan de generalo ***Milan Nédic***. Germanio kaj Italio kreis la sendependan ŝtaton Kroatio sub la kontrolo de la estro de la faŝista ***Ante Pavelić***, kun politiko de radikala "Arjigo" direktita kontraŭ serboj, judoj kaj ciganoj. Hungario aneksis ***Vojvodinon***; Bulgario, kiu estis aliĝinte al la Akso, okupis Makedonion, interalie. Italio akiris la sudan parton de Slovenio, la dalmatan marbordon de Kroatio, insulojn en la Adriatiko, Kosovon kaj Montenegron en Jugoslavio. Germanio, Italio kaj Bulgario egale interdividis la efektivan kontrolon de Grekio. Germanio armee okupis Atenon, parton de greka Makedonio, kun Saloniko, kelkajn insulojn en la Egeo, kaj grandan parton de Kreto; Italio, grandan parton el la kontinenta Grekio, plurajn insulojn, inkluzive de Korfuo, kaj orienta Kreto.
La venko de la germanoj kaj ĉi ties aliancanoj en tiu kampanjo de Balkanio povas aspekti tiel brila kiel tiu de la antaŭa jaro en la okcidenta fronto. Sed, fakte, ĝi igis perdi al Hitlero ses semajnojn por la komenco de sia kara projekto de invado de Rusujo, kaj krome li devis destini multajn milojn da soldatoj por garnizoni en la okupitaj landoj. Dume, spit' al la fulma kampanjo de ***Rommel*** en Norda Afriko, li ne sukcesis alveni al Egipto, kaj tamen la britoj iom-post-iom estis prenante la iniciativon domaĝe al la italaj kolonioj en Afriko. Ekzemple, en majo de 1941, la etiopia reĝo ***Haile Selassie*** povis triumfe eniri en tiun landon post la forpelo de la italoj far la britaj trupoj. La sinsekvaj malvenkoj de la italaj trupoj misfamigis la reĝimon de Mussolino, estigis opozicion kaj kritikon pri la propra persono kaj gvid-rolo de la *Duce* ene de faŝismo, kaj komencis subfosi la larĝan socian konsenton, kiun la faŝisma reĝimo ĝuis ekde 1922.
Sed Hitlero, certa pri la germana supereco, fascinita de sia propra mesianismo, kiel politika kaj milita gvidanto, kaj konvinkita, post la militaj sukcesoj en Pollando, Norvegio, Francio kaj Balkanio, regi perfekte la profesiajn kaj teknikajn kondiĉojn pri militado, decidis plenumi tion, kio, malgraŭ la Pakto pri Neagresado kun Sovetunio de 1939, ĉiam estis la fina celo de lia politiko kaj lia iluzia geostrategia kaj rasa mondvizio: la detruo de Sovetunio, la neniigo de la «juda bolŝevismo», la konkero de Orienta Eŭropo kaj la submeto de la slavaj popoloj, ĉiuj esencaj postuloj por akrediti la superecon de la ĝermana raso kaj la kreadon de granda spaco por la setlado far germana loĝantaro en la Balta Maro, en Krimeo kaj la akiro de tre gravaj mineralaj rimedoj kaj rezervoj de ĉiaspecaj krudaĵoj en Ukrainio. La ofensivo kontraŭ Rusio, nomata «Operacio Barbaroso», kiu estis preparita ekde novembro de 1940, komenciĝis la 22-an de junio de 1941; ĝi, ja, estis la plej granda milita ofensivo en la historio. Germanio preparis tri grandajn armeojn, subkomande de marŝalo ***Walter von Brauchitsch***; 153 divizioj, 17 el ili blenditaj, 3.600 tankoj, 2.700 aviadiloj; 3,6 milionoj da soldatoj, inter ili




*Iósif Stalin*








**Operacio Barbarosso**

700.000 el la landoj de la Akso: 475.000 rumanoj, 60.000 italoj, 50.000 slovakoj, 40.000 hungaroj. Hispanio, ne deklaris militon al la aliancanoj, sed sin deklaris "militema" kontraŭ la komunismo en junio 1941 kaj sendis la t. n. «Bluan Divizion», komence konstituita de 17.692 homoj sub la komando de generalo ***Muñoz Grandes***; tiuj trupoj eniris en batalon en oktobro en la fronto de Leningrado. Per proksimume 10 divizioj kaj 250.000 soldatoj, Finnlando preparis, kunordigite kun Barbaroso, sian propran militan operacion kontraŭ Rusujo por reakiri Karelion kaj la aliajn teritoriojn perditajn en la vintra milito de 1939-1940. La ofensivo kontemplis la penetradon, deplojon kaj avancadon de la germanaj armeoj ekde la Balta Maro ĝis la Nigra Maro (1.800 kilometroj) laŭ tri linioj: al Leningrado, en kiu partoprenus la finna armeo, al Smolensko kaj al Moskvo.

Hitlero kaj la germana militista stabo planis kompletigi la operacion en la daŭro de kvar monatoj. Verdire, la atako estis granda surprizo por la rusoj. ***Stalin*** ne volis kredi la multajn indikojn provizitajn de liaj spionaj servoj kaj de Britio pri la tuja germana atako. Li obstine esperis ke Germanio respektus la paktojn de 1939; li vidis en la informoj ricevitaj nur interesatajn anglajn manovrojn por provoki rus-germanan konflikton kaj tiel trudi al Germanio militon sur du frontoj. ***Stalin*** eraris; la germana atako komenciĝis la 22-an de junio 1941 je la tria horo matene. Per serio da tre precizaj kaj efikaj preventaj atakoj, la germana aviado detruis preskaŭ duonon (1.700 aviadiloj) el la sovetia aer-armeo dum unu semajno, atingante tiele aeran superecon. Germanaj divizioj trapikis la malbone aranĝitajn rusajn defendliniojn, fortranĉis siajn komunik-liniojn kaj kaptis gigantajn poŝojn da malamikaj soldatoj. La rusoj perdis milionon kaj duonon da soldatoj en la unuaj tagoj de la ofensivo; tri milionojn, en la unuaj kvar monatoj. La norda kolono de la atako bone plenumis sian planon en la balta zono sed ne kaptis la urbon Leningrado, sed sieĝis ĝin. Ŝajnas ke tiam ne interesis al la germanoj tuj eniri en Leningradon ĉar ĉi tiu

urbo havis pli ol 3 milionojn da enloĝantoj kaj la invandanta armeo nek povis nek volis garantii la nutradon de tiom ega personalo. Do, oni sieĝis la urbon por ke la loĝantaro pereu pro malsato. La tasko de tiu norda armeo estis bari la provizadon kiun Rusujo povus ricevi tra la Balta Maro. Sed nek la provizo-barado nek la sieĝo al la Leningrado povis esti totala ĉar Rusujo ricevis tra tiu vojo grandkvanton da milita materialo provizita de la aliancanoj, kaj el Leningrado eliris multege da ne-batalantaj enloĝantoj kaj eniris multaj rusaj armeanoj por defendi la urbon. Ĉiukaze, kiam la germanoj, ja, volis okupi ĝin por destini la trupojn de tiu norda armeo al la aliaj rusaj frontoj kie ili estis necesaj, jam ne eblis al ili kapti Leningradon, kaj ĉi tiu, eĉ per ega sufero de ties loĝantoj kaj defendantoj, rezistis ĝis kiam, en januaro de 1944, la ofensivo de la rusa armeo liberigis ĝin.
Do, la decidaj militaj eventoj de la rusa kampanjo okazis, kiel ni tuj vidos, en la aliaj frontoj, la centra, kiu celis la ĉefurbon Moskvo, kaj ĉefe la suda, al kiu estis asignita la tasko konkeri la mineralo-riĉan zonon de Ukrainio. En la centra fronto, la germanoj avancis tra Belorusio proksimume 400 kilometrojn, konkerante Smolenskon, 350 kilometrojn sudokcidente de Moskvo, la 19-an de julio, post kaptado de 300.000 soldatoj kaj 3.200 sovetiaj tankoj. Moskvo suferis la unuan aviadilan atakon la 21-an de julio 1941. La ofensivo al Moskvo ĉesis tiam laŭ dispozicio de la germana militista stabo por ke la operacio ne troviĝu tro izolita de la norda kaj suda frontoj, en kiuj la avanco estis malpli rapida. Laŭ ordonoj de Hitlero, malantaŭ la avangardaj trupoj kiuj bataladis kontraŭ la sovetiaj trupoj iradis SS-aj trupoj kies tasko estis efektivigi raspurigon, t. e. kapti homojn por sklava laborado kaj ekstermi la anojn de abomenindaj etnioj laŭ naciisma kritero, ĉefe judoj. La armeestroj estis ricevintaj konkretajn instrukciojn de la **Führer** ne embarasi tiun agadon de la SS.
Sur la suda fronto, kie la sovetia rezisto estis multe pli granda, ankaŭ la trupoj de ***Rundstedt*** plenumis siajn celojn kaj konkeris Ukrainion: Kievo falis la 19-an de septembro, post alia granda sovetia katastrofo: la kapitulaco de ĉirkaŭ 600.000 homoj. Ĉi tiu venko igis Hitleron pensi ke Rusio jam perdis la militon. La germanoj atingis la Dono-riveron la 15-an de oktobro; ili prenis ***Járkovo***-n, la duan ukrainan urbon, la 24-an. La 11-a armeo, kun sep divizioj, kaj la rumana 3-a armeo, disiĝis, laŭplanite, al la Nigra Maro: inter la 26-a de septembro kaj la 15-a de novembro, ili okupis Krimeon kaj sieĝis Sebastopolon, la gravan rusan mararmean bazon, kiu, helpate de la sovetia floto de la Nigra Maro, rezistus la germanan ofensivon dum kelkaj monatoj. En ĉi tiu suda fronto la germanoj renkontiĝis kun ne-rusaj etnioj, nevole aneksitaj al la carisma imperio unue kaj al Sovetunio poste- kiuj bonvole akceptis ilin; ĉiukaze la judoj de tiu zono suferis similan persekutadon kiel tiuj de aliaj zonoj.
Post plurmonata halto, la 2-an de oktobro oni rekomencis la operacion por la kapto de Moskvo. La ofensivo komenciĝis superforte: la germanoj ĉe ***Viazma*** kaj ***Brjansk***, oriente kaj sude de Smolensko, detruis ok rusajn korpusojn kaj atingis

## BATALO DE MOSKVO













**Celebrado de la datreveno de la Rusa Revolucio**

663.000 milit-kaptitojn. Sed Moskvo ne estis konkerita. La vetero: pluvo, neĝado…, koto, glacio, flakegoj kaj la malbona stato de la rusaj vojoj malebligis al la germanaj tankoj progresi kun la rapideco kaj efikeco, kiun la taktiko de la fulm-milito postulis. Krome, Moskvo estis preta por defendo. Dum la somera halto de la germana ofensivo en tiu centra fronto, la rusa armeo, subgvide de ***Georgij Ĵúkov***, estis plifortigante la defend-liniojn kaj la militistajn efektivojn per la alveno de kvar milionoj da soldatoj el Siberio. Tiu siberia armearo povis esti retirita el tie kiam estis certeco ke Japanio ne atakos la rusan teritorion helpe de Germanio kun kiu estis subskribinta la Feran Paktón. Ja, Japanio havis sian proprajn militajn planojn, konkrete kontraŭ Usono, kiun ĝi atakus en ***Pearl Harbor*** du monatojn poste. La japana neinterveno kontraŭ Sovetunio estis iu el la faktoroj kiuj ebligis la reziston kaj postan sovetan ofensivon kontraŭ Germanio. Alia faktoro estis tio ke dum la someraj monatoj de la germana ofensivo oni plenumis en Sovetio kolosan operacion de translokigo de la industriaj instalaĵoj al pli internaj zonoj for de la atingo de la germanoj, kaj tie oni intense konstruis tankojn kaj ĉiutipan militan materialon. Kaj fine estis ankaŭ la armilaro provizita de la aliancanoj al Sovetio.

Do, la rusaj trupoj sukcesis ne nur reteni la atakon al Moskvo sed ankaŭ eviti la sieĝon de la ĉefurbo far la germanaj trupoj. Meze de tiu «Batalo de Moskvo», la 7-an de novembro, la rusoj celebris la kutiman ĉiujaran defiladon memore al la Revolucio de 1917. En tiu okazo la celebrado havis specialan simbolan signifon de rezistado kontraŭ la faŝismo. Sed la germana atako, pro la rasisma karaktero de la naziismo, metis subdanĝere ne nur la sociajn konkeraĵojn de la Revolucio sed ankaŭ la ekzistadon mem de Rusio kiel popolo. Tial, la propagando de la rusaj aŭtoritatoj adresiĝis al la tuta rusa popolo, sendepende de la politikaj diferencoj, por la defendo de la “Sankta Rusio”.

Repuŝitaj la germanaj atakoj kontraŭ la rusa ĉefurbo, komence de decembro, ***Ĵukov*** kontraŭatakis. Malgraŭ tio ke Hitlero ordonis al ĉiuj siaj trupoj rezisti, la rusoj sukcesis forpeli la germanojn kaj stabiligi, fine de decembro 1941, la frontojn je proksimume 270 kilometroj el Moskvo. Unuafoje ekde kiam la milito komenciĝis en septembro de 1939, la germanaj armeoj ne atingis sian celon kaj estis devigitaj retiriĝi. Tial Hitlero eksigis kelkajn el la ĉefaj militestroj, kiujn li taksis kiel konservemaj kaj prudentaj, kaj la 18-an de decembro alprenis li mem la komandon de la germanaj armeoj. Germanio kaj ĝiaj aliancanoj suferis ege da viktimoj: proksimume 918.000 homoj estis mortintaj, vunditaj aŭ kaptitaj. En Rusujo la fulm-milito ĉesis utili kiam la vetero malboniĝis. La germana komando ankaŭ faris erarojn, improvizojn… la etendo de la frontoj, preskaŭ du mil kilometroj, kaŭzis troan dividon kaj distancon inter la linioj de iliaj armeoj. Malproksime de iliaj bazoj en Germanio, fakte sen sufiĉaj rezervoj, malbone nutritaj kaj ekipitaj, la trupoj devis suferi temperaturojn je 40 gradoj subnule. Ili ne disponis je vestaĵoj por la vintraj temperaturoj tial ke la germana komando kalkulis ke la kampanjo ne daŭrus pli ol kvar monatoj.

Dum la finaj monatoj de 1941, pludaŭris la bombardadon de britaj urboj far la germanoj kaj de germanaj urboj far la britoj. Post la sukcesa japana atako al ***Pearl Harbor***, la 7-an de decembro, Usono deklaris la militon al Japanio, kaj kelkajn tagojn poste Germanio kaj ceteraj landoj de la Akso deklaris la militon al Usono. Dum la unuaj monatoj de la jaro 1942, en la rusaj frontoj daŭre estis furioza batalado, sed ekzistis ia forto-ekvilibro: la germanoj jam ne plu sukcesis avancadi kiel ĝis tiam, kaj la rusoj ankoraŭ ne kapablis entrepreni kontraŭofensivon. En la afrikaj frontoj, la angloj estis pasante al la ofensivo dum la italo-germanaj trupoj subkomande de ***Rommel*** pene rezistadis. Sed en Azio la japanoj estis atingante gravajn venkojn kontraŭ la aliancanoj. Post la sukcesa atako al ***Pearl Harbor***, la japanaj armeoj invadis Indonezion la 10-an de januaro de 1942, kaj la 3-an de februaro. La 15-an de februaro Japanio okupis la urbon Singapuro post venki la britan armeon kaj kapti multajn milojn da ties soldatoj. En aprilo, ankaŭ Filipinoj kaj Hindoĉinio estis sub japana okupo, kaj la japana mararmeo estis operaciante ĉirkaŭ Cejlono. Nur meze de la jaro, konkrete de la 4-a al la 7-a de junio, per la mara batalo de ***Midway***, la usona mararmeo atingis grava venko sur la japanoj kaj metis finon al ĉi ties ĝistiama milita iniciatemo.

Ni ne priskribas detale ĉiujn-ĉi batalojn kaj militajn operaciojn ĉar nia celo, kiel dirite, estas atenti pri la fenomeno de la faŝismo kiu disvolviĝis, interalie, en la kadro de tiu inter-imperiisma milito. Ja, la Dua Mondmilito estis tiom interimperiisma kiom la Unua. Do, ni pli atentas pri tiuj aspektoj kiuj rilatas al la ekzistado kaj disvolviĝo de la faŝismo, kaj tiorilate interesas al ni la enhavon de la diskurso kiun Hitlero faris okaze de la germana deklaro de milito al Usono, la 11-an de decembro de 1941. Li diris: *Mi tre bone komprenas la teruran distan-*

*con, kiu disigas la ideojn de **Roosevelt** kaj tiujn miajn. **Roosevelt** devenas de riĉa familio kaj apartenas al la klaso kies vojo estas pavimita en la demokratioj. Mi estis nur filo de malgranda, malriĉa familio, kaj mi devis malfermi mian vojon per laboro kaj penado. Mi kunhavis la sorton de milionoj da homoj, kaj **Franklin Roosevelt** nur la sorton de la plej supra dekmilo*. Evidentas ke la nazia lidero bone perceptis la esencon de la klasa socio. Tia percepto estas la unua paŝo kaj nepra kondiĉo por alpreni la socialistan konscion batali por la interhoma egaleco metante finon al tiu klasisma karaktero de la kapitalista ekspluatado. Kaj tamen Hitlero poziciiĝas kontraŭ la marksisma ideologio; li ne celas meti finon al la klasista socio, li nur volas batali por bone instaliĝi en ĝi. Kaj plej grave, lia diskurso estis adresata al ega homamaso kiu bone akceptis tiujn argumentojn kaj la ideon kiun ili enhavis. Tio estas, ni devas eltiri la lecionon ke ne ĉiuj subprematoj, nur pro la fakto ke ili estas subpremataj, pretas batali aŭ labori por meti finon al la subpremado. Multaj uloj volas plibonigi sian pozicion eĉ ene de maljusta socia ordo kaj pretas kunlabori kun klasaj aŭ alitipaj malamikoj preze de ia profito, eĉ se malgranda; el tiutipa ularo estas varbataj la lakeoj, sklavoj kun animo de sklavoj. Resume, kadre de la kapitalismo, la faŝismo estas movado kies celo estas altiri kaj varbi popolajn lakeojn serve de la mastroj de la sistemo.

Revenante al la disvolviĝo de la milito, en la lastaj monatoj de 1942, en Eŭropo la afero evoluis malfavore al la potencoj de la Akso. Kvankam Usono devis alfronti la japanan malamikon en Azio, ĝi havis sufiĉe da potenco por destini milionojn da soldatoj, kaj kolosan armilaron por batali kontraŭ la germanoj kaj la italoj. Cetere, en oktobro, la britaj trupoj venkis la germanojn kaj italojn ĉe ***El Alamein***, Egiptujo, kaj puŝis la soldatojn de la Akso en ĥaosan retiriĝon tra Libio al la orienta limo de Tunizio. Kaj la situacio de la germanoj kaj italoj en norda Afriko pli malboniĝis de kiam, la 8-an de novembro, usonaj kaj britaj trupoj elŝipiĝis ĉe diversaj punktoj sur la marbordoj de Alĝerio kaj Maroko en nordafrikaj kolonioj de Francio, subkontrole de la reĝimo de ***Pétain***. La malsukcesa defendo de la francaj ***Vichy***-soldatoj kontraŭ la invado permesis al la aliancanoj rapide avanci ĝis la okcidenta limo de Tunizio. Tio provokis la germanan okupon de suda Francio la 11-an de novembro. La reĝimo de ***Vichy*** perdis la etan aŭtonomecon, kiun ĝi havis ĝis tiam. La germana armeo establis sian rektan kontrolon super la tuta franca teritorio kaj domaĝe al la franca civila administracio, kvankam la ***Pétain***-registaro estis konservita por teni la fikcion de sendependa Francio kaj ĉar por la naziaj interesoj estis oportune ke la administracio restu en la manoj de francaj kunlaborantoj de Germanio pro la altaj homaj kaj materialaj kostoj de starigo de pura germana burokratio.

Sed kie estis pli perceptebla la ŝanĝo de la tendenco de la milito estis en la rusa fronto, konkrete en la urbo Stalingrado. La 28-an de junio, Germanio kaj ĉi ties aliancanoj de la Akso entreprenis novan ofensivon en la suda fronto kaj meze de septembro profunde penetris en Kaŭkazion post okupi la Krimean Duon-

# BATALO DE STALINGRADO

insulon. Tiu ofensivo postulis retiri trupojn el aliaj frontoj, kio signifis definitivan rezignon pri la kapto de Moskvo. La germana avanco komence estis tiom terura, brila kaj sukcesa kiom la operacio Barbarosso la antaŭan jaron. En tiu kampanjo estis konkeritaj gravaj centroj kiel Sebastopolo, ***Voróneĵ***, ***Rostov***, kaj la Kaŭkazian montaron, sed oni ne sukcesis kapti la petrol-produktajn centrojn de ***Grozni*** kaj ***Bakú***.

Komence Stalingrado ne estis celo de tiu ofensivo, sed la 23-an de julio Hitlero vizitis tiun fronton kaj decidis ke la trupoj de la kaŭkazia zono kaptu la urbon Stalingrado (antaŭe nomita Volgogrado), industria urbo (ŝtalo, traktoroj, municio, petrolkemiaj produktoj), de sescent mil loĝantoj, krucvojo de fervojaj kaj riveraj konektoj kaj unu el la ŝlosiloj al Volgo. La komando de ĉi tiu operacio estis asignita al la generalo ***Friedrich Paulus***. Li disponis je 270.000-homa armeo kun 500 tankoj, 600 aviadiloj kaj 3.000 kanonoj. Ankaŭ la rusa armeo defendanta la urbon estis granda kvankam malpli ol la germana: 290.000 soldatoj, 400 tankoj kaj 300 aviadiloj. Oni batalis furioze ekde la 3-a de septembro.

Ekde kiam la germanoj sukcesis eniri en la urbon oni batalis surstrate, pridisputante ĉiun domon. Meze de oktobro la germanoj estis kaptinte 80 elcente el la urbo. Stalingrado akiris simbolan karakteron por ambaŭ armeoj. Por la germanoj estus granda prestiĝo kapti urbon portantan la nomon de ***Stalin***, kaj por la rusoj estis interese konservi ĝin pro la sama kialo. Germanoj kaj rusoj pligrandigis sian respektivan armeon en tiu fronto. La 12-an de novembro rusoj entreprenis ofensivon, kaj 11 tagojn poste la armeo de ***Paulus*** restis sieĝita kaj detranĉita de la cetero el la germanaj trupoj en Rusujo. Hitlero ordonis defendi la pozicion ĉiakoste kaj neis al ***Paulus*** la eblon de retiro. Ĉi tiu disponis ankoraŭ je 250.000 homoj (20 divizioj; 6 el ili, de tankoj). Kiam finiĝis la jaro 1942, tiu germana armeo estis enfermita en poŝo 60 kilometrojn longa kaj 45 kilometrojn larĝa, dum daŭre estis alvenante pli kaj pli da rusaj trupoj.










La jaro 1943 estis malbona por granda parto el la mondo ĉar daŭris la monda milito, sed unuafoje ekde la komenciĝo de tiu milito, en 1939, ĝia kurso estis speciale malfavora por la potencoj de la Akso, la faŝismaj potencoj. Krome, tiu malboniĝo estis jam definitiva ĝis la milita fino en 1945, kiu estis ankaŭ la fino de la ĉefaj faŝistaj reĝimoj. En la rusa fronto, konkrete en Stalingrado, estis ekde la 23-a de novembro de 1942 iu ofensivo de la soveta armeo kiu ĉirkaŭis la germanan armeon komandatan de la generalo ***Paulus***.

Dum monatoj la germanaj trupoj ĉe Stalingrado ricevadis tre malmulte da provizaĵoj: armilaro, nutraĵoj kaj medikamentoj. Estis multaj mortintoj, kaj la vunditoj povis esti nek kuracataj nek evakuataj. La 12-an de decembro fiaskis iu intenco de la germana generalo ***Erich von Manstein*** kontakti per sia armeo kun tiu de ***Paulus***. Ĉi tiu mendis al la plejalta germana milita stabo permeson por intenci rompi la sieĝon cele retiri sian armeon ŭest-direkten por reunuiĝi kun la ceteraj armeoj en Rusujo, sed Hitlero malpermesis tiun operacion kaj insistis ke la armeo en Stalingrado restu batalante tie. Krome li aljuĝis al ***Paulus*** la rangon je marŝalo; temis pri manovro por pli devigi la generalon rezisti ĉar estis tradicio en la germana armeo ke neniu marŝalo iam kapitulacis. La rezisto de la armeo de ***Paulus***, tre malgrandigita pro la malvarmo, disenterio, tifo, subnutrado kaj elĉerpiĝo, estis eksterordinara; la 12-an de januaro, la rusoj rompis la germanajn defendajn liniojn; la 22-an ili transprenis la flughavenon de Stalingrado. Post novaj atakoj, ege intensaj, ***Paulus*** kapitulacis, kun 91.000 homoj, la 31-an de januaro; kelkajn tagojn poste faris same la cetero de lia armeo, aŭ tio kio restis el ĝi. La bilanco de la ofensivo en la suda fronto estis hororа. Germanio kaj ĝiaj aliancanoj suferis milionon da viktimoj (400.000 germanoj, 220.000 italoj, 200.000 hungaroj, 150.000 rumanoj) kaj perdis 900 aviadilojn kaj 1.500 tankojn; la sovetianoj, 1,1 milionoj da viktimoj (480.000 soldatoj kaj 40.000 civiluloj mortigitaj; 650.000 vunditoj) kaj la perdo de 94 tankoj kaj 1.100 aviadiloj. La kapitulaco de ***Paulus*** estis senprecedenca hontigo por Germanio. Stalingrado estis la turnopunkto en la milito

en Rusujo. Baldaŭ ĝia efiko sur la moralo kaj konfido de la sovetaj armeoj estis eksterordinara. Ĉiuj germanaj pozicioj en la rusa sudokcidento: la armeoj de Kaŭkazo, la Don-rivero, la centro... tuj ŝajnis subdanĝere. Dum la sekvaj monatoj la rusoj pludaurigis sian ofensivon, kaj la 8-an de februaro rehavis ***Kursk***-on, unu semajnon poste ***Járkov***-on. La germana armeo reagis per propra ofensivo kaj okazigis grandajn perdojn al la rusoj, sed vole nevole la naziaj trupoj devis retroiri cedante terenon al la soveta armeo. En aprilo, la germanoj ankoraŭ retenis ĉirkaŭ tri milionojn da soldatoj en Rusujo, sed ili estis retroirintaj proksimume 400 kilometrojn, tamen ili troviĝis antaŭ rusa armeo de pli ol ses milionoj da soldatoj.

Ankaŭ en aliaj militaj frontoj la afero montriĝis malfavore por la potencoj de la faŝisma Akso. Japanio estis perdinta la maran superecon, kaj en januaro de 1943 la usonanoj rehavis la Salomon-insulojn. En la Atlantiko la germanaj submarŝipoj perdis efikon ekde kiam la angloj sukcesis deĉifri la germanan kodon je interkomunikado. En la okupita Francio, la ĝis tiam nefara Rezisto komencis krei problemojn al la germanoj. Kaj same okazis en Jugoslavio kun la rezistado kaj gerilo komandataj de ***Josip Broz Tito***. Sed, plej grave por la italoj kaj la germanoj estis ke, ekde majo de 1943, la aliancanoj kontrolis la nordon de Afriko; ***Rommel*** estis finvenkita en tiu fronto. En januaro estis kunsidinte en Kazablanko ***Roosevelt*** kaj ***Churchill*** por plani la aplikotan strategion, kiu kontemplis la invadon de Sicilio kaj Italio post la liberigo de la nordo de Afriko, kaj bombardadojn sur Germanio. Laŭ iniciato de ***Roosevelt***, estis aprobita en Kazablanko deklaron laŭ kiu oni malakceptus ĉian eblon je paco intertraktita kun Hitlero kaj oni akceptus neniun alian eblon ol la "senkondiĉa kapitulaco" de la agresintoj.


Tiu interakordo de ambaŭ lideroj pri la ne akcepto de kondiĉa kapitulaco de iliaj malamikoj, fakte, estis superflua. La faŝismaj lideroj, pro sia propra naturo, estis homoj kiuj neniel konsentus kapitulaci.



**Generalo Friedrich Paŭlus**



**Generalo Erich von Manstein**



**Germanaj militkaptitoj en Stalingrado**

Hitlero preferus ke la 91.000 soldatoj de la armeo de Paulus estus mortinte anstataŭ esti kaptitaj. Kaj tiorilate li estis pli rigora rilate al la estroj. Per lia libro, **Mein kampf** li priemfazis la diferencon kiu, laŭ li, ekzistas inter politikisto kaj **Führer**. Ni vidu iujn paragrafojn de lia teksto:


> Kontraŭe al la demokratia parlamentismo estas la vera germana demokratio de la libera elekto de la **Führer**, kiu estas devigita respondeci pri siaj agoj. Tia demokratio ne supozas la voĉdonon de la plimulto por solvi ĉiun apartan demandon, sed simple la volon de unu sola, kiu volas respondeci pri siaj decidoj per sia propra vivo kaj posedaĵoj.
>
> **Führer**, kiu estus devigita forlasi la bazon de sia ĝenerala ideologio ĉar li rimarkis, ke ĝi estas falsa, agos honeste nur kiam, agnoskante la erarecon de sia juĝo, li pretos akcepti ĉiujn sekvojn. Tiakaze li devas almenaŭ rezigni pri ĉiu plua politika agado, ĉar, jam erarinte unufoje en fundamentaj vidpunktoj, li riskas fali duan fojon en la saman danĝeron. Ĉiukaze li jam perdis la rajton peti kaj eĉ malpli postuli fidon de siaj kuncivitanoj.
>
> Pri gravaj kaj malgravaj aferoj, nia movado enkorpigas la principon de la absoluta aŭtoritato de la **Führer**, kiu siavice implicas maksimuman respondecon.
>
> Tiu kiu estas **Führer**, devos alpreni kun sia senlima supera aŭtoritato la ŝarĝon de la plej granda kaj plej peza respondeco.

Tiuj fragmentoj kaj aliaj de la verko de Hitlero enportas liajn ideojn pri estreco aŭ lidereco. La **Führer** devas havi absolutan povon, sed li devas ne erari, kaj se eraras devas pagi per la propra vivo. Krome la lidero devas ŝajni neerarebla por inspiri konfidon al la regatoj. Laŭ tia pensmaniero estos komprenebla lia sinteno dum la ceteraj jaroj de la milito. Li pretis cedi neniom, kaj nur kiam ĉio estis perdita kaj Germanio preskaŭ ruinigita, li decidis sin mortigi. La ideoj de Mussolino estis similaj. Jen tia estas la heredaĵo de tiuj faŝismoj: milito, morto kaj detruo. Ankaŭ eĉ se tiuj movadoj estus venkinte, la detruo estus certa, en iliaj landoj kaj en la venkitaj, ĉar el ĉiu milito nepre rezultas morto kaj detruo.
En la konferenco de Kazablanko, la decido invadi Sicilion kaj Italion estis prenita laŭ postulo de Britio. La prefero de ***Roosevelt*** estis ataki Germanion ekde la nordo de Francio, kaj same Sovetio preferis ĉi lastan opcion. Sed okazis ke en aŭgusto de la antaŭa jaro, Britio estis entrepreninte tiutipan operacion per siaj trupoj kaj aliaj de Kanado, kaj la invado estis ega fiasko, kun la morto de pli ol 3.300 atakantoj. La ofensivo sur Sicilio komencis la 26-an de majo de tiu jaro 1943. Post kelksemanjna bombardado de siciliaj celoj, la invado komencis la 10-an de julio: grava amfibia operacio en kiu intervenis 2.590 ŝipoj kaj 4.000 aviadiloj sub la plejsupera komando de ***Dwight D. Eisenhower***; kaj la britaj trupoj sub la komando de ***Bernard Montgomery***, kiu elstaris en la batalado kontraŭ la germanoj en norda Afriko. La rezistado italo-germana, konsistantaj el 100.000 homoj, estis forta en iuj puntoj. La 19-an de aŭgusto tuta Sicilio jam estis sub la kontrolo de la aliancanoj. La usonanoj kaj la britoj havis entute 25.000 viktimojn en la kampanjo (5.800 mortintoj); Germanoj kaj italoj, proksimume 20.000.
Dum ankoraŭ daŭris la batalado en Sicilio, okazis en Italio io kio tre ŝanĝis la cirkonstancojn de la milito. Temis pri la falo de la *Duce* Mussolino. La aliancanoj estis bombardinte grandajn urbojn kaj poziciojn en kontinenta Italio en la


unuaj tagoj de la invado al Sicilio, kiel komplemento al ĝi, sed ankaŭ en preparo por la estonta invado de Italio. Krom aliaj urboj, Romo mem estis bombardata la 19-an de julio per pli 800 aviadiloj: mortis proksimume 3.000 personoj, kaj 11.000 rezultis vunditaj. Kompreneble, ĉi tio kaj la antaŭaj malvenkoj de la italaj trupoj kontribuis pliruinigi la prestiĝon de la *Duce* en la lando. Ĉi tio kondukis al drama, decide politika kaj historia rezolucio. La 25-an de julio, la Granda Faŝisma Konsilio, urĝe kunvenanta, voĉdonis favore (19 voĉoj kontraŭ 9) pri mocio prezentita de ***Dino Grandi*** kaj subtenata de aliaj gvidantoj de la faŝisma partio: ***Ciano***, ***De Bono***, ***Marinelli***... kiu postulis ke Mussolino rezignu gvidadon de la italaj armeo-trupoj, fakte, temis pri decidpropono de cenzuro kontraŭ la gvidanto de la faŝismo, kies aprobo permesis al la reĝo Viktoro Emmanuelo la 3-a ĉesi kaj aresti la Dukon. La reĝo nomumis generalon Badoglio kiel novan estron de la registaro. Estis eĉ ne unu protesta gesto en Italio pro la falo de Mussolino kaj la ĉeso de ĉi ties reĝimo. La nova registaro negocis armisticon kun la aliancanoj, kiu estis subskribita la 3-an de septembro kaj publikigita kvin tagojn poste.



**Konferenco de Kazablanko**
***Roosevelt* kaj *Churchill***



***Dwight D. Eisenhower***



***Bernard Montgomery***



***Gian Galeazzo Ciano***

La falo de faŝismo kaj la eliro de Italio el la milito vekis grandan esperon por tiu lando, sed la realo estis alia. La 9-an de septembro la germanoj, kiuj havis en Italio naŭdek diviziojn kaj proksimume mil aviadilojn, plifortigitaj per trupoj transigitaj tre rapide el Balkanio, Grekio kaj eĉ Rusujo, okupis Romon kaj la tutan Italion ĝis Napolo. La reĝo deklaris Romon "malfermita urbo", kio laŭ militaj terminoj signifis, ke ĝi devas esti nek defendata nek atakata. Li kaj la registaro de Badoglio fuĝis al Brindizio, kie estis establita la t. n. "Reĝlando de la Sudo". La armistico de Badoglio tamen lasis la italan armeon sen ordonoj. La germanoj dediĉiĝis senarmigi ĝin en Italio, kaj en la landoj, insuloj, kaj eĉ frontoj kiel en Rusio, sub okupo de faŝisma Italio. En multaj lokoj, la italaj trupoj alfrontis la germanojn kaj estis kelkmilo da mortintoj kaj multe pli da arestitoj senditaj al labor-koncentrejoj.



**Efektivigado de la rasmortigo en Germanio kaj la teritorioj okupitaj de la germanaj armeoj**

La okupado de granda parto el Italio far la germanaj trupoj igis ke de tiam la judoj loĝantaj en tiu teritorio estis submetitaj al sama persekutado kiel tiuj de la landoj subkontrole de la nazia armeo. La estinta reĝimo de Mussolino havis, kiel sciate, multajn karakteraĵojn similajn al tiu de la germana naziismo, sed nur fine, subpreme de Hitlero, ĝi alprenis ioman kontraŭjudan agadon. Tiu rasmortigo, amasmurdado, genocido, ankaŭ konata kiel holokaŭsto, estis nomita de la naziistoj "fina solvo". Estis ekstermejoj en ***Auschwitz***, ***Majdanek***, ***Soldau***, ***Ckełmno***, ***Bełżec***, ***Jasenovac***, ***Sobibor***, ***Treblinka***, ***Maly Trostenets***, ***Bergen-Belsen***, ***Oranienburg***, ***Sachsenhausen***, ***Stutthof***… en ili estis ekstermitaj homoj el etnoj kaj politikaj teniĝoj rifuzitaj de la naziistoj: ciganoj, servoj… kaj ĉefe judoj. Inter la historiistoj estas granda debato pri la nombro da personoj mortigitaj en tiuj lokoj kaj pri la grado je respondeco de Hitlero pri tiu procezo. Verdire, ne ekzistas dokumentaro kiu informus pri la maniero kiel oni organizis tiun aferon, sed tio ne estas strange konsiderante la agadmanieron de la nazia lidero; kutime li indikadis, pervorte, aŭ eĉ nur insinue, al siaj subuloj la ĝeneralajn liniojn de la farendaj taskoj kaj ili dediĉiĝis konkretigi en la realon la ricevitajn ordonojn, aŭ sugestojn, ĉiam en la spirito de la penso de la **Führer**, kio signifas ke, fakte, estis nepenseble ke oni faru ion kion li ne aprobus.

Nu, dum en la militaj frontoj la interbatalantoj mortigadis unuj la aliajn, en la koncentrejoj estis ekspluatataj kiel sklavoj la militkaptitoj kaj la kondamnitoj al pereo, kiuj fine estis alkondukataj al la ekstermejoj kaj kremaciejoj, senreziste, pasive… Sed estis iu menciinda escepto, tiu de la Geto de Varsovio. En tiu loko estis amasigita preskaŭ duonmiliono da judoj, ne nur el Polujo sed ankaŭ el aliaj landoj kiujn la germanaj armeoj estis konkerinte. Iom post iom oni estis elprenante de tie la malfeliĉulojn destinitaj al la ekstermejoj. La 18-an de januaro de 1943, kiam en la geto jam restis nur 70- al 80-milo da judoj, ĉi tiuj ribelis kaj komence ili atingis ioman sukceson. Oni konstruis multenombrajn barikadojn en la getto, kaj la ribelintoj rezistis dum kvar monatoj. La fina batalo komenciĝis la 19-an de aprilo kaj daŭris ĝis la 16-a de majo, tri tagojn post la kapitulaco de la armeoj de la Akso en la nordo de Afriko. Por sufoki la ribelon de la geto, la germanoj devis sendi tien 2054 soldatojn, 36 oficirojn, 821 sturmantoj de la SS kaj 363 polaj kunlaboremuloj. Ĉi tiu trupo sukcesis sufoki la ribelon sed nur post furioza batalado en kiu pereis ankaŭ multaj el la atakantoj.

La 5-an de julio de tiu jaro 1943, kvin tagojn antaŭ la elŝipiĝo de la armeoj de la aliancanoj en Sicilio, la germanoj entreprenis egan ofensivon en Sovet-unio. Temis pri batalo en kiu oni luktis ĉefe per tankoj, krom aviadiloj. La germanoj uzis 3.253 tankoj, 9.467 kanonoj kaj 2.110 aviadiloj, kaj la rusoj 5.500 tankoj, 25.000 kanonoj kaj 3.549 aviadiloj. Estis evidenta la refortiĝo de la sovetia armeo post la malvenkoj de la antaŭaj jaroj, krome menciindas ke la rusaj tankoj, ne ĉiuj sed, ja, tiuj laste produktitaj en la rusaj fabrikoj, estis pli potencaj ol la germanaj. Al tiu batalo oni donis la nomon je "***Kursk***" por ĝin nomi iamaniere, sed la amplekso de la batal-kampo ampleksis areon je kelkcento da kilometroj, nur iomete malpli granda ol la landa hispana teritorio.

La batalo daŭris proksimume du monatojn, kaj finiĝis kun klara avantaĝo por la rusoj, kiuj, spite al siaj egaj perdoj, de tiam definitive pasis al la ofensivo. La germanoj sin sentis devigitaj retiriĝi okaze de la eventoj en Italio: falo de Mussolino, retiriĝo de Italio el la milito… Por alfronti tiun neatenditan situacion Germanio decidis retiri trupojn el la rusa fronto por sendi ilin al Italio. En ***Kursk***, la germanoj perdis 203.000 homojn, 2812 tankoj, 9.467 kanonoj kaj 1.041 aviadiloj, kaj la sovetanoj perdis 863.000 homojn, 6.062 tankojn, 5.244 kanonoj kaj 1.961 aviadilojn. Ĉi tiu kampanjo estis strategia sovetia sukceso. Unuafoje ekde la komenciĝo de la milito, iu grava germana ofensivo estis haltigita sen atingi ian sukceson. Post tiu venko, la iniciato firme pasis al la Ruĝa Armeo. Dum la cetero de la milito, la germanoj simple reagis al la sovetiaj progresoj, kaj neniam ili povis reakiri la iniciativon aŭ lanĉi gravan ofensivon sur la orienta fronto. Krome la ofensivoj de la Aliancanoj en Italio malfermis novan fronton, pli deturnante rimedojn kaj prizorgon de Germanio.

Hitlero serioze alfrontis la aferon de Italio. Li ne nur pligrandigis la germanajn militistajn efektivojn en tiu lando sed krome organizis aŭdacan sturman operacion por liberigi Mussolinon. La 12-an de septembro iu germana komando, gvidata de la aŭstra oficiro ***Otto Skorzeny***, liberigis Mussolinon, kiu estis enŝlosita en montara hotelo en malproksima parto de ***Gran Sasso***, centra Italio. Translokita al Germanio, post renkont-

**Batalo de *Kursk***



iĝo kun Hitlero en Munkeno, Mussolino formis, la 23-an de septembro, en norda Italio marionetan reĝimon de Nazia Germanio, la Itala Socia Respubliko, tiel nomata "Respubliko de ***Salò***", sidejo de la Registaro, kun nominala suvereneco super la tuta german-okupita Italio, sed submetita, pro militaj kialoj, al la rekta kontrolo de la germana komando en Italio. La situacio en tiu lando komplikiĝis ankaŭ per la apero de iu rezistad-movado en Romo kaj la formiĝo de iu eksterleĝa registaro konkure kun tiu de Badoglio. Kaj daŭris la milito en Italio; la armeoj de la Aliancanoj kaptis la urbon Taranto en septembro per atako de 600 ŝipoj kun 165.000 homoj kaj la apogo de 3.280 aviadiloj. La rezistado far la germanaj trupoj estis durega. La aliancanaj trupoj povis avanci nur la 50 kilometrojn ĝis Napolo en la daŭro de 22 tagoj kaj kun perdo de proksimume 2.000 mortintoj kaj 20.000 vunditoj. Napolo estis kaptita de usonaj trupoj la 1-an de oktobro. Notindas ke la loka loĝantaro kunlaboris batalante kontraŭ la germanoj. La cetero el la itala kampanjo estis same malfacila kaj malrapida. La tieaj 15 divizioj de la germana armeo ege rezistis inter oktobro de 1943 kaj januaro de 1944. Kaj poste: la aliancanoj, fakte, ne sukcesis liberigi Romon ĝis post 11 monatoj.
La ŝanĝo de la situacio en Italio ebligis la kontraŭgermanan bataladon en aliaj frontoj, ekzemple en Balkanio. En Jugoslavio la partizanoj de Tito bone profitis la malgrandiĝon de la germana armeo kiu devis sendi trupojn al Italio. Kaj en Rusio; la 6-an de novembro la sovetaj trupoj liberigis la urbon Kievo. La iniciativo pasis al la Aliancanoj ankaŭ en Azio, en la milito kontraŭ Japanio. Laŭlonge de 1943 oni estis forpelante la japanojn el diversaj insuloj kaj enklavoj kiujn ili estis konkerinte la antaŭajn jarojn. Same kiel en la Batalo de la Atlantiko, iu grava faktoro de la progreso de la flotoj de la Aliancanoj estis la fakto ke ĉi tiuj estis sukcesinte deĉifri la kodon de interkomunikado de la malamikaj flotoj.
Sed ankoraŭ estis malproksima la fino de la milito, tiel en Oriento kiel en Okcidento. Inter la 17-a kaj la 24-a de aŭgusto kunvenis en Kebekio ***Roosevelt*** kaj ***Churchill*** kune kun ties militistaj kaj diplomatiaj asesoroj. En ĉi tiu kunveno oni studis ian unuan skemon de milita elŝipiĝo en la marbordoj de Francio. En tiu kunsido Usono kaj Britio interŝanĝis jam iom da informo pri la atom-bombo. Ankaŭ oni interakordis prem-instigi Hispanion ĉesi la provizadon de volframo al Germanio, kaj retiri la Bluan Divizion el la rusa fronto. En aliaj postaj kunsidoj de la Ministroj pri Eksteraj Aferoj de tiuj potencoj plus Rusio kaj Ĉinio oni skizis interakordojn por la punado de la naziaj krimoj, kaj oni plu insistis pri la postulo de senkondiĉa kapitulaco de la faŝismaj potencoj. De la 23-a al la 26-a de novembro de tiu sama jaro 1943, kunvenis en Kairo ***Roosevelt*** kaj ***Churchill*** kun la ĉina reganto ***Ĉiang Kai-Ŝek*** en kiu oni pritemis la estontajn militajn operaciojn en la aziaj frontoj. Fine, ***Roosevelt***, ***Churchill*** kaj ***Stalin*** kunvenis en Teherano de la 28-a de novembro al la 1-a de decembro de tiu jaro. Iranio estis okupita en monato aŭgusto far britaj kaj sovetiaj trupoj, kaj oni altrudis la abdikon de la german-favora Ŝaho favore al ĉi ties filo ***Reza Pahlavi***. ***Roosevelt*** kaj ***Chur-***

***chill*** informis ***Stalin***-on pri la planoj kiujn oni estis preparante por la invado tra Normandio. En tiu kunveno oni skizis tion kio poste estis la **UNO**.
Ĉiuj ĉi konferencoj kaj la interakordoj prenitaj en ili montras ke la aliancanoj estis certaj pri sia venko en la milito. En la malamikaj medioj ekzistis dume la koncerna sento pri verŝajna malvenko de la potencoj de la Akso. Pri tio klare atestas la evoluo de la politika situacio en Italio. Kaj estis poste alia ekzemplo en Hungario. Post la germana fiasko en Stalingrado, batalo en kiu la hungara armeo suferis egajn perdojn, la admiralo ***Miklós Horthy*** kaj la ĉefministro ***Miklós Kallay*** komprenis ke Germanio verŝajne perdos la militon. Kun la silenta aprobo de ***Horthy***, ***Kallay*** provis negoci apartan armisticon por Hungario kun la Aliancanoj. Por malebligi ĉi tiun iniciaton, germanaj trupoj okupis Hungarion la 19-an de marto de 1944. ***Horthy*** rajtis resti reganto, sed ***Kallay*** estis forigita de la posteno, kaj la germanoj anstataŭigis lin kiel ĉefministro per Generalo ***Dome Sztojay***, kiu fanatike subtenis la germanojn. Li igis Hungarion daŭre kunlabori milite kun la germanoj kaj krome oni entreprenis en Hungario la deportadon de judoj, kio antaŭe ne estis okazinte.
Kiel dirite, la Nordo de Italio, subkontrole de la germana armeo, estis formale politike demarŝata de Mussolino kiel ŝtatestro de la "Respubliko de ***Salò***", apogata de la plej fanatikaj sektoroj de la itala faŝismo. Tiu reĝimo ne ĝuis politikan apogon kiel la origina faŝismo; ekzemple, kvankam la hispana registaro de Franko daŭre bonrilatis kun la nazia reĝimo, tamen ne establis diplomatiajn rilatojn kun la Respubliko de ***Salò***. Ĉi tiu entreprenis reprezaliojn kontraŭ la faŝistaj hierarĥoj kiuj malfortigis la politikan pozicion de Mussolino kaj ebligis ĉi ties areston. Tiuj, kiuj povis esti kaptitaj, inter ili la grafo Ciano, bofilo de Mussolino, estis enprizonigitaj kaj juĝitaj, fine oni ekzekutis ilin la 11-an de januaro de 1944 en Verono.
Dum la unuaj monatoj de 1944 la armeo de la Aliancanoj en Italio ne sukcesis avanci en sia ofensivo, spit'



Josip Broz Tito



Konferenco de Kebeko



Konferenco de Kairo



Konferenco de Teherano


Romo liberigata
la 5-an de junio de 1944


Usona Generalo
*Mark Wayne Clark*


Humberto la 2-a
Lasta reĝo de Italio


Palmiro Togliatti

al tio ke en januaro oni provis fari novan elŝipiĝon malantaŭ la germana defend-linio. Fine, la 22-an de majo la aliancanaj trupoj sukcesis pretersuperi la germanan rezistón ĉirkaŭ ***Monte Cassino*** kaj liberigi la urbon Romo, kie la trupoj de la usona generalo ***Clark*** eniris la 5-an de junio. La liberigo de Romo estis psikologie grava evento en la kunteksto de la milito. Post tio, la reĝo Viktoro Emanuelo abdikis favore al sia filo Umberto la 2-a; la registaro de Badoglio estis anstataŭita per koalicia registaro gvidata de ***Ivanoe Bonomi*** en kiu ĉiuj rezistaj partioj estis integritaj, inkluzive de la Komunista; ĉi ties gvidanto, ***Palmiro Togliatti***, ekzilita en Moskvo, revenis al Italio en marto kaj postulis la unuecon de la Rezisto, la formadon de Registaro de nacia unueco kaj la prokraston de la institucia demando -monarkio aŭ respubliko- ĝis la fino de la milito.
Sed ankoraŭ granda parto el Italio, norde de Romo, apartenis al la Respubliko de ***Salò***, de la *Duce*, fakte sub kontrolo de 22 divizioj de la germana armeo. Oni devis daŭre batali; la 24-an de julio jam estis liberigitaj Livorno kaj Pizo, interalie, kaj la 18-an de aŭgusto la trupoj de la Aliancanoj jam estis enirinte en Orvieto, Peruĝo, Arezzo kaj Firenco, kaj la batalado pludaŭris… Kaj ankaŭ estis avancado de la kontraŭ-naziaj fortoj en Rusio. Leningrado estis liberigita la 26-an de januaro, kaj la rusaj armeoj alvenis ĝis la landlimoj de Estonio, Litovio, Polujo, Hungario, Rumanio… Sed tamen, tiam la plej grava fronto de la milito kontraŭ la hitleraj trupoj estis nek Italio, nek Rusujo: la 6-an de junio de tiu jaro 1944, ĝuste unu tagon post la liberigo de Romo, komenciĝis la invadon de Francio tra la marbordo de Normandio far usonanoj kaj britoj. La elŝipiĝo de la trupoj, kun ties armilaro, tankoj, ktp., estis sukcesa ĉar estis surpriza en kio rilatas al la loko. La germanoj tute ne estis sciantaj kie konkrete okazus la operacio. La floto de la Aliancanoj kiu protektis la operacion konsistis el 1213 ŝipoj. La homoj kaj la milita materialo destine al tiu operacio estis transportita de 7000 boategoj. 5000 ĉas-aviadiloj kontribuis al la realigado de la operacio. 23.000 paraŝut-soldatoj, du nordamerikaj divizioj kaj unu brita, estis surterigitaj malantaŭ la germanaj linioj. En tiu marborda zono de Normandio

elŝipiĝis 130.000 homoj, 20.000 veturiloj kaj 950 tankoj. La Franca Rezisto, unuigita en 1943, ebligis la kreadon, en februaro 1944, de francaj enlandaj fortoj, komanditaj de Londono, proksimume 40.000 soldatoj komence, 200.000 en julio-aŭgusto de 1944, inter ili proksimume 4.000 hispanaj, respublikanaj rifuĝintoj, kiuj efektivigis ligajn operaciojn, kaj kun sporadaj atakoj kaj gerilaj agoj senmovigis germanajn trupojn en aliaj regionoj de la lando, malebligante ilian sendadon al Normandio.
La operacio, al kiu la Aliancanoj asignis la nomon ***Overlord***, estis sukcesa ĉar oni atingis la planitan militan celon: meti sur la franca teritorio armeon destinitan avanci direkte al Germanio. Sed ĝi estis multekosta: la britoj perdis 2703 homojn, la kanadanoj 946, kaj la usonanoj 6603. Krome oni perdis 127 aviadilojn, 2 destrojerojn kaj 300 boategojn. En la milito ĉio estas perdoj, eĉ kaze de venko. La germanoj perdis proksimume 10.000 homojn, kaj krome estiĝis en ilia atlantika defend-linio truo, 100-kilometre longa kaj 25-kilometre larĝa tra kiu enirus pli kaj pli malamikaj trupoj.
Tamen la avancado de la aliancanaj trupoj dum la sekvintaj monatoj estis lanta kaj malfacila, kaj multekosta pro la homaj kaj armilaj perdoj. La germanoj devis vidi kiele en tiu kaj la aliaj frontoj de la milito ili senĉese estis perdante terenon, kaj soldatojn, kaj krome estis la intensa bombardado de siaj urboj far la britaj kaj usonaj aviadiloj… En tiaj cirkonstancoj la germanaj armeestroj komprenis ke la milito estis perdita. En la Unua MondMilito la germana armeo kapitulacis kiam ankoraŭ la situacio ne tiom estis senespera kiom ĝi estis en 1944. De militista vidpunkto estis alveninte jam la momento kapitulaci kaj savi kiel eble plej da homaj vivoj kaj havaĵo. Sed la nazia reĝimo ne povis kontempli tian eblecon. La partio de Hitlero estis atinginte la povon en Germanio surbaze de emfazado pri la honto de la malvenko de 1918, kiun ili atribuis al perfido de marksistoj, framasonoj kaj judoj, la “surdorsa ponard-piko” sur kiu la naziistoj bazigis sian propagandon. Do, ili ne povis akcepti tiam, en 1944, similan kapitulacon, kaj tiele estiĝis grava kontraŭdiro inter Hitlero kaj la arme-estroj.



Sendube ankaŭ Hitlero konsciis pri la paradoksoj de ”lia batalo”, kiel atestas la fakto ke lia sanstato kaj persona aspekto estis malboniĝante tiom rapide kaj nerenversigeble kiom sia politika sistemo. Dum tiuj lastaj jaroj de la milito kaj de sia vivo, la **Führer** rezistadis nur dank' al egaj dozoj da kuraciloj kaj drogoj kiujn Doktoro ***Morell*** receptadis al li. Tio, kio estis okazante en la milito, kontraŭis ne nur liajn revojn sed ankaŭ liajn bazajn ideojn. Lia ideo pri la supereco de la arja, germana raso, estis ruinigitaj pro la venkoj de la "malsuperaj" rusoj, la slavaj "infra-homoj".
En tiu tereno li suferis aliajn elreviĝojn; li pensis ke la angloj, al kiuj li ne neis la arjan rasecon, estus aliancanoj de Germanio en la konkerado de la mondo por la arjrasuloj, kaj surbaze de tiu freneza supozo, en majo de 1941, iu asistanto lia ***Rudolf Hess***, flugis al Britujo por interakordi aliancon kontraŭ Sovetunio, sed de tiam tiu ulo restis enkarcerigita en la Turo de Londono. Tial la "arjo" Hitlero sin vidis en la kontraŭdiro esti aliancano de la japanaj "infra-homoj" kiuj militadis en Azio kontraŭ la interesoj de la "arjaj" britoj kaj usonoj, dum li estis, en Eŭropo, aliancano de la balkanaj, italaj, hispanaj kaj portugalaj "infra-homoj".
Alia kontraŭdiro aŭ fiasko lia estis tio ke, estante, kiel faŝisto, servisto de la burĝklaso, lia milito, kun ties evidenta malvenko, estis ruinigante la interesojn de tiu klaso kaj de tuta Germanio cetere. Estis klare alveninte la momento por ke li, laŭ lia politika doktrino, sin mortigu. Sed tamen li ne prenis tiun decidon kaj obstinis rezisti alportante plian kaj pluan detruon de sia lando. Lia preteksto por tion fari estis ke li havis en preparo iajn potencajn kaj fantastajn armilojn kiuj definitive alportus al Germanio la finan venkon.
Ĉu Germanio estis progresante tiam en la konstruo de atom-armiloj? Ne estas certeco pri tio, sed, se tiel estis, tio estus kroma fiasko de la ideologio de Hitlero ĉar iam li difinis tiun sciencon, kaj ĉiun sciencon ĝenerale, kiel "juda afero", kaj la judaj sciencistoj estis persekutitaj de lia reĝimo kaj multaj, kiel Ejnŝtejno, devis ekziliĝi, kaj iliaj libroj estis bruligitaj.
Kaj estis alia fiasko kaj elreviĝo, eble la plej grava, kiun Hitlero devis konstati: li ne estis neerara, li ne estis la brila milita strategiisto kiun li pensis esti. Kiam komenciĝis la retroirado de la germanaj armeoj en Rusujo, li eksigis ĉiujn generalojn kiuj permesis kaj organizis la retroiradon, kaj nomumis, por gvidi la armeojn, aliajn militistojn blinde obeemaj al lia ordonoj. De tiam li mem decidis, de sia bunkro, ĉiujn militajn operaciojn, kaj de tiam daŭre persistis la avancado de la rusaj kaj aliaj aliancanaj armeoj, sed ne estis raciaj kaj ordaj retroiroj de la germanoj: simple, ili suferis pli da senutilaj homaj perdoj.
Tia estis, en 1944, la heredaĵo kiun la faŝismo estis lasante post si dum ties lanta agonio. Do, la armeaj kaj aliaj sociaj altranguloj decidis ke oni devus meti finon al la reĝimo de tiu kiun ili, iam, estis entuziasme apogintaj, kaj ĉar Hitlero ne volis kompreni ke estis alveninte la momento retiriĝi, kun aŭ sen sinmortigo, ili decidis organizi komploton por atenci kontraŭ lia vivo.

La atenco okazis la 20-an de julio de 1944 sed ĝi, kompreneble, estis preparita iom da tempo antaŭe, kaj krome jam oni estis intencante realigi ĝin plurfoje antaŭ tiu dato. Male ol aliaj faktaj atencoj kiujn oni faris al Hitlero, samkiel al Mussolino, ĉi-foje temis ne pri politikaj malamikoj sed pri politika sistemo kiu promociis lin kaj apogis lin dumlonge. La problemo de tiuj karismaj lideroj, kiaj Mussolino kaj Hitlero, estas ke en ties princip-skalo, ilia estreco valoras pli ol ĉiu ajn afero, eĉ pli ol la celoj serve de kiuj, supozeble, ili devas esti. Resume, la sociklasoj kaj povoj kiuj altrangigis Hitleron, konstatis ke ĉi tiu estis elglitinte for el iliaj manoj, for el ilia kontrolo, kaj oni devus haltigi lin…

Estas konate kiel fiaskis tiu komploto, nomita «Operacio Valkiria». La atenco, ja, estis farita; pri ĝi oni multe verkis, kaj estas ankaŭ pluraj gravaj filmoj. La kolonelo ***Claus von Staŭffenberg*** metis valizon kun bombo apud Hitlero sub la tablo de la konferenc-salono kie ĉi tiu estis studante militajn mapojn kune kun iuj altrangaj armeanoj. La bombo eksplodis, kelkaj el la kunsidantaj militistoj mortis, plejparto estis vunditaj, sed Hitlero, hazarde, rezultis preskaŭ senvunde. La regantaro de la Führer povis reagi kaj kontroli la situacion sen ke la konspirintoj povus fari elpaŝojn kiuj povus esti sukcesaj nur se Hitlero estus mortinte. Ĉi tiu pensis ke li, vere, estis protektata de Dio, kaj tiele li sin esprimis antaŭ Mussolino, kiu vizitis lin tiutage mem. Rezulte de la sekvinta esploro estis arestitaj multaj personoj implikitaj en la afero, kaj oni profitis la okazon por aresti multajn aliajn, kontraŭantaj de la reĝimo sed sen rilato kun la atenco. Kvin mil el ili estis kondamnitaj al morto, sed iuj famuloj, kiel Marŝalo ***Rommel,*** por protekti siajn familiojn, devis sin mortigi gardante sekreton pri ties implikiĝo en la komploto. Kaj Germanio daŭre plu devis militi, sub la “genia” komandado de tiu ulo al kiu ĝi malsaĝe sin fordonis.



**Claus von Stauffenberg**




**Ĉefaj organizantoj de la konspiro kontraŭ Hitlero**



**Stato de la konferenc-salono de Hitlero post la atenco**



**Hitlero montras al Mussolino la rezulton de la eksplodo de la tiutaga atenco**

## Liberigo de Parizo
## la 25-a de aŭgusto de 1944












Kaj daŭre plu la germanaj trupoj suferadis malvenkojn, kaj daŭre plu ties armeoj senĉese devis retroiri en ĉiuj frontoj. La 25-an de julio, semajnojn post la elŝipiĝo de la aliancanoj en Normandio, komenciĝis la «Operacio Kobro», ofensivo por trarompi la germanajn defend-liniojn en Normandio. Ĝi estis granda sukceso, kiu kondukis rekte al la germana malvenko en nord-orienta Francio. La 15-an de aŭgusto komenciĝis la «Operacio ***Anvil***» (Amboso), kiu komencis per la elŝipiĝo de la aliancanoj en sud-orienta Francio, inter Tulono kaj ***Cannes***. Ĉi tiu operacio permesis al la aliancanoj malfortigi premon en Normandio, kie oni trovis egan germanan reziston. Poste la aliancanoj, kiuj partoprenis en ĉi tiu operacio sukcesis puŝi la germanojn reen norden kaj kontakti kun la aliancanaj trupoj en Normandio. Krome, la germanoj okupantaj Francion devis retiriĝi ĝis kelkaj kilometroj de la franca limo kun Germanio, Luksemburgio kaj Belgio.

Kaj la 25-an de aŭgusto okazis la liberigo de Parizo. De milita vidpunkto la franca ĉefurbo ne havis strategian valoron; ĝia konkero pli havis emocian, historian, sentimentalan kaj simbolan gravecon. En la batalo kiu kulminis en la menciita dato partoprenis, ĉefe, britaj kaj usonaj trupoj. Kiel dirite, la aliancanaj fortoj en la ŭesta fronto estis sub la komando de ***Eisenhower*** kun ***Montgomery*** kiel lia plej senpera subulo. Sed en la batalo por Parizo ludis gravan rolon ankaŭ la organizaĵoj de la Rezistado subgvide la Franca Komitato por Nacia Liberigo estrita de ***Charles de Gaulle.*** Ĉi tiu estis la elstara figuro de la apoteoza eniro de la liberigaj trupoj en Parizo. En la konkero de la urbo decide partoprenis ankaŭ hispanaj respublikanoj kiuj, ekzilitaj el sia lando pro la faŝisma venko en ties enlanda milito, decide batalis kontraŭ la faŝismo en la frontoj de la mond-milito, ankaŭ en la rusaj frontoj. Parizo liber-

iĝis el detruado simila al tiu de multaj aliaj urboj kiuj estis scenejo de bataloj. Hitlero estis ordoninta al la estro de la germanaj fortoj en Parizo, la generalo ***Von Choltitz***, ke li igu Parizon "amaso da ruinoj". Sed tiu armeestro rifuzis tion fari kaj krome, kiam jam ne plu eblis daŭrigi la bataladon, li kapitulacis kaj estis kaptita de la aliancana armeo, ĉio kontraŭ la specifaj ordonoj de la **Führer**. Evidentas ke multaj prudentaj germanaj militistoj estis konvinkitaj ke la aferoj de Germanio estis komandataj de frenezulo kiu ne meritis obeon. Sekve de tiu ofensivo de la aliancaj armeoj, falis la reĝimo de ***Pétain***. Proksimume 4.000 homoj (policistoj, oficiroj, kunlaborantoj, militistoj, de ***Vichy)*** estis arestitaj en la unua semajno post sia liberigo; 80.000, laŭlonge de septembro. Preskaŭ mil virinoj estis publike humiligitaj, razitaj, pro siaj rilatoj kun la germanoj. En la "eksterjura purigado" okazinta en la liberigita Francio antaŭ ol ekfunkciis juĝejoj kaj tribunaloj, kio okazis jam en oktobro, proksimume 9.000 homoj estis ekzekutitaj. Ankaŭ tiaj reprezalioj estas parto de la heredaĵo de la faŝismoj.

Ankaŭ en la eastaj frontoj sinsekvis la germanaj malvenkoj. Laŭ antaŭe interakordite, Stalino igis koincidi la sovetian ofensivon kun tiu de la okcidentaj aliancanoj ekde Normandio: 2,4 milionoj da rusaj soldatoj, 5.200 tankoj kaj 5.300 aviadiloj kontraŭ 700.000 germanaj soldatoj. Unu el la kvar rusaj kolonoj eniris tra la baltaj landoj kaj invadis Polujon. La 30-an de aŭgusto, kvin tagojn post la perdo de Parizo, la germanaj trupoj devis forlasi Bulgarion. Tri tagojn poste, la 3-an de septembro, en la ŭesta fronto, estis liberigitaj, far kanadaj, usonaj kaj britaj trupoj, Antverpeno kaj Bruselo, kio ebligis la revenon de la belga regantaro el la ekzilo. Preskaŭ unu monaton poste, la 1-an de oktobro, sovetaj trupoj eniris en Jugoslavion post milita operacio komencita la 14-an de septembro. En la batalo kunlaboris la jugoslavaj partizanoj komanditaj de ***Josip Broz Tito***. La operacio sur ĉi tiu fronto kaŭzis la liberigon de granda parto de Serbio kaj la komencon de la definitiva retiro de la germanoj el Balkanio. La bombardado kontraŭ germanaj urboj, norda Italio kaj industriaj instalaĵoj en Rumanio kaj Hungario, kaj aliaj celoj, plu daŭris: la aliancanoj faligis 600.000 tunojn da bomboj inter junio kaj decembro 1944. Dume ankaŭ Londono kaj aliaj anglaj urboj estis bombardataj de la germanoj, sed tiam ne temis pri peraviadila bomb-ĵetado sed pri telegvidataj raketoj, la plej kompleksa armilo ĝis tiam konstruita.

La 14-an de oktobro la germanoj estis elpelitaj el Ateno far la brita armeo, kaj la 20-an de tiu monato la rusa armeo eniris en Belgradon. La batalado, kun grandaj perdoj de ĉiuj batalantoj daŭris dum la lastaj monatoj de 1944 en ambaŭ frontoj, oriente kaj okcidente. La avancado de la brit-usona armeo en la ŭesta fronto estis eĉ pli lanta kaj malrapida ekde kiam komenciĝis la atako kontraŭ la germana teritorio mem per la transiro de la t. n. «Sigfrida lineo» la 12-an de septembro; fakte tiuj trupoj ne sukcesis alveni al Aacheno ĝis la 2-a de oktobro, kaj poste la batalado ene de tiu urbo daŭris ĝis la 21-a de tiu monato. La germanoj perdis tie 8.000 homojn, kaj la usonanoj perdis, inter mortintoj kaj

## Batalo de Ardenoj Fine de 1944













vunditoj, 30.000 homojn. Dume iu kanada armeo de 60.000 soldatoj trovis egan germanan reziston intencante kapti la ***Scheldt***-estuaron. Ĉi tiu operacio daŭris ok-dek kvin tagojn kaj kostis al la aliancanoj 6.367 mortintojn. La germanaj viktimoj, en armeo de 90.000 viroj, estis grandegaj: 10.000 mortintoj kaj 40.000 vunditoj. Ankaŭ la kapto de Metzo kaj ties ĉirkaŭaĵo, defendita de kvar germanaj divizioj, estis tre kosta, kun multaj viktimoj por ambaŭ armeoj. Ĝi komenciĝis la 3-an de novembro kaj ne finiĝis ĝis la 22-a; germanaj redutoj rezistis ankoraŭ kelkajn tagojn en aparte fortikaj punktoj de la fortikaĵo.
Ĉar la rusa armeo alproksimiĝis al la germana teritorio, Hitlero forlasis, en novembro de 1944, la Wolfsschanze-n (Lupejo), en orienta Prusio, kie estis, dum tri jaroj, la germana armea komandejo, kaj kie okazis la atenco de la 20-a de julio, kaj translokiĝis al Berlino, al bunkro konstruita sub la Kancelierejo. Ankaŭ ***Eva Braun***, forlasinte la rezidejon de ***Berghof***, definitive translokiĝis al tiu bunkro. De tiu loko, Hitlero gvidis la militajn operaciojn, kaj tie li programis tion kio estis la lasta ofensivo de la germana armeo, la t. n. «Batalo de Ardenoj».
Specialistoj pri milita strategio opinias ke Hitlero estis genia por la planado de brilaj batalaj ofensivoj, kvankam li malbone sin aranĝis kiam li devis organizi defensivajn operaciojn ĉar lia inklino rezisti ĉiakoste kaŭzis ege da senutilajn homajn perdojn. En decembro de 1944 Hitlero projektis la lastan el siaj militaj fulm-atakoj. La 16-an de tiu monato Germanio kontraŭatakis en okcidento laŭ 130-kilometra fronto, inter ***Monschau***, sude de Aacheno, kaj Treviro, tra Ardenoj, la monteta regiono, arbara kaj tre humida, kun oftaj nebuloj kaj tiam kovrita de neĝo. La celo de tiu atako estis rompi la linion de la aliancana armeo por kontakti en Antverpeno kun aliaj germanaj divizioj avancantaj ekde ***Maastricht*** kaj aliaj lokoj, kaj enpoŝi aliancanajn trupojn en Nederlandon. La usona rezis-

to estis eksterordinara. ***Eisenhower*** sendis du kirasajn diviziojn por plifortigi la liniojn. Inter la 16-a kaj la 24-a de decembro, la germanoj sukcesis konkeri, en ilia penetro, gravan kaj grandan triangulo-forman teritorion. Tamen la celo de la operacio, Antverpeno, estis perdita. ***Eisenhower*** prenis du decidojn, kiuj baldaŭ donis frukton. Li asignis la komandon de la amerikaj armeoj en la areo al ***Montgomery*** kaj ordonis al ***Patton***, kiu estis en ***Metz***, ataki de la sudo. ***Montgomery*** kondukis siajn trupojn de Aacheno al ***Dinant***, devigante la germanojn retiriĝi; ***Patton***, turniĝante 90 gradojn norden, surprizis la germanojn sur sia suda flanko, kaj liberigis ***Bastogne***-on la 26-an de decembro. En januaro, Hitler ordonis retiriĝon; ***Montgomery*** liberigis Ardenojn la 16-an de januaro 1945. La usonanoj, kiuj surtenis la pezon de la batalo, suferis 89.500 viktimojn (19.000 mortintoj). La germanoj perdis 120.000 virojn (ĉirkaŭ 70.000 mortintojn) kaj 600 tankojn kaj blenditajn veturilojn. La ***Colmar*** "sako" en Alzaco, kiu estis izolita ekde la novembra batalado, defendita de iu germana armeo de preskaŭ 80.000 viroj, estis "purigita" la 9-an de februaro 1945.
Tiu germana ofensivo estis “la kanto de cigno” de la germana armearo. Post la Batalo de Ardenoj, la germana milita kapablo estis definitive elĉerpita. La 17-an de januaro la rusoj okupis Varsovion, kaj naŭ tagojn poste la soveta armeo liberigis la koncentrejon de ***Aŭŝvico***. ***Roosevelt***, ***Churchill*** kaj Stalino, kaj entute sepcent militaj kaj diplomatiaj kunlaborantoj kaj konsilistoj, kunvenis en Jalto, Krimeo, inter la 4-a kaj la 11-a de februaro, por determini la finan strategion kaj diskuti kaj analizi la estontecon de Germanio. De tiam, en sia berlina bunkro, Hitlero persistis en sia senespera rezisto; li daŭre studadis en la ĉambro de mapoj militajn operaciojn realigendajn de armeaj divizioj kiuj ekzistis nur sur tiuj paperoj kaj en lia menso. La aliancanoj estis avancante en ĉiuj frontoj, ankaŭ en Azio, en la milito kontraŭ la japanoj, kvankam tie la situacio ankoraŭ estis tre malfacila por la britoj kaj usonanoj. Por ĉi tiuj estis granda desaponto la fakto ke Stalino rifuzis impliki Sovetunion en tiu fronto, almenaŭ dum ne estus finiĝinta la milito kontraŭ Germanio. Berlino estis bombardita la 3-an de februaro far pli ol 1000 bombard-aviadiloj; Dresdeno, la 13-an kaj la 14-an de tiu monato suferis detruan bombardadon far 1300 aviadiloj, rezultis detruitaj 30.000 konstruaĵoj, kaj estis 60.000 mortintoj. La 22-an de februaro la aliancana aviado bombardis fervojojn, trajnojn, pontojn, moleojn, komunikajn nodojn, vojojn… tra la tuta okcidenta Germanio. Dume avancadis surtere la armeoj subgvide de ***Eisenhower*** kaj ***Montgomery***. La 1-an de aprilo la germana generalo ***Model*** ne povis rezisti la ofensivon kaj kapitulacis kun armeo de 317.000 homoj, kaj poste li sin mortigis.
La situacio estis same senespera en la norda parto de Italio ĝis tiam kontrolita de Mussolino per la helpo de la germanaj trupoj. La usona armeo de ĉirkaŭ 500.000 homoj, subkomande de ***Clark***, atakis la Germanan Gotikan Linion, ekde ***La Spezia*** ĝis Pesaro, kaj la Po-Valo, dum la Rezistado, kiu en marto 1945 jam havis pli ol 200.000 anojn, el ili, 20.000 virinoj, reaktivigis siajn agojn: kamp-

araj kaj urbaj geriloj, sabotado, strikoj, atakoj… ene de la teritorio sub germana kontrolo, t. e. la Itala Socia Respubliko, la ***Salò***-Respubliko de Mussolino. La rompo de la linio ankaŭ estis la komenco de la fino por la germanaj trupoj, proksimume 300.000 homoj komanditaj de la Generalo ***Vietinghoff*** kaj la Ĝenerala Kolonelo de la SS kaj germana milita reganto de norda Italio ***Karl Wolff***. La usona armeo atingis la kapton de ***Carrara*** kaj ***La Spezia*** la 12-an kaj la 19-an de aprilo respektive, kaj antaŭeniris tra tie al Ligurujo, Piemonto kaj Lombardio. Britaj trupoj detruis germanan armeon kaj kulminis la kapton de ***Rimini***, ***Raveno*** kaj ***Ferrara*** la 10-an de aprilo, turniĝante nordorienten en la direkto de Padovo. Venecio estis prenita la 28-an de aprilo sen batalo, danke al la interakordo de la germanoj kaj la britoj promociita de kardinalo ***Piazza***. La armeo de ***Clark*** transiris la Padon la 20-an de aprilo. La intensa batalo ĉirkaŭ Bolonjo, kiu daŭris sep tagojn, kun perfortaj agoj de la rezistaj fortoj ene de la urbo, tamen prokrastis ilian antaŭeniron tra la centro. Sed, prenita Bolonjo la 21-an de aprilo, ***Clark*** jam antaŭeniris nehaltigeble al Verono, Trento, Bolzano kaj la pasejo Brenero, ĉe la aŭstra limo. La 25-an de aprilo la Rezisto, la Nacia Liberiga Komitato de Supra Italio, alvokis al armita ribelo tra la tuta norda lando. Okazis tre malfacila batalado: atakoj al kazernoj, policejoj, nervocentroj, oficialaj konstruaĵoj, stacioj, provizejoj de gaso kaj akvo, pontoj, fervojoj, komunikaj centroj, montpasejoj, havenaj instalaĵoj… ĉu kun la germanoj, ĉu kun la fortoj de la ***Salò***-Respubliko. Oni batalis en Milano, Torino, Piaĉenco, Ĝenovo kaj en multaj aliaj urboj kaj kamparaj urbetoj, pli malpli sukcese, sed tio permesis al la usona armeo liberigi kaj okupi, inter la 26-a kaj la 28-a de aprilo, plej multajn urbojn, grandajn kaj mezajn, en norda Italio. La 27-an, ***Wolff*** negocis en Kaserto kun aliancanaj komandantoj kaj la itala registaro la ĉesigon de la batalado. Restis ankoraŭ sub la kontrolo de la germanoj kaj de la polico de ***Salò*** iu eta reduto en la norda ekstremo, inter ***Como*** kaj Valtelino, ĉe la svisa limo.

La milito en Italio finiĝis. Ekde la komenco de la kampanjo en septembro de 1943, la aliancanoj havis 300 000 viktimojn en Italio (ĉirkaŭ 60 000 mortintoj); la germanoj, 434.000 (50.000 mortintoj). 60.000 italoj estis mortigitaj per aliancana bombardado. La Rezisto, finfine, ĉirkaŭ 300.000 soldatoj, havis ĉirkaŭ 50.000 mortintojn, kaj la Respubliko de ***Salò***, ĉirkaŭ 10.000, kaj krome proksimume 10.000 aliaj homoj: faŝistoj, kunlaboristoj, funkciuloj de la Italio de Mussolino aŭ poste de ***Salò***, policanoj, iuj soldatoj, sed ankaŭ homoj, kiuj simple aranĝis sin al tiuj situacioj… estis ekzekutitaj rapide, sen proceso, fare de rezistaj grupoj en la liberigaj tagoj mem aŭ baldaŭ poste.

Mussolino estis ekzekutita la 28-an de aprilo de 1945 far membroj de la Rezistado, post kiam milicia patrolo malkovris lin provante atingi la svisan limon. Li kaj membroj de sia registaro estis en Milano la 25-an de aprilo por negoci, per la perado de la ĉefepiskopo de Milano, kardinalo ***Schuster***, la finon de la milito kun reprezentantoj de la Nacia Komitato de la Rezisto. La negocado fiaskis ĉar

oni postulis senkondiĉan kapitulacon de la *Duce*, Mussolino iris al ***Como***, la lasta bastiono de lia reĝimo, de kie li ekiris, kun kunlaborantoj kaj membroj de lia ĉirkaŭaĵo laŭ vojoj kaj malgrandaj vilaĝoj. La 27-an de aprilo, Mussolino estis malkovrita kaj arestita, en iu urbeto de la lago ***Como*** proksime al la svisa limo, far membroj de la Garibalda Rezistada Brigado, kiu retenis por inspektado longan kolonon da germanaj kamionoj al kiu estis aliĝinta la *Duce*. Mussolino kaj lia amantino, ***Clara Petacci***, estis kondukitaj frumatene de la 28-a al la proksima vilaĝo ***Bonzanigo*** kaj loĝigitaj, subkontrole, en kampara domo. Horojn poste, komandanto Valerio, la komunisto ***Walter Audisio***, kaj du el liaj homoj, senditaj de la Milana Rezistada Komitato, prenis Mussolinon kaj lian kunulinon en aŭto al alia tre proksima loko, la remparo de privata vilaĝo: la pafoj de ***Audisio*** metis finis al iliaj vivoj. La 29-an de aprilo 1945, la korpoj de Mussolino, ***Clara Petacci*** kaj kromaj dek kvin aliaj faŝismaj gvidantoj ekzekutitaj en ***Dongo*** estis elmontritaj, pendigitaj de la piedoj de la plafono de garaĝo, kaj ĉikanitaj de la homamaso, sur la placo Loretto en Milano, proksime de la loko kie Mussolino fondis la faŝistan partion en 1919.

La morto de Hitlero okazis nur du tagojn post tiu de Mussolino, sed laŭ malsama maniero. Li sin mortigis malmultajn horojn antaŭ lia nepra falo en la manojn de la sovetaj trupoj kiuj jam estis enirinte en Berlinon. Dum aliaj rusaj armeaj kolonoj estis okupante la eastan parton de Germanio kaj Aŭstrio, tiu komandata de ***Ĵukov*** okupiĝis pri la germana ĉefurbo. Entute la rusaj fortoj konsistis el 36 divizioj, 4,5 milionoj da homoj, kvankam sufiĉe malfortiĝintaj je homoj kaj materialo pro la batalado en la baltaj landoj, Polujo, Hungario… Konkrete, en la soveta atako al Berlino partoprenis 157 divizioj, 1,6 miliono da homoj. Tiam Germanio havis nenian kapablon kontraŭataki. Sovetaj kaj usonaj trupoj renkontiĝis en ***Torgau***, ĉe Elbo-rivero, la 25-an de aprilo.


**Konferenco de Jalto**


***Clara Petacci***


**Morto de Mussolino kaj lia amantino**



Lastaj fotoj de Hitlero


*Gueorgui Zhúkov*




Batalo de Berlino

Ĉiam kredante, aŭ simulante kredi, siajn fantaziojn, Hitlero pensis ke la situacio draste ŝanĝiĝus pro la morto de la usona Prezidento ***Roosevelt***, okazinta la 12-an de aprilo. Sed la ofensivo de la aliancano senhalte daŭris: Nurenbergo estis kaptita la 20-an de aprilo; ***Ulm***, la 23-an, ***Regensburg***, la 26-an; Munkeno, la 30-an… La lastajn monatojn, ekde lia translokikiĝo al la berlina bunkro, Hitlero apenaŭ eliris por publika aperado. La lasta filmado farita al li estis por saluti tiujn junulojn, preskaŭ infanojn, kiujn oni sendis batali kontraŭ la rusoj atakantaj la urbon… Lia sanstato tiam estis ege malbona; la doktoro ***Morell*** devis recepti al li troajn dozojn da kuraciloj kaj drogoj por ke li plu kapablu agadi. Sed lia tuta kaj nura agado estis postuli tiun senutilan kaj senracian rezistadon kiu estis okazigante la morton de pli da germanoj. Eĉ liaj plej proksimaj kaj fidelaj sekvantoj, ***Himmler*** kaj ***Göring***, konstatinte lian nekapablon alfronti la situacion proponis al li nomumi sukcedanton por alpreni la necesajn demarŝojn necesajn en la tiamaj cirkonstancoj. Sed li, ĵaluza pri sia absoluta povo, taksis tiun iniciaton kiel perfido kaj dekretis la eksoficigon de tiuj ministroj.
Fine, kiam la rezistado signifus ke li estus kaptita kaj humiligita kiel Mussolino, Hitlero decidis meti finon al sia vivo. Post nomumo de admiralo ***Dönitz*** kiel prezidanto de Germanio, li sin mortigis en la bunkro la 30-an de aprilo de 1945 kun sia kunulino ***Eva Braun***, kun kiu li edziĝis la antaŭan tagon: iliaj korpoj estis kremacitaj en la ĝardenoj de la kancelierejo. ***Goebbels*** sin mortigis kun sia estro, post antaŭe mortigi sian edzinon kaj ses infanojn. Sekvinttage, en la emblema dato de la 1-a de majo, la sovetiaj trupoj finokupis la urbon kaj metis la ruĝan flagon sur la konstruaĵo de la **Reichstag**. Ekde la 16-a de aprilo, kiam komenciĝis la atako kontraŭ Berlino, la sovetoj havis 80.000 mortintojn kaj 280.000 vunditojn; la germanoj, 125.000 mortintoj; 480.000 soldatoj estis kaptitaj. Berlino estis detruita: neniu

el la esencaj servoj (akvo, kloakaĵo, elektro, gaso) funkciis. La rusoj multe penadis por provizi manĝon kaj ian higienon al la loĝantaro. La rabado, dispredado, seksperfortado de virinoj (80.000), ekzekutoj (de junaj hitleranoj, policanoj, soldatoj) estis multenombraj. Rezisto estis senutila: ***Dönitz*** negocis la kapitulacon. Iom post iom, dum la sekvaj semajnoj la germanaj trupoj en la diversaj frontoj kapitulacis. Tiuj naziaj gvidantoj kiuj ne sukcesis forfuĝi estis kaptitaj. ***Himmler*** sin mortigis post lia arestado. En Eŭropo finiĝis la milito.

La aliancaj gvidantoj denove renkontiĝis. Ĉi-foje ili faris tion en Pocdamo, en la eksteraĵo de Berlino, ekde la 17-a de julio de 1945. Ne estis la samaj: ***Harry Truman*** estis la sukcedinto de la forpasinta ***Roosevelt***. ***Churchill***, fiaskinte en politika balotado en lia lando, cedis la britan reprezentadon en Pocdamo al ***Clement Attlee***, la lidero de la Laborista Partio. En tiu konferenco aperis jam la signoj de malakordo inter la okcidentaj potencoj kaj Sovetunio, kiu poste konkretiĝis en la t. n. «Malvarma Milito». Japanio estis la lasta epizodo de la Dua Mond-Milito. La disvolviĝo de la milito en tiu azia fronto montris ke la japanaj trupoj estis tre malfacile kaj altekoste venkeblaj sur la tereno, sed Usono gajnis tiun militon ekde areo, per intensaj bombardadoj sur la japanaj urboj, kiuj kulminis per la ĵetado de atombomboj sur du urboj: ***Hiroshima*** kaj ***Nagasaki***. En Pocdamo ***Truman*** anoncis, ke lia lando jam disponis je tiu nova kaj potenca armilo. Krome, en aŭgusto, tri monatojn post la kapitulaco de Germanio, ankaŭ Sovetunio eniris en la militon kontraŭ la japanoj. La imperiestro ***Hiro Hito*** alparolis perradie al la japana popolo, io eksterordinara laŭ la kutimoj de la lando, kaj anoncis ke estis konvena la ĉeso de la milito ĉar la malamiko disponis je «ia tre kruela bombo». Kvankam oni ne uzis la vorton «kapitulaco», la interakordo por la ĉeso de la milito, fakte, estis senkondiĉa alĝustiĝo de la japanoj al la postuloj de la venkintaj potencoj. Eĉ oni faris juĝproceson al la japanaj lideroj respondeculoj de militaj krimoj. Sed oni respektis la figuron kaj la



**Usona Prezidento *Harry Truman***



**Japana Reĝo *Hiro Hito***





**Atom-bomba eksplodo kaj ties sekvoj**

personon de la imperiestro. Notindas ke, ekzemple, en Italio, sekve de la konsento de la reĝo kun la faŝismo, post la milito falis ankaŭ la monarkio. Sed en Japanio la reĝa institucio havis/as kvazaŭ dian karakteron, kaj estis politike konvene al la milit-venkintoj respekti tiun tre antikvan tradicion, kiu estas esenca komponaĵo de la japana identeco.

Paralele al Proceso de Tokio kontraŭ la japanaj responsuloj de la milito, estis ankaŭ, en Nurenbergo, proceso kontraŭ la naziaj lideroj, pro ilia respondeco pri la militaj krimoj, sed kun speciala atento al tiuj de rasmortigo, la ekstermejoj… Plejparto el la juĝitoj, inter ili ***Rosemberg***, estis kondamnitaj al morto; ***Göring*** sin mortigis antaŭ la ekzekutado. Iuj, kiel ***Speer*** kaj ***von Papen***, estis kondamnitaj al kelkjara enprizoniĝo; ***Hess*** al dumviva enprizoniĝo, kaj li metis finon al sia vivo en la jaro 1987. En tiu proceso mankis iu grava kulpulo: ***Adolf Hitler***. Li estis juĝita de la Historio: oni konsideras lin ĉefa kulpulo de ĉiuj germanaj amasmortigoj, de la milito kaj la detruado kiun ĝi alportis… La fervoruloj de la verkaro de ***Nostradamus*** asertas ke Hitlero estis la dua el la tri antikristoj kiuj, laŭ ia interpretado de tiu verkaro, devus aperi en la mondo. Sed… ĉu vere li kaj Mussolino estis la kulpuloj de ĉiuj katastrofoj generitaj de la faŝismo? Oni devas klarigi ke tiuj lideroj ne kreis la faŝismajn movadojn, estis la faŝismo kiu kreis ilin. La faŝismo kaj la naziismo estis sociaj fenomenoj kiuj havis profundajn kaj antikvajn radikoj en la popoloj. Se Hitlero ne estus ekzistinta, alia lidero: ***Röhm***, ***Strasser***, ***Ludendorf***, aŭ iu alia, estus ludinta, pli malpli sukcese, similan rolon. Kaj ni memoru ke Mussolino progresis kiel faŝista lidero prizorgante movadon kiu jam estis kaptinte antaŭe la lidereceman atenton de ***Gabriele D'Annunzio***. Do restas antaŭ ni la tasko esplori la veran originon kaj esencon de la faŝisma sento.



# LONDONO POST BOMBARDADO



# HIROŜIMO POST BOMBARDADO






La itala verkisto Umberto Eco (1932-2016) naskiĝis dum la faŝista diktaturo de Mussolino. Do, infanaĝe li estis subinflue de la eduk-sistemo de la faŝismo, sed male ol multaj homoj de lia generacio, kiuj neniam liberiĝis el tiu ideologia influo, li sciis racie reagi kontraŭ la teoria bazo de tiu politika monstraĵo. Kelkaj el liaj verkoj respegulas lian rifuzon al la faŝisma doktrino kaj al la politikaj sistemoj bazitaj sur ĝi. Por la celo de nia studo pri la faŝismo interesas prikonsideri lian difinon pri la temo, kiun li faras per lia verko «La eterna faŝismo». Li prezentas dek-kvar simptomojn kiuj karakterigas la faŝismon. Ni resumas ilin:

1) Kulto al la tradicio: «La vero estis jam anoncita unufoje por ĉiam».
2) Neracieco: La nazia ideologio baziĝis sur la sango kaj la tero (bazaj elementoj de ĉiuj naciismoj). La faŝisma emo al neracieco rifuzas la spiriton de la klerismo kaj de 1789, «Deklaracio de la Homaj kaj la Civitanaj Rajtoj»...
3) Pensi estas maniero kastri: la faŝismoj kultas la agadon pro ĝi mem. La agado belas per si mem kaj, do, oni devas agadi senpripense. Pensi estas ia formo de kastriĝo.
4) Senkritika sinkretismo. «La malakordo estas perfido». Neniu formo de sinkretismo povas akcepti kritikan pensadon. La kritika spirito faras distingojn, kaj distingi estas signo de moderneco. En la moderna kulturo, la scienca komunumo, la malkonsento estas ilo por progresigo de scioj. Por la faŝismo malkonsento estas perfido.
5) Rasismo: Malkonsento ankaŭ estas signo de diverseco. La faŝismo kreskas kaj serĉas konsenton ekspluatante kaj pligravigante la naturan timon al diferenco. La unua alvoko de faŝisma movado estas kontraŭ entruduloj. La faŝismo estas, do, rasisma laŭdifine.
6) Minacita burĝaro: faŝismo ekestiĝas de individua aŭ socia frustriĝo. Kio klarigas kial unu el la tipaj karakterizaĵoj de historia faŝismo estis la alvoko al la ĉagrenitaj mezaj klasoj, malkuraĝigitaj de iu ekonomia krizo aŭ politika humiligo, timigitaj de la premo de subalternaj sociaj grupoj.
7) Naciismo: Al tiuj, al kiuj mankas ia socia identeco, la faŝismo diras al ili, ke ilia sola privilegio estas la plej vulgara el ĉiuj: esti naskiĝintaj en la sama lando.

8) La forto de la malamiko: La sekvantoj devas senti sin humiligitaj de la riĉeco de la malamikoj kaj ĉi ties fortoj. Al la faŝismo estas necese krei malamikon, kiu ĝenerale estas la masonoj, la judoj, la komunistoj, la islamanoj…

9) La senĉesa milito: Ne estas batalado por la vivo, sed «vivo por la batalado». La pacismo estas, do, koluzio kun la malamiko; pacismo malbonas, ĉar la vivo estas konstanta milito.

10) Elitismo de amaso: Elitismo estas tipa aspekto de ĉiu reakcia ideologio, ĉar ĝi estas fundamente aristokrata. En la historio, ĉiuj aristokrataj kaj militismaj elitismoj implikis malestimon al la malfortuloj. La faŝismo devas prediki "popularan elitismon". Ĉiu civitano apartenas al la plej bonaj homoj en la mondo, la partianoj estas la plej bonaj civitanoj...

11) Mitologia heroeco: La "heroo" estas escepta estaĵo, sed en la faŝisma ideologio la heroeco estas la normo. Ĉi tiu kulto al heroeco estas proksime ligita kun la kulto al morto. La faŝisma heroo aspiras morton, anoncitan kiel la plej bona rekompenco por heroa vivo.

12) Sekso: Ĉar kaj senĉesa milito kaj la heroeco estas malfacilaj ludoj, la faŝisto projekcias sian potenco-volon pri seksaj aferoj, kiel ina malforto, homofobio, ktp.

13) Lidereco: Por la faŝismo, la individuoj unuope ne havas rajtojn, kaj la "popolo" estas konceptata kiel kvalito, monolita ento, kiu esprimas la "komunan volon". Ĉar neniu kvanto da homoj povas posedi komunan volon, la gvidanto pretendas esti ĝia interpretisto. Ĉi tio implicas disdegnon kaj malestimon al la parlamentoj kaj ties legitimeco.

14) Infana lingvo: Ĉiuj naziaj aŭ faŝismaj lernolibroj baziĝis sur malriĉa leksikono kaj elementa sintakso, por limigi la instrumentojn por kompleksa kaj kritika rezonado.

Ĝenerale, la realo estas pli kompleksa ol ĉiuj interpretadoj kiujn oni faras pri ĝi. Ĉi tio estas aplikebla ankaŭ al la difino kiun Umberto Eco faras pri la faŝismo. Li rekte travivis la sperton de iu konkreta faŝismo, tiu de la Italio de Mussolino, kaj la karakteraĵoj kiujn li atribuas al la faŝismo plene validas por tiu reĝimo. Sed aperis aliaj faŝismoj post tiu itala kaj ĉiuj ili havis apartajn kaj specifajn trajtojn kiuj ne tute alĝustiĝas al la skemo de Eco. Li mem, iamaniere, agnoskas tion kiam en la menciita verko, li aldonis:

La esprimo "faŝismo" taŭgas por ĉio, ĉar eblas forigi unu aŭ plurajn aspektojn de faŝisma reĝimo, kaj ni ĉiam povas agnoski ĝin kiel faŝismon. Forprenu la imperiismon el la faŝismo kaj vi estos antaŭ ***Franco*** aŭ ***Salazar***; forprenu la koloniismon kaj antaŭ vi staras la balkana faŝismo. Aldonu radikalan kontraŭkapitalismon (kiu neniam fascinis Mussolinon) al la itala faŝismo kaj antaŭ vi estas ***Ezra Pound***. Enmetu la kulton al kelta mitologio kaj grala mistikismo (tute senrilata al oficiala faŝismo) kaj antaŭ vi havas unu el la plej respektataj faŝismaj guruoj, ***Julius Evola***. Malgraŭ ĉi tiu konfuzo, mi konsideras, ke eblas indiki liston de tipaj karakterizaĵoj de tio, kion mi ŝatus nomi "Ur-Faŝismo", aŭ "eterna faŝismo". Tiaj trajtoj ne povas esti enkadrigitaj en sistemon; multaj kontraŭdiras unu la alian, kaj estas tipaj por aliaj formoj de despotismo aŭ fanatikeco, sed sufiĉas, ke unu el ili ĉeestu por koaguli faŝisman nebulozon.


## Bruligado de libroj en Hispanio



Toloso, Gipusko la 11an de aŭgusto de 1936



Korunjo, la 19an de aŭgusto -1936








Madrido, aprilo de 1939

Jes, kaj ĉi tio utilas por nia studo ĉar ni devas atenti pri iuj faŝismoj, la portugala kaj hispana, ĉefe ĉi lasta, kiuj supervivis post la fiasko de la klasikaj aŭ emblemaj modeloj de faŝismo: la itala kaj la nazia de Germanio (krom la franca reĝimo de ***Vichy*** kaj la orienteŭropaj faŝismaj reĝimoj serve de la hitlerismo). La maniero kiel evoluis la iberiaj faŝismoj kaj saviĝis el la ruino dum kelkaj jardekoj montras ke ne pravas tiu aserto de la dua punkto de la supra listo de Umberto Eco, tiu de la senracieco. Ja, ***Francisco Franco*** kaj ***António de Oliveira Salazar*** sciis studi la situacion kaj agadi racie laŭ la eltirita instruo. Krome, kiam oni temas pri faŝismoj oni devas prikonsideri ke tiuj politikaj entoj konsis-tas el tri malsamaj elementoj: unue estas la mal-kleraj amasoj kiuj rezignas sian civitanecon favo-re al absoluta povo de la koncerna lidero, due estas la lideroj mem, kiuj ne nepre kunhavas kun la amaso ĉi ties emojn kaj timojn, kaj fine estas la faktaj povoj kiuj uzas siafavore la fana-tikecon de la amasoj kaj estas servataj, pli malpli lojale, de la faŝistaj lideroj. Do, iu(j) karakter-aĵo(j) kiu(j) estas vera(j) por iu el la tri elemen-toj povas ne esti, kaj ofte ne estas, ĝusta(j) por la du aliaj.

Reprenante la fadenon de nia historia raport-ado, la frankisma reĝimo sin sentis pli kaj pli subdanĝere, dum la jaroj 1943 al 1945 dum la militaj aferoj iĝis pli kaj klare malfavoraj por la faŝismaj potencoj: retroiro en la rusa fronto, invado de la aliancaj armeoj en norda Afriko, Sicilio, Italio… falo kaj enprizoniĝo de Musso-lino, elŝipiĝo de la alianca armeo en Norman-dio, falo de la reĝimo de ***Vichy***… La frankisma reĝimo tre identiĝis ĝis tiam kun tiuj de Hi-tlero kaj Mussolino. Reale, la starigo de la faŝ-ista povo en Hispanio okazis pli perfortmaniere ol en Italio kaj Germanio; en ĉi lastaj landoj ne okazis civil-milito kiel tiu de Hispanio kiu daŭ-ris preskaŭ tri jarojn. Cetere, ankaŭ ĉi tie ne

mankis tiu barbara agado de bruligado de libroj dum la milito kaj poste. Ni ne intencas fari demagogion por inspiri abomenon al la frankismo; ni ne forgesas ke dum tiu milito ĉiuj interbatalantoj agadis kruele kaj barbarece, kaj ke ankaŭ la kontraŭfaŝismaj fortoj faris bruligadojn, ĉi-kaze de preĝejoj kaj monaĥejoj… Pri tiuj malfeliĉaj jaroj ni jam raportis per ĉi tiu revuo, konkrete en ties 88-a numero, kaj ni indikis, per iu antaŭa ĉapitro de ĉi tiu raporto, la retadresojn de la ĉapitroj temantaj pri la hispana civil-milito. Kaj pri la frankisma epoko, kiun ni devas pritemi nun, estas ankaŭ informo en la sama **Heleco**-numero, konkrete en la ĉapitroj alireblaj tra la ret-adresoj:
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/43-45.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/46-49.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/50-52.html
Do, nun ni ne priraportos tiun periodon. Nia atento iras adresata al la studo de la maniero kiel iu faŝisma reĝimo sciis evolui por adaptiĝi al malfavoraj cirkonstancoj. Ĝis 1940, ***Franco*** estis tute implikita kun la potencoj de la Akso Romo-Berlino. Eĉ post la germana invado de Francio kaj aliaj landoj de okcidenta Eŭropo, printempe de tiu jaro, la hispana diktatoro estis preta eniri en militon kiel aliancano de Hitlero. Kiel jam raportite, la kondiĉoj ne estis konvenaj por la **Führer**. Sed, ses monatojn poste, kiam Germanio kontemplis ian hispanan intervenon en la konflikto, ***Franco*** kun prudento ruze manovris celante eviti tian kompromiton. La maniero kiel la britoj estis rezistante la germanan kaj italan ofensivon en ties Afrikaj kolonioj, en Balkanio kaj en en la Metropolo, igis lin pensi ke povus esti danĝere ege implikiĝi kun la faŝismaj potencoj. Krome estis la fakto ke Hispanio, en ĉi ties teritorio, ĉefe la insularoj, kaj por ties provizado, estis tre vundebla, sendefenda, rilate al la atakoj kiujn la brita mararmeo povus efektivigi. Resume, ***Franco*** takte traktis Hitleron prokrastigante *sine die* la aferon, kaj fine pagis al la naziistoj nur per la sendo de unu divizio al la rusa fronto en 1941.
Ĝuste tiu kampanjo de Sovetunio signis, ekde la aŭtuno de la jaro 1942, la komencon de la defalo de la germana milita impeto. De tiam la hispana ŝtatestro sin metis pli kaj pli preta sekvi la “konsilojn” de la aliancaj potencoj: li ĉesis provizi mineralojn al la germanoj kaj retiris la «Bluan Divizion» el Leningrado. En septembro de 1942 ***Franco*** elpostenigis la Ministron pri Eksteraj Aferoj, ***Ramón Serrano Súñer***, bofrato lia, kiu estis falangisto kaj favora al la koalicio kun la faŝismaj potencoj, kaj anstataŭis lin per alia persono pli favora al Britio. Ĉi tiu estis la ekstera aspekto de la afero, ĉar en la realo, Hitlero tre malkonfidis je ***Serrano Súñer*** kaj krome ĉi tiu tre estis dezirante apartiĝi el tiuj politikaj intrigoj. Fakte, de tiam li ne plu restis inter la politikaj aktivistoj de la reĝimo, kvankam li estis nomumita kiel parlamentano. Notindas ke dum la frankismo, la parlamentanoj estis nomumitaj de la diktatoro, (signalitaj per la fingro de ***Franco***); tial estis en la lando ŝerco diranta ke la hispana politika sistemo estis iu “fingrokratio”. Post lia eksoficigo, ***Serrano Súñer*** amplekse verkis pri la jaroj de sia poli-

tika aktivado. Kompreneble, tiuj memoraĵoj ne estis publikigitaj ĝis post la morto de ***Franco***, ĉar dum la vivo kaj regado de la diktatoro ĉiu publikigota materialo estis cenzurata. Se kredi tion kion li rakontas per tiuj memoraĵoj, li jam de sufiĉe antaŭe dubis pri la venko de la faŝismaj potencoj.
Kaj jen ekde tiuj lastaj jaroj de la mondmilito Franko evidentigis ian grandan diferencon kun la aliaj faŝistaj lideroj kaj kun la teniĝo kiun li mem estis montrinte ĝis tiam. Temas pri lia politika fleksebleco. La klasikaj faŝist-lideroj, se doni tian tilolon al Mussolino kaj Hitlero, tute ne estis fleksеblaj. La invado de Etiopio far Mussolino, kaj okupacio de Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio far Hitlero estis defio al la internacia leĝaro trudita de la venkintoj de la Granda Milito. Poste venis la atako al Polujo kaj ceteraj ofensivoj de la Dua MondMilito. Tiuj operacioj, en la menso de Hitlero estis nerenversigeblaj elpaŝoj. Fakte, eĉ dum la defensiva etapo de liaj armeoj, post la malvenko en Stalingrado komence de 1943, li tute ne pensis pri diplomatiaj aranĝoj por meti finon al la milito kaj mildigi ĉi ties katastrofajn sekvojn. Kaj postulis saman neflekseblecon ne nur al lia sampartianoj sed al la tuta germana popolo. Same sintenis Mussolino; estis necese enkarcerigi lin por ke la itala ŝtato povu entrepreni interakordon kun la aliancaj potencoj. Tiorilate, ambaŭ faŝistaj lideroj plene alĝustiĝis al la 11-a punkto de la listo de faŝismaj karakteraĵoj prezentita de Umberto Eco, tiu de la mitologia heroeco, laŭ kiu estas prefere la morto al iu ajn cedo. Ne estis tia la agad-maniero de Franko. Ŝajnas ke kiam li estis juna oficiro en la milito en la Hispana Protektorato de Maroko, en la tiamaj bataloj kontraŭ la maŭroj, li kondutis temerare, laŭ la faŝisma principo “vivu danĝer-maniere”. Ja, en iu el tiuj bataloj li iam estis grave vundita. Dank’ al tiutipa agado li rapide progresis en la rango-skalo de la armeo. Sed kiel politika gvidanto li agadis pli prudente kaj faris ĉion eblan por dumlonge vivadi. Tiele li cedis al ĉiuj politikaj postuloj de la venkintoj en la mond-milito kaj tiamaniere lia reĝimo liberiĝis el tragika fino kiel tiu kiun havis la reĝimo de ***Pétain***, kvankam devis suferi kelkjaran internacian blokadon. Kaj ankaŭ poste, laŭlonge de lia longa regado en Hispanio ***Franco*** devis cedi pri aliaj aferoj kiuj tre gravis por li. Konkrete, kiam subaŭspicie de la UNO oni entreprenis la procezon de senkoloniigado, Hispanio devis rezigni pri la konservado de ĝiaj kolonioj en Afriko.
Tion dirite, oni devas ne forgesi ke tiu fleksebleco kaj rezigno de la frankisma diktaturo rilate al la internaciaj postuloj, tute ne havis korelativecon en la interna, enlanda, politiko. La faŝisma diktaturo de ***F. Franco*** estis faŝisma diktaturo ĝis la morto de la diktatoro kaj eĉ kelkaj monatoj poste. Dum preskaŭ kvar-dek jaroj la hispanoj estis regatoj, ne civitanoj. Dum tiuj jardekoj en Hispanio ne povis ekzisti politikaj partioj, escepte la oficiala de la reĝimo, pri kiu ni poste temos, nek sindikatoj, escepte la oficiala de la reĝimo, nek religia libereco, escepte por la oficiala religio de la reĝimo, nek plia presaro ol tiu oficiale permesata de la reĝimo, nek plia instruado krom tiu oficiale organizata de la reĝimo, nek civitanaj asocioj, krom tiuj eksplicite rajtigitaj de la reĝimo…

Kiel sciate, la faŝismaj reĝimoj metas finon al la parlamentismo kaj al la konstituciismo; ĉia politika agado baziĝas sur la volo de la lidero (13-a punkto de la listo de Umberto Eco). Tiele funkciis la afero en la Italio de Mussolino kaj en la Germanio de Hitlero. Ankaŭ en la frankisma Hispanio okazis tiele komence, ĝis la faŝista malvenko en la monda milito. Poste Franko devis akordigi la konservadon de sia absoluta povo kun la neceso entrepreni iajn politikajn reformojn kiuj ŝajnus demokratiigon de la sistemo. Rezulte de tiu strebado naskiĝis la «Foruo de la Hispanoj» kun pretendo de Konstitucio aŭ io simila, kaj la Korteso, leĝo-fara asembleo kun pretendoj de Parlamento. En la politika realo ĉio restis same; la hispanoj daŭre restis sen politikaj rajtoj, kaj la membroj de tiu parlamento aŭ korteso, fakte, estis elektitaj de la diktatoro, fingro-signale, ĉar kvankam la hispanoj (nur la famili-estroj) povis voĉdoni en la koncerna elektado, ili povis nur elekti inter tri kandidatoj nomumitaj de la aŭtoritato. Simil-maniere oni elektadis la urb-konsilantarojn. La afero funkciis ĉar la kapitalistaj landoj, tiam en Malvarma Milito kontraŭ la Sovetia bloko, bone kontentiĝis kun reĝimo tiom kontraŭkomunista kiom la hispana. Iom-post-iom la blokado ĉesis kaj la frankisma Hispanio ricevis ankaŭ la viziton de du usonaj prezidentoj: ***Dwight D. Eisenhower*** en 1959, kaj ***Richard Nixon*** en 1970. En Hispanio estis instalitaj militistaj usonaj bazoj en 1953.
Kiel dirite ĉiuj aŭtoritatuloj en Hispanio estis elektitaj kaj nomumitaj, pli malpli rekte, de la diktatoro: krom la ministroj, ankaŭ la parlamentanoj, urbestroj,



**Frankisma politika propagando surbaze de koluzio de la reĝimo kun la RomanKatolika Eklezio**

urb-konsilantanoj, juĝistoj, presardirektoroj, policaj kaj armeaj estroj, universitataj rektoroj, direktoroj de la ŝtataj entreprenoj… kaj ankaŭ la episkopoj. Laŭ la konkordato negocita de la RomKatolika Eklezio kun Hispanio, la papo rajtis elekti la episkopojn de la diocezoj, sed por ĉiu nomumo li devis elekti inter tri kandidatoj prezentitaj de la hispana ŝtato, t. e. de ***Franco***. La interakordo estis konvena kaj profita por ambaŭ partoj, la Vatikano kaj Romo. La frankista reĝimo malavare subtenis la Eklezion de ekonomia vidpunkto, kaj ĉi tiu kontribuis legitimi la faŝistan regantaron. En Hispanio estis permesata nur la religia kulto de tiu Eklezio. Post la vizito de ***Eisenhower***, kaj eble dank' al ĉi ties peto, oni koncesiis al la protestantoj kaj aliaj religiaj organizoj permeson por ia publika praktikado de ilia kulto. Inter la privilegioj kiujn Franko ĝuis en la Katolika Eklezio estis tiu esti akceptata en la templojn subpaliume. La presaraj fotoj pri tiu ceremoniaĵo estis parto de la propagando de la reĝimo ekzaltante la figuron de la lidero. Kiam la RomanKatolika Eklezio entreprenis iujn internajn reformojn rezulte de novaj ideoj elirintaj el la Dua Vatikana Koncilio ĝi pretendis meti finon al tiu faraona kulto de la subpaliuma marŝado, oni proponis al la hispana ŝtatestro rezigni pri tiu privilegio, sed ***Franco*** rifuzis fari tion pretekstante ke ĉar temis pri antikva privilegio koncesiita al la hispanaj monarkoj, estu iu reĝo kaj ne li tiu kiu rezignu ĝin. Sed dume, kvankam ne reĝo, li daŭre ricevadis tiun omaĝon. Pli elreviĝe estis por la diktatoro la fakto ke ekde tiu postkoncilia epoko la Katolika Eklezio ne plu estis la senkondiĉa apogo de lia reĝimo: diversaj sektoroj kaj gravaj figuroj de tiu eklezio komencis postuli demokratiigon de la lando; li kritikis tiun teniĝon kiel perfido kaj nedankemo.
Evidentas ke pri tiu afero de la religio la faŝista diktatoro de Hispanio tre malsimilis al Hitlero kaj Mussolino; ĉi tiuj ne havis, rilate al la eklezioj, pli da ĝentilaĵoj ol tiuj diktitaj de politika pragmatismo. Sed en Hispanio la katolikismo havis de antikve gravan ideologian influon sur la menso de la personoj, kaj Franko apartenis al tiu hispana homamaso por kiu la vorto de la Eklezio estas vorto de Dio. Tial tre gravis por li, kaj por la monarkoj reĝintaj en ĉi tiu lando, la apogon de la Eklezio. Do, la ŝanĝoj alportitaj de la Koncilio rompis la mensajn skemojn de tiuj personoj ĉar, se la Eklezia vorto estas Dia vorto, kiel povus okazi tiajn ŝanĝojn postulitaj de la Koncilio? La tradicia eklezia doktrino benis la krucmilitojn



**Eisenhower kaj Nixon: usonaj prezidentoj kiuj vizitis la frankistan Hispanion**

kaj la Inkvizicion, kaj en tiu linio la hispanaj faŝistoj asignis la titolon de "krucmilito" al la batalado kontraŭ la ruĝularo de la Respubliko, kaj la altrudo de la oficiala religio dum la frankismo tute kongruis kun la maltoleremo de la iama Inkvizicio, kaj jen subite tiu Eklezio tuj abomenis la krucmilitojn kaj la Inkvizicion. Do la reĝimo de ***Franco*** perceptis ke komencis manki al ĝi iu el la esencaj kolonoj sur kiuj ĝi sin apogis, kaj tio kontribuis al la apero de ia sento de eventualeco de tiu reĝimo, sen perspektivoj pludaŭri post la forpaso de la *caudillo*.
Estis alia afero pri kiu la diferenco inter la frankismo kaj la klasikaj faŝismoj estis pli granda. Ni memoru ke iu grava slogano de Mussolino estis "vivu danĝermaniere" kaj ke la doktrino de Hitlero estis tiu de la "konstanta militado". La 9-a punkto de la listo de Umberto Eco rilatas al tio. Nu, en la reĝimo de Franko, ĉefe post la fino de la mond-milito, tio radikale ŝanĝiĝis. En la jaro 1964 la reĝimo organizis gravan propagand-kampanjon sub la devizo aŭ slogano *«25 años de paz»* (25-jaran pacon). Multenombro da afiŝoj, oficialaj publikaj aktoj, ĵurnalaro, kin-informiloj… priemfazis tiun fakton ke en Hispanio estis paco de antaŭ 25 jaroj, kaj tio, kompreneble, dank' al la regado de ***F. Franco***. Ĉar la hispana popolo estis multe suferinta pro la civil-milito, per tiu propagando oni pretendis inspiri la ideon ke por la konservado de la paco estis nepre necese konservi tiun "providencan" reĝimon. Tiu propagando estis kvazaŭ komplemento de tio kion oni povus konsideri la "socian" politikon de la reĝimo. Ekzemple, en Hispanio ekzistas centoj, eble miloj, da tiuj suburbaj kvartaloj nomataj "*barriada*" en la hispana lingvo; temas pri malmutekostaj kaj malalt-kvalitaj loĝejoj por malriĉaj familioj. La inaŭguro de ĉiu el tiuj kvartaletoj estis oficiala akto en kiu partoprenis, nome de la ŝtatestro, la provincestro aŭ alia loka aŭtoritatulo de la reĝimo emfazante la socian politikon de la «Nacia Movado», oficiala nomo de la reĝimo. Multaj, aŭ preskaŭ ĉiuj tiuj kvartaloj havis, kaj daŭre havas, la nomon: "***Barriada Francisco Franco***". En pli gravaj inaŭguroj, kiel tiuj de la elektro-centraloj, fabrikoj, ŝip-konstruejoj, dig-lagoj… partoprenis la *caudillo* mem, kaj en ili ĉeestis ĉiam homamaso por aplaŭdi kaj aklami la lideron, kiu diskursadis en tiuj okazoj imitante Mussolinon. Sed lia mitinga stilo tute ne havis la magion kiel tiu de la *duce*: lia voĉo estis akuteca, afekta… La hispanoj, eĉ simpatiantoj de la reĝimo, ofte primokis kaj ŝercis imitante liajn gestojn kaj paroladon.
Nun venas la momento analizi la naturon de la frankisma reĝimo. Franko ne estis partia lidero kiel Mussolino kaj Hitlero. Ni jam priraportis ke la hispana faŝista partio ***Falange*** estis kreita kaj liderita de homo sufiĉe karisma, ***José Antonio Primo de Rivera***, kiu estis juĝita kaj mortpafita dum la civil-milito. En normalaj cirkonstancoj, t. e. sen milito, ***Franco*** neniam estus politikisto kaj reganto; li estis nura "***espadón***" (soldataĉo, hispana vorto kiun sufiĉe malestime kaj disdegne oni aplikis al la armeestroj pretaj puĉi). La fakto ke la puĉo kontraŭ la Respubliko fiaskis kaj iĝis civilmilito igis lin mastro de la situacio. Do, li heredis la ***Falange***-on kaj aliajn fortojn de la hispana dekstraro: monarkiistojn, konservemajn katolikojn, burĝklasulojn… kaj perdekrete unuigis ĉiujn en unusola partio kiun li nomis «Nacia

Movado». Tiu artefarita partio neniam funkciis kiel partio, eĉ ne faŝism-tipa, ties komponaĵoj neniam sin sentis organike unuigitaj unuj al la aliaj, kaj ne mankis inter ili kontraŭfrontiĝoj, foje eĉ perfortaj, dum la civil-milito kaj poste. Al ***Franco*** konvenis tiu konkurenco ĉar tiamaniere li estis la la sola komuna referenco de ĉiuj ili kaj tiele lia absoluta povo estis sendanĝere. Temante pri tiuj tendencoj, kaj aliaj kiuj aldoniĝis poste, kiel la religia ordeno ***Opus Dei***, oni ĝenerale aplikis al ili la terminon "la familioj de la reĝimo". Inter la membraro de tiuj familioj de la reĝimo estis elektitaj, far la diktatoro aŭ persono pri kiu konfidis, la ministroj, parlamentanoj, guberniestroj, urbestroj kaj ceteraj aŭtoritatuloj de la ŝtato.

Vidinte la diferencojn inter la frankisma reĝimo kaj la klasikaj modeloj de la faŝismo, ĉu oni povas konkludi ke ĝi, la hispana modelo, estis vera faŝismo? La respondo estas jesa tial ke ĝi plene alĝustiĝis la ĉefa, aŭ sola, celo de ĉiu faŝismo. Ni temas pri la 6-a punkto de la listo de Umberto Eco: la defendo de la klasaj interesoj de la burĝaro ĝenerale kaj de la plejaltaj povoj de la kapitalista ekonomio. La ceteraj punktoj de la listoj estas nur karakteraĵoj de la faŝismoj, kiuj povas manki unu aŭ pluraj en iuj konkretaj formoj de faŝismo, sed la defendo de la kapitalista sistemo estas la celo de la faŝismo, kaj la metodo por tion atingi estas mobilizi la etburĝaron (esence ligitan al la koncepto de privata propraĵo) kaj demeti el la klasbatalo la malaltklasulojn (intereso-cele alvokitaj al la egaleco). Estas por atingi tiujn celojn ke oni uzas, la rasismon, la naciismon, la altiron al pitoreskaj tradicioj, kiel tiuj de la gralo aŭ la elitismoj bazitaj sur la koncepto de elektita popolo aŭ plejsupera raso…

Resume, ke la frankismo plene sintenis en la ĉefa kialo de la faŝismo, kaj la potencoj venkintaj en la mond-milito konsentis tion, kiel estis konsentinte antaŭe la reĝimon de Mussolino, ĉar dum la plenumado de tiu tasko en siaj respektivaj landoj ili ĝenis neniom la imperiismon kiu estas monopolo de tiuj potencoj. Nur kiam la faŝistaj reĝimoj de Germanio kaj Italio havis imperiisman alvokiĝon, ili vekis la malamikecon de la imperiismaj konkurantoj. Franko, rezigninte pri imperiismaj aventuroj, povis trankvile regadi dum kelkaj jardekoj kaj milde morti enlite. Tiusence ankaŭ la portugala reĝimo de ***Salazar*** estis plene faŝista. Sed ĝi sufiĉe diferenciĝis el la itala kaj germana faŝismoj kaj ankaŭ el la hispana frankismo. Por la enkonduko de la faŝismo en Portugalio, male ol en Hispanio, ne estis necesa iu civil-milito; la proceso plenumiĝis, simile al Italio, pro la iom-postioma krizo de la liberala sistemo. Unue krizis la konstitucia monarkio. En 1910 la Respubliko metis finon al la reĝado de ***Manuel*** la 2-a kiu estis reĝinta du jarojn post la murdo de liaj patro kaj fratoj. La 16-jara daŭro de tiu Respubliko ne estis paca kaj harmonia; fine, en 1926 la ekonomia krizo akre frapis la landon. En tiu jaro okazis militista puĉo el kiu estiĝis la t. n. «Nacia Diktaturo». Tiu reĝimo oferis al ***Antonio de Oliveira Salazar*** la ministrejon pri ekonomio. Tiam li jam estis prestiĝa profesoro de la Universitato de Koimbro, advokato kaj ekonomiisto. Li akceptis la postenon subkondiĉe ĝui liberecon por apliki laŭ sia kriterio sian ministran rolon, sed tial ke tiu premiso ne estis respektata, post dek-tri tagoj li demisiis

kaj revenis al sia katedro en Koimbro. En 1928, post la fiasko de la ĝis tiam aplikita ekonomia politiko, oni denove alvokis lin fare de nova prezidento de la Respubliko, ***António Óscar de Fragoso Carmona***. ***Oliveira Salazar*** tuj postulis kontroli la elspezojn kaj enspezojn de ĉiuj ministrejoj. Akceptita la postulo, li trudis egan severan kaj rigoran kontrolon de la kontoj, atingante pluson en publikaj kontoj post la financa jaro 1928-29, kaj strebante konservi ekvilibran buĝeton, eĉ per severa reduktado de la ŝtataj elspezoj. La fakto ke, post multaj jaroj da malfacilaĵoj, la portugala ekonomio ne suferis de buĝeta deficito depost 1928 estis konsiderita heroaĵo kaj gajnis al ***Salazar*** grandan prestiĝon inter la politikaj medioj de la respublikana dekstraro, la monarkiistoj kaj la katolikoj. Poste, ***Salazar*** denove minacadis pri sia demisio, se la portugala dekstraro sugestus limigi liajn povojn. Tiam la portugala ekonomio estis postlasinta la deficiton kaj la pezajn pruntojn kontraktitajn eksterlande, kaj la armeestroj kaj la financa elito subtenis lin, timante denove suferi la antaŭan financan ĥaoson. Eĉ la prezidento de la Respubliko, generalo ***Carmona***, konsultadis ***Salazar***-on antaŭ ĉiu ministra restrukturado. Dum la demokratia opozicio malaperadis en sinsekvaj internaj luktoj sen sukceso, li entreprenis politikan operacion: rifuzante la revenon al parlamentismo de la Respubliko, li kreis la t. n. «Nacian Union», fakte unika partio cele kunigi ĉiujn, kiuj volus servi la landon. En 1932, post la demisio de kelkaj ĉefministroj kaj kun elstara figuro en la registaro, ***Salazar*** alprenis la funkcion de ĉefministro de Portugalio. Tiujare li entreprenis la ellaboradon de nova Konstitucio, kiu estis poste submetita al referendumo kaj aprobita en 1933. Naskiĝis tiele la nomita ***Estado Novo*** (Nova Ŝtato) kaj ankaŭ Salazarismo. Sen la perforto de Mussolino, Hitlero kaj Franko, ***Salazar*** atingis similan politikan sukceson en Portugalio.

Sen la perforto kaj ankaŭ sen la vedetismo de tiuj pajacoj. En la reĝimo de ***Salazar*** ne ekzistis la homamasaj mitingoj kaj spektaklecaj politikaj aktoj de la aliaj faŝismoj. Li mem plejofte kontentiĝis kun lia posteno de ĉefministro kaj la protokolaj aktoj estis rezervitaj al la Prezidento de la Respubliko, La Respubliko daŭre formale persistis kvankam la reĝimo fakte estis diktaturo. Sed la portugala faŝismo ne havis faŝistan partion, eĉ ne artefaritan kiel tiu de Hispanio. ***Salazar*** elektis siajn ministrojn kaj ceterajn aŭtoritatulojn inter la du politikaj tendencoj: respublikanoj kaj monakiistoj, kaj li klopodis sin teni ekvilibre inter ambaŭ. Li sendifine prokrastigis la aferon referendumi por elekti inter ambaŭ ŝtat-formoj, sed post la morto de la eksigita reĝo ***Manuel*** la 2-a, en 1932, li sin montris tute kontraŭa al la restarigo de la monarkio, sed dume lia Respubliko estis Respubliko nur laŭnome, fakte temis pri diktaturo simila al tiu de ***Franco*** en Hispanio. Sed, kvankam li estis fervora katoliko, kaj politike li sin apogis sur la prestiĝo de la Eklezio, kun kiu negocis konkordaton, tamen li neniam konsentis redoni al tiu institucio la posedaĵojn kiuj estis ekspropriigitaj far la Respubliko; pri ĉi tiu afero li tute ne similis al la hispana diktatoro.

***Salazar*** defendis la stabilecon de la nacia vivo kaj timis ke la turbula situacio en Hispanio povus perturbi Portugalion. Li intensigis la cenzuron kaj la agadon de la

politika polico. Portugalio provizis al la hispanaj faŝistoj gravan loĝistikan subtenon, permesante la komunikadon inter la ribelemaj armeoj de la nordo kaj la sudo, kiam ili ankoraŭ ne povis establi kontakton per tero tra la hispana teritorio, kaj permesante senpagan transiton al militaj provizoj destinitaj al la frankistaj trupoj, for-rifuzante respublikanajn rifuĝintojn, kaj provizante modestan kvanton da batalantoj (la Viriatoj) kaj armilojn por la ribeluloj. Post la venko de ***Franco***, ***Salazar*** zorgis konservi bonajn diplomatiajn rilatojn kun Hispanio, kvankam dum la dua mondmilito li timis dum kelkaj monatoj, eble prave, ke ***Franco***, kun la subteno de la Nazia Germanio, provos invadi Portugalion kaj aneksi ĝin al Hispanio. Ekde 1945, la hispan-portugalaj rilatoj restis sur bona nivelo, kvankam markitaj de reciproka persona malfido inter la gvidantoj de ambaŭ landoj. Reale, ***Franco*** kaj ***Salazar*** ne simpatiis unu la alian. La hispano konsideris la portugalon ruza kaj neklara; ***Salazar*** malestimis ***Franco***-n, kiun li taksis kiel malklera ***espadón***.
Kvankam klare kontraŭkomunista, ***Salazar***, tamen, eksplicite kondamnis la naziistan rasismon, kiun li difinis kiel "*pagana kaj kontraŭhoma idealo por diigi iun rason aŭ imperion*". Dum 2-a Mondmilito la celo de la ***Salazar***-registaro estis konservi neŭtralecon kaj la aliancon kun Britio. Memorindas ke la portugala ŝtato, reale, estas kliento de Britio laŭsence ke ĝia sendependeco el Hispanio ĉiam dependis de la angla apogo. Do, la reĝimo de ***Salazar*** estis la sola, inter la eŭropaj faŝismoj, kiu ne deziris la venkon de Hitlero. Ĉi tio inspiris la portugalan politikon laŭ kiu la ***Salazar***-registaro entreprenis intensan diplomatian agadon rilate al ***Franco*** provante malhelpi Hispanion alianciĝi kun Germanio kaj Italio, en la antaŭvidebla kazo, ke alianco de la potencoj de la Akso kun Hispanio kontemplus la okupadon de Portugalio kiel rimedo por kontroli la Atlantikon kaj fermi la Mediteraneon, kio deturnus la pezocentron de la milito al la Ibera Duoninsulo. La Ibera Interkonsento (1942) estas pakto kun Hispanio, cele de ke ambaŭ landoj sukcesu resti for de la milito. Dume Portugalio permesis al la aviado de la Aliancanoj uzi la Acores-insularon. Ĉi tio kaj la fakto ke lia reĝimo ne havis dum la milito politikistojn malkaŝe nazi-favorajn, male ol la Hispana kazo de la ***Falange***, ebligis ke kiam estiĝis la Malvarma Milito, Portugalio estis akceptata aliĝi al la NATO spit' al tio ke tiu lando estis la sola membro de tiu alianco kiu neniam rompis rilatojn kun la Nazia Germanio.
Rilate al la imperiismo, la portugala kazo estas iome kurioza. Male ol ***Franco***, la portugala lidero neniam sentis inklinon profiti la militajn venkojn de Germanio por atingi teritorion koste de alies koloniaj imperioj. Sed Portugalio havis proprajn koloniojn en Afriko kaj Azio, kaj la politiko de ***Salazar*** estis konservi ilin ĉiurimede. Tiorilate, li akceptis kolonian militon kiam la sendependecaj movadoj de Gvineo, Angolo kaj Mozambiko provis disiĝi el Portugalio. Ĉi tiu politiko estis rifuzita de plej multaj landoj de la mondo, precipe en kunteksto de kolonia sendependeco, kiam aliaj eŭropaj nacioj kiel Britio aŭ Francio, kaj eĉ aliaj diktaturoj ideologie proksimaj al Portugalio kiel la frankisma Hispano, jam akceptis la praktikan maleblecon subteni malproksimajn koloniajn imperiojn. Krome ***Salazar***

montris malmultan intereson pri la koloniigita loĝantaro. Inter 1941 kaj 1948, longdaŭra malsato en Kabo-Verdo kaŭzis la morton de 50.000 homoj, triono de la loĝantaro, antaŭ totala indiferenteco de la portugala registaro: neniu humanitara helpo iam estis sendita. Post la dua mondmilito, la kolonioj ankoraŭ estis tre malmulte evoluintaj. En ***San-Tomé*** kaj ***Príncipe*** ankoraŭ neniuj mezlernejoj estis malfermitaj, dum en Mozambiko kaj Angolo la solaj institucioj malfermitaj en aneksoj al la Universitato de Koimbro estis destinitaj al infanoj de setlantoj. Sed, sinjoro ***Salazar***… ĉu tio ne estas rasismo?
Kaj en la metropolo pliintensiĝis la faŝismaj trajtoj de la reĝimo. ***Salazar*** poziciiĝis kontraŭ la libera sindikatismo por sufoki la postulojn de la laborista movado, kaj sekve kontestis parto el la loĝantaro. La sekurecaj taĉmentoj severe subpremis la publikajn protestojn, kaj la Respublikana Nacia Gvardio kaŭzis multajn vundojn kaj mortojn. Iu el tiuj viktimoj estus la juna ***Catarina Eufémia***, kiu iĝis simbolo de la kontraŭsalazarisma rezisto. Dume, la komunistaj kaj socialistaj movadoj, kvankam eksterleĝaj, daŭre kontraŭrezistis la reĝimon. La egaj elspezoj de la kolonia milito en la 1960-aj jaroj vekis eĉ la oponon de parto el la dekstraro. Post iu hejma akcidento en 1968, estante 79-jara, ***Salazar*** ĉesis okupiĝi pri la ŝtataj aferoj. Lia sukcedinto, ***Marcelo Caetano***, intencis reformi la politikan sistemon, ĝis la 25-an de aprilo de 1974 kiam li estis eksigita far la armeo en la t. n. «Revolucio de la diantoj».
Se la portugala kazo estis kurioza kazo de faŝisma reĝimo kiu sukcesis dumlonge daŭri sen faŝisma partio, nun ni vidos inversan kazon, same kuriozan, de faŝismo kiu havis fortan partion kaj tamen fiaskis. Ni temas pri la peronismo. La argentinano ***Juan Domingo Perón*** estis militisto kiu kaptis la politikan povon en sia lando en la jaro 1945, sed lia atingo de la plej alta politika


*Antonio de Oliveira Salazar*


***Salazar* kaj *Franco***


*Juan Domingo Perón*


***Eva Perón* en Madrido. En hom-amasa mitingo kun Franco.**

hierarkio ne okazis per armea puĉo, kiel tiuj ofte okazintaj en Argentino antaŭ kaj post lia regado, sed tute male, li gajnis demokratiajn balotadojn. Hispanio havas agrablan memoron pri la regad-etapo de ***Perón*** ĉar li provizis al tiu lando la necesan tritikon por la nutrado de milionoj da hispanoj dum la internacia blokado kiun la potencoj venkintaj en la mond-milito dekretis kontraŭ la reĝimo de ***Franco***. En la jaro 1947, okaze de ŝia vizito al Eŭropo, ***Eva Duarte de Perón***, edzino de ***Juan Domingo***, estis dum 18 tagoj en Hispanio. Ĉi tie ŝi ricevis amasan kaj apoteozan akcepton far la frankisma reĝimo kaj ĝenerale la tuta hispana popolo pro la humana teniĝo rilate al popolo kiu estis maljuste punita pro politiko pri kiu ĝi estis senkulpa. Informoj pri tiu vizito de ***Eva Perón*** rakontas ĉi-ties malkonsenton aŭ kontraston kun la edzino de ***Franco***, ***Carmen Polo***. Ĉi lasta estis riĉulino, aristokratino, mense reakcia… kaj tute ne intervenis en la politikajn aferojn, kiuj estis ekskluziva okupo de ŝia oficiale karisma edzo. Male, ***Eva Perón***, havis tre modestan socian devenon kaj ĉiam estis tre sentema rilate al la situacio de la malriĉuloj kaj la rajtoj de la virinoj. Dum la regado de ŝia edzo, ***Evita*** (kiel karese nomis ŝin la argentinaj malricaj amasoj) tre influis por la aplikado de sociaj dispozicioj favore al la malriĉularo kaj por la voĉdonrajto de la virinoj.

Do, se la peronismo respektis la demokratian funkciadon kaj krome ampleksigis la voĉdon-rajton al la virinoj, kaj havis progresistan socian politikon, kial difini ĝin kiel "faŝisma"? Nu, ĉi tiu estas iu klara ekzemplo de tio ke la realo estas pli kompleksa ol ĉiu ajn teoria skemo kiu celas ĝian interpretadon. Eble estus pli ĝuste diri ke la peronismo naskiĝis kun faŝisma alvokiĝo kaj ne-vole fiaskis en ties konkretiĝo. Ni klarigu ĉi tion. Argentino tradicie havis ekonomion bazitan sur agrikulturo kaj best-bredado. Dum la dua mond-milito tiu lando tre prosperis provizante agrikulturajn produktaĵojn al la militantaj landoj. Sed post la fino de la milito Usono rehavis sian privilegian pozicion en tiu merkato. Do, oni entreprenis en Argentino gravan procezon de industriigado. Kiel kutime okazas en tiaj procezoj, grandamaso da kamparanoj translokiĝis al la urboj kaj industriaj centroj, t. e. naskiĝis iu laborista movado kiu siavice generis formojn de sindikatismo. ***Perón*** estis ambicia homo kiu emis politikan povon; ĉi tio per si mem klarigas nenion, multegaj specimenoj de homaj estuloj de ĉi tiu planedo havas tian emon. Sen ili, kaj la stultaĵoj kiujn ili faras, la historio estus seninteresa afero, aŭ tute ne estus historio. Nu, nia ***Perón*** dediĉiĝis strebi por la plenumado de sia ambicio. Sed kvankam militisto, li ne dediĉiĝis intrigi en la armea medio por perlabori puĉon liafavore (eble estis tie tro da konkurantoj por la sama celo), sed, notinte la kreskantan influon de la sindikatisma movado, li dediĉiĝis aktivadi en tiu laborista fronto. Eble inspiris lin la modelo de Mussolino, serĉi kaj prilabori apogon en la medioj de la malaltaj soci-klasoj. Tiu kvazaŭ katekismo eksplikante la principojn de lia politika doktrino, kiun li eldonis poste, havis komunajn trajtojn kun tiuj de la faŝismaj modeloj, ĉefe en kio rilatas al la ideo de unueco de ĉiuj civitanoj de la lando. Ni jam vidis ke tiu ideo celas kaŝi kaj ignori la koncep-

ton de “klasbatalo”. Kaj estis alia simileco kun la kazo de Mussolino: En la disvolviĝo de la politika agitado de ***Perón*** estiĝis iu danĝera kaj drameca situacio en kiu li petis publikan apogon liafavore kaj tio generis amasan mobilizadon kiu povas esti komparata kun la Marŝo al Romo de Mussolino, kaj kiel ĉi tiu, ankaŭ la mobilizado de ***Perón*** sukcesis kaj li atingis la absolutan povon de la ŝtato. Absoluta sed tamen demokratia ĉar, kiel dirite, li respetis la Konstitucion kaj eĉ plidemokratiigis ĝin. Kaj krome li gvidis de tiam procezon de plibonigo de la situacio de la malaltklasuloj, la tie nomataj “senĉemizuloj”. Oni establis servojn de saneca sekureco kaj de instruado, konstruado de loĝejoj por la laboristaro, kaj la salajroj sufiĉe plialtiĝis. Ĉi tiu politiko celis senaktivigi la socialistan kaj komunistan movadon en la argentina laboristaro. Kaj kvankam la regado de ***Perón*** estis sufiĉe respektema de la civitanaj rajtoj, ne mankis perforto kontraŭ la aktivistoj de la partioj de maldekstraro. La murdo de la komunista kuracisto ***Juan Ingallinella*** estis afero tute simila al tiu ***Matteotti*** dum la reĝimo de Mussolino. Sed tamen la reĝimo de ***Perón*** ne atingis la apogon de la superregantaj klasoj de la ŝtato, la terposedanta aristokrataro, la burĝaro, la armeo, la Eklezio… Dum la regado de Perón estis eĉ perfortaj atencoj kontraŭ la vivo de ***Perón*** kaj aliaj kiel tiu de la 15-a de aprilo de 1953, kaj tiu de la 16-a de junio de 1955 en la Placo de Majo en kiu mortis 350 personoj kaj rezultis vunditaj kromaj 850.
Kio estis okazante? Kial tiu kontraŭdiro? Ni povas kompreni tion ĉar ni jam vidis la konflikton kiu estiĝis en Germanio en 1934 kiam iu interna konflikto de la nazia partio estis solvita per la t. n. «Nokto de la Longaj Tranĉiloj». Ni vidis ke Hitlero atingis la apogon de la superregantaj klasoj kiam li likvidis la socialistan tendencon de lia partio gvidata de ***Ernst Röhm***. Se en tiu konflikto estus venkinta ĉi lasta, la naziismo ne estus atinginte la apogon de la altaj povoj de la ŝtato. Nu, ĝuste tio okazis en Argentino. En la peronismo la rolo de ***Röhm*** estis ludita de ***Evita Perón***, kaj ĉi tiu tre influis la socialan politikon de ŝia edzo. La peronista partio havis egan membraron da “senĉemizuloj” kaj ne estis burĝuloj en ties vicoj; tio signifas ke al la peronismo mankis la gravega 6-a punkto de la listo de Umberto Eco, tiu de la “minacita burĝaro”. Verdire la argentina burĝaro sin sentis minacita sed de la peronismo, ne de la marksismo. La 8-a punkto de la menciita listo de Umberto Eco diras ke ĉiu faŝismo kreas iun malamikon kontraŭ kiu oni metas plejparton el la socia loĝantaro. Nu, por la senĉemizuloj de Argentino la malamiko estis nek la judoj, nek la italoj, nek la hispanoj, nek la indianoj, nek iu ajn alia etno. Por ili la malamiko estis la riĉularo, la terposedantoj, la burĝaro… Do al tiuj posedantaj klasoj la peronismo solvis nenion sufokante la maldekstraron ĉar ĝi mem ludis la rolon de la maldekstraro. Resume, iu militista puĉo metis finon al la reĝimo de ***Perón*** en 1955 kaj ĉi tiu ekziliĝis en Hispanio, kie oni estis tre dankeme al li. Plurajn jarojn antaŭe estis forpasinta lia edzino ***Eva***.
La dua etapo de la peronismo estis eĉ pli malfeliĉa, kaj senhonora. Post 17 jaroj ***Perón*** povis reveni en Argentinon, kaj krome li revenis kiel venkinto. Dum tiu periodo tute ne estis paco kaj ordo en la lando; estis multaj registar-ŝanĝoj, plej-



*María Estela Martínez de Perón*



*Jorge Rafael Videla*



*Augusto Pinochet*



*Jair Bolsnaro*

ofte per militistaj puĉoj. Fine oni permesis la peronistan partion partopreni en la balot-procezoj, kaj ĝi atingis egan sukceson. Tio permesis al la lidero reveni el Hispanio, kaj li estis triumfe akceptita en Argentino. Eĉ antikvaj politikaj malamikoj liaj brakumis lin je lia reveno. La landa povo-sistemo estis kompreninte ke li estis nepre necesa por meti ordon en la argentinan vespejon. Li revenis kun nova edzino ***María Estela Martínez***. Ĉi tiu, post kroma balot-procezo en kiu venkis la peronismo, alprenis la estrecon de la registaro, dum ***Perón*** ludis kiel Prezidento de la Respubliko. En ĉi tiu posteno li sin vidis kiel sorĉo-lernanto; li ne-vole estis kreinta situacion kiun li ne povis kontroli. Kelkaj diversaj, tre malsamaj, kaj eĉ malamikaj organizaĵoj havis lin kiel referaĵo. Ekzemple estis iu terorisma organizaĵo de ekstrema dekstraro, la "Triobla A", kiu sin difinis kiel peronista, kaj samtempe estis alia organizaĵo, la "Montoneroj", ankaŭ terorista, de ekstrema maldekstraro, kiu sin difinis, ankaŭ ĝi, kiel peronista. Kaj meze de ambaŭ tiuj politikaj ekstremoj estis aliaj diversaj sindikataj rondoj kaj parti(et)oj kiuj sin difinis kiel peronistaj. Kaj li havis kompromison kun la supreregantaj klasoj kiuj permesis lian revenon kaj altrangiĝon, kion li devus pagi per politiko favora al la interesoj de tiuj klasoj. Li prenis tion kio estis la plej saĝa decido en tiaj cirkonstancoj… li forpasis. ***María Estela*** alprenis ankaŭ la prezidantecon de la respubliko kaj profitis la tutan atingitan povon por fali en ĉiutipan koruptadon, ĝis kiam nova militista puĉo metis finon al la festo. De tiam la diversaj peronismoj estas kromaj putraj partioj en la putra kapitalista sistemo de la lando, kaj la lando refalis en sian kronikan malsanon de oftaj puĉoj.

Unu el la armeaj puĉistoj estis ***Jorge Rafael Videla***. Dum lia regado, de 1976 al 1981, li uzis la ŝtatan povon por starigi sisteman politikon de ŝtata terorismo kontraŭ opoziciantoj, kiu kaŭzis dekojn da miloj da arestitoj, malaperojn, murdojn, torturojn kaj sekvestron de infanoj. Peronismaj ekstremistoj estis unu el la ĉefaj celoj de ŝtata terorismo, dum multaj el la gvidantoj estis malliberigitaj kaj la sin-

dikatoj, plejparte peronistoj, intervenitaj. Menciindas ke same dume dum la regado de ***María Estela*** kiel dum la diktaturo ***Videla***, la komunistoj kaj aliaj fortoj de Maldekstraro estis perforte persekutitaj far la «Triobla A» kaj aliaj ŝtataj soldulaj ekzekutistoj defendantoj de la sistemo. La diktaturo de ***Videla*** falis kaj li estis juĝita kaj enkarcerigita, sed la politika malstabileco daŭre estis ĝis nun kronika malsano en Argentino.

Sed nia intereso estas prijuĝi la faŝismon. Ni agnoskas faŝistan karakteron al la peronismo, sed, ĉu ***Videla*** estis faŝisto? Laŭ nia interpretado de la faŝismo, ni devas diri ke ne, samkiel ankaŭ ne aliaj iberoamerikaj diktatoroj kiel ***Fulgencio Batista***, ***Anastasio Somoza***, ***Augusto Pinochet***, ***Hugo Banzer***, ***Gustavo Rojas Pinilla***, ***Joao Baptista Figueiredo***, ***François Duvalier***, ***Guillermo Rodríguez Lara***, ***Tiburcio Carías Andino***, ***Juan María Bordaberry***, ***Marcos Pérez Jiménez***, ***Alfredo Stroessner***, ***Carlos Castillo Armas***, ***Rafael Leónidas Trujillo***, ***Alberto Fujimori***… aŭ ***Idi Amin Dada*** (se mencii ankaŭ iun afrikanon). El tiu ĉi listo ni eksplicite ekskludas la brazilan ***Jair-Bolsonaron*** pro kialo kiun ni eksplikos poste. La ceteraj ne meritas la titolon je "faŝisto"; asigni tiun titolon al ili estus tro honorigi ilin. Ili estis nuraj tiranaĉoj, diktatoroj, krimuloj, ekstrem-dekstruloj sendube, subpremantoj certe, ankaŭ defendantoj de la kapitalista sistemo, puĉistoj preskaŭ ĉiuj… Sed mankis al ili, por esti faŝistoj, iu grava eco kiun ni volas rimarkigi. Ili ne havis la karismon kaj la magion de Mussolino kaj Hitlero, sed tio ne gravas, ankaŭ ***Franco*** kaj ***Salazar*** ne havis tiun econ kaj tamen ili estis veraj faŝistoj. Ili ankaŭ ne estis ideologiaj teoriuloj, nek kreis propran apartan partion, sed ankaŭ tio ne gravas, oni povas esti faŝista lidero sen tiaj eventualaĵoj.

La distinga eco de la faŝistoj, rilate al aliaj ekstrem-dekstruloj, estas ilia psikologia kapablo kapti (percepti, kompreni) la esencon de la kolektiva animo de la homamasoj, ĉi ties misajn inklinojn, kaj eltiri profiton el tiu kono por sin prezenti kiel referaĵo



Fulgencio Batista



Anastasio Somoza



Alberto Fujimori

aŭ enkarnigo de la popola animo. La profitanto de tiu kono povas esti persona lidero aŭ organizita movado. Ĉiukaze, oni povas diri ke la lidero (persona aŭ movada) ne kreas la amason kiu apogas ilin, sed inverse, la organizita movado aŭ personaj lideroj aperas tial ke ekzistas la amasoj (kun ties malvirtoj) sur kiuj ili sin apogas. Ĉi tiu kondiĉo estas necesa sed ne sufiĉa por la estiĝo de faŝismo. Estas necese, krome, ke la celo de la organizita movado (kun aŭ sen klara persona lidereco) estu deturni la atenton de la subpremitaj sociaj klasoj el la klasbatalo. Tiorilate, movadoj kiel la islama integrismo kaj la cionismo ne estas faŝistaj ĉar, kvankam ili plene alĝustiĝas al la unua kondiĉo (ili estas generataj de fiaj popolaj emoj: elitismo, fanatikeco, neracieco…) tamen ne celas efiki sur la klasbatalo, t. e. tiuj movadoj, eĉ kaze de politika venko, efikas nenion sur la reale ekzistanta situacio en la ekonomia tereno de iliaj socioj. La naciistaj movadoj (eĉ se ĉiam kaj ĉiuj estas reakciaj) povas esti aŭ ne faŝistaj depende ĉu ili estas uzataj aŭ ne por efiki sur la disvolviĝo de la klasbatalo. La afero ankaŭ ne dependas ĉu la movado estas perforta aŭ respektas la leĝecon; eĉ la plej perfortaj faŝismoj, kiel tiuj de Mussolino kaj Hitlero, respektis la leĝecon kaj bridis sian perfortemon kiam ili ne estis sufiĉe fortaj aŭ politike konvenis al ili fari tion. Cetere ankaŭ iuj el tiuj menciitaj iberoamerikaj diktatoroj respektis la leĝecon komence, kaj nur poste ili agadis perforte kaj diktatorece, kaj ĉi tia teniĝo estas propra ankaŭ de revoluciaj procezoj de Maldekstraro.
Se ni diris ke ne estis faŝistoj la menciitaj iberoamerikaj diktatoroj; estis pro tio ke ilia ebleco defendi la kapitalistan sistemon dependis nur de ilia (per)forto. Ili ne havis kapablon mobilizi la popolajn amasojn kontraŭ ĉi ties propraj interesoj. Male, estis maldekstraj lideroj kaj/aŭ movadoj tiuj kiuj ĝuis/as influon sur la amasoj, ĉi-kaze por batali favore al ĉi ties klasaj interesoj: ***Fidel Castro***, ***Che Guevara***, ***Salvador Allende***, ***Evo Morales***, ***Rafel Chavez***, Sandinista Movado… Kaj male, uloj kiaj ***Jair Bolsonaro***, ***Le Pen***, ***Berlusconi***, ***Donald Trump*** aŭ ***Santiago Abascal***, jes ja, alĝustiĝas al la modelo de faŝismo tia kia ĝin konceptas ni. Ili sukcesas/is forlogi popolajn amasoj el la batalo favore al ĉi ties interesoj por adresi ties atenton kaj batalemon al aferoj kiuj tuŝas la plej basajn instinktojn de la personoj: rasismo, naciismo, masklismo, ksenofobio, *aporofobio* (rifuzo al malriĉularo), ŝovinismo… Ekzemple, tiuj uloj ne nur allogas malriĉulojn por batali kontraŭ socialismo sed ankaŭ virinojn por batali kontraŭ feminismo.
Venas la momento analizi la nuntempan situacion rilate al la faŝismo. Oni povas diri ke nun ne ekzistas faŝismaj reĝimoj. Ekzistas, jes ja, iu prosperanta, kreskiĝanta faŝismo, sed la koncernaj movadoj celas politikan povon kiun ili ankoraŭ ne havas: Germanio, Italio, Francio, Hispanio…. Aŭ jam atingis regi en iuj landoj (ekzemple en Orienta Eŭropo), sed ankoraŭ ne transpasis la linion rompi la leĝecon. La bremso tion fari ne troviĝas en la forto de la koncernaj demokratioj, tiorilate ĉi tiuj estas tiom feblaj kiom estis la Respubliko de Vajmaro kiun Hitlero detruis. En la nuna kazo temas pri la fakto ke tiuj landoj apartenas al la

Eŭropa Unio kaj tio estas forta faktoro de politika stabileco. La kazo de la Rusujo de ***Putin*** estas alia. Ĉi tiu ulo, laŭ sia regadmaniero, pli similas al la ibero-amerikaj diktatoroj antaŭe menciitaj ol al la klasikaj faŝistaj lideroj. Ioman atenton meritas la kazo de la usonano ***Donald Trump***. Li, ja, estas faŝisto kaj rasisto, kaj en lia lando ekzistas forta faŝisma kaj raŝisma movado. Sed Usono, eĉ se imperiista kaj kapitalista potenco, tamen ne estas faŝista kaj rasista politika sistemo. La usona demokratio estas tre malperfekta (kaj ties balot-sistemo vere arkaika), sed tre forta kaj enradikigita, kaj tio estas forta bremso kontraŭ faŝisma puĉo. Do, ***Trump***, kaj similtipaj uloj, ĉu regante, ĉu en opozicio, estus tre restriktitaj de la leĝaro.
Fine ni atentu pri okcidenta Eŭropo. Malgraŭ la diferencoj inter la faŝismaj movadoj de tiu zono, komuna trajto de ĉiuj ili, krom la ĝenerala celo altiri popolan apogon por efektivigi ekde la ŝtataj institucioj politikon favora al la superregantaj klasoj, estas la programero restrikti, kontroli kaj kiel eble plej eviti la enmigradon. Tiu ksenofobio estis inter la ĉefaj kialoj kiujn la faŝisto ***Boris Johnnson*** proponis por ke la britoj voĉdonu en la koncerna referendumo, favore al la eliro de Britio el la Eŭropa Unio. Tiu ulo regas en sia lando sed neniam li povos establi tie faŝisman reĝimon. Ene aŭ for de la Eŭropa Unio, la brita politika sistemo estas sufiĉe firma por malebligi tian elpaŝon. La ceteraj landoj de okcidenta Ejuropo apartenas al la Eŭropa Unio kaj tio kontribuas malfaciligi tiajn aventurojn. Eble pro tio la franca faŝista liderino, ***Marine Le Pen***, krom ŝia programo kontraŭ la enmigrado, pledas ankaŭ por la eliro de Francio el la eŭro-monsistemo kaj malfortigi la rilatojn de Francio kun Eŭropa Unio. Ankaŭ la itala faŝismo kaj tiuj de la landoj de Benelukso pledas por limigo de la enmigrado. Speciala kazo tiorilate estas la germana faŝismo. Tie la faŝisma movado estas forta sed ne havas klaran liderecon; kelkaj organizaĵoj kun ties respektivaj gvidantoj konkuras por la estreco de la movado. Kaj ilia ĉefa programo estas la rifuzo de fremdaj enmigrintoj. Tute mankas en la propagan-



**Donald Trump**



**Boris Johnson**



**Marine Le Pen**



**Santiago kaj Santiago (Abascal)**

do de tiu movado mencion pri konkero de fremda teritorio, la fama **Lebensraum** de la obsedo de Hitlero. Same kiel en la epoko de la naziismo, estas tre forta la rasismo kaj ksenofobio sed nun la celo de la atakoj ne tiom estas la judoj kiom la afrikanoj, ĉar la nuntempa enmigrado venas el Afriko. Do, estas sufiĉe rimarkebla la evoluado kiun la faŝismo havis en tiu lando.

La naziisma ksenofobio kontraŭ la enmigrado estas tre forta en Italio kaj Hispanio ĉar tiuj landoj estas la pordoj de eniro en Eŭropon de la enmigrintoj kiuj venas el Afriko. Same kiel en Germanio, ankaŭ en Italio la faŝismo, kvankam forta, ne havas klaran liderecon; kelkaj malsamaj grupoj konkuras por la kontrolo de la movado. Male, en Hispanio ekzistas relative grava unuiĝo de plejparto el la landaj faŝistoj en unu partio, «Vox» sub la lidereco de ulo, ***Santiago Abascal***, kiu bone respegulas la plej malbonajn ecojn kaj sentojn de la plej mise edukitaj sektoroj de la hispana loĝantaro. Se Hispanio estis lando kie, post la mondmilito, tre evoluis la faŝismo, sub la gvido de ***Franco***, por sin distingi de la venkitoj en tiu milito, ankaŭ la nuna faŝismo estas rezulto de plua evoluado post la malapero de la diktatoro. Se la iama propaganda flago de ***Falange***, rehavi la antikvan imperion, la nuntempa hispana faŝismo tute ne revas pri teritoriaj konkeraĵoj ĉar eĉ la plej malnoblaj sektoroj de la hispana loĝantaro ne havas tian inklinon. La programo de ***Santiago Abascal***, do, centriĝas, ĉefe, sur la temo de la rifuzo al la ega enmigrado de afrikaj gentoj. Tiucele li alprenis simbolon en la historio de la lando. Kiel sciate, Hispanio estis dum multaj jarcentoj en Mezepoko scenejo de militado kontraŭ afrika gento, la maŭroj, muzulmanoj, araboj… Tiorilate vidu la 95-an numeron de ĉi tiu revuo, **Heleco**, kiu priraportas tiun epokon. Nu, kadre de tiu longdaŭra rekonkerado de la hispana teritorio naskiĝis legendoj en rilato kun la rivaleco inter muzulmanoj kaj kristanoj. Unu el tiuj legendoj estis tiu nomata «La batalo de Klaviĥo», kiun ni priraportis per alia numero de **Heleco**, la 85-a, konkrete per la ĉapitro alirebla tra la ret-adreso:

**https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/85/22-23.html**


La ĉapitro titoliĝas: «**Sankta Jakobo Maŭro-buĉisto**». Laŭ la legendo, en iu batalo, Klaviĥo, la apostolo Sankta Jakobo aperis rajdante sur blanka ĉevalo por batali favore al la hispanaj kristanoj kontraŭ la afrikaj maŭroj. La formo de la nomo **Jakobo**, en la hispana lingvo estas ***Santiago***, kaj jen la hispana faŝista lidero nomiĝas ĝuste ***Santiago***. Tio alportas simbolan elementon al la politika celo de tiu ulo, batali kontraŭ afrikaj enmigrantoj-invadantoj. Pri tiu afero ni permesis al ni meti ŝercan bildon sur la antaŭa paĝo.

Krom la rifuzo de la enmigrado, alia flago de «Vox» estas la ŝovinismo, t. e. la patriotismo en ties plej ekstrema kaj fanatika formo. Okazas ke en Hispanio estas regionoj kun separatisma, naciisma sento. Ĉi tiu estas tre opotuna cirkonstanco por ke la faŝisma partio de ***Abascal*** altiru la politikan apogon (voĉdonoj) de la hispanoj kiuj pensas ke "*la patrujo estas subdanĝere*" kaj ke nur ***Santiago*** povas savi ĝin. Ankaŭ tiorilate estas bona ŝanco por li lia nomo ĉar ***Santiago*** **(Sankta Jakobo)** estas la patrono de la hispana patrolando.

Sur tiutipaj stultaĵoj oni konstruas la liderecojn kiam la homamasoj estas senkleraj. Ni memoru ke la lidereco de la naziismo baziĝis sur mitaj legendoj pri Tuleo, la arja raso k. s. Alia propaganda elemento de la lidero de «Vox» estas la masklismo, t. e. la dominado de la viroj sur la virinoj. Eble ŝajnas nekredeble ke kiam en Hispanio okazas seksperfortigoj de junulinoj kaj la responsuloj estas juĝataj kaj kondamnataj, ne mankas publikaj apogoj al la kulpuloj far personaro de tiu faŝista partio, kaj eĉ pli nekredeble estas tio ke inter la apogantoj de tiuj fiuloj estas ankaŭ virinoj. Estas sciate ke ĝuste la celo de la faŝismoj estas mobilizi, favore al la kapitalismo, la ekspluatatojn de la kapitalista sistemo. Malfacilas liberigi la sklavojn kiam ĉi tiuj havas animon de sklavoj.
Fine, ni pritraktos iun teorion kiu lasttempe intencas ekspliki la furoron, la prosperon de la faŝismaj movadoj. Ni ne certas pri la ĝusteco de tiu teorio, sed ĝi meritas esti pristudata. Laŭ ĝi, la progreso de tiuj faŝismaj movadoj estas frukto je aktivado bone pagata (financata) de la Rusio de ***Putin***. Laŭ la sama teorio, ankaŭ aliaj alitipaj movadoj, kiel la naciismoj, separatismoj, havas saman originon. La celo de tiom malsamaj kaj nekongruaj movadoj estus malstabiligi la socio(j)n de la konkurantaj blokoj. Laŭ la sama teorio, ***Putin*** estus kaŝe influinte ankaŭ en la venko de ***Trump*** en la usona balotado antaŭ kvar jarojn, kaj en la nuntempa socia konfliktado en la usona socio, apogante ambaŭ interkontraŭantajn sektorojn de tiu socio, la rasistojn kaj la «*antifa*n» movadon. Ĉiam en la sama linio, ankaŭ la problemoj kiujn ***Putin*** mem havas en la bloko kontrolata de Rusio estas rezulto de similaj intrigoj, ĉi foje organizitaj de Usono kaj la Eŭropa Unio. Dume, la malstabiliĝo de la zono de MezOriento estas sekvo de intrigoj de la jam menciitaj blokoj: Rusio kaj Usono, kaj same oni povas diri pri la sociaj konfliktoj kiujn Ĉinio devis alfronti en HonKongo. Se tio estus vero, la mobilizoj de la flav-vestuloj en Francio, la separatisma intenco de Katalunio antaŭ pluraj jaroj, la mobilizoj de la neantoj de la ***COVID***-viruso… kaj aliaj mobilizoj, estus rezulto de tiaj organizitaj aranĝoj far spertaj specialistoj pri socia mobilizado.
Kiel dirite, malfacilas esti certaj pri tio. La afero estas verŝajna; en la nunaj cirkonstancoj la kontraŭdiroj inter la grandaj potencoj, la grandaj blokoj, estas tiom grandaj kaj gravaj kiom en la epokoj antaŭ la du mondaj militoj de la pasinta jarcento. Sed nuntempe, pro la nun ekzistanta nuklea armilaro, estus tre danĝere ke la grandaj potencoj rekte interfrontiĝu milite. Tial, la nova strategio estus eviti tiutipa militado kaj anstataŭigi ĝin per malstabiligado de alies blokoj. Do, eble jes, eble la kaŭzo de tiom da socia konfliktado estas la formo, aŭ iu el la formoj, laŭ kiuj disvolviĝas la Tria MondMilito. Sed krom la respondeco de la intrigantoj, ankaŭ la popoloj kulpas pri la trompoj en kiuj ili falas. La Unua MondMilito estis entuziasme akceptita de la popoloj kiuj poste suferis ĝiajn sekvojn. La Dua okazis tial ke iuj popoloj sin lasis allogi de uloj kiuj promesis al ili konkeri la tutan mondon. Ĉi raporto pretendas alporti instruon pri tiuj malfeliĉaj spertoj, sed ŝajnas ke, bedaŭrinde, la plej grava instruo de la historio estas ke la homaro eltiras nenian instruon el la historio.




Temante pri la faŝismo, ŝajnas ironie ke ĝi estu objekto de lernado kaj studado, konsiderante ke tiu politika movado ne distingiĝis/as ĝuste pro sia emo al la kulturo. Famiĝis la frazo: **Wenn ich Kultur h re... entsichere ich meinen Browning** ***(Kiam mi aŭdas primencii kulturon... mi malŝlosas mian Browning-on).*** Oni atribuis ĝin ĉu al ***Himmler***, al ***Goebbels***, al ***Göring*** aŭ al Hitlero mem. Fakte, neniu el ili prononcis tiun frazon; ĝi apartenas al iu dialogo de teatraĵo de tiu epoko en Germanio. Sed ĝi bone respegulas la penson kaj teniĝon de la naziista reĝimo rilate al la kulturo; estas konataj ke unue en Italio kaj poste kaj ĉefe en Germanio, kaj ankaŭ iome en Hispanio, estis kampanjoj de bruligado de libroj.
Sed eĉ tiutipaj reĝimoj bezonas librojn por diskonigi sian idearon, kaj krome la lideroj mem de la faŝismaj movadoj estas frukto aŭ produktaĵo de la legaĵoj kiuj nutris ilian menson: oni scias ke Mussolino estis tre influita de la verkaro de ***Friedrich Nietzsche***, kaj sur Hitlero tre efikis la teorioj de ***Houston Stewart Chamberlain*** kaj ***Jörg Lanz von Liebenfels***. Kaj, kiel dirite, tiuj lideroj mem uzis la literaturon por sia politika propagando. Estas fame konata la verko de ***Adolf Hitler***: **Mein kampf** (Mia batalado). Pri ĝi ni temos poste.
Ankaŭ ***Benito Mussolini*** publikigis ion, kvankam ne tre ampleksa kiom la verko de Hitlero, kaj krome ŝajnas ke la aŭtoro ne estis li mem sed la oficiala filozofo de la faŝismo: ***Giovanni Gentile***. En la jaro 1932 estis publikigita la teoria teksto ***La dottrina del fascismo*** (La doktrino de la faŝismo) per kiu oni difinas ĉi tiun politikan movadon kiel pretersuperon de la politikaj modeloj kaj konceptoj de la 19-a jarcento: liberalismo, demokratio kaj marksismo. Ĝi insistas pri tio ke "*la politikaj doktrinoj forpasas, la nacioj plurestas*" kaj ke la 20-a estas la jarcento de la aŭtoritato. La faŝismo koincidas kun la marksismo en ĝia volo pretersuperi la individuismon favore al la kolektivismo, sed en la faŝismo la kolektivismo ne celas egalecon inter la uloj sed nura disciplina fordono de la indi-











viduoj al la ŝtata aŭtoritato. Legante interlinie oni komprenas ke la faŝisma ŝtato ne kontemplas la ekzistadon de civitanoj konsciaj pri ties rajtoj (estas malpermesataj la partioj kaj la sindikatoj) sed sindonemaj soldatoj pretaj batali kaj morti en la militoj kiujn la ŝtato devas entrepreni en mondo kie ne eblas konstanta paco.
Laŭ tiu doktrino, la faŝisma koncepto de la ŝtato ampleksas ĉion; ekster ĝi povas ekzisti neniu homa aŭ spirita valoroj. Tiel komprenita, la faŝismo estas totalisma, kaj ties ŝtato sintezas kaj unuigas ĉiujn valorojn, kaj interpretas, disvolvas kaj potencigas la tutan vivon de la popolo. Tial la faŝismo kontraŭas la socialismon aŭ marksismon kiu konceptas la ŝtaton kiel kunekzistado de sociaj klasoj kun kontraŭdiraj interesoj, kio prisupozas kaj implicas klasbatalon celante pretersuperi la klasismon.
Krome tiu faŝisma doktrino ankaŭ rifuzas agnoski la formiĝon de sociaj plimultoj, majoritatoj, kio signifas ke la ŝtato devas ne dependi de la rezulto de balotadoj. En tiu ideo enestas la koncepto de nediskutebla kaj nerenversigebla gvidereco. Laŭ la faŝisma doktrino la interveno de la ŝtato en la ekonomia produktado okazus nur kiam mankus aŭ ne sufiĉus la privata iniciato, sed konsideras ke la privata entrepreno estas la plej efika ilo por la produktado.
Evidentas ke la rezulto de tiu doktrino estas ŝtato planita kaj konceptita laŭ la intereso de la burĝklaso: La posedantaj klasoj povas private demarŝi la produktadon sen la ĝeno de sindikatoj kaj politikaj partioj de maldekstraro; la rolo de tia ŝtato estus garantii la socian ordon por la konservado de tiu situacio sen ia ajn politika opozicio kaj la organizado de militoj celantajn pliampleksigi la kolonian imperion.
Krom tiu perlo de reakcia politiko, Mussolino publikigis ankaŭ membiografion, fakte mempropagandon, en la jaro 1928.


La verko de Adolf Hitler, **Mein kampf**, publikigita en 1925, kombinas membiografiajn travivaĵojn de la aŭtoro kun ties politikajn ideojn. Temis pri la ideoj sur kiuj baziĝis poste la regado de tiu faŝisma lidero kaj kiu nomiĝis «naci-socialismo» aŭ pli ĝenerale «naziismo». Laŭ tiu doktrino, la solaj aktoroj en ĉiuj historiaj eventoj estus popoloj aŭ rasoj, ne klasoj aŭ religioj, nek, strikte parolante, ŝtatoj. La historio estus la porviva batalado de iu popolo; ĉiu historia disvolviĝo ne estus pli ol la manifestiĝo de la instinkto de memkonservo de la rasoj. La ŝtato estas nura ilo por tiu celo, la celo konservi la rasan ekzistadon de la homoj. La interna politiko devas certigi al iu popolo la internan forton por ĝia ekstera politiko, kiu konsistas el batalado. Devas batali tiu kiu volas vivi, kaj la batalado inter la popoloj, inter la rasoj, nepre alprenas la formon de milito. Laŭ tiu mond-konceptado, la militoj estas la natura, normala kaj ĉiamdaŭra formo de la ekzistado de popolo, kaj la politiko estas la arto plenumi la vitalan bataladon de popolo por ties ekzistado sur la tero. La ekstera politiko estas la arto certigi al popolo la grandon kaj kvaliton de la vivo-spaco kiun ĝi bezonas, dum la interna politiko estas la arto konservi la valoron de la raso kaj la multenombron de popolo samkiel ties necesajn vivrimedojn. Resume, la politiko estas la milito aŭ la prepariĝo por ĝi. Temus pri ĝenerala leĝo por ĉiuj popoloj, eĉ por ĉiuj homaj estaĵoj, ĉar estas senlima la instinkto de memkonservo, kaj tamen limigita la spaco en kiu okazas ĉiu vitala procezo. Tiu historia leĝo estas speciale valida por la germana popolo, kiu devas akumuli fortojn por avanci ekde sia malgranda vivo-spaco al novaj teroj. Krome, laŭ la verko de Hitlero, la milito celas la dominadon kaj la submetadon. La aristokratia principo de la naturo estas la venko de tiu pli forta kaj la detruon aŭ senkondiĉan submetiĝon de tiu pli malforta. La libera interagado de fortoj devas konduki al senĉesa reciproka perfektiĝado de la raso. Kaj fine, la lasta celo de tiu senĉesa batalado de la popoloj estas la tutmonda dominado. Ĉiu estaĵo aspiras al ekspansio, kaj ĉiu popolo al la tutmonda superregado. Ĉi tiun destinon li receptas al Germanio.


Alia baza ideo de la hitlera doktrino prezentita en **Mein kampf** estas la kontraŭjudismo kaj kontraŭ-internaciismo. «Judo» kaj «internaciisto» por Hitlero estas preskaŭ sinonimoj. Laŭ li, la «internacia judismo» estas la malamiko de ĉiuj ŝtatoj, kiujn ĝi kontraŭbatalas per ĉiuj rimedoj: la ekstera politiko, pere de la pacifismo kaj la internaciismo, la kapitalismo, la komunismo; en la interna politiko, pere de la parlamentismo kaj la demokratio. Ĉiuj-ĉi, laŭ tiu doktrino, estas iloj por malfortigi kaj detrui la ŝtaton inventitaj de la judoj por perturbi kaj malfortigi la «arjajn» popolojn en ĉi ties grandioza lukto por la vivo-spaco, cele certigi al si sian propran kaj malignan tut-mondan superregadon. Estas kontraŭdiro en tiu hitlera doktrino kiam li asertas ke ĉiuj popoloj devas kunagadi kontraŭ la judoj. Tia kunagado kontraŭdirus kun la antaŭe menciita principo ke la popoloj devas interbatali unuj kontraŭ la aliaj por la vivo-spaco. ***Adolf Hitler*** ne malkaŝis sian celon ke la germana popolo venku kaj submetu ĉiujn aliajn,

**Houston Stewart Chamberlain kaj ties verkoj**






sed temante pri la judoj, la plano estis ekstermi ilin, lasi al ili nenian eliron. Eĉ se ili forĵurus sian religion, tio signifus nenion, ĉar ili ne estas religia komunumo sed raso. Kaj se ili intencus eskapi el sia raso per sinmiksado kun «arjoj», tio estus eĉ pli malbone ĉar tiele ili damaĝas la «arjan» rason. Sed eĉ pli malbone estas kiam ili intencas asimiliĝi al aliaj popoloj kaj iĝas germanaj, anglaj, francaj… patriotoj, ĉar tiukaze ilia celo estas impulsi la popolojn batali unuj kontraŭ aliaj. Strange ke li kondamnas ĉi-lastan aferon, konsiderante ke li mem doktrinis ke batali unuj kontraŭ la aliaj estas la sola vivocelo de la popoloj. Estas klare ke, por li, la judoj, ĉio ajn estus tio kion ili farus, neniam rajtas vivi, kaj ĉiukaze ili devas esti ekstermitaj. Se oni psikoanalizas iujn argumentojn kiujn Hitlero prezentas en la verko kiun ni prikomentas, oni venas al la konkludo ke dum en la ceteraj popoloj li vidis estontajn sklavojn de la germanoj, en la judoj li vidis, aŭ pensis vidi, la plej danĝerajn konkurantojn de liaj germanoj.

Malfeliĉe, tiu faŝisma lidero havis okazon entrepreni la realigadon de siaj makabraj planoj, tiel rilate al aliaj popoloj kiel al la judoj. Kaj tio eblis ĉar la germana popolo konsentis ludi la rolon kiun asignis al ĝi tiu ulo. Sed tiu konsento ne estis frukto de la influo de lia verko. Fakte, la germanoj de tiu epoko estis maturaj por ricevi la doktrinon de tiu “mesio”. La “mesioj” aperas kiam oni esperas kaj atendas ilin. Ekzistas aliaj verkoj kiuj montras ke tiu espero, la zorgo pri arja rasa pureco, ekzistis inter la germanoj jam pluraj generacioj antaŭ la apero de la naziismo. Ni priatentu iujn verkojn kiuj respegulas, kvankam ankaŭ ili ne kreis, tiun senton. Ni jam menciis ke ***Friedrich Nietzsche*** influis ankaŭ sur la pensmaniero de ***Benito Mussolini***. La tut-germanisma sento inspiris ankaŭ la temaron de la operoj de ***Wagner***. Ni volas

temi ĝuste pri la verkaro de iu bofilo de tiu komponisto: ***Houston Stewart Chamberlain***. Tiu ĉi anglo edziĝis al Eva, filino de ***Wagner***. Interalie li verkis: **Grundlagen des neunzehnten Jahrhunderts** (Fundamentoj de la deknaŭa jarcento). Per tiu verko li esprimas tut-germanismajn kaj kontraŭjudajn sentojn. Li pledis por la konservado de la germana kulturo per batalado por kontroli la fremdajn elementojn: jud-kristanismo. Plenkonvinkita pri la supereco de la germana raso, li pensis ke la armeoj de la Kajzero venkus en la Unua Mond-Milito kaj mendis germanan naciiĝon. En 1923 li konis persone Hitleron en la Festivalo de ***Bayreuth*** honore al la operoj de lia bopatro ***Richard Wagner***. Laŭ ***Chamberlain***, la ĉefaj kaŭzoj de la germanaj fiaskoj estas la koruptiĝo de la sango kaj la demoralizanta influo de la jud-kristanismo. Nedudeble, li estis kvazaŭ anoncinto de la naziismo. Kiam li mortis, en 1927, Hitlero ĉeestis lian funebraĵon.

Menciinda estas ankaŭ la kazo de la franca aristokrato ***Arthur de Gobineau***, kiu opiniis ke la gvidantaj klasoj devus esti konstituitaj de membroj de la arja raso por trudi sian volon sur la ordinara homaro kiu, laŭ li, estas malpli valida. Alia fakta anoncinto de la faŝismo estis ***Jörg Lanz von Liebenfels***. Ĉi ties vera nomo estis: ***Adolf Joseph Lanz*** (1874-1954), aŭstra katolika kleriko, kiu kliŝis la esprimon «arjosofio» por nomi "sciencon" aŭ studojn kiujn li mem iniciatis. Jam ekde junaĝo li montris egan romantikan intereson pri la religiaj ordenoj kaj diversaj formoj de ekzoterismo. En 1893 li iĝis cisterciano kaj jam tiam li sin tenis kontraŭjuda. Ekde 1894 li verkis pli ol trideko da eseoj pri historia arto. Tiam li jam estis interesita pri novpaganismo, okultismo kaj la mito de la Gralo. Subinflue de aliaj maniuloj de tiuj temoj li estiĝis radikala naciisto kaj eŭgenikisto. En 1898 li ricevis pastran ordeniĝon en sia cistercia monaĥejo, sed sekvintjare oni ordonis al li forlasi la ordenon tial ke li estis «dediĉita al la mensogo de la mondo kaj kaptita de karna amo». Oni suspektas ke tiam li havis amrilaton kun iu membro de la familio ***Lanz von Liebenfels***. Ebla fiasko en tiu tereno povas eksplik lian postan mizoginezon. Ĉiukaze not-

***Jörg Lanz von Liebenfels kaj ties verkaro***








indas ke tiam li ŝanĝis sian nomon alprenante tiun de la nobela familio ***Lanz von Liebenfels***. Iuj supozas ke lia simulata aparteno al tiu familio celis kaŝi judan devenon de lia patrino.

Post lia forlaso el la monaĥejo; ***Lanz*** verkis kontraŭ la jezuitoj kaj pri antropologio, arkeologio kaj historio rilate al la arja raso, kaj kontaktis kun tut-germanismaj kaj kontraŭ-judaj rondoj. Li venis al la konkludo ke la arja raso malfortiĝas intermiksante sin kun la "malalta raso" de tiuj kiujn li nomis "simioj". Do li pledadis por eŭgeniko, kiun li nomis "rasa higieno", kio postulas senkondiĉan submetiĝon de la arjaj virinoj al la viroj ĉar, laŭ li, la arjaj inoj sentas egan altiron kaj tre estas pretaj koiti kun tiuj simioj de la malaltaj rasoj. Ja, ŝajnas evidente ke li spertis ian elreviĝon en siaj rilatoj kun virinoj. Tiuj sentoj kaj ideoj konstituas lian teorion de la «teozoologio», ia miksaĵo de rasismo, kontraŭ-judismo, kontraŭ-katolikismo kaj kontraŭ-socialismo, teorio pri kiu li havis multajn sekvantoj de tiam. Li interpretis la Malnovan Testamenton de la Biblio sub la lumo de tiu teozoologio kaj asertis ka la Falo konsistis en tio ke la arjoj, origine diaj, intermiksiĝis kun bestoj kaj el tio rezultis la malsuperaj rasoj, kiuj minacas la legitiman rajton de la arjoj, ĉefe en Germanio, kie la arjoj estis pli multenombraj ol aliloke. Laŭ li, la vera religio estas teni puraj la restaĵojn de la arja raso.

En 1900 ***Lanz*** fondis sian propran religian ordenon, la ***Ordo Novi Templi*** (Nova Templana Ordeno) kiu pretendis esti unuiĝo de german-aŭstroj konsciaj pri la raso celante la belecon de la arja raso kaj apogi la koloniismon. Nur arjaj viroj povis membri en tiu ordeno; komence ĝi alprenis la liturgion, insignojn kaj hierarkia strukturo de la cistercianoj. Dum la jaroj ĝis 1938 li fondis kelkajn priorejojn de tiu ordeno ne nur en Aŭstrio kaj Germanio sed ankaŭ en aliaj lokoj kie ekzistis germanaj etnaj minoritatoj, ĉefe en Hungario. Alia iniciato de ***Lanz***, serve de lia obstina celo, estis la revuo ***Ostara*** publikigita ekde 1905. Tiu revuo estis la presorgano de tiuj «arjosofio» kaj «teozoologio» pri kiuj doktoris ***Jörg Lanz von Liebenfels***. En 1917 estis jam publikigitaj 89 numeroj de tiu revuo. Ĝi havis grandan sukceson de disvastiĝo; oni scias ke dum iom da tempo Hitlero havis kolekton de numeroj de ***Ostara***. Tiu termino estas la nomo de iu diino de la antikva germana mitologio; ja, iu trajto de la tut-germanismo estis la intenco rehavi la antaŭ-kristanan kulturon de la lando. Oni pripolemikas ĉu Hitlero estis influita de ***Lanz von Liebenfels***. Plurfoje la naziista lidero esprimis antipation al la ariosofo kaj, fakte, estis li kiu malpermesis kaj nuligis la Templanan Ordenon de ***Lanz***. Ĉiukaze, ĉu ***Lanz*** influis aŭ ne sur Hitlero, estas evidenta ke iliaj komunaj tut-germanismo, rasismo, kontraŭ-feminismo, kontraŭ-judismo kaj kontraŭ-socialismo respondis al sentoj amplekse disvastiĝintaj en Centra Eŭropo ekde la 19-a jarcento.

Kiuj, jes ja, influis sur Hitlero, kaj krome li mem agnoskis tion, estis ***Leopold Pötsch*** kaj la usona entreprenisto ***Henry Ford***. ***Leopold Pötsch*** estis aŭstra profesoro de historio de ***Adolf Hitler*** kaj influis sur ĉi ties politikaj ideoj. Pli


stranga estas la kazo, pro ties usona deveno, de la entreprenisto ***Henry Ford***, fondinto de la fama kompanio ***Ford Motor Company*** kaj pioniro de la amasa produktado per labor-divido. En 1918 li akiris la ĵurnalon, ***The Dearborn Independent***, kaj ekde 1920 ĝis 1927 li publikigis per ĝi kontraŭ-judan materialon, interalie «La Protokoloj de la cionaj saĝuloj». En tiu jardeko ***Henry Ford*** publikigis libron titolitan: «La internacia judo. La plej granda tutmonda problemo». En tiu periodo li elstaris kiel respektata proparolanto de la ekstrema desktraro de la lando. Hitlero havis portreton de ***Ford*** surmure en sia oficejo. En 1938 la germana konsulo en Usono transdonis al ***Ford*** la medalon de la «Ordeno de la Germana Aglo» aljuĝita de Hitlero. ***Ford*** mem agnoskis ke lia kontraŭjuda sento estis influita de la fama verko: «La Protokoloj de la cionaj saĝuloj». Strikte parolante, tiu verko ne estas rasisma kvankam, jes ja, kontraŭjuda. Ĝi ne devenas el la germana medio sed el la slava; ĝi estis verkita de rusa aristokrata oficiro de la cara kortego por senkreditigi la judojn, kiujn oni akuzas per tiu verko celi tutmondan superregadon. Tiusence la verko utilis ankaŭ por la naziista propagando sed estis/as uzata por kontraŭjuda propagando ankaŭ en aliaj medioj sen rilato kun la faŝisma afero.

Ne nur en la epoko antaŭ la Dua Mond-Milito estis negermanaj simpatiantoj de la naziismo. Ankaŭ post la milita malvenko de la faŝismo oni publikigis librojn kies aŭtoroj, iu aŭ alimaniere, intencis pravigi la movadon kaj ties liderojn. Tia estas la kazo de, ekzemple, la franca ***Jean Mabire*** (1927-2006). Engaĝita en normandaj regionismaj rondoj, li defendis novpaganismon kaj esprimis politikan penson klasifikitan kiel ekstremdekstra, proksima al nov-faŝismaj rondoj. Li estis aŭtoro de multaj libroj dediĉitaj al historio, ĉefe tiu de la dua mondmilito kaj la ***Waffen-SS***. Dum sia militservo en 1954-55, li iĝis paraŝutisto. Poste li havis, ĝis 1959 ian militistan dediĉon en Alĝerio kaj aliloke, kaj ricevis kelkajn ordenojn kaj iun premion pro iu ĵurnala raporto. Fakte, de tiam li rolis kiel ĵurnalisto kaj ankaŭ publikigis kelkajn librojn. Post la sendepend-



***Leopold Pötsch*** **profesoro de *Hitler* pri historio**






***Henry Ford*** **kaj ties verko**

**Jean Mabire kaj ties verkaro**










iĝo de Alĝerio, kiun li travivis kiel malvenkon por Francio, li enviciĝis en rondojn de politika dekstraro. En lia verkaro oni perceptas ian romantikan vidpunkton pri la elitaj naziistaj trupoj ***Waffen-SS*** kiujn li konceptas kiel la postsekvintojn de la antikvaj teŭtonaj kavaliroj, la germanaj batalantoj emerĝintaj el la glacio kaj la arbaroj… Paĝo post paĝo, laŭlonge de lia tuta verkaro, ***Jean Mabire*** idealigas la naziistan reĝimon kaj ĉi ties celon konkeri la eŭropan teritorion. Tiuj paĝoj plenas je tiu militista propagando per kiu oni allogas la junulojn por ilin sendi al la buĉejoj de la milit-frontoj. Kompreneble, lia verkaro vekis polemikon kaj kontraŭdiran pritaksadon. Inter lia ampleksa verkaro elstaras tiu libro titolita: «Tuleo. Serĉe de la suno de la hiperboreoj». Ĝi estas novpaganisma kanto al la mita lando el kie, supozeble, devenas la arja gento. Alia libro de ĉi tiu aŭtoro en tiu novpaganisma linio de idealigado de la malaperinta teŭtona kulturo estas tiu titolita: «La dioj malbenitaj».


Alia verko lia estas: «***Röhm***, la homo kiu inventis Hitleron». Per ĝi, ***Mabire*** priskribas la politikan karieron de ***Ernst Röhm***, kiu vundita en la unua mondmilito, aktivadis en la naziistaj vicoj favore al la plirangigo de Hitlero kaj organizis privatan armeon por la interna politika batalado en Germanio. Kiel sciate, ***Röhm***, post esti iu el la raraj amikoj de la ***Fürer***, iĝis ties politika rivalo ene de la naziista movado, kaj estis murdita dum la t. n. «Nokto de la Longaj Tranĉiloj», la 30-an junio de 1934. Tiu evento, krom signi la venkon de Hitlero, en sia povbatalo kontraŭ sia politika rivalo, signifis ankaŭ la finon de iu naziista milico la ***SA***, favore al alia, la ***SS***. Por interesito pri tiaj milicoj, kia ***Mabire*** estis, tiu temo estis okazo, kromanfoje, por emfazi la valorojn kaj virtojn kiujn li atribuis al tiutipaj soldataj entoj.

Alia aŭtoro kiu kaŝas per altsonaj kaj emfazaj esprimoj la mizerojn kaj malprogresemon de la faŝismo estas la argentino ***Federico Rivanera Carlés***. Per sia verkaro li atakas la masonaron, la organizojn de Maldekstraro kaj ĉefe la judismon, en la linio de la


## *Federico Rivanera Carlés* kaj ties reakcia kaj kontraŭ-juda verkaro










«Protokoloj de la cionaj saĝuloj». Krome li ankaŭ verkis librojn kiuj pravigas kaj defendas la faŝismon, la naziismon kaj ties liderojn, krome per samaj propagandaj argumentoj uzitaj de tiuj reakciaj reĝimoj, t. e. ***Rivanera*** kaj la argentinaj organizoj en kiuj li enkadriĝas teorie rifuzas apliki al si la terminon «dekstraro» kaj defendas, ankaŭ teorie, iujn socialistajn depostulojn, sed fakte konstituas la lastan defendo-linion de la kapitalismo kontraŭ la avancoj de la ideoj de Maldekstraro. Per sia politika propagando ***Federico Rivanera*** prilaŭdas la militistajn "virtojn" kaj la spiriton gvidintan la eŭropajn konkerantojn de la 16-a jarcento kiuj masakradis la indianajn popolojn, kaj tiun de la naziistaj trupoj kiuj plenumis similan rasmortigon en la eŭropaj teritorioj de ili invaditaj.

Paradokse, kaj naŭzige, li fieras pri la kristana civilizacio, sed ŝajnas ke lia Kristo ne estas la judo Jesuo de Nazareto kiu predikis la interhoman amon kaj kompaton, sed nur tiu sakramentita Kristo de la Eŭkaristiaj Kongresoj, religiaj procesioj kaj liturgia kulto kiu havas sencon per si mem kaj ne estas ligata al la konstruado de la Dia Regno kiun Jesuo celis.

Jen iu "perlo" de la politika doktrino de tiu ***Federico Rivanera Carlés:***

> ***…Kaj estas kutime, ke multaj junuloj de diversaj naciecoj -kaj eĉ ne-arjaj rasojfiere elmontras Hitler-simbolojn. Fotoj de la venkita Führer estas vidataj eĉ en la plej malproksima angulo de la tero. Lia figuro staras alta, hela, personigante la venkon de heroa kaj supera Idealo, de la fido super la materialismo, de la Honoro super la perfido, de la Justeco super ekspluato, de la Sango super la oro. Kaj tiu amo por la Führer ne estis trudita per dekreto, sed estis la spontanea respondo de popolo dankema al sia liberiganto kaj patro.***

Per tiutipa propagando oni ariĝas ulojn ne nur por la reakcia politiko sed eble ankaŭ por ĉiutipa militemo. Sendube la junularo kiu tiom entuziasme sin ĵetis al la milit-frontoj en 1914 estis pelitaj de similaj frenezaj sentoj. Konsiderante ke tiaspecaj uloj, kiaj ***Rivanera Carlés***, sin tenas kontraŭ la masonaro, la judismo kaj Maldekstraro, oni ne povas eviti senti simpation al masonaro, judismo kaj Maldekstraro.

Sendube abundas similaj teoriuloj en aliaj landoj, sed ne eblas al ni recenzi ĉiujn. Ni aldonas iun kroman tiutipan specimenon, tiun de ulo de nia lando kiu tre verkis faŝism-favoran literaturon dum multaj jardekoj de la pasinta jarcento. Ni temas pri ***Julián Mauricio Carlavilla del Barrio*** (1896-1982), kiu publik-

## *Maŭricio Carlavilla* kaj ties reakcia kaj pamflet-stila literaturo




igis siajn verkojn kun la pseŭdonimo: ***Mauricio Karl***. Li rolis kiel policisto ekde la jaro 1921, la saman jaron de la puĉo de ***Primo de Rivera***. Dum ĉi ties diktaturo li deciĉiĝis kiel policisto al la esplorado de la tiam ĵus naskiĝinta Komunista Partio de Hispanio kaj ŝajnas ke por la plenumado de tiu tasko li sekrete enŝoviĝis en tiun partion. Oni scias ke en 1911, kiel policisto, li estis translokigita de Valencio al Zaragozo pro faroj liaj «kiuj senhonorigas la polican korporacion». En 1925 oni sendis lin al la Maroka teritorio kontrolata de Hispanio, de kie oni poste forpelis lin akuzita je «malmoralaj faroj, kiel altrudo de arbitraj mon-punoj kaj tolero de prostituado liaprofite».

En 1932, li kunlaboris en la konspiro de Generalo Sanjurjo kontraŭ la hispana Respubliko kiu estis proklamita la antaŭan jaron. En 1935 li estis forpelita el la polica korporacio pro «gravaj misfaroj». Poste li implikiĝis, kune kun alia dekstrema policisto, en iuj planoj por murdi la registrar-prezidenton ***Manuel Azaña***-on, la socialistan lideron ***Francisco Largo-Caballero***-n kaj la Parlamentan vicprezidenton ***Luis Jiménez de Asua***-on. Denoncita pro tiuj faroj, en majo de 1936 li fuĝis al Portugalio. Tiam li jam estis publikiginta plurajn libroj sub la pseŭdonimo ***Mauricio Karl***: «La Komunismo en Hispanio», «Murdistoj de Hispanio»… Tiam la publiko ne sciis kiu estis la ulo kaŝita sub tiu pseŭdonimo. Per tiuj libroj li atakadis la liberalulojn, la framasonojn, la judojn, la socialistojn kaj ĉefe la komunistojn kaj anarkiistojn, kaj, kompreneble, li tre simpatiis al la faŝistaj reĝimoj de Italio kaj Germanio kun kies spionaj servoj, laŭŝajne, li iome kunlaboris.

***Carlavilla*** interrilatis kun la tiamaj konspirantoj kontraŭ la hispana Respubliko; li redaktadis kaj distribuadis en la armeaj medioj propagandon favore al puĉo, kaj instigante ekstermi judojn, maldekstrulojn kaj masonojn. Li revenis en Hispanion iomete post la komenciĝo de la civilmilito kaj instaliĝis en la zono subkontrole de la ribelintoj. De tiam tre kreskis la propaganda influo de lia verkaro. Li integriĝis en la frankisma polico, kaj post la fino de la milito li gvidis polican brigadon por la kontrolo de la judoj loĝantaj en Hispanio. Dum la frankisma epoko, krom plu labori en la kloakoj de la ŝtato, li plu verkis, ĉi-foje favore al la diktaturo kaj al la imperiismo kadre la «Malvarma Milito»; Tiam lia verkaro estis ĉefe kontraŭ-sovetia, per libroj pri Malenkovo, Ĥruŝĉovo…

Kiel ekzemplo de liaj pamfletaj verkoj kontraŭ la judoj kaj la masonaro, jen iu “perlo” de liaj tekstoj:

***La Satanismo malamas Dion kaj Kriston, ne pro tio ke ne kredas je ili, sed ĝuste ĉar certas pri ilia ekzisto. Tia estas la vera satanismo, el kiu, kiel ideo kaj filozofio, la Kabalismo estas ĝia plej pura esprimo. Kaj tial, la Masonaro kun ties gradoj kaj mistikaj ritoj estas ĝia vera emanaĵo. El tie elŝprucas la veraj satanikuloj, estroj de la Masonaro (kaŝita) kaj de la Revolucio. La Kabalista judismo kreis la Masonaron kiel ilo, kaj la Revolucio estas ilia komuna celo, kun superhoma malamo al Dio, al Kristo kaj al ĉi ties Eklezio.***

Jen tio kion povus legi en Hispanio dum la frankisma epoko tiuj kiuj interesiĝis pri politikaj aferoj.

Temante pri ne-germanaj aŭtoroj kiuj pritraktis de-ekstere la hitleran reĝimon, estas speciale mencienda la brito ***David Irving***, naskiĝinta en 1938 kaj ankoraŭ vivanta. Li verkis multajn librojn pri la naziista Germanio, sed pli en rilato kun la Dua Mond-Milito ol kun la hitlera reĝimo mem. Tamen pro la intima rilato de ambaŭ aferoj, li devis dediĉi sufiĉe da atento ankaŭ al la maniero kiel Hitlero kaj ĉi ties partio aliris al la politika povo de la germana ŝtato. Oni klasifikis lin kiel favora al la hitlerismo; eble veras tiu opinio sed rimarkindas ke se estas tia lia kazo, nedudeble li plenumas tiun rolon pli inteligent-maniere ol la du antaŭe menciitaj verkistoj; liaj libroj estas pli seriozaj kaj dokumentitaj, kaj oni povas legi ilin kun plaĉo kaj intereso, eĉ se iuj asertoj liaj estas diskuteblaj. Per siaj verkoj, ***Irving*** asertas ke ***Adolf Hitler*** sciis nenion pri la ekstermado de la judoj. Ĉiukaze estas evidenta ke per siaj libroj, ĉi tiu aŭtoro klopodas prezenti la Führer-n sub favora lumo. Alia ideo kiun li esprimas



**David Irving kaj ties ampleksa verkaro**



per iu el siaj verkoj estis ke la Marŝalo ***Rommel*** ne estis implikita en la atenco kontraŭ Hitlero de la 20-a de julio de 1944. Li polemikas kun aliaj specialistoj pri diversaj aspektoj de la hitlera epoko kaj de la mond-milito. Inter liaj pri-diskutitaj opinioj estas tiu ke la fama «Taglibro de ***Anna Frank***» estas falsaĵo, t. e. ne reale verkita de tiu juda junulino. Eble liaj vidpunktoj estas, iamaniere, reago al la troa kontraŭ-hitlera literaturo verkita en Britio, kaj ĝenerale en la tuta mondo, post la mondmilito. Oni scias ke la historio ĉiam estas skribata de la venkintoj. Persono kiu volas esti ĝuste informata devas prikonsideri ĉies argumentojn kaj rifuzi antaŭjuĝajn pripensojn. Tiorilate la verkaro de ***David Irving*** rajtas esti prikonsiderata kaj objektive taksata.

Se estas ne-germanaj intektuloj kiuj poziciiĝas favore al la naziismo, ne mankas ankaŭ germanoj kiuj staris/as kontraŭ tiu faŝismo. El tiutipaj intelektuloj estas kvazaŭ klasika ekzemplo la kazo de ***Sebastian Haffner*** (1907-1999). Ankaŭ lia verkaro estas tre ampleksa. Lia vera nomo estis ***Raimund Pretzel***. En 1938, pro lia politika opozicio al la naziisma reĝimo, li elmigris al Anglio kune kun sia juda fianĉino. Tie li laboris kiel ĵurnalisto por ***The Observer*** kaj alprenis la pseŭdonimon ***Sebastian Haffner*** por eviti ke sia familio en Germanio estu viktimo de reprezalioj. Dum sia ekzilo li estis radikala oponanto kontraŭ Hitlero kaj multe verkis pri la germana historio de la 19-a kaj 20-a jarcentoj. En 1939 li verkis tiun kiu eble estas sia plej grava libro: *Historio de iu germano*, sed ĝi estis publikigita nur post lia morto. Li revenis en Germanion en 1954 kaj kunlaboris en kelkaj ĵurnaloj


**Sebastian Haffner**
**Kaj ties verkaro**




de Maldekstraro. En 1980 oni aljuĝis al li la premion ***Johann-Heinrich-Merck-Preis***. Pri la temo de la faŝismo, lia plej grava skribaĵo estas la eseo: **Anmerkungen zu Hitler** (Notoj pri Hitlero). Per ĝi, ***Haffner*** ĝisfunde analizas kaj kritikas la penson de la **Führer** kaj montras la politikan limon kaj la kontraŭdirojn de la hitlera politika projekto. Lerte li montras ke la hitlera politika teorio registrita en **Mein kampf** enportas la kontraŭdiron ke unuflanke Hitlero kunvokas ĉiujn popolojn de la tero por forbalai la judojn kiel ĝenerala malamiko de la homaro, sed aliflanke li ne kaŝas sian planon submeti ĉiujn popolojn de la tero al la povo kaj la ekspluatado far la arja raso kaj la germana popolo. Iu ideo de ***Haffner*** kiu vekis egan polemikon estis tiu ke, nevole, Hitlero, per ties persekutado al la judoj, fakte, estis la ĉefa faktoro kiu ebligis la kreadon de la Israela ŝtato 19 jarcentojn post la malapero de la antikva regno de Judujo far la romianoj.

Temante pri alitipaj verkistoj, nun ni priatentu la verkaron de hispanoj kiuj pritemis la frankisman diktaturon. Kiel sciate, la frankisma reĝimo, kiu estis kreitaĵo de la potencaj faŝismoj de Italio kaj Germanio, supervivis ĉi tiujn dum multaj jaroj. Do, ĝi estis studobjekto de diversaj fakuloj pri politika temaro; ni recenzos iujn el ili. Komence ni iome atentu pri la verkaro de ***Rafael Calvo Serer*** (1916-1988). Ĉi tiu estis Profesoro pri Historio de Hispana Filozofio kaj Filozofio de Historio en Hispanio, kaj elstara membro de ***Opus Dei***, opozicia al la frankismo ekde la 1950-aj jaroj. Estas interesa lia politika kaj intelekta evoluo ekde pozicioj favoraj al la reĝimo de Franko, en kies kulturaj institucioj li kunlaboris dum kelkaj jaroj, al opozicio favore al demokratio. Ekde 1966, ***Rafael Calvo Serer*** kontrolis la ĵurnalon ***Madrid***. De tiu momento la gazeto iĝis referenco de la emo al politika evoluo ĉe la krepusko de la diktaturo. Ĝi estis la plej elstara gazeto de la tiel nomata "sendependa presaro" kiu karakterizis sin per la esprimo de siaj propraj ideoj, ofte tre kritikemaj pri la reĝimo, subtile postulante pli grandan demokratian malfermitecon kaj pli bonan defendon de individuaj liberecoj kaj rajtoj. Ĉi tiu redakcia linio kaŭzis al ***Calvo Serer*** seriozajn problemojn kun la reĝimo. Artikolo lia publikigita en 1968, postulante la forigon de Francisko Franko el la povo, kaŭzis la ĉesigon de la gazeto dum du monatoj; poste ĝi estis fermita la 25an de novembro 1971. En novembro 1971, ***Calvo Serer*** devis ekziliĝi rezulte de la publikigo en la ĵurnalo ***Le Monde*** de lia artikolo titolita *Moi, aussi j'accuse*, en kiu li kritikis la frankisman reĝimon. Tiu publikigo igis lin esti procesita en Hispanio. Dum lia ekzilo en Parizo, li partoprenis en la kreado de la Demokrata Komitato, kontraŭfrankisma koalicio impulsita de la Komunista Partio de Hispanio, subgvide de ***Santiago Carrillo***, kaj la liberalaj monarkiistoj, kiuj subtenis la reĝecan pretendon de Johano de Burbono. El la ampleksa verkaro de ***Calvo Serer*** ni speciale atentas pri tiu kiu plej rilatas al nia afero, lia libro: *Franko antaŭ la Reĝo*. Ĝi estis verkita en epoko kiam ankoraŭ la rilato de la aŭtoro kun la reĝimo ne estis rompita, sed havis ian fundon de kritiko al la persisto de la diktaturo de Franko. Tiam jam ***Calvo Serer***



**Rafael Calvo Serer**






**Santiago Carrillo kaj iu el ties verkoj**

apogadis la pretendon de Johano de Burbono. La libro utilas por tiuj kiuj volas koni la internaĵojn de la frankismo kaj ĉi ties evoluo dum la jar-periodo 1939 al 1969.

Alia hispano kiu devis verki deeksterlande pri la hispana diktaturo estis ***Santiago Carrillo*** kiu, de 1960 al 1982, rolis kiel Ĝenerala Sekretario de la Hispana Komunista Partio. En la plenumado de la koncernaj funkcioj de tiu posteno li devis organizi la agadon de la sekretaj aktivuloj de la partio en la cirkonstancoj de eksterleĝeco de la partioj, ĉefe de maldekstraro, en la frankista Hispanio. Decido lia estis meti finon al la aktivado de la gerilanoj en la lando, kaj haltigi la invadon de la gerilo en la Valo de Arano en 1944. Sub lia gvido la kompartio ŝanĝis sian stategion por kontraŭbatali la diktaturon, kaj la komunistoj komencis agadi interne de la sola oficiala sindikato kreita de la frankismo. En tiu epoko la sola organizita forto kiu aktivadis en Hispanio kontraŭ la reĝimo de Franko estis tiu Komunista Partio, do, ĉiu hispan(in)o kiu volus ion fari kontraŭ la faŝismo nepre aliĝis al tiu partio eĉ ne estante komunist(in)o. ***Santiago Carrillo*** verkis multajn librojn, plejparte el ili en Hispanio jam post la morto de la diktatoro kaj restarigo de la demokratio en la lando. Sed por la studo de la diktaturo pli interesas tiuj kiujn li verkis en Francio preparante la post-frankismon. Pri tiu temo elstaras: «*Después de Franco, ¿qué?*» (Post Franko, kio?), kaj «*Mañana, España*» (Morgaŭ, Hispanio). Ĉi lasta estas serio da konversacioj kun ***Régis Debray*** kaj ***Max Gallo***. Kompreneble, la disvastiĝo de tiuj libroj, same kiel la verkoj de ***Marks***, ***Lenin*** kaj aliaj aŭtoroj de maldekstraro, en Hispanio, estis sekreta, eksterleĝa.

Pri la frankismo konkrete kaj la faŝismo ĝenerale oni multe verkis en Hispanio ankaŭ post la malapero de la diktaturo. Iu libro kiu pritemas diversajn aspektojn de la frankisma diktaturo estas tiu titolata: «*40 años con Franco*» (Kvardek jaroj kun Franko). Ĝi prezentas la laboron de kelkaj aŭtoroj sub la kunordigo de la historiisto ***Julián Casanova***.

***Carlos Gil Andrés*** pristudis tion kion li nomis "la

aktoroj”: personoj kiel ***Arias Navarro***, ***Carrero Blanco***, ***Manuel Fraga***, ***Santiago Carrillo***, ***Pilar Primo de Rivera***, ***Serrano Súñer***…

***Mary Nash*** disvolvis la temon: *Venkitaj, reprezaliitaj kaj rezistantaj: la virinoj sub la frankista patriarkeca ordo*, per kiu ŝi priskribis la situacion de duarangeco de la virinoj en la reĝimo de F. Franko, sen la malmultaj civitanaj rajtoj kiujn ĝuis la viroj, enfakigitaj en la rolo de edzinoj kaj patrinoj, kun malfacilaĵoj aŭ neeblo en multaj kazoj, havi propran laboron for el la hejmo.

***Borja de Riquer*** pritemas la krizon de la diktaturo, t. e. la lastajn ses jarojn de la vivo de Franko. La okazintaĵoj de tiu sesjaro, laŭ li, eksplikas kial la reĝimo ne povis daŭri post la morto de la diktatoro: la mobilizado de gestudentoj, la skandaloj pri koruptado (afero MATESA), la kontraŭdiroj inter la politikaj fortoj de la reĝimo (reformistoj kontraŭ ultrakonservistoj), emo al separatismo en iuj regionoj, ETA-terorismo, kontraŭfrontiĝo kun la Eklezio rezultinta el la Vatikana Koncilio, dissaltigo de ***Carrero Blanco***, falo de la portugala kaj la greka diktaturoj, krizo de la Saharo tiam kontrolata de Hispanio…

Alia el la kunlaborantoj en tiu verko, ***Agustín Sánchez Vidal***, koncentriĝis sur la temo de la hispana filmografio dum la diktaturo. Krom montri la malfacilaĵojn ekzistantajn por la disvolviĝo de tiu industrio kaj la evoluo de tiu arto en Hispanio dum tiuj jardekoj, meritas apartan atenton la cenzuro efektivigata ekde la sferoj de la politika povo, kaj la altrudo de la t. n. NO-DO, inform-filmetoj, fakte propagando de la reĝimo, kiujn dum multaj jaroj estis devige prezentataj al la publiko antaŭ ĉiu filmo.

La temo disvolvita de ***Ángel Viñas***, en ĉi tiu verko titoliĝas: *Gloraj jaroj, obskuraj jaroj, epoko de krizo*. Per ĝi, ĉi tiu historiisto prikribas la evoluon de la frankisma reĝimo ekde pozicioj ne akceptindaj por la venkintoj de la MondMilito kaj aŭtarkismo en la ekonomia tereno, al internacia agnosko, ekde 1953 per la subskribo de la Konkordato kun la Papa Sidejo kaj la pakto kun Usono, kaj 1955 per la akcepto de Hispanio en la UNO. Poste venis la ŝanĝoj en la ekonomio, al kiuj komence sin oponis Franko, sed poste evidentiĝis grava faktoro por la pluvivado de la reĝimo. Sed en la politika tereno la reĝimo restis kondamnita pene rezisti dum la vivo de la diktato-


***Julián Casanova***


***Agustín Sánchez Vidal***



***Ángel Viñas***


***Paul Preston***


***Enrique Moradiellos***



Mary Nash



Carlos Gil Andrés



Borja de Riquer




José CarlosMainer



Ignacio Martínez de Pisón

ro por poste ne daŭri multe plu. Alia rezigno kiun la frankismo devis fari, kaj tio multe pli antaŭ ties finiĝo, estis ĝia alvokiĝo al imperiisma ekspansio; male, ĝi eĉ devis cedi la suverenecon kiun estis ĝuinta en afrikaj teritorioj.
La temo pritraktata de **Paul Preston** titoliĝas: *Mitoj, mensogoj kaj manipulado*. Ties studo adresiĝas al la psikologio de F. Franko. Eĉ agnoskante la lertecon de la diktatoro, kiu permesis al li konservi la povon en malfacilaj por li politikaj cirkonstancoj, la aŭtoro de ĉi tiu eseo montras la homan deficiton de la personeco de tiu ulo: lian malkapablon elteni normalan rilaton de amikeco kaj lojaleco kun siaj kunlaborantoj, liajn kompleksojn, la mitojn kiuj movigis lin, liajn ridindajn ideojn pri ekonomia teorio…
Siaflanke, **Enrique Moradiellos** sub la titolo: *Franko kaj la frankismo en inko sur papero: rakontoj pri la reĝimo kaj ĝia ĉefo*, intencas difini la naturon aŭ tipologion de politika reĝimo kiu ŝanĝiĝis kaj evoluis dum kvardekjara periodo. Konstatinte ke en la frankismo estis malsamaj etapoj, kaj aspektoj diversaj kiuj kunekzistis en sama etapo, la klasifiko estas komplika se oni ne prikonsideras ke ĉiukaze la karaktero de la reĝimo estis intime ligita al la personeco de la estro, kaj tio eksplikas la neeblon je pluekzistado de la reĝimo post la malapero de la homo kiu enkarnigis ĝin.
**José Carlos Mainer** verkis la parton titolitan: *Literaturo kaj ideoj sub (kaj kontraŭ) la frankismo*. Esence, el la studo de tiu historiisto oni eltiras ke la literaturo havis dum la frankismo saman entrudiĝon el la politika povo kiel la kin-arto. Kompreneble, la tipo je akceptinda materialo variis laŭ la malsamaj cirkonstancoj de la diversaj etapoj de la reĝimo, dependante de la internacia realaĵo. Evidente, la literaturo kontraŭ la reĝimo devis esti eksterleĝa aŭ esprimiĝi duonkaŝe per komiksoj.
Fine, **Ignacio Martínez de Pisón**, sub la titolo: *Kvardek jaroj sen Franko*, la aŭtoro analizas ne la diktaturon mem sed la sekvajn kvar jardekojn sub la lumo de la influo de kaj reago kontraŭ la frankismo: La puĉo-intenco de la 23-F, la ĉeso de la ETA-terorismo, la procezo de la t. n. "historia memoro"… Ĉi teksto ŝajnas esprimi la esperon ke en la hispana socio estos ne-ripeteblaj la eraroj de la civilmilito kaj la diktaturo.
Ĉiuj menciitaj partoj de tiu libro prezentita kaj kun-

ordigita de ***Julián Casanova*** enportas bibliografion de ili studatan, kio alportas liston de serio da pliaj verkoj temantaj pri la afero de la frankista faŝismo.
Alia hispano kiu sufiĉe verkis pri la historio de la frankisma reĝimo estis ***Ramón Serrano Súñer***. Lia kazo estas speciale interesa ĉar li mem estis grava protagonisto de la historio kiun li prirakontas. Li estis ministro de la unuaj registaroj de F. Franko. Oni primoke nomis lin "la bofratego" ĉar li estis bofrato de Franko, kiu igis nomi sin "la generalego". Pro lia ega interveno en la aferoj de la frankisma reĝimo, dum la civil-milito kaj dum la unuaj jaroj de la mond-milito, lia agado estis objekto de granda intereso de la historiistoj temantaj pri tiu epoko. Do, krom la libroj verkitaj de li mem, ĉefe biografiaj, estas tiuj verkoj de historiistoj kiuj temas pri li. Eĉ estas iu kiu temas pri iu am-afero kiun li havis kun iu aristokratino, el kiu naskiĝis iu filino.
***Serrano Súñer*** aperas en la fotoj kaj filmoj kiujn oni faris okaze de la renkontiĝo de Franko kun Hitlero en ***Hendaya*** en oktobro de 1940, kaj kun Mussolino en ***Bordighera*** en februaro de 1941, ĉar en tiu epoko li estis rolanta kiel Ministro pri Eksteraj Aferoj de la registaro de Franko. Kiel sciate, la faŝistaj lideroj de Germanio kaj Italio intencis tiam treni Hispanion en la militon en kiu ili estis enkotigitaj en Rusujo, en Norda Afriko kaj aliaj lokoj. ***Serrano Súñer***, granda simpatianto de la potencoj de la «Akso Romo-Berlino», penis konvinki sian bofraton por tiu milita interveno. Sed la ruina stato de Hispanio post la civil-milito ne konsilis tiajn aventurojn. Krome tiam Franko ne vidis verŝajna la venkon de la faŝistaj potencoj. Do el Hispanio oni asignis nur la sendon de iu divizio da volontuloj, la t. n. «Blua Divizio» por batali en Rusio. La bofratego estis elpostenigita kiam iĝis evidenta la milita fiasko de Germanio kaj Italio. Krome li estis implikita en internaj bataloj de la klanoj de la frankismo: falangistoj, monarĥiistoj… Dum la cetero el lia longa vivo (li mortis en 2003, estanta 101-jara) li ne plu havis politikan aktivadon. Li dediĉiĝis verki siajn memoraĵojn sed ne publikigis ilin ĝis






***Ramón Serrano Súñer*, "la bofratego", ties verkaro, kaj verkoj pri li**



post la morto de «la generalego». Per siaj verkoj li intencis malgrandigi sian respondecon pri la aferoj de la diktaturo kaj modere kritikis sian bofraton.


Alia eksministro kiu verkis pri la frankisma epoko estis ***Ricardo de la Cierva*** (1926-2015), sed li estis ministro ne de Franko sed de iu registaro de ***Adolfo Suárez***, la politikisto kiu entreprenis la procezon de transiro el la diktaturo al la demokratio. ***Ricardo de la Cierva*** havis universitatan doktorecon pri historio, kaj dum la diktaturo de Franko rolis en kelkaj oficialaj postenoj de la ŝtat-aparato ĉiam en rilato kun la temo de la kulturo ĝenerale kaj la historio konkrete. Lia unua publikigo estis jam dum la frankismo, en la jaro 1966, per la verko: *Cent bazaj libroj pri la milito en Hispanio*. De tiam, li publikigis ne malpli ol 68 librojn, ĝis la jaro 2009. En tiu longa listo aperas titoloj kiel: *Historio de la hispana civil-milito; Francisco Franco, unu hispana jarcento; Historio de la frankismo; Historio de la socialismo; Militista historio de Hispanio; Franko; Jezuitoj, Eklezio kaj marksismo, la teologio de liberigo senmaskigita; La tria templo, kio estas la cionismo en la historio de Israelo; Carrillo mensogas, 156 dokumentoj kontraŭ 103 falsaĵoj; La falĉilo kaj la kruco, apogeo kaj falo de la teologio pri liberigo; Templanoj, la kaŝita historio…*

Ne lia tuta verkaro temas pri la frankismo sed estas libroj de tiu aŭtoro ankaŭ pri aliaj epokoj kaj temoj de la historio de Hispanio kaj eĉ universala, sed ĉiam li interpretas la historion kaj ĉiujn aferojn de konservativa vidpunkto, defendante la interesojn de la superregantaj klasoj: la aristokrataro kaj la burĝaro. Li insistis kulpigi ***Carrillo***-n pri iu masakro okazinta dum la civil-milito (***Paracuellos***) kie estis murdita lia patro far komunistaj milicianoj. Alia manio lia estis tio ke la ŝanĝoj okazintaj en la Eklezio rezulte la la 2-a Vatikana Koncilio estas laŭ inspiro de la framasonaro kaj la marksismo. Tradicia katoliko kia li estis ne povis koncepti ke la rehavo de la instruo de la Majstro Jesuo de Nazareto nepre devas pli simili al la masonara kaj marksista ideario ol al la eklezia tradicio de la inkvizicio kaj la kruc-militoj.




***Ricardo de la Cierva*** **kaj ties verkaro**



Same konservativa kaj eĉ pli akademie malrigora estas la verkaro de alia hispana aŭtoro ankoraŭ vivanta, ***Pío Moa***. Li travivis ian kuriozan personan evoluon. Junaĝe li estis komunista kaj eĉ terorista aktivulo; dum kelkaj jaroj li partoprenis en la kontraŭfrankisma opozicio kiel unu el la membroj de la marksista-leninista terorista organizo GRAPO. Forpelita el tiu organizaĵo en 1977 kaj kondamnita al unujara mallibereco en 1983 pro lia partopreno en la murdo al iu gardisto, lia pens-maniero evoluis ĝis konservativaj pozicioj kaj defendo de multaj aspektoj de la diktaturo de Franko. Laŭ ***Moa***, la demokratia ideologio en Hispanio estas heredaĵo de la frankisma reĝimo, kaj ne de la respublika maldekstro, kiun li nomas totalisma.

Male ol ***Mauricio Carlavilla*** kaj ***Ricardo de la Cierva***, kies verkaron ni jam menciis, kaj kiuj defendis la frankismon tia kia ĝi reale estis, kun ties krimoj kaj diktatoreco, kiujn ili penis pravigi, ***Pio Moa***, tamen, defendas kaj eĉ laŭdas ian frankismon kiu ekzistas nur en lia menso. Laŭ li, la demokratiaj valoroj, tiaj kiaj estas nun konceptataj en la hispana socio, estis generitaj dum la frankismo. Sed li ne agnoskas ke tiuj sentoj kaj ideoj generiĝis ĝuste kiel reago kontraŭ la faŝista reĝimo de Franko. ***Moa*** subtenas la strangan ideon ke estis Franko mem la kreinto de tiu demokratio, kiu, fakte, ekzistis jam dum ties regado. Por subteni sian strangan tezon, li per preskaŭ ĉiuj siaj libroj insistas ĝisnaŭze pri la kontraŭdemokratia karaktero de la revolucio de 1934. Lia prihistoria kono ne sufiĉas por ke li komprenu la situacion de tiu epoko, kiam en Eŭropo unu lando post alia estis falante en faŝismajn diktaturojn, kaj en Hispanio ĉio indikis ke post la pribalota venko de la dekstraro en 1933 oni estis ekirante saman vojon.



Eble la verkaro de ***Moa*** celas trompi la junajn generaciojn, kiuj ne konis la frankismon. Tiuj ni kiuj travivis tiun epokon scias ke vortoj kiel “socialismo”, “pres-libero”, “religia libero”, “seks-libero”, “partioj”… estis malpermesitaj en la frankismo, kaj devis morti la diktatoro por ke konkretiĝu en la realon tiuj konceptoj.







Pío Moa kaj ties tendenca verkaro


# La faŝismo en la kino

La ekspansio kaj plifirmiĝo de la reĝimo de Mussolino, dum la 20-aj jaroj, koincidis kun la disvolviĝo kaj perfektiĝo de la kina tekniko, ekde la silentaj, sensonaj filmoj de la jaroj 1922-1929, pasante tra ĉiuj etapoj de la plibonigo de la kin-arto, ĉiam serve de la propagando favore al la faŝismo. En la jaro 1929, la jam firme starigita faŝista administracio ŝtatigis la kin-agentejon, LUCE (*L'Unione Cine-matografica Educativa*), kreita en 1924, por dediĉi ĝin al la politika propagando enfazante la aliĝon al la lidero kaj al la ideologio de la reĝimo. En 1935, ankaŭ serve de la propagando, estis kreita la *Ente Nazionale Industrie Cinematografiche* (ICE). *La Giornale Luce*, laŭ dispozicio de la *Duce*, estis devige projekciata en ĉiuj kinejoj de la lando: Ĝi prezentadis al la itala publiko informon pri la tiamaj eventoj: milito de Etiopio, tiu de Hispanio… En Interreto oni povas trovi kelkajn el tiuj filmetoj, ekzemple iun pli ol 12-minutojn daŭra, pri la kapto de Malago far italaj trupoj en februaro de 1937, kaj alia, pli longdaŭra, pri la **Parado de la Venko** de la frankistaj trupoj la 19-an de majo de 1939. Fakte, ĉiu disponebla film-materialo pri la Milito de Hispanio havas tian italan originon. Laŭ opinio de spertuloj pri tiu temo de la per-kina propagando, tiu de la itala faŝismo ne estis tiom efika kiom tiu de la germana faŝismo. La kin-raportoj de la *Giornale* provizadis pozitivan bildon kaj celadis konsenton. Tamen iliaj propagandaj celoj estis senefikaj ĝuste pro ilia malkaŝa propaganda intenco. Eĉ la altaj oficialuloj de la reĝimo ne konsentis pri ĝia administrado. Kiel asertis la ministro pri kulturo, ***Dino Alfieri***, «*la novaĵoj de Luce estas nenio alia ol seka fotografia listo da eventoj*».

Rilate al Germanio, memorindas ke la naziismo estis dek jarojn pli juna ol la itala faŝismo kaj ĝia politika propagando disponis, je ties komenciĝo, je pli disvolvigita kin-tekniko. Ĉiukaze, la nazia propagando estis pli kvalita kaj pli fajne ellaborita ol tiu de la itala faŝismo. Ni iome atentu pri du filmoj, ambaŭ reĝisoritaj de ***Leni Riefenstahl***, kiuj estas troveblaj en Interreto. Tiu titolita **Der Sieg des Glaubens** (La Venko de la Fido) daŭras iomete pli ol unu horon. La filmo estas prezentado de la Kvina Partia Kongreso okazinta en Nurenbergo de la 30-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro 1933. Temis pri propagando favore al la Nazia Partio, festante la venkon de la naziistoj atinginte la politikan povon kiam Hitlero estis nomumita kanceliero de Germanio en januaro de 1933. La filmo havas neniun komenton. La








agadoj kaptitaj inkluzivas bonvenigon de eksterlandaj diplomatoj, altrangaj partianoj kaj politikistoj, kiel ***Franz von Papen***, ĉe la nurenberga stacidomo, je la alveno de Hitlero al la flughaveno kaj lia renkontiĝo kun partiaj lideroj, la amasaj defiladoj de SA-trupo kaj la parolado de Hitlero pri la potenco de la partio kaj la dekjariĝo de la germana nacisocialisma movado. La bonvenigo inkluzivas paroladon de altranga ano de la Itala Faŝisma Partio, ***Arturo Marpicati***, kun transdonitaj salutoj de Mussolino. Ĝin sekvas la amaskunveno sur la vasta paradejo konstruita de ***Albert Speer***, kaj inkluzivas flugon de aerŝipo ***Zeppelin***, kun svastiko sur la vostnaĝilo. Estas ankaŭ aparta amaskunveno de Hitlera Junularo, kaj sekvas defilado de SA- kaj SS-trupoj tra la stratoj de la urbo. Ĉi tiu filmo estis poste cenzurita de la naziaj aŭtoritatoj kaj retiritaj ĝiaj kopiaĵoj ĉar en ĝi multfoje aperas apud Hitlero la tiama gvidanto de la SA, ***Ernst Röhm***, kiu estis poste likvidita kadre de la operacio «Nokto de la Longaj Tranĉiloj». La alia el la filmoj de ***Leni Riefenstahl*** estas tiu titolata: **Triumph des Willens** (Triumfo de la Volo), kiu havas daŭron je 1 horo kaj 50 minutoj. Ĝi estas tre simila al la antaŭa, kun samaj programeroj, en la sama urbo. Ĝi kronikas la Nazian Partian Kongreson de 1934 en kiu partoprenis pli ol 700.000 naziaj subtenantoj. La filmo enhavas eltiraĵojn de paroladoj de naziaj gvidantoj ĉe la Kongreso, inkluzive de Hitlero, ***Hess*** k. a. intermetitaj kun bildoj de amasaj marŝadoj de SA- kaj SS-trupoj kaj entuziasma publiko. Ĉar la filmo estis farita post la «Nokto de la Longaj Tranĉiloj» (la 30an de junio de 1934), multaj elstaraj SA-membroj forestas ĉar ili estis murditaj en tiu partia purigo.

En ambaŭ priskribitaj filmoj, la "kongresoj" pli similas mitingoj kun idol-kulto al la lidero: laŭdado de ĉiuj parolantoj al la **Führer** kaj aklamado de la amasoj al Hitlero dum ĉi ties diskursoj pri la unueco de la patrujo kaj ties glora destino, disdegnante la koncepton de klasaj diferencoj. La sama kin-direktorino ***Leni Riefenstahl*** reĝisoris ankaŭ la faman filmon pri la Olimpi-Ludoj de 1936 en Berlino.

Ankoraŭ dum la epoko de la faŝista kaj nazia reĝimoj, sed jam dum la mond-milito, oni faris filmojn pri ili ankaŭ for de la faŝima medio. Ni prirecenzos du filmitajn en Usono, ambaŭ komikaj, satiraj t. e. ridindigante tiujn reĝimojn.


Unu el ili estas la titolita «**The Great Dictator**» (La Granda Diktatoro); estas filmo el 1940 kun scenaro, reĝisorado kaj aktorado de ***Charles Chaplin***. Ĉi tiu estis lia unua parolata filmo. La verko estas furioza kondamno de la naziismo, la faŝismo, la kontraŭjudismo kaj ĉiuj diktaturoj ĝenerale. Dum ĝia filmado, Usono ankoraŭ ne estis ekmilitinte kontraŭ la Nazia Germanio. ***Chaplin*** ludas ambaŭ ĉefajn rolojn: tiun de senkompata nazia diktatoro kaj tiun de persekutita juda barbiro. La filmo estis proponita por kvin premioj ĉe la 13-a Ĉiujara Oskaro, sed atingis neniun. ***Chaplin*** preparis la scenaron laŭlonge de 1938 kaj 1939, kaj ekfilmis ekde septembro de tiu lasta jaro, semajnon post la eksplodo de la dua mondmilito. La filmado finiĝis preskaŭ ses monatojn poste. Iuj anonc-tabuloj en la getaj fenestroj de la filmo estas skribitaj en Esperanto, lingvo kiun Hitlero kondamnis kiel juda komploto internaciigi kaj detrui la germanan kulturon, eble ĉar ĝia fondinto, ***L. L. Zamenhof***, estis pola judo.







La filmo **To be or not to be** (Esti aŭ ne esti) estis prezentita en la jaro 1942. La titolo estas referenco al la fama monologo "Esti aŭ ne esti" en la teatraĵo «Hamleto» de Ŝekspiro. Ĝi estis reĝisorita de ***Ernst Lubitsch*** kaj ĉefroligita de ***Carole Lombard***, ***Jack Benny***, ***Robert Stack***, ***Felix Bressart***… La intrigo koncernas grupon de aktoroj en Nazi-okupata Varsovio, kiuj uzas siajn kapablojn alivestiĝi kaj agante por trompi la okupantajn trupojn. La celo de la filmo estis, iusence, ridindigi la Hitleron kaj la naziistojn, kaj ***Lubitsch*** uzas mirigan mokadon por la epoko, per la abundo de scenojn kun duobla senco. La scenaro de la filmo estis adaptita el la rakonto de ***Melchior Lengyel***. En la jaro 1996, ĝi estis elektita por ties konservado en la Nacia Filmregistro de Usono fare de la Biblioteko de Kongreso kiel "kulture, historie aŭ estetike signifa".


















Inter la kino farita de iu faŝisma reĝimo pri si mem, estas menciinda la hispana kolekto nomata **NO-DO** ***Noticiario y Documentales Cinematográficos*** (Kinaj Informoj kaj dokumentaroj). Temis pri propagand-cela informilo de la frankisma reĝimo kiun oni projekciadis en la hispanaj kinejoj antaŭ ĉiu ajn alia filmo inter la jaroj 1943 kaj 1981. Antaŭ la jaro 1943 oni projekciis italajn kaj germanajn inform-filmojn, sed laŭ la evoluo de la mond-milito kaj la politika neceso distanciĝi el la potencoj de la Akso, la hispana regantaro decidis krei sian propran film-informilon.

La materialo elmontrita de tiu informilo estis pri tutmondaj eventoj, sed ĉefe pri enlandaj aferoj, kaj en ĉiu eldono abundis ĉiam bildoj kaj raportoj de la ŝtatestro ***Francisco Franco***. Fakte, la sola celo de tiuj filmetoj estis diskonigi favoran bildon de la politika reĝimo kiun la hispanoj "ĝuis" en tiu longa epoko. Krom la ĉefa rolo de la figuro de la diktatoro la temaro rilatis al la paco kiel venko, memor-festoj de la patrujo, la ĉeesto de la katolika eklezio aŭ la vizitoj de internaciaj personoj. Estis informo ankaŭ pri sportoj, taŭroludado, modelaj spektakloj, ornamado, arto, metioj aŭ folkloro. Tute mankis informo pri la hororoj de la civilmilito kaj ĝiaj sekvaj malriĉeco kaj mizero, aŭ la subpremado kaj malkontento de la loĝantaro, resume, ĉiuj novaĵoj, kiuj povus kontribui por doni negativan bildon de la faŝismo.

Dum la tuta vivo de la **NO-DO**, estis produktitaj 4.016 novaĵ-elsendoj (2.909 en nigrablanke, 908 miksitaj kaj 199 tute kolore) kaj 498 dokumentaj filmoj kolore kaj 1.219 nigrablanke. Ĉiu novaĵ-elsendo havis inter kvin kaj dek novaĵoj laŭ la periodo. Ĝia averaĝa daŭro estis proksimume dek minutoj.

Dum ĝia ekzistado **NO-DO** ĝuis ekskluzivecon rilate al raportoj elmontritaj en la kinejoj. En septembro de 1975, jam post la morto de la diktatoro, per Ministra Ordo, la projekcio de tiu film-informilo ne plu estis deviga. En decembro 2012, RTVE (Hispana Radio-Televido) ciferigis kaj lanĉis la kompletan **NO-DO** filmaron en sia retejo, tute alirebla por ĉiuj uzantoj el la tuta mondo kaj ne nur por esploristoj.




Pri la itala faŝista lidero, Benito Mussolino, aŭ aferoj en rilato kun li, oni faris kelkajn filmojn. Krom tio, kompreneble, estas ankaŭ multaj raportaj videoj kiujn oni povas trovi kaj vidi en Interreto. Tiu titolita: «Mussolino, la nekonata historio», estas televida etserio bazita sur la memoraĵoj de ***Vittorio***, filo de la diktatoro, kaj prezentas la tutan etapon ekde la kapto de la povo far la faŝismo ĝis la fino. Alia biografia filmo pri la *Duce* estas la titolita: «***Benito Mussolini – Private chronicles***» sed ĉi-kaze, kiel la propra titolo de la filmo indikas, oni pli atentas pri la privata vivo de Mussolino, sed prikonsiderante ankaŭ lian politikan rolon. Konkrete, iu interreta recenzo de prezentado de la filmo diras laŭtekste: «Benito Mussolino lernis legi estante kvarjara kaj povis ludi violonon antaŭ lia kvinjariĝo. Li diplomiĝis kun honoroj ĉe Bolonja Universitato en la aĝo de 18 jaroj kaj verkis romanon, kiu kaŭzis sensacion. Dum sia vivo Mussolino havis multenombrajn amaferojn kaj jaron antaŭ sia morto li igis pafmortigi sian bofilon. Per ĉi filmo oni spuras la eksterordinaran vivon de Mussolino, de lia ascendo por iĝi unu el la plej potencaj gvidantoj de la dua mondmilito ĝis lia sanga falo: lia vivo finiĝis kiam li estis mortpafita kune kun sia plej freŝa amatino en 1945. Vidu kiele Mussolino leviĝis per politikaj intrigoj por iĝi la gvidanto de Italio kaj kiele li fariĝis mastro pri manipulado kiel unu el la plej proksimaj aliancanoj de Hitlero».

Krom tiuj filmoj, kiujn ni povas difini kiel "dokumentaj", estas ankaŭ la aliaj, laŭ la normala skemo de farado surbaze de ellaborita scenaro, pli malpli ĝusta, kaj kun rolado de geaktoroj por enkarnigi la historiajn personulojn, aŭ kun prezentado de pli malpli romaneca intrigo sur la historia fono de la faŝismo de Mussolino. Inter ĉitipaj filmoj ni povas mencii, ekzemple, tiun de la jaro 1960 titolitan: **Du virinoj**, kies ĉefaj geaktoroj estis ***Sophia Loren*** kaj ***Jean-Paul Belmondo***. Ĝi pritemas la historion de virino, kiu provas protekti sian filinon de la hororoj de la dua mondmilito. La historia fono de la intrigo estas Romo kaj ĉi ties ĉirkaŭaĵo en la epoko de la avancado de la aliancaj trupoj tra Italio, bombardado sur Romo…

La kvar-ĉapitra film-serio ***Mussolini and I*** (Mussolino kaj mi) metas la spektantojn antaŭ la bildo de la lasta etapo de la vivo de Mussolino kaj de la Dua Mondmilito, kiu estis malfacila tempo por Mussolino, ĉar li estis devigita pripensi senhelpe la neeviteblan malvenkon kaj malsukceson de la imperio, kiun li provis konstrui. Kiam li ne plu povis fidi al iu ajn, nur lia edzino ***Rachele*** kaj lia amantino ***Clara Petacci*** estis senkondiĉe lojalaj al li kaj provis protekti lin kontraŭ la intrigoj kiuj minacis lin. Surbaze de ĉi tiu premiso, la fikcio permesas la spektantojn enprofundiĝi en la intimecon de ĉi tiu ikoneca figuro, kvazaŭ partoprenante en la internaj konfliktoj, kiujn li devis alfronti dum tiuj tagoj en sia propra hejmo. La rakontado baziĝas sur dokumentaro de la Grafo Ciano.





Ĝuste pri Ciano, bofilo de Mussolino, kaj ties tragika fino, estas alia fama filmo de la jaro 1963: **La proceso de Verono**, kortuŝa rakonto pri ***Edda Ciano***, la filino de la itala diktatoro, kiu ne povis eviti la ekzekuton de sia edzo fare de la nazioj kaj kun la konsento de ŝia patro. Pri la sama temo estas iu film-serio de la jaro 2005, titolita: **La filino de Mussolino**.


**Mi, Mussolino**, estas la titolo de iu filmo de la jaro 2019 elpensita, reĝisorita kaj interpretita de ***Leo Bassi*** kun la celo alfronti tion, kio por la artisto estas klara reviviĝo de la ekstrema dekstraro en la mondo. Ĝi havas komikan intrigon sur la fikcio de reveno de la *Duce*, reveno kiu okazas en iu fama kvartalo de Madrido, ***Lavapiés***, la paradizo de progresuloj kun ĉinoj, pakistananoj, maŭroj... kaj li revenis, li diris, por senmaskigi la verajn faŝistojn, tiujn kiuj levis lin al la supro kaj poste lasis lin fali, la bankieroj. La filmo celas ridindige denunci politikajn teniĝojn de nia epoko kiuj stimulas kaj plifaciligas renaskiĝon de faŝismo.

Alia filmo, titolita **Vincere** (Venki) estas biografio de Benito Mussolino kaj raporto pri la progreso de faŝismo en Italio. ***Marco Bellocchio*** priskribas sian historian epopeon el la perspektivo de la vivo de iu amantino de la *Duce*, ***Ida Dalser***, kaj ŝia ekstergeedza filo. La centro de la intrigo estas la amafero de tiu virino paralela al la rilato, kiun Mussolino havis kun sia estonta edzino. La odiseado suferita de la ***Dalser*** por atingi la agnoskon de ŝia rilato kun la viro, kiun ŝi amis, por kiu ŝi fordonis ĉiujn siajn posedaĵojn kaj sian koron, same kiel la legitimecon de sia filo, agnoskita de Mussolino kaj kiun poste li intencis kaŝi.

Alia filmo pri iu el la multenombraj amaferoj de Mussolino estas iu titolita: **La amantino de Mussolino**. Ĉi-kaze temas pri la ĉefa kaj plej konata el la amantinoj de la *Duce*: ***Clara Petacci***. Estas itala filmo de la jaro 1984, reĝisorita de ***Marco Bellochio*** kaj la ĉefa aktorino, kiu ludis la rolon de la amantino de Mussolino estis ***Claudia Cardinale***. La originala titolo de la filmo estis ***Claretta***. Kiel sciate, ***Clara Petacci*** estis juna virino, kiu apartenis al riĉa kaj influa itala familio kaj kiu memvole decidis unuigi sian sorton kun tiu de la faŝisma diktatoro.


Ankaŭ pri la germana diktatoro ***Adolf Hitler*** estas abunda filmaro, kaj ankaŭ ĉi-kaze oni devas distingi inter la dokumenta materialo -konstituita el kunmetado de ekzistantaj filmoj de la epoko- kaj la filmoj bazitaj sur ellaboritaj scenaroj kaj perluditaj de geaktoroj. Inter tiuj de la unua tipo, estas, interalie, iuj pri la mondmilito en kiuj ofte aperas Hitlero kaj liaj trupoj kaj oficiroj, kaj oni informas pri la militaj operacioj. Tiuj filmoj estas videblaj en Interreto, en la kanalo ***YouTube***, en kelkaj idiomoj, ofte en la angla sed kun alilingvaj surskriboj. Estas ankaŭ iu dokumenta filmo titolita: **Hitlero kaj Stalino, historio de unu malamikeco**, kaj alia pri la politika kariero de ***Molotov***, tiama soveta Ministro pri Eksteraj Aferoj.










Per ambaŭ filmoj oni amplekse informas pri la german-soveta pakto de 1939 kaj pri la posta militado inter ambaŭ potencoj. Sed estas speciale menciinda la ses-ĉapitra film-serio titolita: **Hitlero, la kompleta historio**. Ĝi estas sufiĉe ampleksa raportado (preskaŭ 5 horoj) de la biografio de la **Führer**. La film-serio estas trovebla en Interreto en la hispana lingvo interalie. Same trovebla en Interreto estas la tri-ĉapitra film-serio: **La obskura karismo de Hitlero**. Ĝi analizas la rilaton de la nazia lidero kun la germana popolo. ***Adolf Hitler*** trenis sian landon al ruino, lasante malantaŭ si spuron de morto kaj enorma detruo. Ĉi tiu dokumenta serio analizas, per atestoj kaj arkivaj bildoj, la liderecan rilaton kun la homoj kiujn li gvidis dum la dua mondmilito, kaj esploras la diktatoran personecon serĉante respondojn al diversaj nekonataj aferoj pri la **Führer**. Alia film-serio estas tiu de du ĉapitroj titolita: ***Adolf Hitler* – La historio neniam rakontita**. Ĉi tiu filmaro estas sufiĉe ĝusta eksplikante la kialojn kaj la celojn de la naziismo kaj la maniero kiel la naziistaj hierarkoj entreprenis la plenumadon de ties planoj. La dua ĉapitro pritemas ankaŭ la atencon kiun iuj germanaj militistoj faris kontraŭ la **Führer** la 20-an de julio de 1944. Inter la pliaj multaj dokumentaj filmoj kaj videoj pri la sama temo ni mencias, fine, tiun materialon de famaj inform-societoj kiel ***National Geographic*** kaj ***The History Chanel***. Al la unua apartenas la du-ĉapitra serio: **Apokalipso. La ascendo de Hitlero**, kaj al la dua: **Nazia Germanio – Ascendo kaj falo de la Tria *Reich***. Ambaŭ agentejoj havas ege da filma materialo de la epoko; kiel sciate, la kin-tekniko estis jam konsiderinde disvolvigita en la unua duono de la 20-a jarcento, do oni faris sufiĉe da filmado pri la tiamaj eventoj en rilato kun la faŝismaj reĝimoj.


Krom la filma dokumenta materialo pri la naziismo ĝenerale, estas ankaŭ la filma raportado kiun oni faris pri la mondmilito. Inter ili, ni reliefigas, unue, tiun 26-ĉapitran serion: **La mondo en milito**. Ĝi pritemas, krom la milito mem, ankaŭ la eventojn kondukantajn al ĉi tiu kaj tiujn okazintajn tuj poste. La serio, produktita de ***Jeremy Isaacs***, verkita kaj kunproduktita de ***Peter Batty***, ofte estis konsiderita la plej bona kaj definitiva dokumenta filmo pri la historio de la dua mondmilito farita por televido. Ĝi ankaŭ prezentis maloftajn kolorajn filmajn bildojn pri iuj eventoj de la milito. Ĉiu el la

26 ĉapitroj daŭras proksimume 52 minutojn. Por la realigo de la serio, estis intervjuitaj gvidantoj de la aliancanoj kaj de la Akso Romo-Berlino, inkluzive ankaŭ ĉeestintajn raportojn pri civiluloj kaj soldatoj, oficiroj kaj politikistoj, inkluzive de ***Albert Speer***, ***Karl Dönitz***, ***Walter Warlimont***, ***James Stewart***, ***Bill Mauldin***, ***Curtis LeMay***, ***Toshikazu Kase***, ***Mitsuo Fuchida***, ***Minoru Genda***, ***Brian Horrocks***, ***Lawrence Durrell***, ***Arthur Harris***, ***Paul Tibbets***, ***Anthony Eden***, kaj historiisto ***Stephen Ambrose***. Kaj due, ankaŭ pri la milito, menciindas ankaŭ la film-serio: **Historio pri la 2-a mond-milito**. Ĉiu el ĝiaj ok ĉapitroj daŭras proksimume 54 minutojn. Ĝia enhavo estas kvalita de informa vidpunkto. Notindas ke tiuj filmkolektoj havas britan aŭ usonan originon. Ĉi tio signifas ke la historia prezentado de la prirakontataj eventoj estis farita de vidpunkto de la aliancaj venkintoj de la mond-milito, tio estas, kontraŭ la filozofio de la naziismo, sed ankaŭ de burĝa vidpunkto, tio estas, ankaŭ kontraŭ la socialista vidpunkto de la alia potenco potenco venkinta en milito: Sovetunio. Kaj ĉar la materialo estas alirebla per Interreto, konkrete per la ***YouTube***-kanalo, kiu prezentas siajn video-filmojn en diversaj lingvoj, oni povas vidi ankaŭ la komentojn en la koncerna lingvo, de vidintoj kiuj volis esprimi sian opinion pri la enhavo de la filmetoj. Do ni povis trarigardi la komentojn en la hispana lingvo, faritajn ĉefe de personoj el la hispanamerikaj landoj, kaj tio utilas al ni kiel faŝism-mezurilo, t. e. la ideoj esprimitaj per tiuj komentoj montras ke iome abundas la simpatiantoj de la naziismo en tiuj landoj, kaj tio estas strange ĉar laŭ la nazia rasisma ideologio la loĝantoj de tiu kontinento estas infra-homoj, simioj…

Temante pri la mond-milito, estas ankaŭ dokumentaj video-filmoj kiuj rilatas, ne al la tuta konflikto sed al konkretaj partoj el ĝi. Ekzemple, apartaj temoj estas: Stalingrado, ***Rommel*** kaj ĉi ties afrika kampanjo, la atenco kontraŭ Hitlero, la batalo de Berlino… Nu, pri batalado en Nord-Afriko, konkrete pri Rommel, estas kelkaj longaj filmoj en Interreto sed nur en la angla lingvo; en la hispana lingvo troveblas nur kelkminut-daŭraj videoj. Pri tiu grava germana militisto estas filmoj en la hispana, ne dokumentaj sed sen rilato kun la temo de la faŝismo. Pri la de Stalingrado tre abundas la dokumenta video-filma materialo. Kiel sciate, tiu batalo estis turno-punkto en la germana ofensivo kontraŭ Sovetio. Tie kapitulacis



la 6-a germana armeo en januaro de 1943, kaj de tiam la rusoj definitive pasis al ofensivo. El la 91.000 germanaj milit-kaptitoj nur 6.000 povis fine reveni al Germanio en 1955. Kelkaj el ili prirakontis siajn travivaĵojn en Stalingrado, kaj krome oni konservas ioman filmaron faritan tiam tiuloke; sur-baze de tiuj atestoj oni preparis tiun video-materialon alireblan per ***YouTube***.
Interalie, ankaŭ pri la fino de Hitlero kaj la batalo de Berlino ekzistas dokumentaj video-filmoj. Krome tiuj eventoj estas inkluditaj ankaŭ en la menciitaj ĝeneralaj film-kolektoj pri la milito. Krom tiu dokumenta materialo, estas ankaŭ la alia filmo-tipo, tiu de la kino-verkoj. Sed inter ili oni devas distingi inter tiuj kiuj celas provizi historian informon, t. e. alĝustiĝi al la faktoj kaj okazintaĵoj, kaj tiuj kiuj sur la historia fono prirakontas fikcian historion ankaŭ kun fikciaj protagonistoj; al ĉi tiu tipo apartenas la filmaj versioj de noveloj. Inter la temantaj pri Hitlero, apartenas al la unua tipo tiu du-ĉapitra titolita: **Hitler: The Rise of Evil** (Hitlero: La Ascendo de la Malbono). La serio montras la atingon de la politika povo far Hitlero. Unu el la centraj temoj de la filmo estas la influo, kiun ***Ernst Hanfstaengl*** havis sur Hitlero, kiu progresis en la politika tereno en la tiama Vajmara Respubliko ĝis sia firmiĝo kiel **Führer**, en 1934. Ĝi ankaŭ montras kiel iu ĵurnalisto nomata ***Fritz Gerlich*** kontraŭas dekomence la nacisocialismon. Elstaras la aktorado de ***Peter O'Toole*** ludante la rolon de ***Paul von Hindenburg***, kaj ***Peter Stormare*** kiel ***Ernst Röhm*** kaj ***Robert Carlyle*** kiel Hitlero. La unua komenciĝas en 1923, antaŭ la Munkena Puĉo kaj la ***Landsberg***-malliberejo, kiam Hitlero konstruis sian politikan karieron paŝon post paŝo, kiu unue kaptas la simpatiojn de la ĵurnalisto ***Fritz Gerlich*** kaj multaj aliaj, sed kiam estas konata lia kontraŭ-juda fundo kaj lia brutala malamo, iuj fariĝis kontraŭuloj kaj aliaj lojalaj anoj por lia ekrego kiel germana kanceliero en 1933. En la dua ĉapitro, post ***Landsberg***, Hitlero startas kun la subteno de kelkaj fideluloj kaj la agoj de la **Sturmabteilung** (SA) de ***Ernst Röhm***, kiuj helpis lin firmigi lian povon, gajnante parlamentajn seĝojn ĝis li opoziciu al la registaro de la Vajmara Respubliko.
Al la sama kino-tipo (dokumenta sed kino-arta, kun geaktoroj perludantaj rolon de historiaj personoj) apartenas kelkaj filmoj pritemantaj la eventon de la atenco kontraŭ Hitlero la 20-an de julio de 1944. Kiel sciate, en tiu dato, en la loko konata kiel "Lupa Kaverno" (tiama ĉefsidejo de la **Führer**, en Prusio) kaj dum tre grava kunveno, bombo eksplodis ĉe la piedoj de ***Adolf Hitler***. Tamen la diabla bonŝanco de la diktatoro igis lin suferi nur kelkajn gratvundetojn. La Operacio 'Valkirio', gvidata de kolonelo ***Claus Stauffenberg***, unu el la provoj meti finon al la Dua Mondmilito murdante ĝian instiganton, malsukcesis. La civilaj kaj militistaj implikitoj en la komploto estis poste arestitaj kaj ekzekutitaj. Ekzistas ne malpli ol kvar bonaj filmoj pri tiu temo. La unua, de la jaro 1955, titoliĝas: **Okazis la 20-an de julio**. Ĝi estas germana filmo kaj ties daŭro estas 80 minutoj. Ĉefaj geaktoroj estis: ***Bernhard Wicki***, ***Karl Ludwig Diehl***, ***Carl Wery***, ***Kurt***










***Meisel***, ***Erik Frey***, ***Albert Hehn***, ***Til Kiwe***, ***Jochen Hauer***, ***Annemarie Sauerwein***, ***Jaspar von Oertzen*** kaj ***Willy Krause***. Dua filmo pri la sama temo estis tiu usona de la jaro 1990, titolita: **Komploto por mortigi Hitleron**. Ĝia daŭro estas 89 minutoj; ĝia direktoro estis ***Lawrence Schiller*** kun scenaro de ***Steven Elkins***. La geaktoroj estis: ***Brad Davis***, ***Madolyn Smith Osborne***, ***Ian Richardson***, ***Kenneth Colley***, ***Michael Byrne***, ***Helmut Lohner***, ***Jonathan Hyde***, ***Rupert Graves*** kaj ***Jack Hedley***. La tria filmo pri tiu afero estis tiu titolita: **Operacio Valkirio**. Ĝi estas germana filmo de la jaro 2004, kun daŭro de 90 minutoj, reĝisorita kaj scenarigita de ***Jo Baier***. La ĉefaj geaktoroj estis: ***Sebastian Koch***, ***Christopher Buchholz***, ***Ulrich Tukur***, ***Hardy Krüger Jr***., ***Axel Milberg***, ***Olli Dittrich***, ***Stefania Rocca*** kaj ***Enrico Mutti***. Kaj fine, en la jaro 2008 estis la premiero de tiu filmo kiu sendube estas la plej grava pri tiu ĉi temo. Ĝia titolo estas: **Valkirio**, kaj ĝia daŭro: 124 minutoj. Reĝisoris ĝin ***Bryan Singer***, kun scenaro de ***Christopher McQuarrie*** kaj ***Nathan Alexander***. La geaktoroj estis: ***Tom Cruise***, ***Bill Nighy***, ***Carice van Houten***, ***Kenneth Branagh***, ***Tom Wilkinson***, ***Eddie Izzard***, ***Thomas Kretschmann***, ***Terence Stamp*** kaj ***David Schofield***. Pri tiu ĉi filmo ekzistas ampleksa rezenco en Esperanto en la ret-paĝo de **Astura Esperanta Asocio**, konkrete en la ret-adreso:
*https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/recenzoj/filmoj/valkiria/valkiria.html*

Pri la Batalo de Stalingrado ni jam indikis ke estas ege da dokumenta filma materialo. Nun ni pritemos la filmojn el kin-arto, t. e. tiuj faritaj kun ludado de geaktgoroj. Inter ĉi lastaj, kiel ni jam diris, oni devas distingi inter tiuj kiuj alĝustiĝas al la realaj historiaj faktoj, kaj tiuj kiuj estante aŭ ne filmaj adaptiĝoj de noveloj, ĉiam prirakontas fikciajn travivaĵojn de fikciaj protagonistoj, sed intencante respeguli la historian fonon de la rakonto. Nu, la filmoj pri la Batalo de Stalingrado, pro la propra naturo de la evento, povas aparteni nur al la laste menciita tipo; ĉi tie ne eblas prirakonti elstarajn personajn farojn; la protagonistoj de tiu batalo, ĉu rusoj kaj soldatoj de la germana armeo kaj ĉi ties aliancanoj, estis ege-nombraj anonimaj herooj kaj viktimoj kies persona tragika historio similas al tiu de ĉiuj ceteraj. Ĝi povas nur esti registrita en iu de la jam menciitaj dokumentaj filmoj, se la protagonisto supervivis por ĝin rakonti, aŭ esti novele

aŭ filme simbolita de fikciaj figuroj. Tiusence, filmojn pri tiu temo ni povas mencii sep, eble ekzistas pli, jen ili:
**Tagoj kaj noktoj.** Ĉi tiu estas la unua sovetia filmo pri Stalingrado. Filmita en 1944, ĝi baziĝas sur teatraĵo de la ikoneca sovetia verkisto ***Konstantin Symonov*** kaj rakontas la historion de la defendo de Stalingrado de aŭgusto ĝis novembro 1942, kiu estis la plej furioza batalperiodo. La filmo montras, ke "la veraj herooj, kiuj staris firme en Stalingrado, estis oficiroj kaj soldatoj de la Ruĝa Armeo", ne la Komunista Partio aŭ ĝiaj gvidantoj. Unu el la ĉefaj roloj en la filmo estis ludita de juna aktoro, ***Yuri Lubimov***, kiu poste fariĝis la reĝisoro de la legenda Moskva Taganka Teatro.
**La turno-punkto**. Soveta filmo de la jaro 1945, reĝisorita de ***Fridrikh Ermler***. Ĝi estas ia Kritika raporto pri la militaj bataloj, korŝira bildigo de la vivo de soldatoj malproksime de ilia hejmo, batalantaj en senkompataj kondiĉoj sur la malvarma rusa fronto, sen certeco pri la rezulto de la konflikto. La panoramaj bildoj de la pejzaĝoj kaj la malhelaj kaj troegaj sekvencoj de la dialogoj, kiuj estas la subskribo de ***Ermler***, estas bele plenumitaj kaj preskaŭ kompletigas la esprimojn kaj prezentojn de la aktoroj. La kreintoj de la filmo poste konfesis, ke la ideo krei ĝin aperis tuj post la sovetia venko en Stalingrado, kiu tiutempe ŝajnis miraklo. La filmo gajnis Grandpremion ĉe la unua Festivalo de Cannes en septembro 1946.
**La kuracisto de Stalingrado**. Germana filmo de la jaro 1958. Intrigo: 1943. La batalo de Stalingrado finiĝis. Batalionoj de germanaj kaptitoj estas kondukataj al koncentrejoj. En unu el ĉi tiuj tendaroj, la 5110/47, alvenas la milita kuracisto ***Fritz Böhler***, li ne povas forgesi sian hipokratan ĵuron kaj rompas ĉiujn kampajn regulojn por povi operacii iun oficiron pri peritonito. La kuracisto kaj lia teamo krom ŝtelo, povas esti akuzitaj je murdo, se la leŭtenanto mortos...
**Stalingrado: batalo en la infero.** Ĉi tiu okcident-germana filmo pri la temo estis farita proksimume en la epoko kiam la lasta germana militkaptito revenis hejmen el Sovetunio. La filmo prezentas la vivojn de **Wehrmacht**-soldatoj kaj iliaj rumanaj aliancanoj post ilia kapitulaco en Stalingrado, kie ili estis kaptitaj. La reĝisoro de la filmo uzis en la filmo aŭtentikan dokumentan filmitan materialon.
**Ili batalis por sia patrujo**. Ĉi tiu filmo de la oskar-gajninto





















sovetia reĝisoro ***Sergej Bondarchuk*** elstaras inter la filmoj dediĉitaj al Stalingrado. Surbaze de la samnoma romano de ***Mihaail Ŝolokhov***, kiu gajnis la Nobel-premion pri literaturo, la filmo rakontas la historion de taĉmento, kiu rezistis la germanan ofensivon en Stalingrado somere 1942. La fama sovetia verkisto kaj aktoro, ***Vasili Shukshín***, ludis sian lastan rolon en ĉi tiu filmo, kaj ĝenerale la filmo prezentas multajn sovetiajn aktorojn de la tempo, inkluzive ***Bondarchuk*** mem. La filmrevuo ***Sovétsky Ekran*** nomis ĝin la plej bona filmo de 1976.

**La malamiko ĉe-porde**. Ĉi tiu filmo estas eble la plej fama en Okcidento pri la Batalo de Stalingrado. Farita de franca reĝisoro ***Jean-Jacques Annaud***, la centra konflikto de la filmo estas persona duelo inter du kaŝpafistoj luditaj de ***Jude Law*** kaj ***Ed Harris***. Dum la filmo ricevis neegalan ricevon en Rusio, ĝi estis laŭdita pro sia skalo kaj delikataj bildoj. Tamen ĝi estis kritikita pro tio, ke ĝi prezentis multajn historiajn erarojn kaj kliŝojn. Iu specialisto taksis la filmon "netolerebla kiĉa" por filmo, kiu "pretendas portreti la plej grandan batalon en la historio de militado". En alia analizo, la ideo de la filmo estis esprimita tiamaniere: "Sovetiaj soldatoj estas skurĝitaj por iri batali kiel brutoj kiuj estus pelataj al la buĉejo, kaj ili estas pafitaj de siaj propraj punaj unuoj, kiam ili retiriĝas. Ili estas malpuraj kaj mizeraj male al la bone trejnitaj kaj bone ekipitaj germanoj".

**Stalingrado**. Filmo de la jaro 2013. Unu el la lastaj rusaj provoj prezenti la batalon estis ambicia projekto kun granda buĝeto laŭ lokaj normoj: 30 milionoj da dolaroj. Reĝisorita de ***Fjodor Sergejeviĉ Bondarĉuk***, la filo de la kreinto de la filmo: **Ili Batalis por sia lando**, ĝi estis sukceso de vidpunkto de atingitaj enspezoj: pli ol 68 milionojn da dolaroj.

Nu, konvenas ne forgesi ke ĉi-ĉiuj filmoj pri la Batalo de Stalingrado estas interesaj ĉefe de historia kaj milita vidpunkto; ili nur iom flankece tuŝas la aferon de la faŝismo. Se ni dediĉas al ili ioman atenton estas pro tio ke tiu batalo estis la deir-punkto de la milito, t. e. la komenciĝo de la fino de la hitlerismo, kaj krome la ne-retiriĝo de la germana armeo, eĉ en senespera situacio, estis sekvo de la obstina teniĝo de la **Führer** pro ties politikaj vidpunktoj. Do, ni ne dediĉos saman atenton al aliaj filmoj pri la milito kiu ne havas tian rilaton. Ekzistas, ja, bonaj tiutipaj filmoj: ***The***

***Longest Day*** (La plej longa tago), kiu prezentas la elŝipiĝo de la aliancaj trupoj en Normandio la 6-an de junio de 1944, kaj: **La batalo de Ardenoj, Ĉu Parizo brulas?,** k. a. Sed nia atento nun iras al tiuj filmoj kiuj povas iom instrui pri la faŝismoj, ties kaŭzoj kaj sekvoj.


Al tiu tipo apartenas filmoj kiaj: **Hitler: The Last Ten Days** (Hitlero: la dek lastaj tagoj). Estas brita-itala filmo, de la jaro 1973. Ĝia daŭro estas: 110 minutoj. Reĝisoris ĝin ***Ennio De Concini***, laŭ propra scenaro lia kaj de ***Wolfgang Reinhardt*** kaj ***Gerhard Boldt***. La rolon de Hitlero ludis la aktoro ***Alec Guinness***, kaj tiun de ***Eva Braun***, la aktorino ***Doris Kunstmann***. La filma intrigo baziĝas sur atesta rakonto, verkita de ***Gerhard Boldt***, supervivanto de la **Führerbunker**.


Alia filmo pri la sama temo estas tiu titolita: **The bunker** (La bunkro), de la jaro 1981. Ĝi estas usona filmo reĝisorita kaj produktita de ***George Schaefer***, kun scenaro de ***Uwe Bahnsen*** kaj ***James P. O'Donnell***. Ludis la rolon de Hitlero ***Anthony Hopkins,*** kaj tiun de ***Eva Braun, Susan Blakel***. La filmo rakontas la lastajn monatojn de Hitlero, lian restadon en la Berlina bunkro, la perfidon de multaj el liaj plej proksimaj amikoj. Pro malsanoj kiel Parkinson, li komencas havi iluziojn de grandiozeco dum la nehaltigebla antaŭeniĝo de la aliancanoj al la koro el Germanio.

La germana filmo titolita: ***Tod im Führerbunker - Die Geschichte von Hitlers Untergang*** (Morto en la bunkro - La dekadenco de Hitlero), de la jaro 2004, kun daŭro de 80 minutoj, reĝisorita de ***Michael Klof***, baziĝas sur la biografio de Hitlero verkita de ***Ian Kershaw***. Ĉi-kaze temas pri dokumenta filmo, kun prezentado de film-fragmentoj de la dua mondmilito, ne pri ludado de geaktoroj. La intrigo de la filmo faras iujn demandojn kies respondo estis supozeblaj sed ne certaj: ĉu Hitlero tiutempe estis fizika kaj psikologia ruino atendanta trupojn ne plu disponeblajn, aŭ ĉu lia fino estis malvarme planita akto de fiaskinta fanatikulo? Ĉu Hitlero pafmortigis sin, kiel postulis la honoro de la prusa soldato, aŭ ĉu devis fari al li tiun servon iu lojala servisto post kiam li mordis venenan kapsulon?...

Fine, tiu germana filmo titolita: **Der Untergang** (La falo), de la jaro 2004. Ĝi estas kunproduktaĵo germana, itala kaj aŭstria. Ĝia daŭro estas 156 mintoj (178 minjutoj en ties plej ampleksa versio). ***Bruno Ganz*** ludis la rolon de Hitlero.











La filmo estis reĝisorita de ***Oliver Hirschbiegel*** kun scenaro de ***Bernd Eichinge***. La intrigo de filmo estas rakontado de lastaj tagoj de la **Führer** de vidpunkto de iu el liaj sekretariinoj, ***Traudl Junge***. La rakontata historio okazas preskaŭ tute en la bunkro, kie ***Adolf Hitler*** kaj liaj kunuloj rifuĝis dum la lastaj semajnoj de la Berlina Batalo. La filmo estis nomumita al Oskar-Premio kiel Plej Bona Fremdlingva Filmo.
Alia temo en rilato kun la faŝismo estas tiu de la rasismo. En la kazo de la germana naziismo, tiu rasisma tendenco alprenis la makabran formon de amasa rasmortigo, la ekstermado de milionoj da homaj estaĵoj pro la sola kialo aparteni al iuj specifaj etnoj: slavoj, ciganoj kaj ĉefe judoj.
Estas malfacile kalkuli la nombron da viktimoj. Oni taksas ke estis proksimume ses milionoj da mortoj de la juda komunumo. Kaj ke, entute, mortis minimume dek unu milionoj da homoj, el kiuj unu miliono estus infanoj, kaj el la judoj loĝantaj en Eŭropo antaŭ la holokaŭsto, ĉirkaŭ du trionoj estis murditaj. Laŭ iuj infomfontoj la holokaŭsto-maŝinaro havis reton de ĉirkaŭ 42.500 instalaĵoj tra Eŭropo por limigi kaj mortigi siajn viktimojn, kaj havis la rektan partoprenon de ĉirkaŭ 100.000 kaj 500.000 homoj por ĝia planado kaj ekzekutado, inter la uzataj metodoj estis sufokado per venena gaso, pafado, pendumado, deviga laboro, malsato, pseŭdo-sciencaj eksperimentoj, medicina torturo kaj batoj.
Pri tiu ĉi temo ekzistas sufiĉe da televid-filma materialo, trovebla ankaŭ en Interreto. Ekzemple, estas tiu plur-ĉapitra filmo titolita: **AUSCHWITZ-La Sekreta Historio de la Tria *Reich* (la naziistoj kaj la fina solvo)**. Estas ankaŭ tiu titolita: **Holokaŭsto – la koncentrejoj senmaske**. Krome estas la ses-ĉapitra kolekto: **La nazia holokaŭsto**, la tri-ĉapitra: **Holokaŭsto** kaj tiu de la jaro 2005: **La holokaŭsto - kroniko de ekstermado**. La filma enhavo de ĉi tiu dokumenta materialo estas de la nazia epoko, sed ne ĉiu apartenas al la afero de la Holokaŭsto sed estas ankaŭ de aliaj tiamaj eventoj: militistaj kaj SS-trupoj defilante, bildoj de mitingoj de Hitlero…
Pri la Holokaŭsto mem estas filmoj, kaj fotoj, de la kolonoj da arestitaj judoj marŝante al la koncentrejoj, al la fervojaj stacidomoj por ties translokiĝo al tiuj lokoj,



sed pri la koncentrejoj mem, la filma kaj fota materialo, kompreneble, plejparte el ĝi ne estis farita de la SS-anoj kaj ankaŭ ne de la viktimoj; tiu materialo estis farita post la kapto de la koncentrejoj far la kontraŭ-naziaj armeoj.




Krom ĉi tiu menciita dokumenta filmaro estas ankaŭ la filmoj poste faritaj por pritrakti, ec se ne rekte, la aferon de la nazia rasmortigo. Inter ili, ni povas mencii: **La taglibro de Ana Frank**, usona filmo de la jaro 1959 bazita sur teatraĵo kiu siavice estis bazita sur la taglibro verkita de tiu nederlanda knabino inter la 12-a de junio de 1942 kaj la 1-a de aŭgusto de 1944, kiam ŝi estis arestita de la naziistoj kaj translokigita al koncentrejo, kie ŝi poste mortis.





Ankaŭ tiu titolita: **La lasta trajno al Auschwitz**, germana kaj ĉeka filmo de la jaro 2006 kiu priskribas turmentan sestagan fervojan translokigon de kondamnitoj al tiu fama koncentrejo.


**La fina solvo (Conspiracy)** estas usona filmo el 2001, kiu rekreas la konferencon de ***Wannsee***, la 20-an de januaro de 1942, kie la fina solvo estis forĝita kontraŭ la juda popolo. La 20-an de januaro 1942, dek kvin viroj, inter ili ***Reinhard Heydrich***, sigelis la sorton de la juda loĝantaro en Eŭropo. Post 90 minutoj de la kunveno, la projektoplano de la fina solvo de Hitlero estis preta. ***A. Eichmann*** preparis 30 ekzemplerojn de la protokolo de la kunveno, kiu, kiam la **Reich** falis, malaperis aŭ detruiĝis, ĉiuj escepte unu. La protokolo ***Wannsee***, aperinta en la oficejoj de la Ministrejo pri Eksterlandaj Aferoj de la **Reich**, estas la sola dokumento, en kiu la detaloj de la plano de Hitlero estis koditaj.




La filmo: **Schindler's List** (La listo de ***Schindler***), de la jaro 1993 estis reĝisorita de ***Steven Spielberg***. Intrigo: ***Oskar Schindler*** (***Liam Neeson***), germana komercisto kun granda talento por publikaj rilatoj, celas gajni la simpation de la naziistoj por sia persona gajno. Post la invado de Pollando fare de la germanoj en 1939, Schindler akiris, danke al siaj rilatoj kun la altaj naziaj hierarkoj, la posedaĵon de fabriko en Krakovo. Tie li kontraktas centojn da judaj laboristoj, kies ekspluatado igas lin rapide pliriĉiĝi, dankon ĉefe al sia administranto ***Itzhak Stern*** (***Ben Kingsley***), ankaŭ judo. Sed dum laŭlonge de la milito, ***Schindler*** kaj ***Stern*** ekkomprenas, ke la judoj, kiujn ili dungas, estas savitaj de preskaŭ certa morto en la timinda koncentrejo de ***Plaszow***, gvidata de la nazia komandanto ***Amon Goeth*** (***Ralph Fiennes***), kruela homo kiu ĝuis ekzekutante judojn.












Krom ĉi tiuj menciitaj filmoj, estas aliaj el la sama tipo: **La pianludisto**, **La falsistoj**, **Sendestine**, **Iu eksterordinara tago**… Kaj filmoj kiuj pritraktas ne la temo de la Holokaŭsto specife sed kiuj iu aŭ alimaniere rilatas al la naziismo, ties komencîĝo, ties epilogo… Inter ili estas la famkonata: **Casablanca**, de la jaro 1942, reĝisorita de ***Michael Curtiz***. Ĝi rakontas romantikan dramon en la maroka urbo Kazablanko sub la kontrolo de la registaro de ***Vichy***; ĉefaj geaktoroj estis ***Humphrey Bogart*** kaj ***Ingrid Bergman***. La intrigo centriĝas sur la konflikto inter amo kaj virto: La protagonisto devas elekti inter sia amantino aŭ agadi justece. La dilemo estas ĉu aŭ ne helpi ŝin eskapi de Kazablanko kun ŝia edzo, unu el la gvidantoj de la Rezistado, por ke li povu daŭrigi sian batalon kontraŭ la naziistoj.

La filmo: **La caduta degli dei** (La falo de la dioj) estas itala kaj okcident-germana produktaĵo de la jaro 1969, reĝisorita de ***Luchino Visconti***. Ĝi priskribas la situacion en la Germanio de la Vajmara Respubliko (1918-1933) kaj reprezentas la katastrofajn efikojn de la ascendo de la naziismo sur aristokrata familio de germanaj industriistoj. La titolo de la filmo aludas la operon de ***Wagner***: **Götterdämmerung** (Krepusko de la dioj), kaj pritraktas temojn de tiu opero, kiel incesto, pedofilio, troa ambicio de potenco kaj perfido.


La usona filmo de la jaro 1961: **Judgment at Nuremberg** (En Hispanio: **Venkintoj kaj venkitoj**), surbaze de scenaro verkita por televido, fokusiĝas al la historiaj Juĝoj de Nurenbergo al naziaj responsuloj post la fino de la milito, konkrete al juĝistoj, kiuj aplikis nazian juron dum la Tria ***Reich***, sub la historia dilemo pri la ebla respondeco de la germana popolo rilate al la holokaŭsto. La proceso, kiun prezentas la filmon, baziĝas sur la «kazo ***Katzenberger***», en kiu judo estis akuzita pri "nedeca rilato" kun arja virino kaj kondamnita al morto en 1942.

Alia filmo pri la samaj Juĝoj estas tiu titolita **Nuremberg**, ankaŭ ĝi usona, de la jaro 2000. La filmo, reĝisorita de ***Yves Simoneau***, estas sufiĉe longa (180 minutoj), tial estas dividita en du partojn. Ĝi amplekse prirakontas la Procesojn de Nurenbergo, kiuj daŭris de la 20-a de novembro 1945 ĝis la 1-a de oktobro 1946. Estis juĝitaj dudek kvar naziistoj, militistoj kaj civiluloj, pro la krimoj faritaj dum la milito, oni sentencis al morton dek-unu kondamnitojn. Unu el ili, ***Göring***, memmortigis antaŭ la ekzekutado. La ceteraj estis kondamnitaj al kelkjara, kaj unu, ***Hess***, al dumviva enprizoniĝo.

Ankaŭ en Hispanio oni faris, post la milito, filmojn pri la temo de la faŝismo. Post la milito, kaj ankaŭ post la morto de ***Franco***, ĉar dum ĉi ties diktaturo estis nenia ebleco je arta kreado en rilato kun la politiko.
En la jaro 1986 estis farita la filmo titolita: **Dragon Rapide**, kies reĝisoro estis ***Jaime Camino***. Ĝi prirakontas la okazaĵojn antaŭ la puĉo en julio de 1936, montrante la agadojn de generalo ***Francisco Franco***. La filmo havis la kunlaboron de ***Ian Gibson*** kiel historia asesoro. La Generalo ***Franco*** estas en Kanarioj. Li instigas iujn fidindajn generalojn dungi aviadilon (***Dragon Rapide***) en Londono por helpi lin alteriĝi en la Hispana Protektorato de Maroko kaj gvidi la baldaŭan armean ribelon, kiu kondukus al la Civil-Milito.




***Libertarias*** (Liberecaninoj) estas filmo de 1996, reĝisorita de ***Vicente Aranda***, surbaze de samnoma romano de ***Antonio Rabinad***, kiu prirakontas travivaĵojn de juna monaĥino kiu, en la komenciĝo de la hispana Civil-Milito, kiu forkuras de ŝia konvento kaj hazarde renkontas grupon de anarkiistaj milicaninoj kaj partoprenas kun ili en iuj militaj faroj. Pri tiu ĉi filmo ekzistas pli ampleksa recenzo en Esperanto en la retpaĝo de **Astura Esperanta Asocio**, en la adreso:
*https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/recenzoj/filmoj/libertarias/libertarias.html*




**Las 13 rosas** (La 13 rozoj) estas filmo de la jaro 2007, reĝisorita de ***Emilio Martínez-Lázaro***, bazita sur iu reala historio. Dek tri junulinoj, fakte senkulpaj, estis arestitaj monaton post la fino de la hispana civila milito. La 3-an de aŭgusto 1939 ili estis juĝitaj, akuzitaj pri disdonado de flugfolioj baldaŭ antaŭ la eniro de frankismaj trupoj en Madridon, en marto de la sama jaro. En la proceso ili estis kondamnitaj al morto. La limdato, la 5an de aŭgusto, ili estis mort-pafitaj. Ili havis inter 16 kaj 29 jaroj. Ekde tiam, ili estis konataj kiel «la Dek tri Rozoj».




Fine, ni menciu iun komikan filmon pri la malbeninda frankisma diktaturo. **Espérame en el cielo** (Atendu min en la ĉielo) estis reĝisorita de ***Antonio Mercero*** en la jaro 1988. La filma titolo prenas sian nomon de kiu kanto de ***Antonio Machín***. La intrigo: Iu hispana ordinara viro, pro sia hazarda simileco al la diktatoro ***Francisco Franco*** estas kidnapita kaj trejnita por anstataŭi ĉi tiun en oficialaj aktoj. Ĉiuj konsideras lin morta, sed fine rezultas ke la anstataŭo tiele estis kompleta ke estis li kaj ne ***Franco***, la entombigita en la «Valo de la Falintoj».




HUMURO PRI LA DIKTATURO
Sinjoroj Ministroj: vi scias kiom malfacila estas la situacio de nia landa ekonomio. Pro la milito, la post-milito, la internacia blokado... Kiel ni solvos la aferon?
Ĉu iu el vi havas ian ideon?
Mi pensas ke ni povus deklari militon al Usono... Tiele kiam ili estus venkinte nin, la uson-anoj, laŭ sia kutimo en tiaj kazoj, aplikus *Marsall*-planon por nia ekonomia rekuperado...
Hmm... Ŝajnas bona ideo... Sed... Kion se en la milito venkus ni?
Mussolino deklaras ke li estas la sendito de Dio. Sed Hitlero insistas ke la sendito de Dio estas li.
Kiaj stultaĵoj!... Mi sendis neniun!